

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Specimena numero-unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 102 (Ninth Year) Melbourne (Melbourne), Australio.

10 Januaro 1929

ALVOKO DE LA PREZIDANTO DE I.C.K. AL LA ESPERANTISTARO.

Karaj gesamideanoj,

Kiel Prezidanto de I.C.K. mi deziras hodiaŭ fari alvokon, ne sole al miaj samlandanoj, sed al ĉiuj samideanoj tutmondaj.

Jen mia peto: Ne okupu vin pri kritikaj plendoj kaj malgrandaj flankaferoj, sed, forĵetante ĉiujn personajn ĉagrenojn, forgesante ĉiujn pensojn pri via propra gloro kaj honoro, laboru senĉese por la pli rapida efektivigo de la revo de nia kara majstro.

Al la eminentaj gvidantoj de niaj Naciaj Societoj mi simple diras: Iru antaŭen en harmonio kaj konkordo. Fermu la okulojn kontraŭ negravaj plendoj, evitu disputojn pri bagatelaj aferoj. Havu fidon kaj kuraĝon. La nokta mallumo pasis kaj la suno brilas super nia movado. Oni konstatis, ke vermo per persisteco kaj pacienco iam naĝis de Eŭropo ĝis Afriko. Per diligenteco kaj pacienco ni povos atingi la celon en gloro.

Al la redaktoroj de niaj gazetoj kaj revuoj mi permesas al mi proponi: Evitu en viaj ŝatataj paĝoj ĉiujn polemikojn kaj akrajn disputojn pri tute ne gravaj aferoj kaj senĉese disvastigu kuraĝigajn artikolojn kaj novaĵojn. Kaj pri alia multe pli grava afero mi fervore petas vian subtenadon. Mi estas nur komercisto . . . ne aŭtoritatulo pri lingvaj aferoj. Pro tio mi neniam misuzas la tempon pri demandoj, kiuj ne alportas

profiton al la movado. Mi propagandas la lingvon kaj lasas la diskuton pri lingvaj punktoj en la manoj de la Lingva Komitato. Mi esperas, ke ĉiuj redaktoroj kore kaj lojale subtenos niajn laŭstatute elektitajn aŭtoritatojn kaj dediĉos siajn grandajn kapablojn kaj energiojn al la pli grandigo de la movado. Dum almenaŭ unu aŭ du jaroj ni bezonas nepran pacon por povi labori. Se la Lingva Komitato aŭ alia institucio de nia movado ne agas laŭ niaj deziroj, ni ĉiam posedas la necesan povon anstataŭigi ĝin per aliaj homoj. Same pri niaj aliaj organizaĵoj. Sed ni nepre devas agi laŭ la principo, ke kiujn ajn ni elektas, tiujn ni devas lojale obei. Mi turnas min al vi hodiaŭ, estimataj redaktoroj, kun la espero, ke vi helpos min je la nuna momento, ĉar mi bone scias, ke vi posedas la povon krei kaj kreskadi novan spiriton de harmonio kaj amikeco en niaj rondoj tutmondaj. Ne sufiĉas, ke ni prediku pri frateco buŝe, se ni ne sentas amikecon kore.

Al la grupanoj mi deziras diri: Neniam forgesu, ke la forteco de la movado vere troviĝas nek ĉe la I.C.K., nek ĉe la Naciaj Societoj, sed ĉe VI! Ĉar el viaj rondoj oni ĵetas la semojn per kiuj la tutmondo movado riĉiĝas, kiu alportas al ni ĉiam-kreskantan rikolton. Tial viaj klopodoj kaj vigla propaganda laborado estas nepre necesaj por la triumfo de nia sankta afero.

Mi havas la planan fidon pri la frua sukceso de esperanto kaj, kvankam

gis nun mi ne multe partoprenis la internacian vivon de la movado, mi esperas, ke helpite de la Ĝenerala Sekretario de I.C.K., sro Robert Kreuz, kun kiu mi jam kiel eble plej intime kunlaboras, mi rapide akiros la kapablecon plenumi miajn novajn devojn je la kontentigo de niaj estimataj kunkomitatoj kaj de la tuta esperantistaro.

Kuraĝe antaŭen! karaj gesamideanoj. Mi vere kredas, ke en la spaco de eble dek jaroj, Esperanto estos ĝenerale akceptita kiel unu — se ne la sola — el la oficialaj lingvoj en ĉiuj internaciaj kongresoj. Sed tio okazos nur, se ni daŭrigas labori ŝultron apud ŝultro, manon en mano, ne serĉante personan honoron, sed batalante entuziasme kaj kuraĝe por la multe pli nobla celo de Tutmonda Frateco kaj Senĉesa Paco.

JOHN MERCHANT, Prezidanto de la Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado.

ESPERANTO AND WIRELESS.

At its sitting on 29th September, 1927, at Como the Council of the International Union of Radiophony unanimously adopted a new resolution in favour of Esperanto, of which the following is the principal passage:

“Whereas Esperanto constitutes a powerful means of intercomprehension and reconciliation between nations, the Council again invites the members of the Union to give the most serious attention to that language and particularly to retain the teaching of it in their programmes.

Referring to the resolution of the General Assembly of 12th May at Lausanne, the Council recommends members to apply to the International Central Esperanto Committee in Geneva — in relation with the Secretariat of the International Union of Radiophony — which has offered its services to stations for the purpose of indicating local Esperantist collaborators, and is also prepared to publish an international time table of broadcasting in Esperanto, with a view to facilitating the success of the undertaking.”

—I.E.S.

Address subscriptions to Manager, “Suda Krucio,” Box 731f, Elizabeth St. P.O., Melbourne.

KONGRESO ANTVERPENO.

Geneve, 10 Novembro 1928.

Tre estimataj samideanoj,

En la septembra numero de La Suda Krucio ni legis sub “Wellington” noton, ke en la Novzelanda gazetararo bedaŭrinde aperis eĉ ne unu noto pri la Antverpena kongreso kaj ke vi sciigas tion por kinsidero al nia komitato.

Ni deziras informi vin, ke en la kongreso kompreneble estis organizita bone funkcianta gazetararo servo, kiu ĉiutage dissendis informojn kaj notojn pri la okazintaĵoj. Specialaj notoj ankaŭ estis faritaj por la telegraficejoj. Estas fakte bedaŭrinde, ke neniu noto aperis ĉe vi, sed ni povas nenion fari por tio, ĉar tio ne dependas de nia influo. Jam du jarojn, unu post la alia, ni rimarkas ke en tuta Aŭstralio kaj Oceanio aperas nenia novaĵo pri niaj kongresoj.

Evidente tio dependas de la agentejo Reuter, resp. de ĝia korespondanto por Aŭstralio. Plej bone estus kompreneble mem sendi kablegramon al Novzelando, sed por tio mankas la necesaj monrimedoj kaj povas okazi, ke eĉ tiam kablegramon la tiea gazetararo ne akceptos kaj tiam la elspezo estis vana.

Laŭ ni ekzistas nur unu rimedo, ke vi insistu ĉe la diversaj redakcioj kaj la reprezentantaro de la eŭropaj agentejoj tie, ke ili ne pretervidu nian movadon.

Kopion de tiu-ĉi letero ni sendas al nia prezidanto, kiu samtempe estas prezidanto de la Brita Esperanto-Asocio.

Eble li povos, pere de B.E.A., influ la aferon por ke estonte vi ne plu havu okazon, esti malkontentaj.

Ni deziras ankoraŭ altiri vian atenton al tio, ke niaj kongresoj ne estas nur kongresoj de U.E.A., sed de la tuta neŭtrala Esperanto-movado; U.E.A. ne plu havas apartajn kongresojn.

Ni multe dankas vin, se en la venonta numero de via organo vi bonvolos fari mallongan noton pri nia zorgo koncerne tiun aferon.

Intertempe ni sendas al vi, tre estimataj, karaj samideanoj, kun koraj bondeziroj por via laboro, niajn plej sincerajn kaj samideanajn salutojn.

Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado

ROB-KREUZ, Ĝenerala sekretario.

KURSO PER TRADUKADO.

(Kondukata de S-ro. George Gordon,
F.B.E.A.)

Antaŭaj tradukoj kaj notaroj en ĉi tiu kurso aperis en la numeroj de Junio ĝis Decembro de la Suda Krucio. Studantoj dezirantaj kursaniĝi devus havigi al si tiujn numerojn, ĉar en estontaj notaroj ofte estos referencoj al klarigoj en ili. Por ricevi estontajn tradukotajn pecojn ili sin turnu al Miss Blyth, 10 Victoria-av., Surrey Hills, E10, sendante al ŝi po 4 pencoj kaj unu adresita, afrankita koverto por ĉiu peco. Oni povas ricevi tradukotajn pecojn 1 ĝis 9 po 4 pencoj por ĉiu.

TRADUKO 8.

Videtoj al Nova Gvineo
(daŭrigata).

Veturinte (1) kvin tagojn de Brisbane oni saĝe forlasu la liton por rigardi la levigon de la suno, dum la ŝipo, manovrante (1) tra (2) tordecajn pasejojn veturas preter sennombraj insuletoj, vestitaj (10) de la plej bela verdaĵo de la supro ĝis la marbordo. Ie kaj ie (3) estas atesto de terkultivado (4), kaj videblaj inter kokosaj palmoj staras malgrandaj bangaloj (unuetaĝa domo kun verando) (5), pri kiu oni imagas, ke tie estus eble pasigi idilian vivon de kontento.

Nun la ŝipo atingas la unuan vizitatan havenon, Samaraj, kaj oni aligas ĝin al malgranda elŝipejo. Ĉi tiu insuleto, administrata de Papuo, estas vera Edena ĝardeno. Ĝi havas (6) nur kvindek tri akrojn (ĉirkaŭ 2145 arojn), kaj laŭ larĝa vojeto el pistita koralo kaj borderita de palmoj oni povas nerapide ĉirkaŭmarŝi la insulon dum malpli ol duono de horo. Flanke de la vojeto vidiĝas brilkol-
oraj (7) kaj de hibiskoj (7) borderitaj vojstrektoj, kondukantaj (10) al loĝdomoj, el kiuj iuj, starantaj (10) alte sur la mezo de la insulo, povas rigardi sur belan kaj vastan perspektivon. Preskaŭ ŝajnas malhonoro (8), ke oni faras ordinaran negocon sur tiu mare zonita gemo. Tamen Samaraj servas kiel deponejo de komercaĵoj por la orienta parto de Papuo, kaj ĉe la ĉefa strato staras butikoj, tri hoteloj kaj preĝejo kaj aliloke klubdomo, hospitalo, banko kaj senfadena telegrafa stacio. Poeziema

homo ricevas pluan skuon (9) vidante (1) aron da indiĝenaj punlaboruloj sidantaj (10) sur la grundo (11) kaj tondantaj (10) per longaj tranĉiloj la herbon de herbobedo, dum indiĝena policano kun bastono en la mano tenas sur ili pli-malpli (12) observantan okulon.

Lasinte (1) Samaraj, oni veturas laŭ la suda bordo de New Britain (elp. nju briten), la plej granda insulo en la submandata teritorio Nova Gvineo. La insulo estas longa (6) tricent Anglajn mejlojn (ĉirkaŭ 480 kilometrojn) (13) kaj larĝa sesdek ĝis naŭdek mejlojn (14) kaj havas amplekson de dek-trimil kvadrataj mejloj (ĉirkaŭ 33 kvadratkilometroj). Ĝi estas montabunda kaj estas dense kovrita de arbaregoj krom en la nordorienta parto de la duoninsulo Gazelle kaj aliloke en malgrandaj spacoj, kiujn oni senarbigis (15) por plantejoj aŭ indiĝenaj ĝardenoj. Nur malmulton de la marbordo de New Britain oni detale surkartigis. Dum sia lastatempa flugo al la Pacifikaj insuloj grup-kapitano Williams raportis, ke li vidis de supre almenaŭ dek du grandajn riverojn, kiuj ne troviĝas sur kiu ajn (16) geografia karto. Grandaj areoj de ĉi tiu kaj aliaj insuloj ne estas esploritaj, kaj preskaŭ nenie en la teritorio ekzistas registara posteno aŭ misiejo proksime malpli ol dek (17) mejlojn (16 kilometrojn) de la oceano. La orienta, norda kaj okcidenta marbordoj de New Britain konsistas el ĉeno de vulkanoj, el kiuj multaj ankoraŭ estas vivaj. Inter la vulkanoj plej ofte estas ebenajo, malofte montoĉeno. Mallumiĝas dum ni rigardas la marbordon, kaj baldaŭ sur ĝia malklare videbla konturo je regulaj interspacoj aperas malgrandegaj punktoj de lumo, signantaj (10) la fajron en indiĝenaj vilaĝoj. Antaŭ la mateniĝo oni faligas la ankron en golfeto Blanche.

NOTARO 8.

1. Adverba participo. Notaro 2/10.
— 2. "tra" sekvata de akuzativo havas la signifon "through" (en ĉe unu flanko kaj el ĉe la kontraŭa flanko). Oni uzas "tra" kun nominativo por signifi "through," kiel en la frazo "Mi iradis tra la urbo" (through aŭ about in). Tamen iuj verkistoj uzas la nominativon en ambaŭ sencoj (L.R. pĝ 74). — 3. "ie kaj ie," Zam. en Rab. de Bah. 32/15. Troviĝas ankoraŭ "tie ĉi kaj tie" (Kabe, Far. ii,

152/17) kaj "tie ĉi tie." — 4. "terkultivi." En Biblio. Gen. 9/20, 2 Reĝ. 25/12. — 5. "bangalo" ankoraŭ ne estas oficialigita vorto, sed ĝi estas internacie komprenebla. — 6. Oni atente rimarku la diversajn manierojn por esprimi mezurojn. La bastono estas longa je du futoj (aŭ longa du futojn). La longo de la bastono estas du fotoj. La bastono havas la longon de du futoj. La bastono havas du futojn da longo. Tiel same ĉe pezo, areo, volumeno, ktp. — 7. "krotono," "hibisko" (Verax). — 8. "profan'" ankoraŭ ne estas oficialigita, kaj pro tio, ke la Angla "profane" havas diversajn signifojn, mi konsilas uzi "malsanktig'" aŭ "malhonor'" en la ĉi-tiea senco. El. 31/4, Lev. 21/12. — 9. "shock," skuo. Rab. 12/19, 38/25, 124/19. "ŝok'" ankoraŭ ne estas oficialigita. — 10. Adjektiva participo. Notaro 1/20. — 11. "ground" (surface of earth); "grundu." Rab. de Bas. 46/47. — 12. "more or less," plimalpli. Rab. 95/21. — 13. Kilometro estas ĉirkaŭ kvin okonojn de Angla mejlo. — 14. En tia esprimo oni uzas akuzativon, ĉar en ĝi "ĝis" ne estas prepozicio sed kvazaŭ parto de nedefinita numeralo sesdek-ĝis-naŭdek, — 15. Anstataŭ "kiuj estis senarbitraj." Notaro 1/21. — 16. Ekz. 30/8. — 17. Akuzativo, ĉar "ol" ne estas prepozicio.

KRONIKO.

MELBOURNE, Vic. — La plej grava okazaĵo de la monato estis festa vespero por honori d-ro Zamenhof je la datreveno de lia naskiĝo. Je la invito de s-ro kaj f-ino Pyke, ĉirkaŭ naŭdek gastoj kunvenis en la "Austral Salon" kaj ĝuis tre aŭdindan programon de kantoj, muziko, kaj teatraĵo. Dum la vespero s-roj Drummond, J. Skurrie (prez. Melb. Esperanto-Societo) kaj J. G. Pyke (prez. Melb. Esperanto-Klubo) faris taŭgajn paroladojn pri la kara Majstro. Fraŭlineto Shirley Dumbrell deklamis "Asfodeloj" tre naive, kaj s-ino. L. Smith kantis ĉarme "Miaj ŝipoj." "Ombraj Arboj" kantita de s-ro. McKenzie, oni bone akceptis kaj ankaŭ la kantoj de s-ro. Davidson "Mia Fil'" kaj "Vekiĝu" de f-ino. Joan Davidson. Tiam sekvis unuakta komedio, "La Amigilo" en kiu bone ludis la jenaj: Maud Helm, Phyllis Pyke, J. G. Pyke, G. Hussey, kaj R. Rawson. La komedio estas la verko de s-ro. Pyke, kaj estas certe ke la

aŭdantaro tre ĝuis la teatraĵon. Intertempe muzikistaro bone ludis, kaj la ĉeestantoj babiladis gaje. Poste oni servis al la gastoj frandaĵojn, en la feste ornamita ĉambro.

AUCKLAND, Nov-zelando. — Je konveno de la ĉi-tiea societo, okazigita je la 8a de Oktobro, ni plu diskutis la proponon refondigi nacian asocion; kaj decidis malgraŭ manko de monrimedoj provi aranĝi por reprezentado ĉe la sugestita konferenco en Wellington.

Dum pasinta monato polemiko rulis tra la kolonoj de loka taggazeto, "The Sun": iu skribis al la redaktoro volante ke la Kastila lingvo estu akceptata anstataŭ Esperanto kiel lingvo internacia. S-roj J. A. Hodges kaj C. J. Adcock (ambaŭ estas instruistoj) forte defendis Esperanton.

La sekretariino societa ricevis peton de la Junulara Kristana Asocio (Y.W.C.A.) gvidi Esperanto-kurson sub la aŭspicioj de la Asocio. Espereble konvenaj aranĝoj fariĝos.

S-inoj Watkin kaj Bloodworth, Esperantistaj membroj de la Parnell Lerneja Komitato, sukcesis aranĝi por la diskuto ĉe la okazonta komitata kunveno de la Aucklandaj Publikaj Lernejoj de la jena propono: — "Ke konsiderante la antaŭ-nelongan kreskegon de Esperanto kaj la favoregajn raportojn pri tiu lingvo de la angla profesoro Findlay kaj aliaj edukaj aŭtoritatoj bone konataj, la Aucklanda Eduka Departemento estu instigita konsideri la enkondukon de elementa kurso de Esperanto en la duagrada lernejo anstataŭ la franca lingvo." La kunlaboro kaj helpo de pluraj lernejaj komitatoj jam estas petitaj.

La eksterurba klaseto ĉe St. Heliers daŭras funkciadi progresante laŭdinde.

S-ino J. L. King, M.P.S., kiu vojaĝis al Antverpeno por partopreni en la 20a E. Kongreso, revenis al ni je la 10a de Oktobro kaj estis kore bonvenigita de malnovaj geamikoj.

HAMILTON, N.Z. — Dum Septembro lasta fondiĝis tie-ĉi "La Hamiltona Esperanto-Societo" kun ĉirkaŭ dudek da geanoj. Tio okazis post la sukceso-plena konkludo de la dua kurso gvidata sub la aŭspicioj de la Laboristara Eduka Asocio. Tre helpis nian aferon Pastro Paris, Esperantista redaktoro de la gazeto "Methodist Times," kiu anoncas pri la lingvo ĉiusabate.

FEILDING, N.Z. — Tiu malnova amiko de Esperanto, S-ro Rod Ross,

raportas ke li sukcese starigis Esperanto-klason ĉe Awahuri, vilaĝo apud Feilding. Konsistante el ses lernantoj, la klaseto kunvenas regule kaj faras kontentigan progreson sub la kapabla gvidado de S-ro Ross.

WELLINGTON, N.Z. — La klubo loka ĉiumarde kunvenas. Dum monato pasinta okazis, krom la instruado, kelkaj intereso-plenaj paroladoj, speciale menciinde estis tiuj de S-ro Bernstein, kiuj preparolis la temon "Pollando — la naskiĝlando de Esperanto." Ĉar S-ro Bernstein estas filo de Pollando, li povis provizi detalojn nevideblaj al alialandulo.

Tiuj ĉi kronikeroj estis sendita por la Novembra eldono sed pro bedaŭrinda eraro de la poŝto ne atingis nin ĝis post la Decembro eldono estis jam forsendita. (Red.)

AUCKLAND, Novzelando. — De radio-stacio 1YA (333 m. 500 v), la 27an Novembro S-ro J. Lowe King, M.P.S., parolis dum dekkvin minutoj pri Esperanto. Nia vigle laboranta samideano jam ricevis alian inviton preparoli la temon ankaŭ kanti en la lingvo.

La semajna gazeto, N.Z. Truth publikis tre bonan skizon de la multaj agadoj por Esperanto de S-ro King — nomita de la redaktoro kiel "The Esperanto Queen." Interalie la gazeto rakontis al sia pli ol naŭdek mil da legantoj pri ŝiaj spertoj kaj vojaĝo al Eŭropo. La redaktoro klare montris la praktikan valoran de Esperanto.

Dum Novembro S-ro C. A. Adcock lekciis al studantoj ĉe la Training College, kiuj aŭskultis atente kaj tre simpatie. Post konkludo kelkaj enketis pri lernado, k.t.p. S-ro Adcock ankaŭ intervjuis la sekretarion de la Y.M.C.A. pri la starigo de kurso kaj kiel rezulto estas preskaŭ certa ke klaso estos aranĝita en la aŭtuno.

HAMILTON, N.Z. — Nia agema organizanto, S-ro Adcock, del. de U.E.A., veturis al Aucklando dum la pasinta monato por propagandi lekciadi. Lia veturo estis tre sukceso-plena. La 9an Decembro li parolis

al la geknaboj de la Metodista Preĝejo, Hamilton, pri la lingvo.

Nia societo provizis al debatanto ĉe Ohura materialon por diskuto pri la temo "Esperanto en Lernejoj."

S-ro Adcock, kiu laboras vigle por la revivigo de la N.Z. 'a Esperantista Asocio raportas ke la kluboj ĉe Auckland kaj Christchurch, aldone al la nia, estas pretaj por esti reprezentataj en la proponita kunveno ĉe Wellington.

MASTERTON, N.Z. — Post tre sukceso-plena sezono la funkciado de la loka klubo interrompiĝis la 15an de Decembro (datreveno de naskatago de D-ro Z.) por la festa periodo. La nune videblaj signoj ja promesas bone por la venonta jaro.

FEILDING, N.Z. — La Esperanto-kurso gvidita de S-ro Rod Ross finiĝis sed tiom entuziasmaj restas la lernantoj ke ili petis al S-ro Ross restarigu novan dum la estonta vintro.

WELLINGTON, N.Z. — La variaj programoj aranĝitaj ĉe la ĉiumardaj kunvenoj de la ĉi-tiea klubo dum la pasinta monato estis altgradaj kaj edukigaj. La klubprezidanto, S-ro E. C. Jack, liveris pluajn paroladojn en Esperanto pritraktante tiajn temojn kiajn "La Eduka Flanko de Esperanto," "Nia Urbo — Wellington," "La Malpli Peza Flanko de Esperanto," kaj "La Fondito de Tutmonda Literaturo," ĉiuj el kiuj estis tre ĝuataj. S-ro Dust, Del. U.E.A., daŭris sian lekciadon pri diversaj partoj de Esperanto-gramatiko kaj S-ro Bertram Potts, F.B.E.A., provizis kelke da tre intereso-plenaj paroladoj, uzante por klarigceloj la nigran tabulon. Per tiuj simplaj kretaj skizoj kaj bone elektita parolmaniero, lernantoj ricevis utilan helpon elstudante kaj praktike la lingvon. S-ro W. L. Edman-son, F.B.E.A., multe aldonis al la ĝuado de la programoj deklamante du verkaĵojn de Shakespeare — "Hamlet's Soliloquy" kaj "The Seven Ages of Man" — sekvante kun monologo, "How Rubenstein Played the Piano."

HAROLD PUDNEY

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? rizorgas mendojn per poŝto. Memoru facila por via monujo. Li speciale p

ia adreson

Specialisto pri Fontanplumoj

Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

Ĉi-vespere instruado dum unu horo estis provizita. La kluba sekretario aranĝis por la publikado de raportoj pri la kunvenoj en la tagĵurnaloj per tiu ĉi metodo akirante por la klubo kaj Esperanto ĝenerale regulan kaj efikan propagandon.

Aranĝoj estas farataj por okazigi en nia urbo, ĉirkaŭ la 26a Januaro, konferencon de delegitoj, kiuj kunvenos por diskuti kaj esplori la proponon restarigi la N.Z. Esp. Asocion.

Pakaĵo de alte valora literaturo estis ricevita donace, pro kio la klubo kore dankas S-inon A. Chapman-Taylor, unu el la pioniroj de la lingvo en Novzelando, kiu restis dum pli ol dudek jaroj fidela kaj sindona al nia movado. Inter la literaturo troviĝas malnovaj eldonitaĵoj, kiuj provizos al la membraro bonegan legmaterialon.

SYDNEY, N.S.W. — Pro la Krisnaska libertempo, la pasinta monato estis tre mallonga por la Esperantistoj.

Plej skribinde estis la Zamenhof Vespero, kiam okazis la lastan socialan vesperon de la jaro 1928, kaj samtempe festis la datrevenon de nia majstro, Doktoro Zamenhof. En tiu ĉi okazo, Doktoro Williams parolis iomete pri la vivo de Zamenhof, kaj la kresko de la Esperanto-movado.

Kelkaj laboremoj ankaŭ ricevis premiojn, kiel dankesprimoj de la societanoj pro bonaj servoj. La ricevintoj de premioj estis, S-ro Pfahl kiu estas entuziasma sekretario de antaŭdek jaroj; F-ino Fairfield, estinta kasisto; kaj S-ino Ostler, Fino Boosey kaj Murphy, kaj S-ro Murphy, kiuj bone laboradis al la bone ŝatataj socialaj vesperoj.

Nur du paroladoj estis liverataj dum la monato, unu de S-ro Torr, titolita "Babilonio," kaj unu de S-ino Fleming, pri "Esperanto en Melbourne."

La agema prezidanto, D-ro Williams, ĵus libertempis ĉe la Bluaj Montoj, kaj faris gravan propagandon tie. Unu rezulto estas, la deziro starigi grupon ĉe Blackheath.

GAZETOJ RICEVITAJ.

Austria Esperantisto, 10; Amerika Esperantisto, 2-3; British Esperantist, 284; Bulgara Esperantisto, 1; Bulteno de E. Pres-Agentejo, 18; Esperanto, 9-10; Germana Esperantisto, 11; Heroldo de Esperanto, 44, 45; Informservo de la Internacia Labora Oficejo; Oomoto Internacia, 23; Svenska-Tidningen, La Espero, 8-9.

IGNORANCE OF FOREIGN LANGUAGES.

Kant was first made known to Edinburgh in 1803, not in the German original but through a French translation. John Stuart Mill was able, though with difficulty, to read German, but preferred reading translations, and never learnt to shift for himself in a German railway station. When Carlyle met Louis Blanc "it was the veriest fun to watch their conversation. Carlyle's French was a literal translation of his own untranslatable English, uttered too in his own broad Scotch. Louis Blanc could not at all understand him, but would listen attentively, and then answer very wide of the mark." (Car. Fox). Faraday knew no German, and consequently Robert Mayer's and Helmholtz's investigations were a "sealed book" to him. "How different," said Dean Stanley, "might have been the case of the Church of England if Newman had been able to read German." When a German scholar sent an annotated edition of Macbeth to Dr. Furnivall, the director of the New Shakespeare Society, the Early English Text Society, etc., the latter wrote back to regret that he could not read the notes, but that he saw from the figures that the author had gone into metrical questions. When Zola fled from France during the Dreyfus troubles, he was utterly unable to make himself understood in English. And the same was the case with the Danish poet Herman Bang, who died miserably in America in 1912 unable to make his simplest wants understood by those about him.

Nor is a similar inability unknown among statesmen. It is said that it was injurious to Denmark in her difficult political situation in the middle of the last century, that Madvig (the great Latin scholar) and other ministers spoke French with difficulty and felt shy of talking bad French to the foreign ambassadors. Similar things are reported from the World War. Sir Edward Grey could not speak French, and the French ambassador, Cambon, spoke bad English. None of the French or English generals, with the exception of Lord Kitchener, spoke the other nation's language at all well, and at the Peace Conference

Clemenceau gained an undue ascendancy because he was practically the only one who had complete command of both languages. It requires no unusual amount of wisdom to understand that confidential talks between mighty statesmen of different nationalities on topics of world-wide importance lose a great deal if they have to be carried on by means of interpreters; how much better if the mighty of the earth were able to meet on an equal footing linguistically speaking—but that could only be possible by means of a perfectly neutral language.

It is true that we have translators and interpreters, but good and efficient translators are neither plentiful nor very cheap. I take from Miss Pankhurst's book the bit of information that during 1926 the Geneva staff of the League of Nations included 29 translators and interpreters at salaries amounting to £19,800—besides shorthand writers and typists. And then, the League is only a modest beginning of that vast political organisation of the whole world which has to come in a not too distant future!

In these days of cheap travel, of commercial interchange between all parts of the world, of airplanes and broadcasting, of international science and of world-politics, it seems an urgent need for merchants, technical men, scientists, literary men, politicians, in fact for everybody, to have an easy means of getting into touch with foreigners and of learning more from them than is possible by visiting other countries as tongue-tied tourists. The word "international" was only invented by Jeremy Bentham in 1780—nowadays we have come to the point of needing an international language.

Let me mention here also the recent invention of the speaking film, which is now being brought to rare technical perfection. When Axel Petersen and Arnold Poulsen's "phonofilm" was shown to a small audience in Copenhagen, my thought leapt out to the time when by this means it would be possible to have plays and speeches made visible and audible and comprehensible all over the world—the advantages of cinema and radio combined and made still more useful by means of an Interlanguage.

(Prof. Jespersen: An International Language.)

NOVZELANDA POLITIKA ŜANĜO. Ĉu Esperanto Profitos?

Antaŭ ol la 14a de Novembro pasinta la Novzelanda Parlamento konsistis el tri ĉefaj partioj, t.e., Reformista, la Laborista kaj la Naciista, kiuj enkalkulis 54, 14, kaj 12 membrojn respektive. Post la gravega voĉdonado tiun daton, la partiaj fortoj staras jene: Reformista 28, Unuigita (novenomita) 32, kaj Laborista 19 membrojn.

Konsiderite de ĉiuj vidpunktoj la nuna politika situacio estas tre intereso-plena; kaj se konsiderite en la intereso de Esperanto, ĝi estas precipe promeso-plena. Rilate al tiu temo, la Reformista partio, de kiu S-ro Coates estas la ĉefulo, malfavoras Esperanton kaj ĉian internacilingvan ideon. Tio ja estis multfoje konfesita publike, parole kaj skribe. La Unuigita partio ankoraŭ ne havis sufiĉon da tempo por montri sian inklinon, sed la partiestro, Sir Joseph Ward, estis patrono de la nun dormanta Novzelanda Asocio Esperantista, kaj estintece favore priparolis la lingvon. La enkonduko de Esperanto en la publikajn lernejojn estis oficiala programero de la Laborista partio dum multaj jaroj.

El la supre-cititaj faktoj kompreniĝas ke estas tre verŝajne ke de post nun Esperantlingvaj aferoj ricevos en Parlamento pli simpatian konsideron ol antaŭe. Samideanoj tra Novzelando memorante la intereson de la nove elektita ĉefministro Ward en pasintaj jaroj, jam komencis unu la alian demandi pri la rezultato de la antaŭnelonga registarŝanĝo. Kvankam la opinioj de la individuaj membroj de la nova (Ward) administracio estas ankoraŭ nesciataj, la fakto restas ke la ties partiestro kun la tria (Laborista) partio favoras la ideon de lingvo internacia, kaj kune la du partioj tenos sufiĉon da forto enkonduki leĝojn, se oni tion dezirus, koncerne la oficialan akcepton kaj rekonon de Esperanto. Neniam antaŭe tiaj bonaj signoj sin montris en Novzelando kaj pro tio, espereble estas ke la laboroj de la N.Z.'aj Esperantistoj estonteco portos fruktdonajn rezultojn. Sen ia dubo la laboro estos multe pli faciligita.

Sekve al la alveno de la nova administracio registara, estas urĝa kaj tuja postulo por forta organizo nacia de samideanoj, kiuj unuigitaj en solida fronto povos meti la celojn de Esperanto aŭtoritate antaŭ Parla-

mento kaj la registraraj departementoj. La tempo por tiu organizstarado sendube nune estas oportuna; kaj la bedaŭro estas ke ni ne estas preparintaj.

Ni esperu ke la tagiĝo kiu donis al Novzelando la novan politikan ordon provos esti doninta al la landa Esperanto-movado prospero-plenan, sanan kaj plifacilan vivon. Voko.

WHO ARE INTERESTED IN ESPERANTO?

In connection with the 40th anniversary of Esperanto it is worth inquiring what kind of people are interested in Esperanto. Among the 1000 persons from 36 countries who took part in the 19th Universala Esperanto Congress in Danzig, there were among others: 5 statesmen, 58 men of science, 110 professors, teachers and schoolmasters, alone a hundred public officials, including a large number of postal and railway servants, 23 advocates and notaries, 33 doctors, 14 ecclesiastics, 22 editors and journalists, 64 commercial men, manufacturers, bankers, etc., and more than 150 students.

—I.E.S.

CHANGE OF ADDRESS.

The Melbourne Esperanto Society has moved to new rooms which are conveniently situated, yet removed from the disturbing noise of city traffic. The members will meet on Jan. 4th in the new rooms, in McEwan House, 343 Lit. Collins St. room No. 7, on the 4th floor.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Ni kvitanças la ricevon de donacoj kaj abonoj jene:— (la daton post la nomo kaj sumo montras al kiu dato la abono estas pagata). L. Irwin, 4/6, Juni 29.

HENRY E. CALWELL (Reg.)

Kuracadas malŝanulojn kun bonegaj rezultatoj per Osteopathy, Chiropractic, Dieto kaj aliaj sendrogaj metodoj.

Donas informon senpage.

11 COLLINS ST., MELBOURNE.

Tel.: Cent. 4018.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro J. Skurrie; sekretario f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: McEwan House, 343 Lit. Collins St., Room No. 7, 4th floor. Vendrede vespere, je ol oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 8-10 p.m. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; d-ro F. J. Williams; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 174 Burwood Road. Burwood.

Brisbana Esperanto - Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 3-a etaĝo, King House, Queen-str.: Prezidanto: Klement Kidd. Vicprezidantoj: Fraŭlino Rose MacPherson; M. Hyde. Sekretario: Fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane (Kvinslando-Queensland).

WELLINGTON ESPERANTO CLUB.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A., Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Mr. V. L. M. Daniel; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A., 34, Argentine Ave., Miramar; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A.

BOOKS YOU SHOULD READ.

Abismoj (Jean Forge)
Paper Covers 3/3
Aladin . . (Cox) . . Paper 6d.
Aŭstralio, Lando kaj Popolo
Delsudo kaj Laiho 7/6
La Biblio 7/6, 10/6, 15/-, 25/-
(According to paper and binding)

Dancu Marionetoj (Baghy) 2/9
La Faraono (Prus), in 3 Parts
Paper Covers 7/6 set.
Lilio . (Sinnotte) . Cloth 2/9
Luno de Izraelo (H. Rider Haggard)
Paper Covers 5/6.
Postage Extra.

LA BIBLIOTEKISTO, Melbourne Esperanto Society,
BOX 731 F., ELIZABETH ST. POST OFFICE, MELBOURNE.

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :
Box 731F, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :
Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Specimena numero-unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 104 (Ninth Year) Melbourne (Melbourne), Australio. 10 Februaro 1929

OUR ALPHABET JUSTIFIED.

(From the Esperanto of Dr. Privat
in "Esperanto," Dec., 1928)

The new law in Turkey changing the alphabet of the Turkish language will specially interest Esperantists. Here one sees that the Government of a great people has decided to force energetically the whole nation to abandon the old Arabic alphabet and to learn and use only the Latin letters.

Now, how are the different sounds of the Turkish language represented by the new alphabet? Are our Latin letters numerous enough to meet the phonetic principle of one letter for every sound?

The same problem that Dr. Zamenhof studied in his day has occupied for a whole year the close attention of an official commission of experts, which had to present its project for the approval of the President and Parliament of the Turkish Republic. It has solved it very much on the same lines as those laid down by Dr. Zamenhof. It rejected letter-combinations, such as SH or CH and preferred to make official the cedilla-letters S and C and the circumflexed letters ŝ and ĉ also ĝ for the special Turkish consonant GJ.

This should be brought to the notice of those facile critics of Esperanto who are too ready to affirm that the circumflex is out-of-date because Americans do not use it. Look! Hav-

ing radically changed its manners and customs in the last few years, this modern-minded, progressive republic of Turkey has given official approval to an alphabet very similar to that of Esperanto and so publicly confirmed the clear-sighted decision of Dr. Zamenhof.

In Europe, however, all modern printerries for a long time have had our circumflexed letters or even are using linotypes with free signs. It is a remarkable fact that all the new States in Europe use a phonetic orthography with circumflexes, while the western nations, who so firmly believe themselves modern and progressive, in point of fact use the most ridiculous and unphonetic orthography imaginable; this applies pointedly to the Americans, the British and the French.

It would be sheer madness for Esperanto to render its orthography old-fashioned and unphonetic in an effort to imitate, even in a minor degree, the English language. Esperanto does not live for this or that propaganda period. It lives and grows for the good of all mankind yet to be. To-morrow millions of children in schools throughout the world would be made to suffer unnecessarily, were we to spoil the relative perfection of its alphabet in order to avoid some insignificant expense to this or that dawdling printer.

—Trans. Robo.

GRAVAJ KONFESIOJ DE MOND-FAMA FILMDIREKTORO.

Los Angeles, Kalif. 25-a de Oktobro 1928.

La filmdirektoroj pli kaj pli interesiĝas pri Esperanto. Subite ili eltrovas ke universala lingvo estas absolute necesa se ili volas vendi parolantajn filmojn en la eksterlando.

Unu el la plej unuaj homoj rekomendantaj Esperanton estas la mondfamo filmdirektoro Fred Niblo ĉe la fama kaj grandega filmfarejo Metro-Goldwyn-Mayer Studio. Li estas la viro kiu filmis Ben Hur.

Antaŭ nelonge Jesepe R. Scherer, la delegito de UEA kaj Prezidanto de la Esperanto Klubo de Los Angeles, kune kun D-ro Chas. R. Witt, Vic-Prez. de la klubo kaj VD de UEA, havis la honoron esti invitataj viziti S-ron Fred Niblo kaj S-ron Joe Polonsky en iliaj oficejoj por diskuti la eblecojn kaj planojn pri la elekto de Esperanto por la parolantaj filmoj. Kelkaj el la direktoroj de tiu granda filmfarejo M-G-M estas favoraj al Esperanto, ĉar ili ekkonas la fakton ke Esperanto estas nepre necesa por universala sukceso de la parolanta filmo.

La famo filmdirektoro tre afable respondis je multaj demandoj. La respondoj jam estis presataj en multaj Usonaj gazetoj sed ĉi sube mi volas ripeti la plej gravajn eldirojn de la konata Fred Niblo. Jen la demandoj de S-ro Scherer kaj la respondoj de S-ro Niblo:

D. Kiam vi unue aŭdis pri Esperanto?

R. Antaŭ multaj jaroj mi legis pri Esperanto kaj aŭdis pri ĝi kiam mi laboris en Eŭropo.

D. Kial vi nun subite estas pli multe interesata en nia Universala lingvo?

R. Mi ne havis multan tempon por Esperanto. Mi ne bezonis la lingvon. Sed ĉar nun la parolantaj filmoj estas tiel multe ŝatataj en la tuta mondo, nova problemo ekaperis. Estas problemo de nia vivado, de nia sukceso en Eŭropo. La angla lingvo ne estas dezirata en la kontinenta Eŭropo. Universala lingvo estas nepre necesa por niaj novaj filmoj. Estas afero de mono. Se la filmoj ne estas uzeblaj en Eŭropo, niaj profitoj estas pli malgrandaj.

D. Ĉu vi ne kredas ke filmsteloj povus lerni diversajn naciajn lingvojn? (Li mem ne kredas tion, sed li deziris ke la filmdirektoro mem

diru ĝin.)

R. Tute ne! Tio estas absolute nebla. Ĝi estus ebla teorie sed ne praktike. Multaj bonegaj filmsteloj ne havas lingvan talenton. Plej ofte bonaj elparolitoj en unu lingvo ne povas lerni la akcenton de eĉ unu alia lingvo. Famaj eksterlandaj steloj devus lerni kun granda peno la anglan akcenton kaj eble ĉiam estus limigataj je eksterlandulaj roloj. Sed eĉ se estus praktike eble bone lerni tiom da lingvoj, ĉiam restus financa neblaĵo, fari la saman filmon en diversaj lingvoj. Ne, tute ne, tio estos neniam ebla; la kosto estus terure alta, kaj nenia profito rezultiĝus.

D. Sed la Usonaj filmoj povus esti montrataj almenaŭ en Britlando, ĉu ne?

R. Jes, sed vi devas memori ke nia Usona-angla lingvo ne estas tre agrabla al granda parto de la Angla popolo. Ni havas krome, multajn idiomaĵojn kiuj ne estas komprenataj de britoj. Tie ili havas aliajn idiomaĵojn kiujn ni ne komprenas. Kaj la idiomaĵoj ja donas al la lingvo la spicon. La angla lingvo en britaj filmoj ne estos ŝatata de la plimulto de Usona popolo. Sed krom tio ĉio ni ja tute ne deziras perdi la klientaron de la kontinenta Eŭropo kaj aliaj landoj.

D. Ĉu Usonaj parolantaj filmoj ne povus esti montrataj kiel "silentaj filmoj" en la kontinenta Eŭropo?

R. Tute ne, ĉar la Eŭropanoj rifuzas esti tiel malĝentile malatentataj. La Eŭropaj filmfarejoj ja ankaŭ faros parolantajn filmojn kaj sen akcepto de ia neŭtrala lingvo la nun tiel ŝatataj Usonaj filmoj nepre fariĝus malŝatataj. Ankaŭ la estontaj grandaj filmoj de germanaj, francaj, italaj kaj aliaj filmfarejoj estos limigataj je sia propra lando sen la simpla sed plej kompleta, plej logika kaj plej facila lingvo — la neŭtrala Esperanto.

Poste S-ro Scherer donacis al S-ro Niblo Esperantan flagon kaj insignon, kaj la fama direktoro ĝojis pro la donaco tiom ke li tuj ordonis fotografadon de la transdonado.

La adreso de la direktoro estas: Fred Niblo, ĉe Metro-Goldwyn-Mayer Studio, Los Angeles, Kalifornio. Ĉar subskribo-kolektoj nur malfacile organiziĝas estus tre helpa se arego da Esperantistoj sendus Esperantajn gratulojn al la fama direktoro.

La eldiro de S-ro Niblo estas tiel

gravaj por nia movado ke ĉiu fervora Esperantisto certe deziros kopii la artikolon aŭ traduki ĝin en la lingvon de sia lando, por publikigado en gazetoj de sia urbo. — Jeroŝo.

KURSO PER TRADUKADO.
(Kondukata de s-ro George Gordon, F.B.E.A.)

Antaŭaj tradukoj kaj notaroj en la kurso aperis en la numeroj de Junio ĝis Januaro de Suda Krucio. Studentoj dezirantaj kursaniĝi devus havigi al si tiujn numerojn, ĉar en estontaj notaroj ofte estos referencoj al klarigoj en ili. Por ricevi estontajn tradukotajn pecojn ili sin turnu al Miss Blyth, 10 Victoria-av., Surrey Hills, Melbourne, sendante al ŝi po 4 pencoj kaj unu adresita, afrankita koverto por ĉiu peco. Oni povas ricevi tradukotajn pecojn 1 ĝis 11 po 4 pencoj por ĉiu.

TRADUKO 9.

Unika Kolonieto En Sovagejo.
ĜEJO.

Estis nenio neordinara en la sonorilado (1) de la horloĝo nek en la tono de la sonorilo, tamen ĝin aŭdi estis por fremdulo miregiga okazo. Antaŭ momento ni estis traveturantaj ŝajne senfinajn mejlojn da sovaĝeja vojs-treko, dum emuoj kuradis antaŭ la aŭtomobilo kaj dense ĉirkaŭ ni staris eŭkaliptoj, ksantorheoj (2) kaj palmoj.

Jam aŭdiĝis kiel en civilizacio la arĝentecaj tonoj de sonorilado (1) en turo, kaj tie, apud senbrue fluanta rivero kaj ĉirkaŭita de verdaj kampoj, troviĝis vera peco el malnova Hispanujo, iel magie transportita en Okcidentan Aŭstralion.

Kiuj vidis ĝin, tiuj solaj povas tute kompreni la ĉarmon kaj mirigon (3) de la Benediktaj monaĥejo kaj misiejo ĉe New Norcia en distanco de okdek ĝis naŭdek mejloj norde de Perth. Ĝi estas unika kaj krom tio estas historia, ĉar jam en (4) la jaro mil-okcent-kvardek-sesa (5) fondis (6) ĝin patro (poste episkopo) (7) Salvado, ano de la Benedikta societo, kaj de tiam ĝi ĉiam kreskadis kaj progresadis. Ĝi estas belega.

Post nia longa aŭtomobila veturo de Perth tra la sovaĝeco mi sidis tie babilante (12) al lia moŝto la abato en la malvarmeta malalte plafonita gastoĉambro. Ekster la domo en la korto, ĉirkaŭita de (8) altaj blankaj muroj, hirundoj ronde flugadis (9) kaj glitadis malsupren el la nestoj sub la randoj de la tegmento. De-

nove la horloĝo sonoriladis, kaj tuj preterpasis nigre-robotaj kaj -zonitaj membroj de la societo. Por ni estis malfacile kredi, ke ni estas (10) en Aŭstralio, ne en la malnova mondo.

Tiu sento de nerealeco neniam mal estiĝas en New Norcia. Ĝi estas forta en la granda bibliotekejo de la monaĥejo, fame konata (11) pro sia admirinda kolekto de Aŭstraliaĵoj. Tie estas civilizaciaj kvankam severaj komforto kaj kulturo kaj masivaj bretoj plenaj de literaturaĵoj de multaj landoj. Tra fenestroj oni povas vidi la riveron Moore (elp. mur), fluantan (11) preter la kampoj, kaj la densan arboran, kiu havas preskaŭ la saman aspekton, kiel ĝi havis tiam, kiam patro (7) Salvado brave piediris tra ĝi en la jaro mil-okcent-kvardek sesa por starigi misiejon por la indiĝenoj. La stablo donas impreson de malharmonieco kun la natura ĉirkaŭaĵo.

Oni eniras la grandan blankan preĝejon de Hispana desegno, kies ĉizitaĵoj estas verko de Benedikta frato. (daŭrigota)

NOTARO 9.

Eraro: Ĉe la 15a linio antaŭ la fino de Trad. 8 legu "malproksime" anstataŭ "proksime."

1. Sonoriladi, chime (Mill.). — 2. La botanika nomo de "blackboy" estas "Xanthorrhoea." — 3. Komparu la nesamajn signifojn de "mir'" kaj "surpriz'" (Mill.). Ofte en la literaturo oni vidas "surpriz'" neĝuste uzata anstataŭ "mir'". — 4. "as far back as" Kp.: "Ŝi fondis la kudrejon jam antaŭ dedek jaroj" (Mart. 117/25). — 5. En tiu ĉi kurso bone estas skribi numeralojn per vortoj por ekzerci sin pri la ĝusta skribado kaj legado de ili. Ekz. 12. — 6. Ekzemplo de konstruo kun simpla verbtempo anstataŭ kunmetita. Notaro 1/21. — 7. "patro," "episkopo" (ne "Patro," "Episkopo"). Notaro 2/4. — 8. "ĉirkaŭitaj de" (aŭ "per"). La uzo de "de" estas ĝusta, ĉar la muroj mem ĉirkaŭis la korton. L.R. pĝ 73. — 9. En la tradukotan pecon oni enmetu "wheeled and" antaŭ "dipped" — 10. "estas" ne "estis." Notaro 2/15. — 11. Adjektiva participo. Notaro 1/20. — 12. Adverba participo. Notaro 2/10.

Ne sufiĉas

legi vian gazeton. Vi devas ankaŭ paroli pri ĝi al viaj amikoj kaj konatoj; ĝia sukceso estos via sukceso.

LERNEJA SISTEMO DE LA ĈEĤOSLOVAKA RESPUBLIKO.

Ni ricevis de la konsulo en Sydney por la nomita lando ampleksan pri-traktaĵon pri la supra temo. Jen el-ĉerpo:

“Nova ŝtato ĉs. naskiĝis antaŭ dek jaroj per unu renverso sensangversa, kiu finiĝis per proklamo de la Ĉeĥoslovaka Respubliko. Fronten de tiu ĉi resp. oni starigis la prezidanton—filozofon, T. G. Masaryk, kiu estas ĉiam tre estimata.

“La sensangan renversion kaj la sukcesojn de la nova resp. oni povas kompreni el tio, ke la ĉeĥa nacio eminentiĝis jam tiam per sia rimarkinda edukiteco, ĉar ĝi havis inter loĝantoj de siaj ĉefaj teritorioj: Bohemujo, Moravio kaj Silezio, nur 4% de analfabetoj. En tiuj tri landoj okjara deviga irado elementan lernejon (de la 6a ĝis la 14a jaro de aĝo) estis enkondukita jam en 1869. Slovakujo kaj Subkarpata Rusujo, kiuj estis antaŭe parto de Hungarujo havis tamen kaj havas ĝis nun inter pli aĝaj loĝantoj grandan nombron de analfabetoj. Ĉe la popolsumigo en 1921 en Slovakujo estis konstatitaj 14.71 p.c. kaj en Subkarpata Rusujo 50.03 p.c. da personoj, kiuj ne scias eĉ legi ne skribi. Tiuj du teritorioj havis nur sesjaran iradon elementan lernejon, (de la 6a-12a jaro).

“Pro tio la ĉs. parlamento devigis zorgi pri unuigo de la lernejoj kaj ĝi faris tiel en 1922 per leĝo, kiu enkondukis egalan okjaran devigan instruon en ĉiuj teritorioj de la resp. kaj malaltigis la antaŭan altan nombron de lernantoj en unu klaso de la elementa de 80 grade sur 75, 70, 65 kaj 60 lernantoj. Inter lernobjektoj la leĝo enkondukis nove la civitanan sciencon, kaj najbare de tiu ĉi objekto la knabajn manlaborojn. Ĝi ankaŭ permesis, ke la religia instruado ne estu deva por tiuj lernantoj, kies gepatroj skribe postulos, ke ili estu liberigitaj de tiu instruado. La leĝo decidis ankaŭ, ke instruistoj aŭ — inoj povas instrui en ĉiuj elementaj lernejoj kaj tiel, ke en ĉiu lernejo unu duono de postenoj estu okupita per instruistoj kaj la dua duono per -inoj. Postenoj de lernejestroj kaj la malparaj postenoj devas esti okupataj per viroj en knabaj lernejoj kaj en knabinaj per virinoj.

“Kamparaj elementaj lernejoj havas laŭ la nombro de lernantoj 1-8 sinsekvajn klasojn. Elementaj lernejoj en urboj havas kutime nur 5 klasojn, ĉar poste iliaj gelernantoj progresas

al pli altaj lernejoj: al urbanaj aŭ mezaj lernejoj.

La urbanaj lernejoj estas propre unu pli alta speco de elementa lernejo. En neniuj landoj de antaŭa Aŭstrujo ili tiel disvastiĝis kiel en Bohemujo kaj Moravio. Tiuj ĉi lernejoj estas triklasaj kaj akceptas gelernantaron, kiu finis la 5-an klason de la elementa lernejo. Tie ĉi instruas fakaj instruistoj kutime po 3 objektoj. Oni dividas la lernantaron laŭsekse en apartajn lernejojn. La evolucio de tiuj ĉi lernejoj pruvas jeno:— En 1920 en la resp. estis 1412 urbanaj lernejoj kun 245,118 gelern.; en 1926/7 ĉiuj 1736 urbanaj lernejoj havis 310,010 gelern., el kiuj estis 144,409 knabinoj. Samtempe en 14, 158 elementaj lernejoj estis 1,403,823 gelern., inter kiuj estis 709,541 knabinoj.

“La ĉs. resp. tute praktikas la principon de Comenius, scie, ke ĉiu infano estu instruata en sia propra gepatra lingvo. Tial en tiu ĉi ŝtato la lernejoj estas dividitaj laŭ la gepatra lingvo de lernantoj.

“Laŭ la lasta statistiko en 1926 estis 9419 ĉs. elementaj lernejoj kun en knabaj mezlernejoj, kaj ili vere 922,901 gelern., 794 magiaraj kun 91,367 gelern., 87 polaj kun 10,407 gelern., 2 rumanaj kun 296 gelern., 9 judaj kun 613 gelern. kaj 76 aliaj aŭ kombinitaj (kun 2 aŭ 3 lingvoj de instruado) lernejoj kun 19,834 gelern.

“La nombro de elementaj lernejoj (ankaŭ urbanaj kaj aliaj) respondas al proporcia nombro de loĝ. de ĉiu nacio. El 13,604, 807 loĝ. estis per la popolsumigo en 1921 konstatite, ke en la resp. restadas 65,53 p.c. ĉeĥoslovakoj, 3.44 p.c. rusoj kaj ukrainoj, 23.36 p.c. germanoj, 5.58 p.c. magiaroj, 1.35 p.c. judoj, 0.57 p.c. poloj kaj 0.17 p.c. de aliaj nacioj.

“La minoritan elementan lernejon oni kutime organizas, se 40 inf. de la dua lingvo sin prezentas, kaj la minorita urbana lernejo devas esti organizita, se la lerneja komunumo havas almenaŭ 400 gelern. de tiu minorita lingvo. Nun estas jam 983 minoritaj elementaj kaj 157 urbanaj lernejoj.

“Por spiritmankaj kaj alie difektaj infanoj nun staras entute 74 lernejoj kun 4351 inf. Krom tio en urboj estas organizitaj 162 helpantaj klasoj. 1584 infanvartejoj havas en urboj 99,134 inf. de 3-6 jaraĝajn. Privataj lernejoj (monaĥejoj kaj aliaj) estas malmultaj en Ĉs.

“Por knabinoj oni organizas en grandaj urboj apartajn mezajn lerne-

jojn, sed knabinoj povas ankaŭ studi kreas unu kvaronon de ĉiuj lernantoj en tiuj lernejoj. En 1927-8 7671 knabinoj vizitadis 30 knabinajn mezlernejojn kaj 15,222 lernantinoj vizitadis knabajn mezlernejojn. Entute Ĉĉ. havas 297 mezlernejojn en kiuj sidas 109,912 gelern.

(Tiam sekvas priskribo pri la eduka sistemo rilatanta al la instruistoj, kaj al la fakaj, komercaj, kaj industriaj flankoj de eduko. Ankaŭ pri la agronomia, arbarista, domsciencia kaj popolokultura - legemiga eduk - statistiko oni lernas per ĉi tiu interesa por multaj raportoj, kiu ja montras sur unu plej ĝenerale-kulturitaj popoloj en Eŭropo.)

KRONIKO.

SYDNEY, N.S.W. — Ankoraŭ venas al ni alilandaj Esperantistoj mondvojaĝantaj. La plej nova alveninto estis Doktoro de Vilnits, el Latvujo. Tiu ĉi sinjoro, kiu estas doktoro de medicino, kaj paroladas dekunu lingvojn, vojaĝas ĉirkaŭ la mondo per motorbiciklo, por vidi la mondon kaj ankaŭ por akiri sperton en la medicino en diversaj landoj.

Li jam dufoje parolis al la Sydney E. Societo pri siaj vojaĝspertoj, unufojon kun lumbildoj. Ĝis nun li vizitis kvindek landojn . . . preskaŭ ĉiu lando en Eŭropo kaj la plej multaj en Azio kaj Afriko. Kaj en ĉiu el tiu ĉi landoj, krom en naŭ (Belga ŝtato en Afriko, Mesopotamio, kaj similaj negravaj lokoj) li trovis Esperantistojn.

Li sendube havis interesan kaj okazoplenan vojaĝadon, kaj eĉ iom da tragedio ankaŭ, ĉar, dum li estis en Ĥinujo, dum la estintaj malpacoj, lia amiko estis mortpafita je lia flanko. Post multaj aventuroj en Ĥinujo, li veturis tra Malajo kaj ĉirkaŭaj insuloj ĝis nordokcidenta Aŭstralio, kaj ĉirkaŭ Aŭstralio ĝis Sydney. De tie ĉi li veturos al Nova Zelando.

Je la vespero de 17 Januaro, sinjoro J. Domingo interesigis la klubanojn per Esperanto deklamoj.

LA ĈEVALINO DE HADITA.

Hadita Paŝao, ŝejko el El Khour, heredis tre multe da kameloj, kaproj kaj ĉevaloj, sed lia malavara kaj kompata naturo baldaŭ lin malriĉigis. Kiam lia najbaro Sirhan foriris suden por negoci pri mielaj daktiloj kaj suferis dum la vojaĝo rabatakon de Ŭahiboj, per kiu li perdis ĉion, Hadita dividis en duonojn sian tutan posedadon kaj donis al li.

Sed restis unu objekto, kiun Hadita tute ne volis fordoni; nome sian preferatan blankan ĉevalinon. Unu ŝejko nomata Goren aĉete proponis 300 funtojn ore por ĝi, tamen Hadita diris, ke li ne volas vendi ĝin kontraŭ kiom ajn prezo.

Tiam diris Goren:—Mi havas filinon, kiu estas tiel bela, ke jam multaj ĉefoj petis ĝin kiel edzinon. Mi proponas ŝin al vi interŝanĝe por via ĉevalino—

Ankoraŭ Hadita malakceptis. Goren diris:—Mi tamen juste - nejuste volas posedi la ĉevalinon. Tial, ke vi volas nek vendi nek interŝanĝi, mi vin avertas, O Hadita, ke mi intencas ĝin ŝteli—

Hadita rediris:—Nu, vi avertis—

La legantoj sciu, ke laŭ Araba honormoro ne estas hontinde, ke oni priŝtelas amikon avertinte lin pri intenco tion fari.

Foren rajdinte Goren ne sin vidigis al Hadita dum jaro kaj lasis neski al si longan taŭzan barbon. Post iom da tempo Goren sciiginte, ke Hadita tuj iros al Damasko por negoci pri aĉeto de iuj kameloj, survoje iris antaŭ ol li. Tinkturinte la vizagon per koto kaj heneo, li sin vestis per ĉifonoj, donis al si doloran vundon en la piedo per ponardo kaj ekiris laŭ la vojo, kiun Hadita devos laŭvojaĝi. Se Goren nur sin ŝajnigus esti laca kaj dolorigata, la akraj okuloj de Hadita nepre rimarkus la malveraĵon; tial Goren efektive sin faris lecega kaj tre suferanta per longa lamirado trans mejlojn sub la ardanta suno.

Fine Hadita envidiĝis al li, galope-

HAROLD PUDNEY

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? rizorgas mendojn per posto. Memoru facila por via monujo. Li speciale p

ia adreson

Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

Specialisto pri Fontanplumoj

tante sur sia blanka ĉevalino, kun lia pafilo surŝultre. Goren falis sur la vojon. Hadita tirbride haltigis la rajdaton, kaj sin klinis super la vundiginta almozulo. Goren penspire diris, ke li volas iri Damaskon, sed ne povas plu.

Laŭ sia bona naturo Hadita levis la fremdulon en la selon kaj marŝis ĉe la piedingo. Goren silentis duonhoron por rekolekti siajn fortojn kaj tiam proponis, ke la nobla ŝejko pendigu sur la selbutonego la pezan pafilon, por ke estu al li malpli ŝarĝe. Tuj kiam Hadita tion faris Goren ekgalopigis la ĉevalinon, ĝin turnante por ĵeti krion:—Mi juste vin avertis, O Hadita—

Li jam ekforgalopis, sed Hadita laŭvoĉe haltigis lin. Ankoraŭ unu fojon Goren turnis sian rajdaton, kaj Hadita kriis:—En justa maniero vi jam gajnis la ĉevalinon, Goren, kaj mi ĵuras, ke ĝin mi ne penos rehavi, se vi ĵuros neniam malkaŝi antaŭ aliu, kiel vi gajnis ĝin—

—Mi ĵure promesas. Sed kial? — demandis Goren.

—Se ĉi tiu faro disvastiĝus en la dezerto—Hadita respondis—neniu vojaĝanto plu kuragiĝus doni helpon al vundito aŭ almozulo—

Tion aŭdinte, Goren elseliĝis, kaj etendante antaŭ si la pafilon kaj bridrimenon, li diris:—Mi ne povas tian homon priŝteli—

Ili kune iris al Damasko. Goren ankoraŭ rajdis, ĉar insistis pri tio Hadita, kiu poste mem tenis la ĉevalinon, dum Goren tenis la amikecon de Hadita, kiu amikeco estis ja multe pli valora.

(W. B. Seabrook, en "Adventures in Arabia." Trad. Robo.)

CHANGE OF ADDRESS.

The Melbourne Esperanto Society have moved to Room No. 3, Temperance Hall, Russell Street, and will in future meet every Tuesday night at 8 o'clock. The Society hopes to make this a permanent address.

"SOVETIO."

Laŭ avizo de Rusa s-ano la plimulto da lialandanoj uzas la formojn "Sovetio" kaj "Sovet-Unio." Sed Zamenhof skribis "sovjet" ĉe, La Gimnazio" (60/5, 13), kiu cetere ne troviĝas en la "Radikaro" de Wuster. Multe da E-tistoj tamen ankoraŭ uzas la antaŭrevoluciajn "Rusujo" aŭ "Rusio." — (Robo.)

CEFANJA.

Two Esperanto Versions.

Two things are necessary to a good translation, says Washington Moon. The one that it should be a faithful expression of the ideas intended to be conveyed in the original; and the other that it should be a grammatical expression of those ideas, according to the idiom of the language into which the translation is to be made. It follows then that a literal "photographing," or word for word rendering, of the original texts, is often impossible when translating into national languages, although at times one gives, for purposes of literary analysis, a "bold," or literal, translation, that is, an unidiomatic composition following, as far as is intelligibly possible, the word-order and general style of the original. Esperanto, possessing not only a free word-order but also wonderful flexibility of word-combination, is therefore a more efficient instrument of translation than national languages, hampered by their own "genius" or spirit, can possibly be. Esperanto can reproduce to a certain high degree the personal style and national characteristics of a writer and follow not only his perhaps intricate sentence construction but also faithfully "Esperantize" his most ungainly compounds in a way of course forbidden to the more analytic English and the Romanic tongues.

For instance, accurate translation of Hebrew into a national language is impossible owing, for one thing, to the grammatical Seven Voices characteristic of the ancient tongue. In Esperanto it is possible, although in a literary translation perhaps not expedient. But at least one Hebraist has expressed regret that in the biblical translations these voices have been ignored, seemingly because of a fear on the part of the translator that precise rendering of them would mar the literary beauty of the passages in which they occur.

Here are examples, based on two versions of Zephaniah. The first is by Dr. Zamenhof, who translated the book primarily as a piece of fine prose composition; numbers of Hebrew idioms, many or most of which, standing alone, would be unintelligible to Western readers, were recast by the Master, and the result has been a text that reads very smoothly when

compared with that of the unknown Hebraist who in 1910 published his "La Biblia Profeto Cefanjaho antaŭanoncinta Esperanton." In this latter one has a literal rendering of the book, an attempt to give the world the content of the prophet's utterance in its original purity, or shall we say, crudity of expression as it appears when transferred literally into the dress of modern language. So the translator informs us that the book of Zephaniah clothed in its natural Hebrew is much more beautiful than in his ellaboration of it in Esp-o.

The student should compare the following variants. The Zamenhof citation stands first.

1/3. Mi forprenos la homojn.

Mi ĉesigos la tersupraĵulon. (Heb. Adam).

v.4. Mi ekstermos de ĉi tiu loko la restaĵon de Baal.

Mi detranĉos el tiu ĉi loko la kunskrapaĵon de B.

v.6. Tiujn, kiuj defalis de la Eternulo.

La malantaŭen turniĝintojn el sekve de la Eternulo.

v.17. Mi premos la homojn.

Mi en-mallargej-igos la tersupraĵulon.

2/5. Mi vin pereigos tiel, ke restos neniu loĝanto.

Mi eĉ perdiĝ-igos cin ĝis ne estos loĝanto.

3/3. Ĝiaj juĝistoj estas kiel lupoj vespere; ili nenion restigas ĝis mateno.

Ŝiaj juĝistoj estas vesperaj lupoj; ili ne ĝismordadas la tagiĝon.

v.4. Ĝiaj pastroj malsanktigas la sanktejon, kripligas la instruon.

Ŝiaj oferistoj elpikis la sanktejon, ili perfortis la celigaĵon. (Note the difficulty of a literal rendering here.)

v.5. La Eternulo estas justulo meze de ĝi, Li ne faras maljustaĵon; ĉiumatene Li montras Siajn leĝojn, ne ĉesas; sed la malpiulo ne konas honton.

faros maljustfaron; tagiĝe post tagiĝe sian porfaraĵon Li donas al la lumo; Le ne estas mankata; sed ne konas la maljustulo la paliĝon.

v.9. Tiam Mi redonos al la popoloj lingvon puran, por ke ĉiuj vokadu la nomon de la Eternulo kaj servadu al Li unuanime.

Car tiam Mi alturnos al la popoloj lingvon purigitan, por ke voku ĉiuj per la nomo, Jehovon, por servi Lin unu-ŝultre.

v.17. Li ĝojos pri vi gaje, Li pardonos al vi pro Sia amo, Li ĝoje triumfos pri vi.

Li ĝu-sentos je ci kun gajeco; Li silentos en sia amo; Li ĉirkaŭsaltados je ci kun sonor-kriado.

(Robo.)

ESPERANTO CONGRESS.

Meeting in Perth Proposed.

At a meeting on Saturday afternoon of those interested in Esperanto it was decided unanimously to arrange a West Australian Esperanto Congress for this year. The congress has been fixed for October and Esperanto associations throughout the world will be notified of the event.

Mr. T. Burt, who presided at Saturday's meeting, said the congress, in addition to stimulating interest in Esperanto, should also further trade, as many foreigners would attend. They would have an opportunity of obtaining first-hand information on the State's economic condition and resources. Local business men would also realise the value of Esperanto as a commercial language.

A committee was formed to deal with the proposed congress and the following officers were elected:—President, Mr. T. Burt; vice-presidents, Messrs. C. Unwin and M. T. Stitz; secretary and treasurer, Mr. L. C. Mansfield. It was stated that already £70 had been guaranteed to meet any expenses entailed. It was resolved to inform the State Centenary Committee of the meeting's decision.

The Universal Esperanto Association has promised to circularise 8,000 delegates concerning the intended congress.

—"West Australian," 14th Jan., '29.

NIA NOV-ZELANDA KRONIKO.

Ĉar la diversaj kluboj kaj klasoj en Nov-zelando interrompis sian agadon dum la festotempo kaj kredeble ne refunkciados ĝis Februaro, raporto pri tiuj nuntempe mankas. Tamen, ni esperas havi por nia venonta numero, aldone al la ordinara kroniko, ampleksajn detalojn pri la nacia konferenco, kio okazis en Wellingtono je la 26a de la pasinta monato — tro malfrue por enpresi en tiu ĉi aldono — kiam delegitoj diskutis proponon restarigi la nun dormantan N.Z'an Asocion Esperantistan.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Ni kvitancas la ricevon de donacoj kaj abonoj jene:—(la daton post la nono kaj sumo montras al kiu dato la abono estas pagata). E. J. O'Reilly, 9/-, Junio '29; W. Waterman, 4/6, Junio '30; W. McPherson, 10/-, Sept. '29; H. Franks, 5/-, Dec. '29; C. Whittenbach, 4/6, Dec. '29; W. J. Parker, 4/6, Nov. '29; C. W. Ballard, 5/-, Dec. '30; S. Clark, donaco 3/-, 4/6, Jan. '30.

GAZETOJ RICEVITAJ.

Austria Esperantisto, 11, 12; Arbeiter-Esperantisten, 5-9; Amerika Esperantisto, 5; Arbeiter-Esperantist, 11; British Esperantist, 285; Bulgara Esperantisto, 2-3, 4; Belga Esperantisto, 7; Bulteno de Esperanta Pres-Agentejo, 19, 20; Esperanto et Commerce, 4, 5; Germana Esperantisto, 12; Heroldo de Esperanto, 43, 46 ĝis 49; International Language., Dec.; Internacia Medicina Revuo, 6; La Tagigo, 6, 7; La Revuo Orienta, 12; La Socialisto, 11, 12; Oomoto Internacia, 24; Svenska-Tidningen, La Espero, 10; Verda Stelo, 11.

EDUCATION AND ESPERANTO.

CHINA. — Since December, 1927, Esperanto has been taught as a compulsory subject in the Municipal School for Women in Shanghai. An optional evening course has been commenced at the Anglo-Chinese College in the same town. The Workers' University of Kianwow, near Shanghai, introduced the compulsory teaching of Esperanto more than a year ago. The high school of Putun has done the same.

—I.E.S.

HENRY E. CALWELL (Reg.)

Kuracadas malsanulojn kun bonegaj rezultatoj per Osteopathy, Chiropractic, Dieto kaj aliaj sendrogaj metodoj.

Donas informon senpage.

11 COLLINS ST., MELBOURNE.

Tel.: Cent. 4018.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro J. Skurrie; sekretario f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je ol oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 8-10 p.m. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; d-ro F. J. Williams; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 174 Burwood Road. Burwood.

Brisbana Esperanto - Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 3-a etaĝo, King House, Queen-str.: Prezidanto: Klement Kidd. Vicprezidantoj: Fraŭlino Rose MacPherson; M. Hyde. Sekretario: Fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane (Kvinslando-Queensland).

WELLINGTON ESPE R A N T O CLUB.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A., Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Mr. V. L. M. Daniel; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A., 34, Argentine Ave., Miramar; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A.

BOOKS YOU SHOULD READ.

Abismoj (Jean Forge)
Paper Covers 3/3
Aladin .. (Cox) .. Paper . . . 6d.
Aŭstralio, Lando kaj Popolo
Delsudo kaj Laiho 7/6
La Biblio 7/6, 10/6, 15/-, 25/-
(According to paper and binding)

Dancu Marionetoj (Baghy) 2/9
La Faraono (Prus), in 3 Parts
Paper Covers 7/6 set.
Lilio . (Sinnotte) . Cloth . . . 2/9
Luno de Izraelo (H. Rider Haggard-
Paper Covers 5/6.
Postage Extra.

LA BIBLIOTEKISTO, Melbourne Esperanto Society,
BOX 731 F., ELIZABETH ST. POST OFFICE, MELBOURNE.

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Specimena numero-unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 105 (Ninth Year) Melbourne (Melbourne), Australio.

10 Marto 1929

NEW ZEALAND ESPERANTO CONFERENCE.

Dominion Association Formed.

The New Zealand Conference of Esperantists, which took place in Wellington on 26th January last, was attended by an enthusiastic gathering, among which were four delegates representing clubs and societies. Unfortunately, the Christchurch Esperanto Society—a very strong and active body—was unable to arrange for its representation. The conference was convened by Mr. C. J. Adcock (Te Uku, Mamilton) and arranged by the Wellington Esperanto Club. Mr. W. L. Edmanson (Wellington) presided and Mr. Wm. H. King (Wellington) acted as conference secretary.

In view of the fact that Wellington Esperantists predominated the conference, the question of voting powers of the attendance was raised. Mr. Jack (Wellington) moved that the discussion be open, and that in the event of any voting taking place, all persons present would be eligible to vote, those matters being carried to be referred to the various groups and clubs for their consideration and replies. Mr. Dewar (Masterton) seconded, and the motion was carried unanimously.

Mr. Adcock then delivered a splendid address, bringing forward many solid reasons for the establishment of some central body or organisation to control the Esperanto movement in New Zealand, which is rapidly becoming too large for individuals to

carry on. The speaker outlined the lines of future activities, and, seconded by Mrs. Watkin (Auckland), moved "that a New Zealand Esperanto Association be formed."

Mr. Jack thought that steps should be taken to investigate the establishment of the Association, and moved as an amendment "that steps be taken to accomplish the establishment of a New Zealand Esperanto Association." Mr. Dust (Wellington) seconded. Mr. Adcock withdrew his original motion, and Mr. Jack's motion was carried unanimously.

Mr. Adcock moved that the proposed association consist of three kinds of members—Members paying £1 per annum, subscription to include fees to the U.E.A. and La Suda Kruco; Junior Members paying 7/6 per annum, 2/6 of which would be a subscription to "Junularo"; and Supporting Members, paying 5/- per annum, who would receive the journal "International Language." Mr. Jack seconded pro forma.

As an amendment Mr. Dewar moved that there be two categories of members—active and associate—the yearly subscription for each being 2/6 without any magazine. Mr. J. McGuigan (Wellington) seconded. Mr. Adcock withdrew his motion, and the amendment (now the original) was carried by ten votes to nil, every vote not being cast.

Mr. Dust moved, seconded by Mr. Potts (Wellington) that the rules of the previous New Zealand Esperanto

Association be considered as the basis of the rules for the proposed association.—Carried unanimously. The rules in question were then read to the meeting and certain minor alterations were agreed upon.

Mr. Adcock moved, seconded by Mr. Dust, that the objects as set out for the old N.Z.E.A. be received en globo for the new association.—Carried.

All the above-mentioned matters having been thoroughly discussed, Mr. Alcock moved "that an association to be named 'The New Zealand Esperanto Association' be, and is hereby formed, and that those present become members thereof; and all persons present and those joining within three (3) months of receipt of the report of this meeting be recognised as the foundation members of the association." Mr. Dust seconded, and the motion was carried unanimously.

The following were elected as officers of the Association:—Patrons (subject to their approval being obtained): The Prime Minister of New Zealand, Sir Joseph Ward, P.C., K.C.M.G., L.L.D.; Sir Robert Stout, P.C., K.C.M.G.; and Sir George Fowlds, C.B.E. President: Mr. C. J. Adcock; Delegate of the Universal Esperanto Association, Te Uku, Hamilton; Vice-presidents (subject to the approval of two absentees being obtained): Mrs. E. M. Watkin, Secretary, Esperanto Society, Auckland; Mr. L. E. Dust, Delegate of U.E.A., Wellington; Mr. J. S. Russell, President, Esperanto Society, Auckland; and Mr. N. M. Bell, M.A., Secretary, Esperanto Society, Christchurch. Hon. Secretary: Mr. Wm. H. King, Vice-delegate of U.E.A., Wellington. Treasurer: Mr. E. C. Jack, President, Esperanto Club, Wellington. Other officers: Mr. Adcock moved that each local group have the right to appoint a delegate who will be considered as a member of the executive of the Association. Mr. McDonald (Wellington) seconded.—Carried.

Votes of thanks to various persons and a special vote to Mr. J. S. Russell (Auckland) for sending copies of the rules of the old N.Z.E.A., and to Mrs. Watkin for bringing them were accorded and carried by acclamation.

After congratulating the assemblage on account of the manner in which the business was conducted and for the splendid Esperantist spirit displayed throughout the whole of the Conference, the president declared the Conference closed.

In the evening of the day of the Conference, a social welcome to the visiting delegates was tendered by the Wellington Esperanto Club, the function being well attended and an unqualified success. Mr. E. C. Jack presided. Supper was served and the following toasts were honored:—"The King," "Our Guests," "The U.E.A. and the B.E.A.," "The N.Z.E.A.," and "The N.Z. Groups." Included in the very fine musical programme were two gramophone records of addresses delivered in Esperanto by Dr. E. Privat, recitations ably given by Mr. W. L. Edmanson, and an accordion selection by Mr. J. McGuigan.

RADIO-KONCERTO EN BRISBANO

La 4-an de februaro, el la stacio 4QG de la Kvinlanda Gubernio, la Brisbana Esperanto-Societo donis malgrandan koncerton, de la 8-a ĝis la 8,30 vespere. La koncerto estis bone aŭdata en diversaj partoj de Kvinlando kaj en la Nordaj-Riveroj-regiono de la gubernio Nova Sud-Kimrujo; sed pro la malbona sezono la koncerto estis malmulte aŭdata en aliaj gubernioj.

Pro neevitebla foresto de la prezidanto (sinjoro Kidd), la enkonduka parolado pri Esperanto kaj Paco estis legata de unu vicprezidanto (sinjoro Hyde), kiu ankaŭ anoncis la numerojn de la programo, en Angla kaj Esperanto.

La koncerton tre sukcese kaj laborplene aranĝis la muzika direktoro (sinjoro H. H. Hutton) kaj la sekretario (fraŭlino Carrick), al kiuj la societo ŝuldas koran dankon.

Jen la programo: Enkonduka Parolo: Esperanto kaj Paco. Internacia Himno: "La Espero": La Ĥoro. Kanto: "Siberia Lulkanto": fraŭlino Eva Bowen. Kanto: "En la Silenta Hor'" (Oft in the Stilly Night): sinjoro Walter Land. Slava Popolkanto: "Mi Eliras": sinjorino de Pclotyński. Rusa Romanco: "Pokalo": sinjoro P. Smikov. Psalmo 84: "Kiel Ĉarmaj estas Viaj Loĝejoj": fraŭlino Grace Brown. Kvarteto: "La Soldata Adiaŭ": fraŭlinoj E. Bowen kaj M. Young; sinjoroj Land kaj Hutton. Kanto: "Robin Adair": sinjorino T. Benussi. Korda Kvarteto: "Interludo laŭ Antikva Modo" (Glazunov). Ĥorkanto: "Ĝoju, Ĝoju Ni, Kolegoj" (Gaudeamus Igitur).

KURSO PER TRADUKADO.
(kondukata de s-ro George Gordon,
F.B.E.A.)

Interesatoj turnu sin al Miss Blyth,
10 Victoria-av., Surrey Hills, E10.

TRADUKO 10.

Oni (2) aŭdas la profundan ŝveladon (3) de orgeno, kaj ankoraŭ unu fojon oni sentas sin transportita (4) malproksimen for de la sovaĝejo.

Elpaŝu en la sunlumon kaj jen denove oni (2) estas en Aŭstralio. Gaja indiĝena infanaro kun plenstreĉa kriegado ludas futbalon (5) sur (12) kampo proksime al malgranda elŝtipa kabano, kiu tie staris jam de la jaro mil-okcent-kvardek-sesa kaj estis la ĝermo de la nuna impona kolonieto. En apuda ŝaftondejo oni trovas maljunan indiĝenon, lerte tondantan (6) ŝafon. Li estas loĝinta ĉe la misiejo jam de la jaro mil-okcent-sepdek-tria kaj povas flue paroli ne nur la Anglan sed ankaŭ la Hispanan lingvon (7).

New Norcia ne estas nur pentrinda (14). Ĝi havas du lernejojn, el kiuj unu estas por knaboj kaj la alia por knabinoj. Monahinoj el Societo de Sankta Josefo instruas la knabinojn, kaj monahoj el Societo de Maria la knabojn. Tie estas ankaŭ misiejo por la zorgado pri miksrasaj orfoj el nordaj kaj malproksime orientaj regionoj. Vidante (8) la infanojn ĉe iliaj taskoj kaj ludado oni konstatas, kiel homama estas la laboro farata (6) de la misiistoj pro tre malfavorata klaso de homoj.

Oni poste tenas multajn memoraĵojn pri tiu unika, memstara kolonieto ĉe Nova Norcia. Se oni deziras aĉeti vinon, la monahoj povas plenumi la mendon. La vinbergardenoj kaj vinoj de Nova Norcia estas bone konataj en Okcidenta Aŭstralio. Se oni deziras kvieton oni trovos ĝin en la malvarmeta preĝejo, kie staras la marmora tombo de la fondinto (13), episkopo Salvado, kaj gastamaj (9) oni trovos la misianojn, ĉu ili estas Hispanaj ĉu Aŭstralianaj.

La Finoj.

GRANDFAMA ESPLORISTO.

En la jaro mil-okcent-dek-kvina, en la Angla provinco Yorkshire (elp; jorkŝir) naskiĝis Edward John Eyre (elp; ejr), unu el la plej grandfamaj el Aŭstraliaj esploristoj. Lia patro, kiu estis pastro, unue intencis, ke la knabo fariĝu armea oficiro, sed je la aĝo de dek ok jaroj malsukcesinte

(8) ricevi priesperatan (6) komision oficiran, la junulo migris Aŭstralion, kie li fariĝis ŝafedukisto (10) kaj rapide akiris riĉon. Li kelkfoje vojaĝis tra la nekonata (6), sovaĝa regiono en la sudo de la insula kontinento, transmovante (8) brutarojn el Nova Sud-Kimrujo en la lastatempe fonditan (6) kolonion Suda Aŭstralio. Li fariĝis unu el la plej elstarantaj (6) homoj en tiu nova kolonio, kaj antaŭ ol atingi la aĝon de dudek kvin jaroj li estiĝis pacjuĝisto (11) kaj plenumis tiun oficon kun granda takto kaj kapablo ĉe kvietigado de kvereloj inter la kolonianoj kaj indiĝenoj.

(daŭrigota en la Maja n-ro.)

NOTARO 10.

1. Skriberaroj. Trad. 8; kol. 1, L 26, post "brilkoloraj" enskribu "krotonoj"; 2. "You" en la Angla ofte havas la sencon de "one" (oni). — 3. "swell," komp.: "la kanto ŝveladis grade" (Grabowski en "La Kondukan-to" 123/7.) — 4. Predikata participo. Notaro 1/7. — 5. aŭ "piedpilkon." — 6. Adjektiva participo. Notaro 1/20. — 7. Aŭ oni povus diri "paroli kaj la Anglan kaj la Hispanan" (both English and Spanish) aŭ "paroli kiel la Anglan lingvon tiel ankaŭ la Hispanan." Komp.: Fab. de And. Pt. 1, 136/2 kaj Mart. 72/27. — 8. Adverba participo, notrao 2/10. — 9. Predikata adjektivo, Notaro 1/10. — 10. "eduki" havas pli ampleksan signifon ol la Angla "to educate" (en la senco de "instruadi, lernigi, klerigi"). Oni edukas (brings up, rears, raises) infanojn, ĉevalojn, ŝafojn, bovojn, porkojn, kokinojn k.t.p. "Brutedukisto," "keeper of live stock" (Gen. xlvi, 32). "Ŝafedukisto," aŭ "ŝafpaŝtisto," sheep farmer. (Gen. iv, 2). "Bredi" (vorto ankoraŭ ne oficialigita) ne estas samsignifa kiel "eduki" sed signifas "to breed as a business pure-blooded animals." 11. "magistrate." Ne uzu "magistrato" en la ĉi-tiea senco. Ĝi havas tute alian sencon (the authorities of a municipality, city or town). Komp.: Rab. de Bah. 22, 1, 15, Mill. — 12. aŭ "en." — 13. Substantiva participo. Cox 209. — 14. Oni ofte en la literaturo vidas "pitoreska," sed ĝi ankoraŭ ne estas oficialigita.

**PASSED ADVANCED
EXAMINATION.**

Gordon F. Piera, Melbourne. Kor-
ajn Gratulojn. (Red.)

ESPERANTO.

Its Origin and Rise.

It has been decided to hold a congress of Esperantists in Perth during the centenary year. Esperanto being the international auxiliary language, it has many adepts among European and Asiatic nations. The need of an international language is not so necessary in the Dominions as it is in parts of the world where nations rub shoulders with other nations. It was this proximity of different speaking peoples in central Europe that caused the invention or formulation of Esperanto.

The author of the language was a Polish doctor—Zamenhof by name—who was born and lived in Bielystok, a small Polish town inhabited by at least four different speaking races. Complications and disputes were of daily occurrence, and young Zamenhof, who was greatly troubled by these happenings, conceived the idea of an international language. After ten years of intensive labour he produced, in 1887, his first text book and grammar. At that time a few enthusiasts were the only students of Esperanto. During the intervening forty-two years the growth of the language has been remarkable.

The official headquarters of Esperanto are in Geneva, where the Universal Esperanto Association functions. This organisation has delegates—or consuls—in almost every country in the world; these delegates now number 1,800; their duty is to meet visitors from foreign parts and to assist them with information about the city and country in which they are found. They also act as foreign correspondents to the central body, sending statistics and information regarding trade and commerce and other matters of international interest.

It is easy to realise that Esperanto may be, and possibly is, of great value as a ready means of communication in commercial and other matters. As an auxiliary international language it is officially recognised by the League of Nations. Delegates are stationed in Perth, Adelaide, Melbourne, Sydney, Brisbane, New Guinea, and New Zealand; and societies exist in all the States for the study of Esperanto and the transaction of international business. In European countries Esperanto is widely used by the administrative bodies of exhibitions—or fairs—as they are styled,

such as the well-known Lyons, Leipzig, Dresden, and Nurenburg Fairs, which are held in the spring and autumn of each year.

The Japanese, especially, among Asiatic nations have readily adopted Esperanto as the international language. It is taught in most secondary schools in the principal Japanese cities. From a literary point of view, Esperanto has reached a stage where its possibilities demand serious attention and consideration. Magazines and newspapers printed in the language now number about sixty-four distinct publications. Important works by eminent writers in all countries are immediately translated into Esperanto, and circulated all over the world. A recent publication is that of Professor Sir Arthur Keith's much-discussed address on the "Origin of Man." A few well-known writers discovered that it pays to write original works in Esperanto. It is obvious that a world-wide circulation must be more profitable than a merely national one.

For many years past Esperantists have held annual international congresses in various large cities. Apart from these, it is customary to hold a national congress in most countries where Esperanto is spoken. The last Australian Congress was held in Melbourne, at which most of the business and addresses were carried on in Esperanto. From an advertising point of view the holding of a congress in Perth will undoubtedly be of considerable value to the State. It is expected that visitors from all parts of the world will be present, and reports of the proceedings will receive world-wide publication in Esperanto.—H.B.

GAZETOJ RICEVITAJ.

Argentina Esperantisto, 28-29; Arbeiter-Esperantist, 1; British Esperantist, 286; Belga Esperantisto, 8-9; Bulteno de Internacia Scienca Asocio E., 13; Esperanto, 1; Germana Esperantisto, 1; Heroldo de Esperanto, 51, 52; Hungaro Heroldo, 8; Inform-servo de la Internacia Labora Oficejo; Internacia Esperanto-Servo, 8-10, 11-12; International Language, Jan.; I.S.K., 1; La Revuo Orienta, 1; Libro, 27; Oomoto Internacia, 25; Revuo Kultura, 2; Svenska-Tidningen, La Espero, 11-12, 1; Weekly News Bulletin, V.O.K.S., 46-47.

KRONIKO.

BRISBANO (Kvinslando - Queensland). — La societo kunvenas jam en nova salono, 59a Elizabeth-str: Kvan-kam ĝi ne estas sur la ĉefa strato, ĝi estas pli facile trovebla; plie super la stratpordo, elpendaĵo kun verda stelo kaj la nomo de la societo estas konstanta deklamo.

Pri nia radio-koncerto vidu la apartan raporton.

La 22 januaro tri anoj de la societo legis la amuzan komedion "Rozalio," kiun la (bedaŭrinde nemultaj) ĉeestantoj tre ĝuis. La rolojn legis sinjoro Hyde (sinjoro Bol), sinjoro Mills (sinjorino Bol) kaj sinjoro Behncken (Rozalio).

MELBOURNE, Vic. — Post la laboro de transloĝiĝo, la klubaj aferoj komencas progresi tre kontentige, kaj la membraro pligrandiĝas ĉiun kunvenon. La kunvenoj nun okazas je la mardo vespere, kaj al tiu ŝanĝo ni atribuas la bonan progresadon. La nova adreso de la Melb. Esp. Societo estas, Cambro 3, "Temperance Hall," 172 Russell Strato.

En Januaro okazis ekskurso al la Lago de Eduardo. La vetero estis tre varma, sed agrabla venteto kiu blovis trans la lago, faris kelkhoran restadon sub la arboj ĉe la lagbordo, tre ĝuebla afero. Tiel opiniis la aro de Esperantistoj, kiu babiladis inter si, kaj rigards la naĝantojn kiuj amuzis sin en la akvo.

AUCKLAND, Nov-Zelando. — Nia agema propagandisto, S-ino B. King, elportis tre utilan laboron—laŭ la nombrego da libroj venditaj — por nia kara lingvo dum pasinta monato, kiam ŝi aranĝis la aperon gazete de diversaj artikoloj pri Esperanto kaj por la elmontron de afiŝoj en multaj el la plej grandaj bultikoj urbaj.

La loka Societo, kiu ankoraŭ ne refunkciadas por la nova jaro, estis reprezentita en la Nov-zelanda Esperantista Konferenco, kio okazis en Wellington dum 26a Januaro. La Societa sekretario, S-ino Watkin, partoprenis. Skribdate, la anoj ankoraŭ

ne havis okazon pridiskuti la detalojn de la Konferenco.

MASTERTON, N.Z. — La grupo ĉi-tiea komencos /is kunveni je la fino de la kuranta monato (Februaro). La sekretario, S-ino L. Payne, 8 Bruce Street, Masterton, estas tre kontenta pri la laboro farita dum pasinta jaro, kaj raportas atendon por eĉ pli sukcesa dum la nuna jaro. S-ro A. Dewar, klasgvidanto, estis la grupa delegito al la Konferenco de Esperantistoj okazita en Wellington lastan monaton.

Kvar el la anoj de nia grupo malgranda subtenadas la S.K. per abono, la gazeto estas treege ŝatata nialoke.

S-roj E. C. Jack kaj L. E. Dust, bone konataj samideanoj kaj oficposedantoj de la Wellington Esp. Klubo, vizitis nian urbeton dum la festotagoj kuragiĝante nin.

HAMILTON, N.Z. — Dum Januaro okazis al nia societo granda honoro — la elekto de nia ano, S-ro C. J. Adcock, Del. de U.E.A., kiel unua prezidanto de la Nov-zelanda Esperano Asocio. Daŭre kaj diligente laborante por Esperanto, ĉiame pensante kaj agadante por la lingvo, S-ro Adcock bone meritas la honoron kaj fidon, kion oni esprimis je li. Ni gratulas lin kaj la konferencanojn kiuj elektis lin al tia grava kaj respondeca ofico.

En la Somera Lernejo por instruistoj okazita Januaron ĉe Oamaru, S-ro Adcock partoprenante lekiadis al siaj gekolegoj pri Esperanto, ricevante tre simpatian aŭdadon. Ankaŭ ĉe bala Somerlernejo la lingvo estis reprezentita — fraŭlino portis grandlitere la vorton "Esperanto," kaj kvin sinjoroj kun verdaj rubandoj formigis la grandan kaj belan stelon.

CHRISTCHURCH, N.Z. — Diversaj anoj de nia Societo brodkastas ĉiusessemajne de stacio 3YA. F-ino Corkill, la 17an Decembron parolis pri li disvastigado de Esperanto per la radio kaj la filmoj. Dum 28a Januaro, S-ro Alastair More pritraktis sian propran travivon rilate al la

HAROLD PUDNEY

Specialisto pri Fontanplumoj

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Li havas multajn el ĉiu speco, je precizorgas mendojn per poŝto. Memoru -
VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? facilaj por via monujo. Li speciale p
la adreson

Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

lingvo. S-ro Geo. Wheeler, D.B.E.A., parolas dum la 11a Marto.

La klaso rekunvenas komencinte novan jaron je la 12 Februaro. Laŭ ĉiuj indikoj ĝi duobligos sian membraron ĉi tiun jaron. Por starigi librareton de interesaj Esperantaĵoj, ni decidis kontribui po tri pencojn semajne.

Kvankam ni esperis ke du delegitoj estus reprezentantaj nin en la N.Z. Konferenco, ĉe Wellington, bedaŭrinde niaj esperoj ne realiĝis. En lia foresto, nia sekretario, S-ro N. M. Bell, M.A., estis elektita kiel unu el la kvar vice-prezidantoj, kaj lin ni gratulas.

Vizito de S-ro B. Potts, F.B.E.A., (Sek. Esp. Klubo, Wellington), treege gojigis nin dum la festotagoj.

La gazeto "International Sunbeam" daŭras sian reklamadon por Esperanto per speciala sekcio en ĉiu eldono, kio enhavas artikolojn pri kaj en Esperanto.

WELLINGTON, N.Z. — La pasinta monato estis okupo-plena por la loka klubo pro la okazigo en nia urbo de la N.Z. Konferenco Esperantista, pri kio detala raporto aperas alikolone. La bonega laboro de la kluba sekretario kaj prezidanto certigis la sukceson de la konferenco, al kio ni bonvenigis samideanojn el aliaj lokoj.

La klubo rekomencis siajn agadojn por 1929 je la 29a Januaro. Estas kontentige noti la aliĝon de novaj anoj. La dua kunveno okazis la 5an Februaron, kiam Gesinjoroj Payne, el Masterton, plujaj membroj novaj vizitis la klubon.

KRONIKO EL SYDNEY.

Parolado de S-ro Mattersin, titolita, "La Natur-amiko Movado en Eŭropo," estis tre interesa. Tiu ĉi samideano, kiu ĉiam interesigas sian aŭdantaron, tre bone preparolis la supre-nomitan movadon, kiu, li diras, celas konduki la popolon al plena kompreno de, kaj amo al, la Naturo. La celoj de tiu ĉi movado estas kaj saniga, kaj edukado. Plej multaj Eŭropaj laboristoj, vivantaj en grandaj urboj, sentas la mankon de la belaĵoj de la naturo en sia vivo, kaj penas forigi tiun mankon per ekskursoj en la kamparon, science elektita manĝitaro, k.t.p. La paroladisto rakontis pri la diversaj klopodoj de tiu ĉi kreskanta movado en-tuta Eŭropo, menciante, inter aliaj la nudkorpaj kultoj, la vegetaristoj, kaj aliaj.

Aliaj paroladoj de la monato pri-traktis la internaciismon. Fino. An-

derson lekciatis pri "Internaciismo," kaj montris, kiel la mondo kvazaŭ malpligrandiĝas, pro la multaj modernaj elpensitaĵoj, kiel la radio, aviado, k.t.p. Ŝi diris, ke en pli antikvaj tempoj la diversaj popoloj ne tre multe komunikigis inter si, sed iom post iom, pro multaj diversaj kaŭzoj, ili devis forlasi la malnovan izolecon, kaj la tempo venas, kiam la nacioj de la mondo fariĝos aro de fratoj. Tio estos necesa, kaj granda helpo al tiu celo estos la internacia lingvo, Esperanto.

La alia internaciisma parolado estis pri "Esperanto kaj la Ligo de Nacioj." En tiu okazo la paroladisto estis la vigla prezidanto, Dro. Williams.

La programo por la venonta duon-jara enhavas multajn interes-aspektajn temojn. La paroladantoj estas homoj el kelkaj diversaj nacioj, kaj temoj kiuj devus havi iom de intereso per ĉiuj ĉeestantoj estas sur la programo.

PRI ŜANĜOJ.

En Majo 1907 en ĉiuj Esp-aj ĵurnaloj aperis grava artikolo de d-ro Zamenhof "Pri reformoj en Esp-o," en kiu li diris: En la lasta tempo inter la Esp-istoj kuris la famo, ke mi intencas reformi Esp-on. Tiu-ĉi famo, kiu povas fariĝi tre danĝera, estas absolute malvera. Mi neniam intencis arbitre reformi la lingvon, ĉar tio-ĉi ne sole estus pezaĵa por nia afero, sed mi havas por tio eĉ nenian moralan rajton. . . Oni scias, ke de la momento, kiam mi en la jaro 1889 fordonis mian mastrecon, mi neniam permesis al mi fari propravole en la lingvo ian eĉ plej malgrandan ŝanĝon. Se mi ne faris tion, ĝis nun, tiam pli mi certe neniam ekdeziras fari tion nun, post la Buljona Deklaracio . . . La Esp-istoj povas esti tute trankvilaj: mi neniam surprizos ilin per ia arbitra ŝanĝo en la lingvo, por kiu mi, simile al ĉiu alia Esp-isto, jam de longe havas nenian rajton; neniam mi altrudos al ili mian personan deziron; kaj se eĉ mi volus iam freneze fari tian senrajtan kaj pereigan faron, ĉiuj Esp-istoj povas kontraŭmeti al mi la Buljonan Deklaracion kaj diri: Ni ne permesas . . . Nia ŝipo estas nun en la mezo de la maro! Ĝi iras bone kaj ĝi naĝas bonorde al sia celo. Tial ni gardu nin fari kun ĝi iajn ajn eksperimentojn kaj elvoki malpacon inter la ŝipanoj en la maro! Ni atendu, ĝis la ŝipo venos al la haveno!

L'INITIATION A L'ESPERANTO.

Jen bona Franclingva enkonduko por ĉiuj ne ĝuste sciantaj pri Esp-o. Verkita de la konata kompilinto de "Provo je Marista Terminaro," Rollet de l'Isle, la 78-paĝa broŝuro enhavas 4 partojn; (1) Kio estas Esperanto? (2) La Historio de Esp-o kaj la vivo de Zamenhof; (3) Organizo kaj nuna stato de la movado; (4) la propagando. Tiuj siavice dividiĝas sub kernecaj indiklinioj. Facilvideble estas, ke ĉiu paĝo elplumiĝis per mano de firmegega fidanto al fina, eĉ nemalbaldaŭa venko, tamen la sekcio pri niaj jamaj impresoj ĉe diversaj homagadaj fakoj estas verkita laŭ altkontentige modera takso.

Jen kelkaj notindaj liniaroj tradukite el vere lumiga kompilaĵo. "Esp-o estus por la Ligo de Nacioj la plej forta garantiaĵo por ĝia daŭrigata ekzisto, ĉar, kiel la sperto jam pruvis, tiu lingvo kreas novan spiriton, la spiriton internacian, kiu tamen ne estas internaciismo, sed kiu konsistas en kompreno kaj forta sento, ke la lando al kiu oni amas antaŭ ĉiu alia, ne estas izola, sed ke ĝi havas sian lokon en organismo superanta ĝin; ke almenaŭ kelkgrade ĝi estas nur radeto de granda meĥanismo, kiu devas funkcii por la komuna bonestado ĉiu, celanta la daŭrigon de la paco."

Ĉu vere, "ĉiu vorto (en Esp-o) havas nur unu solan signifon"? Kp. akt, firm, daktil, atlas, artikol, mark, sekund kaj aliajn. Pri la Majstro: "jen kio pli valora (ol nura filologeco) — ĉar ankoraŭ neniu filologo kapablas krei verkon similan al lia — dotita li estis per eksterordinara instinkto lingvistika kaj estis samtempe profunde poeto; prefere ol obei regulon, kiu devigus lin akcepti nomojn al li neplaĉajn, li plivolis doni al sia lingvo iun ĉarmon kaj harmonion, kiu faras ĝin ilo, kies praktiko donas veran plezuron intelektan, kaj forte helpas al ĝia disvastiĝo . . . Ĝia kreinto estis samtempe lingvisto, artisto kaj poeto; estas ĉi tiu tiel eksterordinara kuniĝo de kvalitoj, kio faras Esperanton verko neimitebla."

"La Babel-legendo tre frappe komprenigas pri la forta flugsalto, kiun farus la scienco kaj tehniko, se tiu denaska malpovo (la prolingva muteo) estus forigita; la legendo malkaŝas al ni la diojn timigitajn vidi, ke la homoj povas prirabi eĉ iliajn sekretojn, se ili daŭrigis paroladon per komuna lingvo." Krome, ĉu ne

frapante estas konstati, ke la ideo pri la teruraĵoj sekvontaj la diversigon de la parolado trudokupis la homajn spiritojn jam en la originoj de nia historio?"

La verketo meritas facilan vendon en Franclingva teritorio, kaj lernantoj trovos ĝin tre bona ekzerc-materialo.

Prezo: ses pencoj ĉe Belga-Esperanto-Instituto, 11Rue de Petit-Chien, Antverpeno.

(Robo.)

EL "A SHROPSHIRE LAD."

De A. E. Housman.

Se ver' en koraj povus
el alto savon porti,
plej certe mia amo
vin farus jam ne morti.

Ho, se volado forta,
se sola penso savus . . .
se mortus mondo morgaŭ,
la tombo vin ne havus.

Ĉi longa korinklino,
'senlima simpati' . . .
ho, vivus vi por ĉiam,
se estus help' en ĝi.

Jam vane! Do kompatu
al koro tiu ĉi,
ĝis vi veturos urbon,
kie sola restos vi.

Tradukis A. Delsudo.

ESPERANTO AND THE POST OFFICE.

In view of the next Universal Esperanto Congress, which will be held at Budapest in August, 1929, the Hungarian Ministry of Posts, Telegraphs and Telephones has authorised Esperanto classes for the officials of the service.

The People's Commissariat for Posts, Telegraphs and Telephones of the Union of Socialist Soviet Republics has recently announced the issue of a number of commemoration stamps with inscriptions in Russian and Esperanto, including a 28 kop. stamp in memory of Tolstoy and two stamps issued for benevolent objects of 1 and 2 roubles respectively.

—I.E.S.

NEKROLOGIO.

Kun sincera bedaŭro ni ricevis informon pri la morto de jenaj samideanoj. Al iliaj familioj ni sendas la esprimon de niaj respektplenaj kondolencoj.

SinJORINO A. Scammell. Per la morto de sinJORINO A. Scammell je la 5- de Februaro, en Mater-Misericordiae-hospitalo, Brisbano post longa kaj turmenta malsano, la Aŭstralia movado perdis unu el siaj fidelaj subtenantoj.

SinJORINO Scammell estis konata al multaj samideanoj en nia kontinento, kaj en 1924 partoprenis la universalan kongreson en Vieno.

SinJoro T. O'Leary, 85 jara, mortis en sia hejmo ĉe Oakleigh. Nur unu horo antaŭ lia morto li laboris en sia bela ĝardeno. Li estis tre entuziasmo Esperantisto kaj instruis nian lingvon al junuloj ĝis liaj lastaj tagoj. Kiel soldato li servis al sia Reĝo en Hindujo, Sudafriko, kaj Gibraltaro, kaj antaŭ ne longe estis unu el la urbestaro ĉe Oakleigh.

ESPERANTO AND TOURING.

In connection with the Twenty-first Universal Esperanto Congress which will be held in Budapest from 2nd to 9th August, 1929, the Budapest Tourist Office has issued a prospectus in Esperanto, and also a profusely illustrated folder in the same language entitled: "Budapest, the Queen of the Danube."

It has also distributed a very artistic poster referring to the Congress, which will, no doubt, like previous congresses, attract participants from all parts of the world.

—I.E.S.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Ni kvitancas la ricevon de donacoj kaj abonoj jene:—(la daton post la nomo kaj sumo montras al kiu dato la abono estas pagata). W. A. F. Thomas, 4/6, Jan. '30; C. W. Ballard, 5/-, Dec. '30; A. Saar, 5/-, Junio '29; F. J. Butler, 5/-, Aprilo '30; C. J. Sharpe, 5/6, Marto '30.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro J. Skurrie; sekretario f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je ol oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 8-10 p.m. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; d-ro F. J. Williams; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 174 Burwood Road. Burwood.

Brisbana Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance" kaj apud oficejo de "Beckett's Budget." Prezidanto: Klement Kidd. Vicprezidantoj: Fraŭlino Rose Macpherson; M. Hyde. Sekretario: Fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane (Kvinslando-Quensland).

WELLINGTON ESPERANTO CLUB.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A., Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Mr. V. L. M. Daniel; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A., 34, Argentine Ave., Miramar; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A.

BOOKS YOU SHOULD READ.

Abismoj (Jean Forge)
Paper Covers 3/3
Aladin . . (Cox) . . Paper 6d.
Aŭstralia, Lando kaj Popolo
Delsudo kaj Laiho 7/6
La Biblio 7/6, 10/6, 15/-, 25/-
(According to paper and binding)

Dancu Marionetoj (Baghy) 2/9
La Faraono (Prus), in 3 Parts
Paper Covers 7/6 set.
Lilio . (Sinnotte) . Cloth 2/9
Luno de Izraelo (H. Rider Haggard)
Paper Covers 5/6.
Postage Extra.

LA BIBLIOTEKISTO, Melbourne Esperanto Society,
BOX 731 F., ELIZABETH ST. POST OFFICE, MELBOURNE.

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Specimena numero-unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 106 (Ninth Year)

Melbourno (Melbourne), Australio.

10 Aprilo 1929

ON TRANSLATION.

In "A Conversation with an Angel and Other Essays" Hilaire Belloc writes:—"Throughout the Occident there are no less than five quite separate major idioms, which five major idioms have attached to them at least one hundred minor ones. No man, not the most cultured and travelled man, possesses fully these five idioms. A very few men may claim to three; a few thousand (out of many millions) to two For instance, I can make my way with difficulty through an Italian or Spanish newspaper. I cannot do this with a German newspaper. I can read a French newspaper, not well, as though it were English, but still with a fairly full comprehension. When it comes to the literatures of these countries, say the ordinary novel, I cannot read German at all, nor, with any ease, Italian, nor, save at three-quarters guesswork, the Castilian; when it comes to great literature, and an immediate feeling of excellence through reading, I am no use at all, except in English. Though I have a wide current acquaintance with French I could never be sure of my judgment as to a French piece of verse, still less as to French prose. In my acquaintance I count highly-cultivated men—perhaps a dozen of them—with a full judgment of two or even three idioms foreign to my own; but I have, in the whole course of a life which has brought me up against a great many other men, only

known two who were even generally acquainted with the five idioms; not one who was at home in all." Elsewhere, in warning he tells us that those "very insufficient people who imagine for the moment that English will become a universal medium for the white civilisation must admit that its wide spreading has had a most lamentable effect upon its quality."

He concludes that "great translation needs exceptional talent, desiring to reproduce, and able to reproduce, the spiritual rhythm, the character, the essence of the original thing," and refers to newspaper translation as an "appalling misrepresentation of national feelings abroad which is a curse to our modern press."

After treating the manifold and subtle difficulties that attend the work of translating from one national tongue into another, among which are the different thought-associations and overlapping of meaning in words believed to be equivalents (e.g. rue and street), the "lack of exact correspondence between individual words in two different languages, the different trick of thought in two civilisations, by which what is rhetorical in the one, for instance, may seem plain prose in the other, or by which the order of thought in the one turns chaotic in the other, conceptions in the one not occurring at all in the other (for instance, the French words constater, droit, directive; the English words gentleman, scholar, fun), and so forth." Belloc asks what economic basis there is for the pro-

duction of sound translations, and answers, a payable demand for such or an endowment by a rich man or the State. That the five major idioms must be indifferently translated because of the lack of cash and competency gives little hope to the literati and scientists of the one hundred minor idioms that go to make up the Babel of western Europe. And their viewpoint was not considered or even acknowledged by the essayist. Further, it could hardly have been Mr. Belloc's ignorance of the claims and successes of Esperanto that prompted him to complete the writing without any reference to that language.

—(Robo.)

AN AUSTRALIAN ABROAD.

The following extracts are from a letter to the local Esperanto "consul" written from Vienna by an ex-resident of Mitcham, who, having planned a tour of the old world, learned Esperanto to try out its pretensions to be a means of inter-comprehension.

"For eight months I have been wandering about Europe—Holland, Belgium, France, Germany, Austria — during which time I have proved to my satisfaction that Esperanto is a reality and that in Europe are a great many people whose desire it is to exchange thoughts and aspirations with foreigners. For years before I came to the Continent I felt the impulse to get in personal contact with men of other tongues, but for the Australian, particularly, how many barriers have to be overthrown before that wish can be met.

"Well, why not do the next best thing, and correspond by means of Esperanto? For example, in the quiet little town of Ausbach, in Southern Germany, I met a charming young woman who, while showing me her array of presents and photographs received from all corners of the world, told me that scarcely a day passes without at least one letter arriving for her in Esperanto. For anyone who can travel abroad this language will open the way. Experience warrants my believing that one would find Esperantists scattered everywhere in Europe.

"By the way, one of my English correspondents informed me that he heard you giving a talk from 3LO, in which you mentioned having received a former letter from me. Every success."

LA REVANCHE (REVENĜO).

El "Castro's last Sacrament" de Albert Dorrington).

Rado grincanta en sulko vekis Carnac el lia letargio. Li trene paŝis al la pordo kaj scivole rigardis sur la malaltan terenon, kiu sidis inter la biendomo kaj la malgranda sovaĝeja urbeto. La veturilo skue iris tondrete trans mallarĝan ponton super disstaranta fendo en la bazalta deklivo, kaj la ejoj forte pensigis Carnac pri la sonoj de paflegaj radoj. Ekbruliginte alumeton li glitkurigis siajn tremantajn fingrojn laŭlonge sur breto en postparta angulo de la Ĉambro. Helene jam antaŭe metis tie kandelon.

Kiel la vesperoj ĉiam trafis lin surprize! Ŝajnis al li, ke paŝis nur momenteto de kiam Helene saltete kuris el tiu ĉambro kun la granda sunĉapelo svinge pendanta ĉe ŝia brako. Carnac ankoraŭ ne povis alkutimiĝi al la sunsubiroj de Aŭstralio. Kun la rapideco de elspiro la mallumo frapis la homojn. Froste li tremis starante en la pordenirejo; la vento de sur la montoj mordis ĝis en liaj ostoj.

"Helene, Helene!" Paŝinte sur la malsekan herbon li vokis nelaŭte. Nenia respondo — nenia sono krom nur tiu de la paflegaj radoj, kies ejoj ankoraŭ resonis el la valeteto ĝis la sabloŝtonaj altoj.

Malsupre de li staris la malluma vinbergardeno, kie laboris Kellerman. La nemultaj lanternoj de la malproksima urbeto trembrilis kiel cirklo el juveloj; neforta lumaĵo en la orienta ĉielo arĝentis la grize-tegmentan domon transe de la ebenaĵo; hundo minace bojis dum la ejoj de la paflegaj radoj krakadis de altaĵo ĝis altaĵo.

"Helene, Helene!" Li plende batis per la piedo sur al grundon kaj kolere palpebrumante skuis la pugnon al la vojo kondukanta al la bieno de Brougard. Kiel ŝi estas malfrue! Kiel senĝoja, soleca ŝajnas la domo, kiam ŝia babilanta voĉeto malestas! Ja neniam plu li ŝin permesos foriri post vesperiĝo.

La malsekaĵo el la tero, eĉ la gutejoj falantaj de la arboj, kvazaŭ ferdente tenegis liajn ostojn. Jam lastatempe li komencis malami la landon, kiu tiele ŝvitigis lian korpon de mateno ĝis nokto, la senindulgan sunon, kaj la frostojn venadantajn kun diabla akurateco por pirabi al li la

frukton de lia laboro. Malsaĝe li agis, formigrante de la trankvila valo de la rivero Rodano (Rhone)! Ho tiu malbeninda milito de 1870!

El la mallumo de la vinbergardeno ŝvelis al li ondo de sono — subite, klare, vibrante kun fortpulma fervoro. Carnac sin trenis laŭ la vibereje flankita vojstreko kaj aŭskultis. Strio da lumo el la kabano iluminis Kellerman kantantan kaj fingre elektantan pri vinberoj sur la planko. Carnac palpire alproksimiĝis, kaj la antaŭlonjara sabrovundo ĉe la kokso elpuŝiĝis krion el la lipoj; Kellerman povus tion aŭdi, se li ne ĝuste tiam kantus tranaze:—

Lieb Vaterland, magst ruhig sein!

Lieb Vaterland, magst ruhig sein!

Fest steht und treu

Die Wacht, die Wacht am Rhein!

Carnac ŝtopis la orelojn, kaj kaŝe reiris la domon. Antaŭ tri monatoj venis al li Kellerman kun vundfrotitaj piedoj kaj laboron peteganta. Kellerman estis vinbergardenisto ja Germana, sed Carnac, la kosmopolitulo, provis lin je tasko, kaj la vino de ĉi tiu farita egalas la propran. Iom post iom la simplanima Kellerman rakontis sian vivhistorion — la milito de 1870-71 — kun ruĝiĝoj pro fiero, kion ankoraŭ li ne povis kaŝi. Interŝanĝe Carnac nenion diris; sed tie, en la Aŭstralia sovaĝejo, Sedan-batalo revenis en lian imagon — la amaso da venkitaj leonoj ruzlogitaj en kavon kaj tie buĉitaj de Germanaj matematikistoj.

“Der Deutsche bieder, fromm und stark,” kantis Kellerman. Carnac ronde turniĝis sur la vojo, kaj la sango alsaltis lian aŭskultantan vizaĝon. Subite perlis malsekaĵo sur lia frunto; la terura doloro ĉe la kokso alportis kun si la memoron de certa ulano, kaj de sabrotranĉo mandorse donita sub la fumantaj kaĥonoj de Moltke. La sabristo kaj Kellerman estis samlandanoj; eble ili parenkis. Kellerman ja batalis ĉe Sedan en la ironta linio de ulanoj; povus ja esti, ke Kellerman mem estis la sabristo.

Carnac iris falete tra la longa herbo, kaj la ŝvito gutis de lia vizaĝo sur la manumon. Atinginte la domon, li enmanigis al si brile poluritan sabron, akraklinga ĝi estis, kaj de post Sedan ĝi ne entranciis karnon. Nenia sono en la domo; jam de vesperiĝo Helene forestis. Al najbaro Brougaud ŝi iris por ludi kun ties infanoj; bone estis, ke Helene havas kunetulojn ĉirkaŭ ŝi! Ŝi intencis resti tie ĝis la deka horo, kiel

ĉiam! Ja bone!

Lia dolore tordata korpo tremetis; li svingegis la brakon dekstren-maldekstren ĝis la sabro fajfis post liaj oreloj. Helene eble sentus la males-ton de Kellerman; sed li povus diri ŝin, ke Kellerman jam foriris okcidenten, kaj baldaŭ ŝi lin forgesus.

Okaza puŝo de vento ĵus blovmalfermis la kabanpordon; la strio jam grandiĝas en blankan radion kontraste kun la mallumo, kaj la nuko de Kellerman movetadis en ĝi, flanken-antaŭen takte kun la malrapida ritmo de lia ofendega himno. La nuko allogis Carnac. — ĝi estis tiele karnoriĉa, tiele tendenoplana, rondkurba, kaj atingebla en nur malpli ol brakstreĉo de la pordejo: Carnac bone scipovis sabrobaton taŭgan por malarĝaj spacoj — kurbe-brakan tranĉon, kiu saltigus la dekoligitan kapulbon en la vintonon.

El la apudaj montoj sovaĝa dingo (canis dingo) hurlis, kaj en la sekvinta silenteco Carnac aŭdis la ŝtonojn bruste ruliĝantajn en la perpluve sveliĝinta rivereto malsupre.

Kellerman estis parolanta — ŝajne al si — kaj la voĉo estis mola, tre dolĉa. Carnac ŝteliris pli proksimen ĝis lia torpedosimila barbo frotis la pordon. La nuko de Kellerman denove svingis en la lumon, sed io jam ĝin ĉirkaŭvolvis, io blanka kaj kavet-hava, kiel infana brako. Kellerman ree parolis. “Vi enrampas, enrampas, ĉi tien, kaj vi, kiel eta fantomo, min teruras. Kie vi iris, Helene?” Lia giganta korpo fervore leviĝis super tiun de la knabineto, dum ŝi flustre klarigis, ke patrino Bougaud estis instruanta sin kudri.

Sidanta sur la vinberuje kovrita benko, ŝi klinetis dormeme la kapon, kaj Kellerman ridis al ŝi per sia forta baso, “Himmel! Mi pensas, ke mi mortus en ĉi sovaĝejo, se vi ne ekzistus, Helene. Mi pensas, ke mi mortus!”

Enbrakiginte la infanon li sidmetis ŝin sur la ŝultron. “Mia laboro estas jam finita, Helene; ni iru al via patro.” Ŝia maneto fide enŝoviĝis en lian sunbruligitan pugnon. Preninte pipon de breto li marŝis supren laŭ la malbrua vojstreko sub senmovaj branĉoj de eŭkaliptoj elbarantaj la lumon de duone leviĝinta luno. Helene ridis ĝis tio, ke ŝiaj longaj bukloj skue envolvis lin kiel fumringoj. Ŝia pepanta voĉeto kunkantis kun lia profunda baso:—Die Wacht, die Wacht am Rhein!

Carnac retroŝteliris, nur malforte povante stari. Io klake falis sur la stonojn; li kliniĝis, kaj sur la sabron gutis liaj brogantaj larmoj.

(El la Angla trad. Robo)

KURSO PER TRADUKADO.

(kondukata de s-ro George Gordon, F.B.E.A.)

Interesatoj turnu sin al Miss Blyth, 10 Victoria-av., Surrey Hills, Victoria, E10.

TRADUKO 11.

NESCIO DE FREMDAJ LINGVOJ
de Profesoro Jespersion.

La verkoj de Kant unue konatiĝis en Edinburgh en la jaro mil-okcentria, ne en la Germana originalo sed per Francaj tradukoj. John Stuart Mill nur malfacile povis legi la Germanan kaj plivole legadis (2) tradukojn. Li neniam sufiĉe bone lernis la lingvon por komprenigi (3) sin en Germana stacidomo. Kiam Carlyle renkontiĝis kun Louis Blanc "estis treege amuze aŭskulti la interparoladon." La Franca lingvo kiel parolis ĝin Carlyle estis laŭvorta tradukado de lia propra netradukebla Anglaĵo, kiun li elparolis per Skota prononco. Louis Blanc tute ne povis kompreni lin, sed atente aŭskultis (4) kaj tre maltrafe respondis (11) (Car. Fox). Faraday havis nenian scion de la Germana lingvo, kaj pro tio la esploroj de Robert Meyer kaj Helmholtz estis por li "sigelita libro." "Kiel alie — diris dekanano Stanley — "povus esti ĉe (5) la Eklezio de Anglujo, se Newman estus povinta legi la Germanan." Kiam Germana klerulo sendis prinotitan eldonon de "Macbeth" al doktoro Furnival, la direktoro de New Shakespeare Society (nova Shakespeare'a societo), Early English Text Society (societo por frutempaj Anglaj tekstoj) k.t.p. (6), la doktoro respondis, ke malfeliĉe li ne povas (7) legi la notojn, sed pro la ciferoj komprenas (7), ke la aŭtoro pritraktas punktojn pri metriko. Kiam Zola forkuris (8) el Francujo dum la malfeliĉa afero pri Dreyfus, li tute ne povis komprenigi (3) sin per la Angla lingvo. Tiel same estis ĉe (5) la Dana poeto Herman Bang, kiu mortis en mizero en Ameriko en la jaro mil-naŭ-dek-dua tute ne povante sciigi al la proksimuloj siajn plej ordinaraĵajn bezonojn.

Ne forestas ekzemploj de simila

reebleco ĉe (5) ŝtatistoj. Estas dirite (9), ke Danujo suferis malprofiton ĉe sia malfacila politika situacio en la mezo de la pasinta jarcento pro tio, ke Madvig, la fame konata latinisto, kaj aliaj ministroj nur malfacile povis paroli France kaj hezitis paroli malĝustan Francan al la aliandaj ambasadoroj. Tiel same estas raportite (9) pri personoj de la tutmonda milito. Sir (10) Edward Grey ne povis paroli France, kaj la Franca ambasadoro, Cambon, malbone parolis Angle. Neniu el la Francaj kaj Anglaj generaloj, krom Lord (10) Kitchenĉer, bone parolis la lingvon de la alinacianoj, kaj en la Pac-Konferenco Clemenceau gajnis supran influon nur pro tio, ke li sola perfekte sciis ambaŭ lingvojn. Oni ne bezonas neordinaran saĝon por kompreni, ke konfidencaj interparoloj inter eminentaj ŝtatistoj el diversaj nacioj pri aferoj de tutmonda graveco perdas multe da profito, se tiaj interparoloj devas esti farataj pere de interpretistoj. Kiel multe pli bone estus, se ĉiuj grandcerbuloj povus egale bone kompreni ĉiu la aliajn, sed tio ne estus ebla krom se per la uzo de perfekte neŭtrala lingvo.

(daŭrigota)

NOTARO 11.

1. Preseraro. — Trad. 9, kol. 2, L17 "arboran (arbaron). — 2. "legadis," used to read. Cox 270 (1c). Vidu noton 4 malsupre. — 3. "komprenigi sin" povas laŭ la kunteksto signifi aŭ "igi sin kompreni" (aŭ komprenanta) aŭ (kiel ĉi tie) "igi sin komprenata." L.R. pĝ 31. — 4. "would" ĉi tie signifas "used to." Vidu noton 2 supre. — 5. "ĉe" ofte havas la senco de "with" aŭ "in the case of," ekz.: Ŝia buŝeto tremis, kiel okazas ordinare ĉe la infanoj, kiam ili penas reteni fortan ploron. Mart. 143/27. — 6. Oni ne esperantigas nomojn de neinternaciaj societoj. Notaro 2/5. — 7. Rimarku "povas" ne "povis" kaj "komprenas" ne "komprenis." Notaro 2/15. — 8. Iuj verkistoj uzas la ankoraŭ neoficialigitan "fugi" (to flee). Zam. uzas "kuri" (Gen. xxxv, i). — 9 "Estas dirite" kp.: Mat. 5/21. Vidu ankaŭ "estas raportite" malsupre. — 10. Ne esperantigu la titolojn "Sir," "Lord," "Lady" kiam ili aperas kvazaŭ parto de persona nomo, sed oni dirus "ĉeestis multe da lordoj kaj lordinoj (peers and peeresses) kaj sinjoroj, inter kiuj estis Lord Curzon, Lady Blake kaj Sir James Smith." —

11. Kiam oni uzas la sufikson —ad en antaŭa verbo en frazo (kiel ĉi tie en "aŭskultadis") ofte ne estas necese uzi ĝin en posta verbo en la frazo, ĉar sen ĝi la senco estas tute klara. Kp.: F.K. 29/14.

KRONIKO.

MELBOURNE, Vict. — Inter la aferoj pri kiuj interesigas la Esperantistaro, du okazintaĵoj estis speciale notindaj. Je Feb. 28a, s-ro. C. W. Ballard, invitis la Esperantistojn al sia domo por ke ili aŭdu novajn fonografdiskojn, de Dro. Privat kaj aliaj parolantoj. Unu disko donis lecionon pri la elparolado de la lingvo, kaj pro tio la aŭskultantoj trovis ĝin la plej interesa. Dum la vespero la gastoj partoprenis en du ludkonkursoj, dum la diveno de kiuj la konkursoj tre gajigis. Por tre feliĉa vespero la gastoj esprimis al gesejoroj Ballard siajn dankojn.

Je 19a Marto, s-ro. C. L. Clarke faris bonan kaj interesan paroladon pri la multe uzata kaj bone konata poŝtmarko. Li priskribis ĝin de tempo de la unua eldono, kaj, pri la ŝanĝoj de formo, traborado, k.t.p. kiuj aperis kun postaj eldonoj, kaj pri kelkaj desegnoj li rakontis ridindajn anekdotojn. Li ankaŭ montris al la anoj orde aranĝitajn poŝtmarkojn en du albumoj, kaj por unu serio kiun li elmontris je ekspozicio oni aljuĝis al li bronzan medalon. La anoj kore dankis s-ron Clarke kaj poste ekzamenis la poŝtmarkojn laŭvole.

HAMILTON, Nov-zelando.—Nova kurso sub la aŭspicioj de la loka Societo komencis post la Pasko. S-ro W. B. Williams, River Rd., estas la sekretario. N.Z. samideanoj povas menci tiel adreson al iuj geamikoj ĉi tieaj.

MASTERTON, N.Z. — La 18an Februaron nia grupo rekomencis agadon por la jaro kun 15 geanoj. Ĉe kunveno tre sukceso-plena, la jenaj oficistoj estis elektitaj:—Patrono, S-ro G. R. Sykes, Parlamentano; Prezidanto kaj Instruisto, S-ro A. Dewar; Vice-prezidanto, S-ino J. Mc-

Nab; Publikada Agento, S-ro E. J. Coleman; Komitatanoj, S-roj H. Franks and H. Arthur; Delegito al N.Z.E.A., S-ro A. Dewar. La grupsekretario estas S-ino L. Payne (8 Bruce Street), kiun oni reelektis al la grava ofico. Raporto de la loka Y.M.C.A., kiuj laŭdis Esperanton kaj certigas la Grupon pri sia laŭpova helpo. Kunvena raporto aperis en nia taggazeto, kio publikis ankaŭ bonegan artikolon pri la opinio de Profesoro J. J. Findlay pri Esperanto.

WELLINGTON, N.Z. — Dum pasinta monato la ĉi tiea klubo regule daŭras siajn kunvenojn, ĉiu el kiuj havis bonegan programon laŭ ĉiavidpunkto. Krom elementa instruado por novuloj, programeroj altgradaj por spertuloj estis provizigitaj. Novaj membroj daŭras aliĝi. Ĉiu kunveno ricevas detalan presmencion.

Aferoj de la nove starigita N.Z. Esp. Associo antaŭeniras bone. La honora sekretario, (S-ro Wm. H. King, 119A Kelburn Parade, Wellington) raportas ke Kavaliro Georgo Fowlds, C.B.E., akceptis oficon de patrono; ke la agkomitato estas starigita; ke kluboj k.a., jam estis provizitaj kun detala konferencraporto; kaj ke cirkuler-leteroj estis enpoŝtigitaj al la N.Z. Esperantistaro.

SYDNEY, N.S.W. — Dum Marto la Sidneja Esperanto Societo perdis sian tre entuziasman kaj kapablan prezidanton Dro. Williams. Tiu-ĉi bone-konata laboranto por nia afero forvojaĝis, la 26 de la monato, al Papua, kie li restos dum nedefinita tempo. Je la 21 de la monato li estis adiaŭata de malnovaj anoj de la Sidneja Esperantistaro, kaj prezentata per horloĝo. Multaj malnovaj anoj ĉeestis; inter ili S-ro. Simon, estinta prezidanto de la grupo. Ĉiuj deziras al li, bonŝancon en lia nova posteno!

En la sama vespero, S-ro. V. Roberts, de la Pac-Societo, (Peace Society), liveris paroladon kiu enhavis multon de intereso al ĉiuj, kiuj sin interesas pri Mondpaco kaj Frateco. La temo de la parolado estis, "La Pac-movado kaj Esperanto." La ĉefa punkto de la lekcieto, kiu estis en

HAROLD PUDNEY

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? rizorgas mendojn per poŝto. Memoru facila por via monujo. Li speciale p

la adreson

Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR

7 **EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.**

angla lingvo, estis la emo al unueco en la nuntempa mondo. Ekzemple, diris la paroladanto, ni havas unuecon en la scienco, matematiko, muziko, radio; kaj komerco, turismo, k.t.p., pli kaj pli kondukas la mondon al unuecon en tiuj kaj similaj aferoj. En lingvaj aferoj ankoraŭ ekzistas haoso, sed, pro la supre menciita unuecemo, oni ĉie pli kaj pli sentas la bezonon de internacia lingvo. Sendube, iu ajn nacia lingvo ne povas servi kiel internacia lingvo, pro la malfacileco en la lernado de ili, kaj ankaŭ pro la nacia ĵaluzeco. Oni ankaŭ ne povas revivigi "mortintan lingvon," kiel la latinan pro la granda malfacileco en ilia lernado. Do, devas esti "artefarita" lingvo, kiun oni elektos por internaciaj rilatoj. Komprenble, tiu internacia lingvo estos uzata nur por internaciaj aferoj, kaj ne celos tute forigi la naciajn lingvojn; tiuj ĉi ankoraŭ estos uzataj por enlandaj aferoj. Multaj penoj estis faritaj, enkonduki internacion help-lingvon tian, sed ĉiuj, krom Esperanto, malsukcesis, kaj preskaŭ malaperis. Nur Esperanto vivas, kaj sin montras kapabla plenumi ĉiujn postulojn de internacia lingvo.

Alia tre grava maniero en kiu labori por mond — paco, estis per edukado. Kiel oni emas al unuecon en tiom multaj aliaj aferoj, tiel, ankaŭ, oni devas enkonduki universalan sistemon de edukado. Se la infanoj en ĉiuj landoj estus edukataj kontraŭ la militon, milito baldaŭ foriĝus. Por unuigi la popolon, regantoj ofte parolas pri "la malamiko post la landlimo," kiu deziras invadi ĉies landon. Tio helpas kreskigi la milit-spiriton, dum, se ĉiu komprenus, ke popoloj de ĉiuj landoj estas homoj, similaj, unu al alia, milito multe malaperus.

El Richmond, N.S.W., venis raporto pri fondo de Esperanto grupo tie. La ĵurnalo, "Hawkesbury Herald" multe priskribis la aferon, kiu estis frukto de la laboro de Sro. G. Di Rago. La grupo formiĝis en Januaro, kaj la oficistoj elektitaj estis; Prezidanto, Sro. W. Hudson; kasisto, Sro. N. S. Marshall; sekretario, Sro. G. Di Rago. Sep-cola kolonero pri la lingvo, titolita, "Kial lerni Esperanton?" estis, publikigata de la "Hawkesbury Herald" kiun dankis la grupo.

DEZIRAS KORESPONDADI.

Emilo Chudoba, Stonava, Silezio-Ĉ.S.R. Deziras korespondi pĉt. kĉl. per L, Pt. bfl! Tuj Respondas!

NOVA GRAMATIKO (Stamatiadis).

Bedaŭrinde estas, ke d-ro Anakreoni Stamatiadis ne kartone bindigis ĉe iu jam konata firmo sian 186-paĝan lernilon por superaj kursoj. La broŝurita libro malfiksiĝas disfolie en la manoj.

Ne nur pri gramatiko, vortfarado kaj sintakso ĉi tiu ampleksa libro pritraktas, sed ankaŭ pri instrumentoj kaj plialtaj ekzamenoj por instruistoj, kaj ĝi klarigas la ĝisnune malfortan staton de Esperanto en Grekujo. S-roj Bailey, Lippman, Fruictier kaj Stojan kontrolis la manuskribajon, kaj pro tio oni miras, ke unu-du dubaj formoj eniĝis en la tekston.

Ĉiu paĝo instige havas rilatan demandfrazaron ĉepiede. La libro, kvankam tre multhava, tamen por kelkaj restos ankoraŭ nesufiĉe kompleta. La atendemo jen-ĵen ricevas skueton, ĉar oni volas pli scii pri multo nepre inda esti trovata en tia verko. Ekz., la pritrakto pri la nombroj de akordiĝantaj substantivoj kaj adjektivoj (10) povus esti pli prinita; la uzo de la adjektivo ĉe senobjekta frazo (12), (kial d-ro S. ne tuŝis pri Dan. 4/2 kaj Petro 1/13?); ĉu vere laŭ Lippman "tia formo estas antikviĝinta kaj tial nekonsilinda"? Ŝajne la rimarko en 12/41 devis esti presita en linio antaŭ "Aliaj ekzemploj." Oni ŝatus iom detalan pritrakton pri la nuancoj de la verbfinajo post "kvazaŭ" (65,77). Ekz., "Li iris kvazaŭ li estis (us) ebria." "Unuobla" (obligata de unu?) kaj "duobla" estas kuriozaj almenaŭ por Angloj pro ilia signifo donita al "double." Kp. Mill.

"Forludi sian unikan panon" (27) estas neĝusta. Ĉu ne "solan, lastan, sole restantan"? Post "ĉiuj" la artikolon ne uzas bonaj verkistoj. Vere antikviĝinta estas la citaĵo en la Dua Libro, pĝ 39, "ĉiuj la Dioj." La cito de alia verbfinajo (38) ol "u" post "por ke" ankaŭ estas interesa arkaiĉaĵo sed tute ne imitinda. Ni estu simpla, precipe ĉe la verboj. Ne fikreskiĝu al nia lingvo la nacilingvaj malregulaĵoj.

En pĝ 23, par. 85 la vortoj "En ĉiuj aliaj okazoj oni uzas 'vi'" povas esti erariga, ĉar oni povus supozi, ke "ci" estas deviga en la antaŭiranta frazo.

Lumiga estas mallonga letero de Zam. pri la vortoj "pii" (66), "feliĉi." Kvankam Zam. iom ofte uzis

akuzativon post "kontraŭ" (24), neniam li faris tion post "ĉe." La konsilo de d-ro S. ne uzi du sinsekvajn prepoziciojn (74) estas pridiskutinda pro la jamofta ekzemplo de la Majstro, kiu ankaŭ uzis "depost" unuvorte; malgraŭ tio, estas prava la averto de S. pri la malfacilo fonetika (74). "Citato" (citaĵo) 83.

Ĉe 86 troviĝas paragrafo atentinda por ĉiu tro-kunmetulo. Ne ĉiu por la verkanto tutklara kombinorto estas nepre unusenca por aliulo. Kp. Butontruo—truo sur la vesto, tra kiu oni pasigas butonon; truo de butono—truo sur la butono mem.

93. D-ro S. malrekomendas uzon de "end" ĝis ĝia oficiala aprobo. Ĉu ne pli konsilinde uzi ĝin libere ĉe la literaturo, sed rifuzi al ĝi lokon en lernolibroj kaj parolo? 105. Ĉe "dank'al Dio" la apostrofo verŝajne estas neregula sed ofta forlaso de "on," ne "o." Tamen komparu Ham. 1. 1. "Halt' (halt-u), . . . kiu iras?" Dank' al" povas ankaŭ servi kiel "danke al." Kp. "ruĝ' aŭ nigre binditaj." (Privat)

Pri la t.n. listo de 'homonimoj' oni povus diri, ke la kompilinto tro streĉis la spriton. Estas aserteble senriske, ke neniam okazos ia malkompreno pri cim-balo, cir-kulero, diabeto, fal-balo, kol-porti, mani-pulo, vet-er-in-ar-o (kolekto da inaj elementoj de veto!). Strange ke la verajn homonimojn li preterlasis. (Vidu nekompletan liston alikolumne).

110. Kial "ekvivalas" anstataŭ la Zam. "ekivalent'?"

127. En la frazo "partikuloj devas stari ĵus antaŭ la verbo," la aŭtoro strange uzas "ĵus" kiel adverbbon de loko.

132. "fineco" (finesse), subtileco, lerteco, delikateco, estas dusenca. Kial ne prefere "finezo"? 155. 30. Erara uzo de "kies" (kiun).

Bone estus, ke d-ro S. precizigu la difinon de la vortoj Heleno, nov-Heleno, Greko, por ke ili ne staru kiel nenecesaj variantoj en la penso de la negreko.

Studinda libro, precipe por Grekoj, kiuj povas kompreni la sendube ĝustajn komparojn, ĝi nepre markas etapon sur la malfacila marŝvojo de nia Greka samstelanaro. Prezo 8/6. (Robo).

Adresu ĉian komunikaĵon por la Suda Kruco al "La Administranto" Box 731f, Elizabeth St. P.O. Melbourne, Victoria.

AN ACTIVE BODY.

Christchurch (N.Z.) Esperanto Society.

The above-mentioned Society — properly organised — commenced the new year on the evening of 12th February, 1929.

In 1928, an average of five or six members attended the fortnightly classes which were instructed by Mr. N. M. Bell, M.A., B.D., D.B.E.A., who, although an extremely busy man, very kindly gives his services to the cause of promoting Esperanto in Christchurch, and is doing splendid work. Last year, the classes commenced at 8.30 o'clock every second Thursday evening and continued until 10 o'clock. Each pupil had a "Fryer's" textbook and a pocket dictionary. Much work was put into the translating of Esperanto into English and vice versa; also during several evenings, books were put aside and conversation in Esperanto made the evenings full of enjoyment. In addition to the instruction given, the Society maintained a regular six-weekly radio lecture from the local station (3YA) and secured the publication in a leading daily of a series of splendid Esperanto articles of a highly informative nature. This year, the Society intends to undertake a great deal of work in various fields, and by way of making a start, officers were appointed as follows and a policy was discussed:—President, Mr. N. M. Bell; Librarians, Miss Corkill and Mr. G. E. Wheeler; Philatelist, Miss Moffatt; Treasurer and Secretary, Mr. A. More (48 Hackthorne Road, Cashmere Hills, Christchurch).

The members who attended the classes last year have agreed to take each a new member and coach that member in the primary grammar of the language and so attain quicker results for the Society. It was decided that the Society have a small seal to attach to correspondence and a design—one of several submitted by a member—was chosen. A monthly report will continue to be sent to the Suda Kruco for publication. A subscription of six pence for each member will be handed to the secretary each evening of meeting of the Society, the money to be used for literature for a library, advertising which the members agree is necessary, and also for a reserve fund to meet any expenses incurred during the attend-

ance of any chosen delegate at any conference held by the N.Z.E.A.

The meetings of the Society are to be held during this year every second Tuesday evening at 8.30 o'clock, and on the opening night ten members attended, several others notifying their intention of joining later.

GAZETOJ RICEVITAJ.

Arbeider-Esperantisten, 10-12; Antaŭen, Jan.; Arbeiter-Esperantist, 2; British Esperantist, 287; Bulgara Esperantisto, 5; Belga Esperantisto, 10-11; Esperanto, 2; Esperanto et commerce, Jan.; Germana Esperantisto, 2; Heroldo de Esperanto, 3, 5; Hungara Heroldo, 1; Internacia Esperanto-Servo, 8-10, 11-12; International Language, Feb.; La Revuo Orienta, 2; La Progreso, 5-6; Oomoto Internacia, 26; Svenska-Tidningen, La Espero, 2.

ESPERANTO IN SOUTH AMERICA

The Esperanto movement in South America is once more attaining the dimensions that it had before the war. National associations for the propagation of the language have been formed in Peru and Paraguay. A national society is in course of formation in Chili. The Brazilian Esperantist League has for years past been in the front rank of the movement on the other side of the Ocean.

The great French architect, Agache, who has been visiting Brazil, has delivered a number of lectures on town planning in Esperanto to large audiences.

—I.E.S.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Ni kvitanas la ricevon de donacoj kaj abonoj jene:—(la daton post la nomo kaj sumo montras al kiu dato la abono estas pagata) A. Bennett, 4/6, Okt. '29; K. Simmons, 20/-, Junio '33; C. J. Adcock, 5/-, Marto '30; H. C. McKerrow, 4/-, Feb. '30; S-ino McNab, 5/-, Dec. '29; S-ro Johns, 5/-, Dec. '29; J. McGuigan, 5/-, Aprilo '29; W. McGuigan, 5/-, Julio '29.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro J. Skurrie; sekretario f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je ol oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 8-10 p.m. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; d-ro F. J. Williams; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 174 Burwood Road, Burwood.

Brisbana Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Klement Kidd. Vicprezidantoj: Fraŭlino Rose Macpherson; M. Hyde. Sekretario: Fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane (Kvinslando-Quensland).

WELLINGTON ESPERANTO CLUB.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A., Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Mr. V. L. M. Daniel; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A., 34, Argentine Ave., Miramar; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A.

BOOKS YOU SHOULD READ.

Abismoj (Jean Forge)
Paper Covers 3/3
Aladin .. (Cox) .. Paper 6d.
Aŭstralio, Lando kaj Popolo
Delsudo kaj Laiho 7/6
La Biblio 7/6, 10/6, 15/-, 25/-
(According to paper and binding)

Dancu Marionetoj (Baghy) 2/9
La Faraono (Prus), in 3 Parts
Paper Covers 7/6 set.
Lilio . (Sinnotte) . Cloth 2/9
Luno de Izraelo (H. Rider Haggard)
Paper Covers 5/6.
Postage Extra.

LA BIBLIOTEKISTO, Melbourne Esperanto Society,
BOX 731 F., ELIZABETH ST. POST OFFICE, MELBOURNE.

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio : Abono (por dek du numeroj) :
Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Melbourne (Aŭstralio). Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Specimena numero-unu respondkurpono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 107 (Ninth Year) Melbourne (Melbourne), Australio.

10 Majo 1929

N.Z.E.A.

Progressing Satisfactorily.

Since the formation of the New Zealand Esperanto Association by Esperantists assembled in congress at Wellington on the 26th January last — of which a detailed report was published in our March issue (No. 105) — satisfactory progress has been made towards firmly establishing the new organisation; and it is indeed very gratifying to the officials of the N.Z.E.A. to note, in addition to the sound development, the hearty welcome extended to the Association upon its springing into life and the numerous good wishes expressed for its welfare and success, which already have been received from samideanoj in different parts of the Dominion.

The three patrons elected by the Conference — the Prime Minister, Sir Joseph Ward, together with Sir Robert Stout and Sir George Fowlds — have accepted office. This augurs well for the future activities of the N.Z.E.A., for the Association is bound to prosper and to have its status raised under the protection of these influential patrons. The Executive of the Association has been set up as arranged by the Dominion Conference, with the addition of Mr. A. Dewar, who has been appointed the delegate of the Masterton Group. It is a noteworthy fact that the Executive consists of active officials, whose metal has been proved, of the various N.Z. clubs and societies.

During March, circulars inviting membership to the N.Z.E.A. were printed and posted to all New Zealand Esperantists, with the result that at the time of writing (5th April) no fewer than 85 members have been enrolled. Much organising work has been accomplished by the honorary secretary (Mr. Wm. H. King, 119a Kelburn Parade, Wellington), who has also arranged for the exhibition of Esperanto magazines on the tables of the Parliamentary Library at Wellington. Several enquiries relative to Esperanto books and journals have already been received by the Association.

A good deal of important work yet remains to receive attention, included being such questions as the ways and means of introducing Esperanto into New Zealand schools; the inauguration of an Examination Committee; the arranging of a N.Z. congress; preparation of an Esperantists' directory; and the reviving of several clubs, etc., now lying dormant. The N.Z.E.A. is hopeful for the satisfactory arrangement of all these matters; and it is certain that with a strongly supporting and unapathetic membership much will be achieved for Esperanto in New Zealand. However, the work which will be undertaken is largely dependent on the measure of support accorded the Association in general and the Executive in particular; but at this early juncture, writing of a very encouraging nature is upon the wall.

PRI "MAJSTRO."

"Nun, kiam la matureco de nia afero estas jam eksterduba, mi petas," diris Zamenhof ĉe Krakova kongreso, "ke vi liberigu min de tiu rolo, kiun mi okupis dum dudek kvin jaroj, ke vi ĉesu vidi en mi 'majstron,' ke vi ĉesu honori min per tiu titolo. Tuj en la komenco de nia movado mi deklaris, ke mi ne volas esti mastro de Esp-o, sed ke mi transdonis la tutan mastrecon pri Esp-o al la Esp-istoj mem Estas necese, ke la mondo sciiĝu, ke Esp-o povas havi aŭ ne havi siajn libere elektitajn gvidantojn, sed ke ĝi posedas nenian konstantan majstron. La Esperantismo kaj la Esp-istoj ne povas esti respondaj pro miaj personaj ideoj kaj aspiroj. Se mi ion diras aŭ faras, kio ne estas konforma al la gusto aŭ konvinkoj de iu el vi, ĉiu havas la rajton diri: tio estas tute privata ideo aŭ frenezaĵo de Zamenhof kaj ĝi havas nenion komunan kun la Esp-a movado"

Komentariis Z. Adam, historiisto, pri tio: "Neniu certe povus nei la severan logikecon de tiuj ĉi vortoj de Zamenhof. Tamen ne estus facile por Esp-istoj plenumi lian deziron, ĉar ĉiuj estis kutimigitaj vidi en li ne nur la ĉefon de la Esp-a movado, sed ĉiam sentis por li ankaŭ profundan, koran simpation por liaj noblaj ideoj, por la multjaraj oferoj, kiujn li alportis al tiuj ideoj, kaj ankaŭ ĝuste pro tiu modesteco, kiu karakterizis ĉiujn liajn agojn ĝis tiuj ĉi lastaj vortoj. Ne estas do mirinde, ke kiam H. Fischer lerte proponis, ke 'ĉar ni jam estas plenjaraj, ni do povas malobei patron kaj daŭrige nomi lin — patro,' la sentoj de ĉiuj ĉeestantoj esprimiĝis en longaj, laŭtaj aplaŭdoj."

Kio precize signifas "majstro"? Estas kelkaj sinonimoj havantaj senĉon "havi aŭtoritaton pri io, (aŭ, super io)." Devas esti, ke aŭ tiu aro da vortoj havas ĉiu sian apartan esprimcon, aŭ ke unu aŭ pli estas necesa varianto. Ni kompziu estro, mastro, ĉefo, sinjoro, magistro. La difino de Grosjean-Maupin estas jene: Maitre (qui commande, qui possede); mastro, sinjoro; (qui enseigne) instruisto; (qui est superieur en talent) majstro. Tiu de Kabe: 1. Metiisto diplomita, laboranta memstare. 2. Specialisto, perfekte konante sian fakon, ĝuanta altan ŝaton. Tiu de Boirac: Lertulo, ĉefartisto (F. maitre en

son art, maestro). Por traduki la Anglan "master" oni uzas en N.T. ĉe Mat. 8/19 majstro (didaskale); 9/11 instruisto (same); 10/25 dommastro (despotes); 23/8 instruanto (katheges); 26/25 rabeno (rabbi); Marko 13/35 domomastro (kurios); Luko 8/24 estro (epistata); Efes. 6/9 sinjoro (kurios).

En la M.T. la Hebreajn vortojn en-Angligitajn sub "master" Zam. tradukis per ĉefo (Dan. 4/9); estro (1 Reĝoj 22/17); mastro (Jes. 24/2; sinjoro (1 Sam. 25/27) kaj mastro (Mal. 2/12).

Supozinde estas, ke kelkaj, eĉ multaj, Esp-istoj nomante nian amatan ĉefon per la titolo "majstro" konscie uzas la vorton por komprenigi pli ol "artlertuleca" nuanco, ĉar ili pliĝuste sentas pri la "patro" ion pliproksiman (plinajbaran) al "adoro," sed pro tio, ke la vorto "majstro" jam estas enkolumnigita en multaj vortaroj, ĉiam havanta la limhavan signifon supre donitan, direble estas, ke aldoni de tiu "adoreca" plinuanco ne estas necesa aŭ rajthava. Komprenoble, la ideo de "super(eg)a lerteco en iu arto" enhavata en "majstreco" logike sekvigas ideon de decevolanta submetiĝo antaŭ tiu supereco, sed la submetiĝo povas esti nur intelekta kaj tute ne ligita al iu aldoniteco al la posedanto de tiu artlerteco.

El la skribito estas esperate, ke jam vidiĝis neceso por pripensa uzado de tiuj sinonimoj.

—Robo.

ESPERANTO AT THE INTERNATIONAL FAIRS.

Following what is now the annual practice the bulky catalogue of the Fair of Frankfort-on-Main for the autumn of 1928 again contains a warelist in 5 national languages and in Esperanto. The Frankfort Fair has now used Esperanto with great success for nearly ten years in its advertising and correspondence.

The Leipzig Fair has again published a folder in Esperanto, of which 12,000 copies have been distributed. The Esperantist section of the Office of this Fair organises each year special meetings of traders employing Esperanto for commercial objects.

The first sample fair in Rio de Janeiro, which was opened at the end of June, employed Esperanto for foreign advertising.

—I.E.S.

THE LANGUAGE PROBLEM.

The advent of modern developments in commerce, telephony, broadcasting, talking films and aviation has created a very real need. Without question, each of these is hampered by linguistic limitations.

Circumstances have arisen in which it becomes necessary for mankind to know other languages besides the national tongue.

One stands appalled at the thought of foreign languages having been translated into so-called English.

The pidgin English met by the traveller in other lands may be amusing, but it certainly degrades our mother tongue. Its tendency is to defile the language which makes English literature so dear to the nation.

Even the American manner of using our language is repugnant to the cultured British subject.

It is not difficult to realise what would be the result when foreign announcers and foreign film artists attempt to give translated items to English hearers.

The same result would occur when an attempt is made to translate English into other tongues.

Aviators concur as to the difficulty of lingual communication when landing in foreign countries.

International telephone communication is almost impossible. The story of the tower of Babel has become very truth in the present epoch.

Facts must be faced courageously. Men and women cannot devote years to the study of foreign languages, but a language has been evolved, and could be used by all nations as auxiliary to the mother tongue.

The nature of this language is such that it can be easily and quickly learned, and freely spoken by all.

A conference of linguists representing the forty odd different speaking peoples, with official credentials from the various Governments, should have no difficulty in solving this problem. The report of such a body could be given effect to immediately by all educational departments, and a world-wide knowledge of the auxiliary language should be realised in twelve months.

Mr. Vernon Bartlett, who was special correspondent for Reuters and The Times in France, Switzerland, Germany, Poland and Italy, and who now is London representative of the League of Nations, recently broad-

casted from London. Having special opportunities and knowledge, he was emphatic that the adoption of any one national language as the international language was quite impossible. He stated that force of circumstances is compelling us to adopt a form of international auxiliary language.

Many film artists and producers already favor Esperanto as a language which fills the need.

Mr. Clarence Brown, a well known producer, is reported as having said "the success of the talking film in America will spread to Europe and South America, and unless Esperanto is understood generally an international exchange of talking pictures will be impossible." Dr. Ludwig Berger, Hollywood, is of precisely the same opinion.

Miss Elga Brink, who is playing in English films with great success, was recently interviewed. Of the talking films she said they are yet in their infancy, but they have international importance, and if used in combination with Esperanto will open up possibilities hitherto undreamed of.

Mr. Fred. Niblo, the world famous film producer who produced "Ben Hur," says that the success or otherwise of talking films lies in a solution of the language problem. He is of opinion that the English language is not desired on the European continent. It is quite impracticable for artists to learn many national languages, many famous film stars do not possess ability in that direction. The question of accent and idiom is a standing barrier. He states further that the English language as spoken in England is not liked in America, neither do English people like Americanised English. Mr. Niblo is driven to the conclusion that a neutral international language only will solve the problem.

Recent events and developments have moved so rapidly that the whole question of lingual intercommunication between nations has come to be a matter of first-class importance.

This fact is recognised by the League of Nations, and through the International Labor Bureau a monthly Bulletin is issued relating to world labor affairs; this paper is printed entirely in Esperanto and has a world-wide circulation.

Many European Governments publish Tourist Guide Books which are wholly in Esperanto.

Twenty-two important broadcasting stations in Europe are giving programmes regularly in Esperanto.

Important speeches such as Sir Arthur Keith's Presidential Address on the Origin of Man are immediately translated into Esperanto and these find a ready sale in every corner of the known world.

These things show conclusively that the language problem may be solved by the adoption of a wholly neutral language capable of being easily learned by people of every nation.

Used orally Esperanto is euphonic, the vowels are softened and the accent is always on the penultimate syllable. There is no indefinite article, there are no exceptions. The whole grammar is contained in sixteen short paragraphs, hence the comparative ease with which Esperanto may be acquired and retained.

ESPERANTO AND EDUCATION.

The teaching of Esperanto has already been introduced in a considerable number of schools in various countries, either as an optional or a compulsory subject.

The Minister of Worship and Public Instruction of Poland has authorised the teaching of Esperanto as an optional subject in all schools in which a request has been made for the same. In Austria and Czechoslovakia the official examinations in Esperanto continue to be regularly held and attract increasing attention and interest in teaching circles.

In view of the 21st Universal Esperanto Congress, which will meet at Budapest in August, the Hungarian Ministry of Worship and Public Instruction has renewed the authorisation to teach Esperanto in all Catholic intermediate schools for 1928-29.

—I.E.S.

KRONIKO.

AUCKLAND, Nov-zelando. — La sekretario de la loka Societo (S-ino E. M. Watkin, 5 Park Crescent, Parnell) de post Januaro restis ĉe Nelson, sed post ties reveno dum Aprilo la Societo refunkciados.

S-ino B. King daŭras aranĝi por la ofta apero en la tagjurnaloj de pri-Esperantaj novaĵoj, per tio celante eduki la ĝeneralan publikon al "Esperantisma" sento. Ankaŭ S-ino King klopodas starigi klason en la urbeĝo.

MASTERTON, Nov-Zelando. — La grupo tie ĉi kreskis jam ĝis 16 geanoj, sed bedaŭre ni devas kroniki foriron de unu membro, s-ro pastro Kean, kiu en la pasinta monato translokiĝis al Picton, Suda Insulo. La grupanoj kiel signon de altestimo donacis al li ekz. de la Sankta Biblio.

Je la 25a Marto la grupo okazigis sian unuan ĉiujaran festvesperon, kiu estis bone ĉeestita kaj granda sukceso. Parlamentano s-ro G. Sykes prezidis. La vespero malfermiĝis per la Esperanto-doksologio kaj enhavis jenajn programerojn; kantoj, s-inoj Lambert kaj Dewar; deklamo, s-ino L. Payne; fortepianaj soloj, s-ino Carle kaj s-ro Knott, kantoj nacilingvaj (Kroate) kaj Esperanta, s-ro Pavlinovich. La plej juna membro, f-ino Evelyn Johns, donacis al s-ro Sykes verdan stelon.

CHRISTCHURCH, N.Z. — S-ro A. More, sekretario de la Christchurch Esp. Soc., (48 Hackthorne-rd., Cashmere Hills) raportas bonegan progreson faritan de sia societo. La membraro, nombre 25, diligente laboras. Krom per diversaj fakoj de studo, la anoj sin okupas per lernado de teatraĵo. Je la jarfino tio estas prezentita. La Societo aliĝis al la N.Z.E.A., kaj ricevis en la 12a de Marto viziton de du anoj el la Masterton grupo.

Tre notinda fakto kaj kuraĝiga signo estas vendoj de Esp. lernolibroj kaj vortaroj dum pasintaj semajnoj, kaj taksante per tio, oni povas diri, ke ŝajne spertiĝas nova periodo de akra revivigo de pri-Esperanta intereso.

WELLINGTON, N.Z. — Ĉiusemajnaj klubkunvenoj regule daŭras, ĉiu daŭranta du horojn—unua horo por lecionoj, dua por lekcionoj, paroladoj, ktp. Multaj altgradaj kaj edukaj programeroj, faritaj tute en Esperanto, estis ĝuataj. Menciinde estas, ke ne nur la spertuloj, sed ankaŭ la progresintaj gelernantoj kontribuis al sukceso de la vesperoj per programeroj.

La klubo posedas bonan provizon de Esperanto-libroj, kaj kontentige

estas ke la bibliotekisto raportas pli-grandigon en la librovendoj.

Je la 22a de Marto, la klubprezidanto, S-ro E. C. Jack, paroladis de radiostacio 2YA dum kvaronhoro (7.40 ĝis 55 vespere) pri temo "Radio kaj Esperanto."

La ĉefsidejo de la N.Z. Esp. Asocio troviĝas niaurbe kaj ties sekretario (S-ro King) sciigas ke la Asocio estas establita kaj ke ĝi ricevas bonegan subtenadon de samideanoj. (Vidu apartan raporton pri N.Z.E.A.)

SYDNEY. — Dum la pasinta monato nova prezidanto estis elektita en la loko de d-ro Williams. Li estas s-ro E. Pryke, D.B.E.A., multjara kaj sperta Esperantisto, kiu estis ano de la unua Sidneja Esp-o Societo, en 1909. Anoj ĝuis tri interesajn paroladojn pri tri vaste malsimilaj temoj, kaj de tri lertaj Esperantistoj.

La temo de s-ro Simon eble estis tiu, kiu plej interesas Esperantistojn. Li pritraktis "parolantajn filmojn," klarigante ilian funkcion kaj ilian rilaton kun internacia lingvo. Kinodirektistoj, diris s-ro Simon, jam konfesa, ke internacia lingvo estas urĝa neceso por parolantaj filmoj. Oni trovas, ke neniu el la naciaj lingvoj taŭgas por tiu celo, pro la malbona maniero en kiu homoj parolas alinacian lingvon. Esperanto sole taŭgas por tiu celo, kaj kelkaj famaj geaktoroj ĝin favoras. Je la 11a de la monato s-ro Feldmayr rakontis sian viziton al Venicio, dirante, ke li povis per helpo de Esperanto, havi spertojn neveneblajn al ordinara turisto.

S-ro Rutland paroladis la 18an prenante kiel kutime neordinaran temon. Tiuokaze ĝi estis La Tagoj de la Semajno, kiu, kvankam ne sonanta tre intereschava, povas fariĝi aŝkultinda temo, se oni ĝin pritraktas ĝuste. Nia s-ano prezentis la evoluon de la nuntempa semajno. Unua surprizo de la parolado estis ekscii, ke la semajno ne ĉiam, aŭ ĉie, konsistis el sep tagoj. En antaŭaj tempoj, kaj eĉ hodiaŭ, en iuj mondpartoj, kiel ekz. la Belga Kongo, la semajno konsistas el nur kvar tagoj. En

ĉi tiuj okazoj la longeco de la semajno dependas de la foirotago de la komunumo. En la Kongo la foirotago okazas unufoje an kvar tagoj, do la unua tago de la semajno estas "foirotago," la dua, "la dua tago post foirotago" ktp., dum tri tagoj, kaj post tio komencas nova semajno per nova "foirotago." En la tempo de Romo la semajno estis septaga, nomata honore al la planedoj, kiuj siavice prenis siajn nomojn de Romaj dioj. La Anglo-Saksaj loĝantoj de Anglujo havis kvintagan semajnon, kies tagoj nomiĝis per nomoj de nordaj dioj jene, Tiisdag, Udinsdag, Thursdag, Frijdag kaj Savagsdag. Kiam la Romanoj venis Anglujon la Saksoj prenis la Roman septagan semajnon kaj por la du plujaj tagoj prenis la du unuajn tagnomojn de la Roma semajno, nome, Dies Sol, Dies Lunae, kiuj fariĝis en Anglo-Saksa lingvo "Sondag," "Moondag." Jen ni havas preskaŭ la nuntempajn nomojn de la Angla semajno. Kiam la kristanoj fariĝis multenombraj en Romo ili iom ŝanĝis la nomojn de la Romaj tagoj. La unua tago fariĝis Dies Dominica (tago de nia Sinjoro) kaj la lasta, Dies Saturn, fariĝis Sabato, la nomo de la Hebrea sankta tago. En Anglujo Savagsdag poste prenis la formon Saturday (tago de Saturn, kiel en la Roma semajno). Kaj nun en Anglujo, Germanujo kaj la ceteraj nordlandoj de Eŭropo la nomoj tagaj similas la nomojn de nordaj dioj, dum en latinaj landoj kaj ankaŭ en Esperanto la nomoj similas grandparte la nomojn de la kristan-Roma semajno.

KURSO PER TRADUKADO.

(Kondukata de G. Gordon, F.B.E.A.)
Sek.: F-ino B. Blyth, 10 Victoria av., Surrey Hills, Vic., E.10.

TRADUKO 12.

En la jaro mil-okcent-kvārdeka Eyre ekiris je la plej fama el siaj esploroj, kun la celo eltrovi ircjon, laŭ kiu oni povus (2) sendanĝere peli

HAROLD PUDNEY

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? rizorgas mendojn per poŝto. Memoru facila por via monujo. Li speciale p la adreson

Specialisto pri Fontanplumoj

Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

(3) bovarojn al la kolonietoj en Okcidenta Aŭstralio. Tiu eltrovo estus tre grava por la kolonianoj, ĉar pro ĝi oni evitus la grandan elspezon por transportado de bovoj per ŝipoj. Li ekiris de Adelaide la dekokan (4) de Junio, kune kun kompanio de kvin aliaj blankuloj kaj du indiĝenoj. En la komenco li marŝis norden, esperante (5) trovi herboriĉan teron tra kiu vojaĝi la okcidentan marbordon (6), sed post multe da (7) monatoj da terura mizero kaj danĝero dum kiu li trovis la alnordan iradon barita (8) de salaj marĉoj kaj sekegaj dezertaj, li direktis la marŝadon sudokcidenten, kaj fine la ekspedicio sin trovis ĉe Fowler's Bay (golfeto de Fowler) en Great Bight (la granda enkurbo de la maro).

Oni tiam decidis (2) disigi la kompanion kaj sendi returne al Adelaide kvar el la blankuloj sur registara kutro (9), kiu renkontiĝis kun la ekspedicio ĉe Fowler's Bay. Eyre kaj lia subestro, John Baxter, ekiris por piediri al Albany en Okcidenta Aŭstralio. Akompanis (2) la kuraĝajn homojn la du indiĝenoj, vojaĝintaj kun ili de Adelaide, kaj kune kun tiuj estis indiĝena knabo nomata Wylie (elp.: ŭajli). Tiu ĉi lasta estis ano de tribo ĉe Albany kaj kuniĝis kun ili el la kutro. La vojaĝo de okcent kvindek Anglaj (10) mejloj (ĉirkaŭ mil tricent kvindek kilometroj) tra nekonata dezerto ĉstis plena de senĉesa laboro, seniĝo de necesajoj kaj maltrankvilego, kaj kiam ili fariĝis (2) nur unu trionon de ĝi, la du indiĝenoj ŝtelis la pafilojn de la blankuloj, kaj pafe mortiginte (5) Baxter'on, ili forkuris kun tiom da manĝaĵo, kiom ili nur (16) povis porti forlasante (5) Eyre'on en la dezerto nur kun la fidela Wylie. Tagon post tago la du homoj daŭrigis la lacegigan marŝadon tra tiu dezerta regiono de soifo kaj malsato, ĝis fine ili alvenis la urbon Albany la sepan (4) de Julio mil-okcent-kvardek-unua.

Eyre loĝis en Aŭstralio ĝis la jaro mil-okcent-kvardek-kvina, kaj tiam (11) li reiris Anglujon (6) kaj tie publikigis la historion de siaj vojaĝoj sub la titolo "Eltrovoj en Meza Aŭstralio." La sekvantan jaron (12) li eniris la servon de la Brita registaro, kaj, en la daŭro de la postaj dudek jaroj li estis gubernatoro (13) laŭvice de Nov-Zelando, St. Vincent, Antigua, kaj Jamajko, sed en la jaro mil-okcent-sesdek-sesa la registaro revokis lin Anglujon (6) por respondi

al akuzoj kontraŭ li pri la metodoj, kiujn li uzis (14) en mil-okcent-sesdek-kvina por subpremi ribelon de Jamajkaj nigruloj. Kvankam la komitato, kiu enketis pri la afero, trovis nenian kaŭzon por procesi kontraŭ li, tamen la registaro, konsiderante (5), ke resendi lin al Jamajko estus nesage, eksigis lin el la servo de la ŝtato, tamen donante al li plenan pension. Li mortis la tridekan de Novembro mil-naŭcent-unua je la aĝo de okdek ses jaroj. —(Fino)

NOTARO 12.

Preseraro. — Trad. 11. En la lasta linio krom du de par. 1, "milnaŭ-dek-dua" (mil-naŭcent-dek-dua). — 2. Rimarku la uzon de la aktiva formo de la verbo anstataŭ la pasiva, por eviti kunmetitan tempon. Notaro 1/21. — 3. "peli" aŭ "konduki." — 4. Pri la skribado de datoj. Cox pĝ 316 aŭ 329. — 5. Participa adverbo. Notaro 2/20. — 6. Rimarku akuzativon ĉe la loko al kiu oni iras. Oni povus uzi "al" kun nominativo. Cox 67(2). — 7. "multe da." Notaro 4/10. — 8. Predikata Participo, Notaro 1/7. — 9. "kutro," unumasta ŝipeto. (Verax, Rollet de l'Isle). — 10. Car estas diferenco (granda en iuj kazoj) inter la longo de mejlo en unu lando kaj tiu en alia, estas bone aŭ skribi longojn laŭ la internacia metra sistemo (almenaŭ kiam estas grve por precizigi) aŭ (ne tiel bone) skribi "Anglaj" antaŭ "mejloj." Kilometro estas ĉirkaŭ kvin okonoj de Angla mejlo. — 11. Pri "when" en la ĉi-tiea senco. Notaro 7/5. — 12 Akuzativo de punkto de tempo. Ankaŭ estus bone skribi "en la sekvanta jaro." Cox 68(3b). — 13. Ŝajnas al mi, ke "gubernatoro" aŭ "koloniestro" estas pli bona ol "guberniestro" por "governor" de Brita kolonio. Vidu F.K. 95/27. "Gubernio" (government) estas Rusa nomo por Rusa provinco. Oni rimarku, ke ĉe Agoj 23/24 en la plena Biblio oni anstataŭigis "guberniestro" per "provincestro." — 14. "Uzis" estas tute tiel klara, kiel "estis uzinta." Notaro 1/21. — 15. Mi dubas, ĉu la aŭtoro prave skribas "natives" (indiĝenoj). — 16. "nur" ĉi tie akcente esprimas, ke ili portis ĝis la limo de sia povo. Komp. "Ni tial decidis vivi tiel malkare, kiel nur eble, ŝpari kiom ni nur povis" (F.K. 114/9). Vidu ankaŭ F.K. 19/15, Mart. 117/32, 96/6.

HOMONIMOJ.

Akt, act (drama); deed (document).
 Artikol, article (gram.); article (in journal, etc.)
 Atlas, satin; book of maps; Atlas (myth.)
 Cert, one, some ("a certain man"); sure.
 Daktil, date (fruit); dactyl (poetry).
 Dam. king (at draughts); queen, (at chess or cards).
 Domen, domino (game); hooded masquerade cloak.
 Er, a particle; era.
 Firm, firm (steadfast); firm (aŭ firmao) business company.
 Frank, franc; Frank.
 Hiacint, hyacinth (fl.); jacinth (stone).
 Kanon, canon (ecc. law); cannon.
 Las, to permit; to leave.
 Mark, German coin; sign.
 Organ, part of body; party gazette.
 Penik, paint brush; cluster (grapes, etc.)
 Sekund, second (time); to second (duel).
 Turb, top (toy); periwinkle.
 Takt, (beat, mus.); discretion.
 —El Brita Esperantisto.

CHANGE OF EDITORSHIP.

Owing to the early departure of Mr. Percy Hudson for India it has been arranged that the editorship of the "S.K." henceforth be in the hands of Mr. R. Banham, who confidently appeals for the continued support of the paper's subscribers and well-wishers.

TRADUKETO LAŬ HEINE.

(Page 334 Fundamenta Krestamatio.)

Here, on my heart, torn with anguish
 so grievously,
 Rest the sweet hand of thine, girl to
 me dear.
 Hear you not there how some Inner
 One's laboring.
 Building for me, without ceasing, a
 bier?
 Ah, in this heart of mine strikes he
 so bitterly;
 Life itself flees from me; nothing re-
 mains.
 Hasten, thou Inner One, finish thy
 laboring,
 Let me sleep for aye, freed from my
 pains.

—Trans. Robo.

LETERO EL JAPANUJO.

Esperanto pli ol iu ajn fremda lingvo.

Oni ofte laŭdas ke iu flue parolas en lingvo angla, franca aŭ germana. Ĉu efektive tiel flue kiel angloj, francoj aŭ germanoj mem, aŭ en tia grado, kian oni rimarkas ĉe fremduloj, kiam ili parolas japane?

Ne grave, ĉu tiu aŭ tiu ĉi estas la fakto, sed vidante, ke bonaj parolantoj de tiu aŭ alia fremda lingvo estas, speciale kun orientuloj ĉe okcidentaj lingvoj, unu aŭ du el centoj da ĝiaj lernintoj, ni povas facile konvinki nin, ke multego da tempo kaj energio estas vane konsumitaj por lerni ĝin.

Kiom koncernas nur interkomprenigado kun fremduloj, ni do asertas, ke lernado de fremdaj lingvoj estas de la plej malgranda efikeco kaj la plej teda rimedo por la nuntempuloj, kiuj jam posedas la plej facilan interkomunikilon Esperanto elpensitan de la senekzempla monda geniulo D-ro Zamenhof.

Pripensu momente, kiu el niaj diplomatoj aŭ lingvistoj kuraĝus rompi la rekordon faritan lastatempe de S-roj Ossaka kaj kelkaj aliaj, niaj gloraj ambasadoregoj Esperantaj, kiuj interkomprenigadis perfekte kun la gastigantoj en Usono, Francujo, Anglujo, Germanujo, Danzigo, Polujo kaj ĉie, kien ili vizitis.

Ni celas liberigi la homaron, komencante de ni, japanoj, de la vanaj klopodoj turmentaj al gejunuloj koncerne lingvo-lernadon.

Forstreku la frazon: "flue paroli en lingvo angla aŭ alia," por ke ĝi ne allogu gejunulojn, ĉar ĝi estas efektive nenio krom malnovmodaĵo de la pasinta jarcento.

K. Takahaŝi,
 Ŝizuka.

ESPERANTO AT INTERNATIONAL CONGRESSES.

The number of international conferences and congresses employing Esperanto as one of their languages or as the sole language for translations is continually increasing.

On the invitation of the Office of the Frankfort-on-Main Fair an International Touring and Advertising Conference was held in Frankfort in Easter. A considerable number of persons and organisations interested in these matters from all parts of the world took part. Speeches and reports were allowed in all national languages, but Esperanto was the sole language for translations.

The next congress of the Federation of Educational Associations will be held in Geneva at the beginning of August, 1929, under the auspices of the International Office of Education. Esperanto will be the only language allowed for translations in certain sections.

—I.E.S.

ESPERANTO AND TOURING.

The Tourist Offices continue to publish prospectuses, etc., in Esperanto. Recently the towns of Budapest, Albertville (Haute Savoie), Norderney (Germany), Padua, Cologne (2nd edition), Zutphen (Netherlands) have published guides in Esperanto. The Tourist Centre "Ĉedok," in Prague has adopted the same method for making known to foreigners the region of the Tatra.

—I.E.S.

LA LIMOJ' DE LA SCIENCO.

Mi kredas al la scienco: mi bazas sur ĝia kreskado mian esperon pri la estonteco de la mondo kaj pri la homara progreso. Sed mi ankaŭ scias, ke en la homo estas multo, kiun la scienco neniam povos kontentigi. Estas en la homo sento pri la belotio la scienco eble povos klarigi, sed ne povos anstataŭi. Ankaŭ estas niaj emocioj—la fontoj de amo, espero kaj karito; la scienco ne povas pli ol klarigi tiujn, mi dubas, ĉu ĝi povos pliintensigi aŭ plibonigi ilin. La scienco aŭ sciado estas vere nur unu nepre-necesigo de la vivo; sed ĝi estas tiel gravega, ke mi metas ĝin en kategorion tute apartan.

(Sir A. Keith, en la Daily Express, konkludante en artikolo "Kial mi kredas al la Scienco") Trad. Robo.

SYDNEY ESPERANTO SOCIETY. 449a Pitt-st.

May 23—Psikologio de Rusa popolo. I. Serišev.

May 30—Social Evening.

June 6—Vojaĝimpresoj. H. Mathashin.

June 13—Early Esperanto Personalities. R. Swainson, O.B.E., D.B.E.A.

June 20—Filozofio de bolŝevismo. I. Serišev.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Ni danke kvitanco ricevon de donacoj kaj abonoj jene:—C. M. Smith 4/6, Dec, '29; A.E.A., donaco, 32/-; F. J. Williams, 5/-, Dec. '29; P. Hudson, 9/-, Julio, '31; C. M. Pocklington, 9/-, Julio, '31; Melb. Biblioteko (Esp-Soc.) 12/-; J. Skurrie, 4/6, Feb., '30; D. Hitchcock, 5/-, Junio, '30; D. B. Thomson, 4/6, Feb., '30; J. A. McDonald 4/6, Majo, '30; C. Caine, 12/-, Feb., '32; P. Dean, 10/-, Sept., '30; W. King, 5/-, Aŭg., '30; Amiko, £1/1/-; L. Hiob, 4/6, Aprilo, '30; H. Torr, 4/6, Jan., '30. La dato informas pri la monato ĝis kiu la sumoj estas pagitaj.

ANONCO.

Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo. Prezidanto, S-ro A. Dewar; Sekretariino, S-ino L. Payne, 8 Bruce Strato. Kunvenas en ĉiu lundo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro J. Skurrie; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je ol oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 8-10 p.m. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; d-ro F. J. Williams; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 174 Burwood Road. Burwood.

Brisbana Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Klement Kidd. Vicprezidantoj: Fraŭlino Rose Macpherson; M. Hyde. Sekretario: Fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane (Kvinslando-Quensland).

WELLINGTON ESPERANTO CLUB.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A., Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Mr. V. L. M. Daniel; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A., 34, Argentine Ave., Miramar; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A.

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Specimena numero-unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kuponon.

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 108 (Ninth Year)

Melburno (Melbourne), Australio.

10 Junio 1929

EDUCATIONISTS MEET TO DISCUSS ESPERANTO.

One of the most important meetings ever held in New Zealand in the interests of Esperanto took place at Wellington on 24th April when, in response to an invitation issued by Mr. H. Amos, Director of Banks College and Principal of the Wellesley Private College, the three Wellington members of the N.Z.E.A. Executive (Messrs. Jack, Dust and King), together with Messrs. Edmanson and Potts of the Wellington Esperanto Club, met in conference Mr. Amos, Mr. Lomas, Principal, Wellington Training College, Mr. Combs, Headmaster Mt. Cook (Wellington) Public School, and Mr. Lohore of the teaching staff of Wellesley College, for the purpose of seriously discussing international language in general and the claims of Esperanto in particular. That the meeting was highly successful is indicated by the following report.

Mr. Amos was manager of the N.Z. team of athletes at the Olympic games in Amsterdam last year, at which the official languages were English, French and Dutch. He was so forcibly struck by the "farcical proceedings" that he came away a firm believer that an international medium of speech is the only solution to the language problem.

In April, educationists and others in Wellington energetically debated through the Press the reforms to be

introduced shortly into the curricula of the New Zealand schools. It is very encouraging to note the suggestion from a non-Esperantist source that Esperanto be introduced. In view of this, Mr. Amos—himself an educationist—arranged the meeting between the Esperantists mentioned and his colleagues.

All present agreed that no existing national tongue would suffice as an international one. Attention was therefore directed to an artificial language. Mr. Edmanson, as spokesman for Esperantists, briefly outlined Esperanto and its progress, the narrative being supported by Mr. King, who quoted the impartial investigation made by the League of Nations in 1922, and the consequent recommendation for Esperanto. After a keen discussion, Mr. Amos, who presided, stated that, personally, he was satisfied with the case for Esperanto, and enquired if all agreed that it should be supported. Receiving an unanimous reply, the chairman sought information regarding Esperanto in N.Z., Mr. King supplying the relative particulars. Mr. Amos favored the organising of a deputation to the Minister of Education, adding that the Educational Conference was arranged to take place at Wellington about mid-May, and that a deputation to the Minister then would be timely. Mr. Lomas mentioned that at present there are 250 students in the Training College, all of whom are ready to learn Esperanto. After discussion

it was decided to organise as early as possible a deputation to the Minister of Education and to seek permission to teach Esperanto in all N.Z. primary schools (Classes V and VI) and in the secondary schools of the Dominion as an optional subject; also that permission be obtained to teach Esperanto to the students now attending the Training College, or Colleges.

The three N.Z.E.A. patrons—the Prime Minister (Sir Joseph Ward), Sir Robert Stout and Sir George Fowlds—will be invited to associate themselves with the deputation

The meeting closed with the four educationists ready to begin a course in Esperanto, and a class will be formed, the weekly instruction of which will be given by Mr. Edman-son. Instruction of Esperanto commenced at the Wellesley College on 29th April, and it is expected that soon the class will be augmented.

NEW COURSE IN TRANSLATION.

To Start in July.

For some years, and latterly through these columns, Mr. G. Gordon, F.B.E.A., has guided a course in Esperanto translation, which all capable of writing a letter in clear Esperanto are earnestly invited to join. Both he and the secretary give their service wholly free, a charge of 4d. only being made to cover cost of the English typewritten piece, sent to all members. Those wishful of joining the Traduka Rondo write to the secretary, Miss Blyth, 10 Victoria-av., Surrey Hills, Melb., E10, for particulars and the current English piece, to be translated and sent back to her for forwarding to Mr. Gordon, who will compile his notes on observations made during the reading of members' work. It is urged that readers of S.K. be not content merely to read the Esperanto version by Mr. Gordon, but rather to strive for proficiency in the art of readily translating English into sound Esperanto.

It is hoped that the patient labor of the generous organisers of the course will be instrumental in producing many a skilful user of the language of Zamenhof, men and women ready to fill the varied roles that the rapid extension of Esperanto will call into being.

D-RO HAZIME ASADA EN BERLIN.

La 3an de Septembro, prof-o Dro Asada el Tokio parolis en Berlin pri la temo "Jurmedicino en Japanujo." Invititaj estis Esperantistoj kaj individue elektitaj gastoj el la profesia sfero de prof-o Asada.

Ĉeestis ĵurnalistoj kaj kriminalistoj el la ĉefpolicejo Berlina.

Prof-o Asada klarigis la diversajn metodojn, laŭ kiuj oni en Japanujo penas rekoni la krimulojn. Antaŭ sesdek jaroj oni en Japanujo ankoraŭ devigis la krimulojn per mezepoka turmentilaro, konfesi sian kulpon. Komprenoble tiel okazis, ke oni "kaptis" kaj kondamnis krimulojn, — sed la vere kulpaj ili ofte ne estis — pli kaj pli multe ankaŭ japanaj sciencistoj informvizitis eŭropajn universitatojn, konatigis kun pli humanaj, sed ne malpli efikaj helpiloj, kaj tiamaniere Japanujo iom post iom penadis labori same kiel la eŭropaj kulturlandoj. Prof-o Asada akcentis, ke jam hodiaŭ en Japanujo ekzistas 18 fakaj profesoroj, kiuj grandparte studadis en eŭropaj universitatoj la jurmedicinan sciencon, kaj ke en Japanujo oni nun rekonas la krimulojn per mezurado de fingropremoj, sango-esplozado ktp. same ekzakte kiel en eŭropaj landoj. La parolinto ankaŭ diris, ke nun la japanaj fakistoj posedas eĉ helpilojn kaj metodojn neuzatajn kaj nekonatajn de la eŭropaj kriminalistoj, kaj estas pruvita fakto, ke tial jam hodiaŭ speciale la germanaj universitatoj volonte akceptas japanajn profesorojn kiel instruistojn, oni pli kaj pli multe "intersanĝas" profesorojn el la japanaj kaj germanaj universitatoj, por ke tiamaniere lernu la unuj de la aliaj. Bedaŭrinde nur estas la lingvaj malfacilaĵoj. La japanoj nur malfacile povas lerni eŭropajn lingvojn, tial ili ankaŭ ne povas doni siajn spertojn al aliaj popoloj. Iom pliboniĝis la afero, post kiam la japanoj komencis lerni la internacian helplingvon Esperanto. Jam hodiaŭ multaj japanaj sciencistoj verkas en ĉi tiu lingvo, kaj prof-o Asada akcentis, ke nur per Esperanto li mem povas travojaĝi la eŭropajn landojn, tiel kolektante spertojn. Estas nenecese diri, ke prof-o Asada ankaŭ en Berlin parolis en Esperanto. Ernst Wichert, Berlin, interpretis; kiel jam ofte li majstris la tre malfacilan taskon, samtempe pruvante, ke Esperanto taŭgas eĉ por pure sciencaj temoj. — Dro Schneickert kompletigis la paroladon de prof-o

Asada, aldonante klarigojn pri rekono de krimuloj laŭ propraj esploroj kaj spertoj. Per vigla aplaŭdo la aŭskultantaro dankis al la du parolintoj, per tio plej bone montrante sian kontentecon.

Dro Liebeck en sia finparolo atentigis pri tio, ke verŝajne nur malmultaj el la aŭskultintoj estas komprenintaj ĉi tiun vere interesan kaj pure sciencan paroladon de prof-o Asada, sed tamen ni rajtis diri, ke la parolado fariĝis sukcesa, jam pro tio, ke ni pruvis al neesperantistoj, ke Esperanto estas nepre taŭga lingvo por pritrakti sciencajn temojn. Ni Esperantistoj tion ja scias, sed al la neesperantistaj gastoj oni tion ne povas montri sufiĉe ofte.

—El Germana Esperantisto.

KRONIKO.

CHRISTCHURCH, Nov-Zelando. — Lastkunvene la Societejo entenis 19 anojn. Ĉi-tio estas kuraĝiga, precipe kiam oni rememoras ke la meznombro lastan jaron estis 6. Evidente E-to forte dissemiĝas en nia urbo, samkiel en aliaj regionoj de N.Z. Antaŭe la societa laboro estis farata senorde, sed nun estas kompilita labortabelo, laŭ kiu oni sisteme agas dum ĉiu kunveno. Kiam alvenos jarmfino, la grupanoj verŝajne posedos diplomojn. Ankaŭ ni preparas teatraĵojn prezentotan en Dec. Laŭ aranĝo por ĉiusessemajna brodkasto de 3YA (Christchurch) Societano parolis pri E-to la 22an de Aprilo. Kvan-kam Christchurch ne estas ĉefsidejo de E-to en N.Z., ni opinias ke la plej progesa grupo tie aktivis!

WELLINGTON, N.Z. — Ĉeesto de membroj kaj ĉi ties progreso estas alte kontentdonaj, sendube la klubo firme stariĝas dank'al vigla laboro de la estraro. Krom provizi okazajn uzojn la lingvon la klubo estas ejo de larĝa eduko, ĉar tie oni pritraktas temojn tre diversajn. Pasintmonate ankoraŭ gazet-vortbatalo okazis pri instruado de la franca k.a. lingvoj en N.Z. lernejoj. Edukistoj partoprenis. Mencio de int. lang. provizis al la N.Z.E.A. sek-io bonokazon meti frapmaniere E-ton antaŭ legantoj. Je la 7a Majo s-ro W. Edmanson, F.B.E.A., akompanate de s-roj B. Potts kaj W. King, vizitis por lunĉi la Rotarian Klubon. Al ĉ. 150 rotarianoj, inter kiuj la urbestro, s-ro Edmanson kapable parolis duonhoron pri E-to. Rezulte tion kelkaj rotarianoj eklernos. Ampleksa raporto aperis en "The

Evening Post." S-ro C. Adcock, prez. N.Z.E.A., trapasis ĉi-urbon, veturante al Christchurch kaj Dunedin.

HAMILTON, N.Z. — S-ro Adcock gvidas kurson sub aŭspicioj de la Laborista Eduka Asocio. Jen la duajara kurso aranĝita de tiu asocio.

BRISBANO. — La societo kunvenis je la 9a de Aprilo, kiam oni akceptis "viziton" de du altrangaj "alilandaj" vojaĝantoj. Du societanoj ludis la rolojn unu el Nippon (en konvena kostumo) kaj la alia el "Ĉehohispuljo." La gastojn bonvenigis s-ro Behncken, kaj ili poste parolis pri siaj landoj. S-ro Suess legis tezon pri "Dangeraĵoj Insektoj"; oni esperas, ke la temo ne estis aludo pri la gastoj.

La societo diversmaniere reklamas nian aferon per malgrandaj anoncoj en la taggazetoj.

Je la 10a de Junio la societo havos beneficon ĉe la teatro "Royal." kie ludos fraŭlino Nellie Bramley kaj ŝia trupo, per kio ĝi espereble gajnos samtempe monon kaj reklamon.

FROM THE N.Z. FRONT.

Pars in Big Polemic.

Deprecatory remarks on interlanguage by one A. Zimmern at Geneva having formed the subject of a leader in the Christchurch "Star," that paper opened its columns to a series of letters productive of an enlightening exchange of opinion. Herewith are a few of the barbs that we hope found many a mark. Said s-ano N. M. Bell: — "The acquirement of vocabulary (and the educated Englishman uses, I suppose, some 15,000 words) is, in the national tongues, largely a matter of mere memorising. In Esperanto, words are built up by the exercise of intelligence in a logical manner. Now what the world needs at the present time is the liberalising tendency of intelligence more than the conservative tendency of memory. To use an international tongue, which throughout is a logical product, will react in a wonderful way on man's general behaviour. . . . An Englishman or Frenchman recognises some 70 per cent. of the words. From this point of view Esperanto is simplified English or French. . . . The national language is useful to express national ideals; the international language to express international ideals. And in the eyes of Zamenhof the great international ideal is "brotherhood and justice among all peoples." "All

mankind must be united into one family," he said; and the language through which this human family expresses itself is Esperanto. . . . Those who may think that Esperanto is a spent force forget that there are some 1600 Esperanto "consuls" (called "delegates") all over the world; that every year an International Congress is held at which the delegates number over a thousand; that the language is in actual use (for example, I use it to keep in touch with some forty people in many different countries); that some 5000 different works have been published in it; and that the League of Nations uses it as one of the languages in which it prints the report of its Labor office.

And "D.B.E.A." Mr. Zimmern says: Use the many other pathways to the understanding of nations, through their music, their art." I have loved the music of Poles and Hungarians all my life, but I am sure if I travelled in their countries this art would not enable me to converse with those people, whereas Esperanto would help me perfectly to make friends and to explain all my needs.

S-ano G. Wheeler confesses "it took me seven years to learn English; I learned Esperanto in three months. A waste of six years and nine months, which could have been made good use of in other ways. Furthermore, I said I learned (?) English in seven years, but in truth I did not know English until I had learned Esperanto.

"I have been in places where I have found English and not Esperanto, but I have also been into Central South America, where I have found Esperanto and not English."

It is good to know that waves of pro-Esperanto letters flood the sanctum of any editor who nowadays opens his columns to the I.L. question.

ESPERANTO AND THE VIENNA PRESS.

The "Volkezeitung" one of the largest newspapers in Vienna, with a circulation of 125,000, has decided to print regularly in its Sunday supplement an Esp-o course. The course was preceded by a series of important articles on the growth of Esperanto throughout the world. "Das Kleine Volksblatt" also announces an Esperanto course.

FRENCH CONSUL APPROVES.

"While holding my mother tongue in the highest love and reverence I extend my hearty sympathy to the Esperanto movement and express my respect for its ingenious and self-sacrificing author, Dr. Ludovic Zamenhof. I have no doubt that the language makes steady progress and that it is destined to play an important part in the diffusion of comprehension and goodwill among the peoples. I believe it to be an instrument that will aid in no small measure the efforts of those who are endeavoring to lead the world to a consciousness of its fundamental unity."

—Signed: RENE TURCK, Consul for France, with very best regards.

QUERY CORNER.

Readers are invited to send in questions of general interest relating to the grammar or history of Esperanto.

W.E. in M. "He will not do this thing, because he loves me." The presence or absence of the comma makes all the difference in the meaning of the English. Translate by (1) Pro tio, ke li amas min, li ne faros ĉi tion. (Lia amo al mi detenas lin fari la agon. (2) Ne estas pro amo al mi, ke li ne faros ĉi tion, aŭ ĉi tiun agon.

B. in S. "Malgraŭ pluvetis" is bad. Write malgraŭ tio, ke pluvetis; malgraŭ pluveto, or maldensa (mallonga, nedaŭra according to the sense) pluvo. "Malgraŭ" is a preposition and requires a noun in the nominative after it.

T.K. in B. "La ĵus parolinto" is better avoided. Write "tiu, kiu ĵus parolis" or "la ĵusa parolinto."

E.T. in D. "Konkludi" does not mean to finish, but to form a final judgment, to infer or arrive at by reasoning.

A.Y. in S. "To record an event," kroniki aferon, okazintaĵon.

"A sports record," sporta rekordo.

OKCIDENTA AŬSTRALIA ESPERANTO KONGRESO.

8-14a de Oktobro.

Ĉitujare okazos la datreveno de la ŝtato Okcidenta Aŭstralio kaj tial multe da homoj certĉe iros tien por ĉeesti la sporton kaj ceterajn allogojn dum Oktobro. La kongresa programo entenas paroladojn en kaj pri Esperanto, vojaĝojn tra kamparo, viziton al la Reĝa Ekspozicio de Ĉef-

produktaĵoj, motorciklajn kurkonkursojn, ĉian sporton, kaj fine ĉiunacian balon.

Partoprenontoj nepre informu s-ron L. Mansfield, 49-63 Royal Arcade, Perth. Kongreskotizo estas 21 ŝil., rajtiganta la paginton je membrokarto donanta bonajn rabatojn.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Ni danke kvitancas ricevon de abon-oj jene:—Miss Sinnotte 10/-, Dec. '29; C. H. O'Dwyer, 4/6, Dec. '29; O. Betucken 4/6, Jan. '30; R. Cleary 4/6, Aprilo '30; W. A. Esp. Club 4/6, Majo '30; Miss E. Carrick 4/6, Mar. '30; M. Cecich 5/-, Aprilo '30; E. Huebner 4/6, Apr. '30; Wellington Esp. Club, abono-anonco 10/6, Feb. '30; C. Dornbusch 4/6, Junio '29; Auckland E. Soc. 3/6; A. Cohen, 4/6, Junio '29; H. Racer, 5/-, Majo, '30.

INGENIEROJ.

Pere de s-ro Takahaŝi ni ricevis jam alvokon al Tehnika Kongreso Internacia en Tokio havota Okt-on ĝis Novembro, 1929. Jam 350 aliĝintoj el Eŭropo k. Ameriko sin anoncis, kaj Esp-o estos proponata k. diskutata ĉe mas-kunsido. Ĉiu inĝeniero pruntu forton al la Kongreso perĉeeste aŭ vorte!

IMPORTANT.

Would supporters and subscribers kindly make out all money-orders to "R. Banham, Melbourne." Postalnotes may either be left open or made out in the same way.

KURSO PER TRADUKADO.

(Kondukata de s-ro G. Gordon,
F.B.E.A.)

Sek.: F-ino B. Blyth, 10 Victoria-av., Surrey Hills, Vic. E10.

TRADUKO 13.

Vere estas (1), ke estas tradukistoj kaj interpretistoj, sed kleraj, kompetentaj tradukistoj nek estas multaj nek malmultpage laboras. El la libro de fraŭlino (2) Pankhurst mi ĉer-

pas la informon, ke dum la jaro mil-naŭcent-dudek-sesa la Ĝeneva oficistaro de Ligo de Nacioj enhavis, krom stenografistoj kaj maŝinskribistoj, dudek naŭ tradukistojn kaj interpretistojn, la sumo de kies salajroj estis dek naŭ mil okcent funtojn sterlingajn. Konsideru ankaŭ, ke la ligo estas nur modesta komenciĝo de granda politika tutmonda organizo (3), kiu devas fariĝi post ne tre longa tempo.

En la nuna tempo de malmultekosta vojaĝado, de interŝanĝado de komercaĵoj inter ĉiuj partoj de la mondo, de aeroplanoj (4), de radia disaŭdiĝado (5) kaj de internacia scienco kaj mondpolitiko ŝajnas, ke estas urĝa bezono, ke komercistoj, tehnikistoj, literaturistoj, politikuloj kaj efektive ĉiuj, povu facile ekinterrilati kun alilandanoj kaj lerni de tiuj pli ol ili povus lerni vizitante (6) fremdajn landojn kiel langoligitaj turistoj. La vorto "international" (t.e. internacia) estis elpensita de Jeremy Bentham en la jaro mil-sepcent-okdeka, kaj jam nun la mondo bezonas internacian lingvon.

Mi ankaŭ menciu lastatempan inventon — la "parolanta filmo," kiu tre progresas al tehnika perfekteco. Kiam oni prezentis la "parolantan filmon" de Axel Petersen kaj Arnold Poulsen antaŭ malgranda vidantaro en Kopenhago, miaj pensoj saltis al la tempo, kiam per tiu ilo, kiu kunigas en si la proprecojn de kinematografo kaj radio-telefonio, oni povos vidigi, aŭdigi kaj komprenigi teatraĵojn kaj parolojn ĉie en la mondo kaj pli utiligi la servadon de la instrumento per la uzo de internacia lingvo.

(Fino.)

NOTARO 13.

1. Rimarku la uzon de adverbo (ne adjektivo) en senpersona esprimo (Cox 245; Ekz. 17/11, 19/1). — 2. Notaro 2/4. — 3. Ordinare estas bone tiel konstrui frazon, ke la plej proksima vorto antaŭ la relativa pronomo "kiu" estu la rilatanta substantivo (ĉi tie "organizo"). — 4. "aeroplano" es-

HAROLD PUDNEY

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per posto. Memoru la adreson

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

Specialisto pri Fontanplumoj

tas multe uzata. — 5. Oni vidas uzataj "disaŭdig'" kaj "brodkast'". Tiu ĉi lasta troviĝas en "International Radio Manual" de Epton. — 6. Adverba participo. Notaro 2/10.

"HUMANITARISTAJ PRINCIPOJ KAJ INTERNACIO DE INTELEKTULOJ."

En Nov., 1921, Eugen Relgis, fondinto de Rumana humanitarisma movado, per libro supretitolita provis starigi fundamenton de la hom. doktrino, per kiu ĝi povu eliĝi el al nuna sentimentala nebulaĵo, kaj aperu kiel vera scienco bazita sur la biologia evoluo de la homa speco, sur la tuta progreso de la civilizo kaj de la homa spirito. Cititaj estas kelkaj intelektulaj internacioj, kies programoj tamen baziĝas trolime sur nur partecaj ideoj. Ilia agado tial estas nur izola, fragmenteca. Dume, la eroj de la vera Internacio de la Intelektuloj ankoraŭ sin serĉas, reciproke, por kune formi unuecan tuton nedetrueblan. Sed kiu estas la supera ideo ilin unuigonta? Kia estas la supera doktrino, la Vero, kiu estu samtempe ĉe la bazo de tiom da partaj veroj? Nun sekvas kritiko de la Internacio de la Proletarioj. Ĝia agado estas limita de fera kadro. "La Kapitalo" de Marx estas sintezo de la evoluo de l'homa socio, sed nur el la vidpunkto ekonomia. La absoluta dualismo de la socialistoj — ekspluatistoj kaj ekspluatitoj — ne klarigas ĉion. La socialismo konduki(a)s ankoraŭ la subpremitajn amasojn al celoj ne ankoraŭ definitivaj. Tiom da abismoj troviĝas sur la vojo, tiom da herezoj embuskas ĉe la vojkurbiĝoj. La batalo interpopola ŝajnas esti anstataŭta de la interklasa batalado. La milito estas anstataŭta de la revolucio. Lo homaro dividiĝas en du partojn: regantoj kaj regatoj, kaj la lasta denove diseriĝas en partiojn malamikajn.

Legante ĉi-libreton mi konstante pensis pri la diro de tiu belspiritulo, Romain Rolland:— Esperanto faros elekton inter la spiritoj en la tuta mondo, ĝi kungrupigos la pensfratulojn, dissemnitajn sur la terĝlobo kaj disigitajn unuj de la aliaj per la baroj de la lingvoj naciaj. Tiel formiĝos super ĉiuj problemoj pri rasoj, klasoj kaj partioj popolo internacia."

Akcentata tralibre estas la speco unueco de l'homo. "Ĉia dogmo, imperialista aŭ bolŝevika, dia aŭ eĉ es-

tetika, estas partia; ĝi detruas la specan unuecon de l'homaro." Relgis antaŭvidas venon de la Unika Ŝtato, en kiu tempo la homaro ne fariĝos unueca organismo, sed ĝi tiam tuteklare sentos, ke ĉiam ĝi estas tia. Jam el kelkaj landoj aliĝas pensgvidantoj al la Relgis-fondaĵo. Inter ili estas: Henri Barbusse, Upton Sinclair, kaj Rabindranath Tagore. Plezure legata precipe de alegoriŝatantoj estos la premiita "Parabolo pri la hodiaŭa vivo"; por la pli aktualemaj la nuna sinteno de la pacifismo rilate Esp-on pritraktita en ĉap. "La lingvo de la pacifismo" donos interesan temon. La S.A.T. (laborista) ricevas riproĉon pro "ĝia vasaliĝo al iu politika partio" malgraŭ ĝia "bela deklaro de principoj." Tio denunciĝas kiel grava eraro, kiel la aliĝo de la grupo "Clarte" al la 3a Internacio, kaj Relgis rememorigas al tiuj "politikemaj Esperantistoj, ke Zamenhof ĉiam sciis resti en la kadroj de la universala spirito de la lingvo, kiun li kreis."

Malkare havata soci-studaĵo. Prezo: ses pencoj ĉe Belga Esperanto-Inst. 11, Kleine Hondstraat, Antverpeno.

(Robo)

EL LETERO EL SOVETUNIO.

"La murgazetoj en nia lando naskiĝas kun la Oktobra Revolucio. Oni povas nomi ĝin murgazeto ne nur pro tio, ke ĝi pendas sur la muro, sed ankaŭ pro tio, ke ĝi iaforte proksimiĝas laŭ sia grandeco al granda parto de la muro. Cetere oni jam prave batalas kontraŭ tiu senlima kresko de la formato, ĉar la gazeto fariĝas malfacile legebla.

Ne ekzistas fabriko aŭ laborejo, institucio aŭ lernejo, organizo, aŭ societo, kiu ne eldonas sian propran murgazeton. Laŭ milionoj oni povas kalkuli la legantojn de la murgazetoj, laŭ centmiloj iliaj kunlaborantojn. La murgazeto estas la pulso de la kolektiva vivo. Ĝia kulturkleriga, politika, organiza kaj disciplina signifo kaj efiko estas ne malpli, se ne pli granda, ol tiu de la lokaj aŭ centraj presorganoj. Ili pritraktas ĉiujn politikajn, ekonomiajn, industriajn, kaj kulturajn temojn en hejmlanda kaj internacia skalo, sed krom tio ĉiun temon, kiu povas interesi la anaron de tia aŭ alia kolektivo el profesia, socia aŭ kulturkleriga vidpunkto.

Ili estas plene sencenzuraj eĉ por dekjaraj infanoj, kiuj povas tute libere kritiki eĉ siajn instruistojn,

same kiel la laboristoj siajn fabrikestrojn. La trouzo de tiu libereco estas malofta, ĉar ĉiuj ordonantoj kaj plenumantoj sentas sin en Sovetunio kamaradoj. Krom tio la kolektivo eldonanta la murgazeton, eĉ la kolektivo de dekjaraj lernantoj, ne permesabsolute forestas iaj ajn punoj. Sed as, ke en ĝi aperu kalumnioj. Oni ne forgesu, ke en Sovetiaj lernejoj la interna disciplino en la lernejoj, ne formale, sed esence, estos multe pli bona, ol dum la antaŭrevolucia tempo. Ĝuste la sencenzura murgazeto multe helpas al tio. Ofte la estintaj kunlaborantoj de murgazetoj fariĝas poste kunlaborantoj de lokaj, eĉ de ĉefurbaj ĵurnaloj kaj gazetoj. Nia urba ĉiutaga ĵurnalo, "Urala Laboristo," gvidas la murgazet-movadon en nia urbo kaj distrikto (ĉar en vilaĝoj ankaŭ estas eldonataj murgazetoj).

La murgazetoj estas multkoloro pentrataj. Tiel la murgazet-movado ne nur helpas al la kreado de estontaj verkistoj, sed ankaŭ de pentristoj kaj ilustraĵistoj el inter la plej vastaj rondoj de la popolamasoj."

AL LA GRUPOJ!

Estas bedaŭre, ke tiom malmultaj grupoj anoncas en Suda Kruco. Pro malesto de anoncoj devas ŝajni al alilandaj gazetoj, ke la movado en Aŭstralio kaj Nov-Zelando estas tre malforta. Plue pro tiu malesto vojaĝantaj Esp-istoj ne scias, kie estas grupo, kiun ili povus viziti. Unu tia informis, ke dum jaroj li pensis, ke la sola grupo en N.Z. estas la Wellington. Tamen estis aliaj. Trilinia anonco je kosto de ŝilingo estus sufiĉa, ĉar nur estus necese doni nomon de grupo, lokon kaj daton de kunvenoj kaj nomon-adreson de la sekretario.

A LIVING LANGUAGE.

Prof. Charles Baudouin, poet and litterateur, says, "I find that I can write my poems in Esperanto as easily as I can in my mother tongue, French."

AL KONTRIBUANTOJ.

Bv. lasi 1½-colan marĝenon kaj interlinajn spacojn ĉe sendoj, ĉu masine—ĉu plumskribitaj. Tio donas lokon por eventualaj vortenmetoj, frazaliigoj k.s. Plaĉe estas ricevi klarlitere legeblajn verkajojn, precipe tiujn senpere batitajn de la klavoj; tamen helnigraj kopioj ne tre ĝenas. Ĉiu Esperantaĵo devas esti skribita per maŝino. Plukonsile, tenu memore, ke ms. devas kusi ĉe Box 731F ne pli malfrue ol la 28a de la monatoj, se vi volas ĝisdatan aperigon de via materialo.

VARTEJAJ RIMOJ.

Eta Jaĉjo Kornulo, en lia angulo
Tre gaje sidadis, tre vole manĝadis
Kristnaskan pastecon, maĉadis: kaj do
Dikfingro eniris, prunegon eltiris,
Kaj Jaĉjo, li diris:—

Kia knabo bonega mi estas, ho ho!

Fraŭlineto Mufeto sur mola tufeto
Jen sole ŝi longe sidadis,
Kaj ĝue, frandeme gustadis
Selakton, kazeon manĝadis!
Sed venis pestego, aĉareanego:
Fraŭlineto Mufeto sur mola tufeto
Ĉe ŝi la pestaĉo kunsidis,
Kaj ŝin terurege forigis,
Fraŭlineton for, for, terurigis!

—H.D.

AL REDAKTOROJ!

Pro spacmanko bv. konstati vi per ricevo regula de S.K., ke ni bone ricevas vian gazeton. Dankon por akurata sendado.

AL POSTISTAJ ESPERANTISTOJ.

M. Robert Filliatre, 28 rue de l'Agent Dufraine, L'ecole, Francujo, tre volas kontakti kun poŝtoŝefoj en Sidnejo aŭ Melburno; proponanta al unu tiaj aŭstralian delegitecon de la "Interligilo de la P.T.T."

SANO — SANA — SANIGA. DO YOU ENJOY GOOD HEALTH?

Thanks to Esperanto, Australia is now able to benefit from Switzerland's foremost medical discovery, NOVOCHIMOSIN (Novo-Kim) which is a remedy for every type of gastro-intestinal disorder and its sequels. "Incurable" cases yield to this remedy, which contains no drugs or chemicals, being a biological product.

All chemists CAN supply "Novo-Kim" or it will be forwarded upon receipt of a P.N. for 5/- by the agents: The Saniga Company of Australia, P.O. Box 1106, Melbourne.

LE NEKONATA SOLDATO.

Sabaton, la 11an de Aŭgusto, multaj parteprenantoj en la XXa Universala Kongreso de Esperanto veturis al Bruselo. Interalie ili iris al la tombo de la belga nekonata soldato kaj metis sur ĝin florgarbon.

En la Esperanto-movado ankaŭ estas multaj "nekonataj soldatoj," kiuj en silento, nebruante pacience fordonas siajn plej bonajn fortojn por nia sankta afero. Ili ankaŭ ne celas, eĉ ne pensas pri ebla famo. En la oficialaj rondoj oni ne konas ilin, oni ne parolas pri ili; neniam iliaj nomoj estas menciataj. Ili ankaŭ ne deziras tion, sed simple daŭrigas persiste la alprenitan taskon, ĉar en ilia senambicia nemakulita koro arde brulas la vera, nedifektita sankta fajro, kiun nenio povas malpliigi aŭ estingi. Ilia agado estas despli nobla; despli plene ili reprezentas la veran bildon de la sinforĝesema apostolo por la alta celo de la Esperanto-movado.

La "nekonata soldato" estas por ni la personigo de la plej pura, la plej perfekta, la ideala esperantisto. Nomon li ne postlasas; sed restas la rezultato de lia humila agado, kiu starigas por la nedetruoblan, neniam malapereblan monumenton.

J. Jacobs.

—El Bulteno Antverpena E. Kom.

"Some have said to me that it will take 50 or 100 years for Esperanto to be established. Even so, I replied, if it enables us to understand the other nations now, then let us get to work and use it today without waiting all those years. Then, others have said English will be the international language 100 years hence. Even so again we are not going to wait a century—we require the use of an international language now."—Mr. Amos, Educationists' Esperanto Meeting, Wellington.

"So numerous are the rules and exceptions of French and Latin that the learning of these languages becomes merely a memory test, whereas in the case of Esperanto, study comprises the application of common sense."—Mr. Combs, Educationists' Esperanto Meeting, Wellington.

"A great deal of the English spoken by foreign delegates at the last in-

ternational gathering which I attended, was quite unintelligible to me."—Mr. Amos, Educationists' Esperanto Meeting, Wellington.

AŬSTRUJO.

La ministerio por Komerco kaj Trafiko, Wien, ĉi-jare eldonas eĉ pli grande imponan broŝuron pri sia belriĉa montlando. Vera artaĵo, kun ampleksa landkarto kaj plendetaloj, ĝi parolas forte pri antaŭiro de E-to en Aŭstrujo.

AUCKLAND (N.Z.) ESPERANTO SOCIETO kunvenas la duan lundon de ĉiu monato je 7.45a horo vespere ĉe Nov-Preĝeja Halo (New Church Hall) Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell. Sekretariino: S-ino E. M. Watkin. Komunikajojn al la prezidanto ĉe Kent's Buildings, Newmarket, Auckland.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro J. Skurrie; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je ol oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 8-10 p.m. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; d-ro F. J. Williams; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 174 Burwood Road, Burwood.

Brisbana Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Klement Kidd. Vicprezidantoj: Fraŭlino Rose Macpherson; M. Hyde. Sekretario: Fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane (Kvinslando-Quensland).

WELLINGTON ESPERANTO CLUB.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A., Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Mr. V. L. M. Daniel; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A., 34, Argentine Ave., Miramar; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio : Abono (por dek du numeroj) :
Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Melbourne (Aŭstralio). Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Specimena numero-unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kuponon.

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 109 (Ninth Year)

Melburno (Melbourne), Australio.

10 Julio 1929

ESPERANTO IN THE UNIVERSITIES.

(by Dr. E. Privat, Feb. "Esperanto")

Reports from the Antwerp Congress have shown how our language is progressing in University circles. At some, Esperanto groups for students have been formed, at others professors have joined also. As is now known, several Japanese scientists are using the language for articles destined for foreign readers. In some Universities Esperanto has been placed on the curriculum. This can be done in different ways. For instance, it may be simply the teaching of the language. Such courses are the most successful in numbers, but they can be established only in commercial faculties, where other languages are taught for practical ends.

On a higher level is the present preparation of Esperanto teachers. Here the course can be arranged in a pedagogic faculty, if this contains such a preparatory section, which is often a separate institution under the name of normal school.

To enter as a subject for study into the faculty of belles-lettres the Esperanto course must be divested of all that is practical or "utilitarian." It must be purely an object of science, that is, it must not be taught, but must serve as a field for language research, just as in the faculties of science and medicine the human body, animal and plant life, serve as material by which can be observed the function and evolution of different organs.

Such study, of course, has no relation to the reformist controversies on universal language. No serious-minded student occupies himself with the question whether it would be an advantage for man to have a third eye in his back, whether grass should be blue instead of green, or whether German should have all its verbs made regular and its declensions abolished, although Mark Twain would have congratulated such a querist.

To the true linguist, not to the amateur critic, scientific research in Esperanto does not consist in voicing his own opinion as to whether Zamenhof rightly or wrongly chose this form or that, but in attentively observing how those forms were used in their life since 1887, how they evolved, grouped themselves, were of frequent or infrequent use, how they influenced one another, survived or died, were rich in derivatives, preserved their original meanings or acquired new, and so on.

But what is the good of all this? Impatience will prompt the practical-minded to ask, for he rightly yearns to see before all else, say, Esperanto signwriting on the railway carriages of the world. Certainly! Let him not grow faint in his efforts to that end. But we must remember that such linguistic studies are purely scientific. The practical one might as well ask, What is the use of comparing the grammars of Latin and German?

That Esperanto is now a recognised field for such scientific study

proves that it has become a living language, meriting the respectful attention of the Universities. It helps definitely to close the period of theoretical polemics concerning the various I.L. projects. It forces earnest people to look at the facts and note how fittingly Esperanto has become adapted to the needs of life, and to the varied expression of human thought.

And is that unimportant? No. It is possibly our most decisive confirmation. If, instead of an enthusiastically worded pamphlet, you give to the University man the monograph of Prof. Collinson on word order in Esperanto, or that of Prof. Aymonnier on its derivation, he will see at a glance that he has not to deal with some barbarous freak, but with a living, pulsating language, the study of which will instigate him both to learn and teach it.

So with our Esperanto teachers. It is very important that they should be familiar not only with the theory and fundamental rules of our language, but also that they appreciate its instinct for life and the processes of its evolution. One who had lighted upon the Esperanto translation of a well-known work, such as the Bible, and by it mastered the marvellously simple grammar of the language, would be best fitted to teach it.

At the faculty of belles-lettres at the Geneva University in the coming spring we intend to hold every Saturday a conference on these subjects, to which members of the course will themselves bring forward the results of their research. It is hoped that students from other countries will participate. Teachers or other students have permission to avail themselves of this and other courses, including that led by Prof. Bovet at the Pedagogic school. May the Geneva faculty receive encouragement in its initiative, and other universities besides those of Zagreb and Warsaw show interest in this matter.

—Trans. Robo.

H. G. WELLS PRI LA ANGLA LINGVO.

Se oni pripensas nur la disvastigon de la angla lingvo dum la 19a jarcento, oni povas facile tendenci al la opinio, ke tiu lingvo nepre fariĝos la monda ĉeflingvo. Tamen devas esti konsiderate, ke pezaj faktoroj en tiu granda disvastigo estis (1) la rapida plimultiĝo de anglodevenaj

kaj —parolantaj popoloj, (2) la enmigrado de fremduloj en anglolingvajn teritoriojn en nombroj tro malgrandaj por rezisti al la lingvoinfluo sin ĉirkaŭanta, kaj (3) la politika kaj komerca regado de unu popolo tro malklera por senpene lerni fremdlingvojn. Neniu el tiuj kaŭzoj estas necese ĉiamdaŭra. Post plifunda esploro de la demando oni miras eltrovi, kiel vere malrapida estis tiu disvastigo de la angla eĉ kontraŭ ŝajne multe malpli taŭgaj lingvoj. La angla ankoraŭ malsukcesas anstataŭi la francan en franca Kanado kaj ĝia supereco estas duba en Sud-Afriko, post preskaŭ jarcenta regado brita. La angla havas nenion de la alloga kvalito de la franca, kaj la anareto, kiu monopoligas direktadon de britaj aferoj, kaj kiu verŝajne tion faros ankoraŭ kelke da jarnekoj, neniam montras multe da fervoro propagandi uzon de sia lingvo. El la malmultaj ideoj posedataj de la brita rega klaso, la malestigo aŭ malŝato de lernejoj kaj kolegioj estas bedaŭrinde unu el la ĉefaj, kaj evidenta estas ilia absoluta nekapablo kompreni la politikan signifon de la lingva demando. La hindujano, kiu pene lernas kaj uzas la anglan, renkontas ion tre similan al malamo maskita per sprito. Rekompence por sia lernopeno li certe legas en la angla pri si nur malmulton, kiu ne estas hontinde malestima. Devos aŭ flori el sia propra potenco aŭ ĝis forpaso velkiĝi la ebloj iam ekzistantaj, kaj kiuj ankoraŭ ekzistas en malpliigita grado, per kiuj firmintencaj ŝtatestoj povus fari la anglan la ĝenerala lingvo de interkomunikado tra tuta Azio sude kaj oriente de la montoj Himalajaj. Tre povas esti, ke tiuj ebloj ja forpazos. Ŝajnas, ke nek la anglo nek la usonano havas konscion pri la graveco de anglolingva supereco por la estonteco de la raso, kaj tial verŝajne dum ankoraŭ multe da jaroj li reniel klopodos por direkti la iron de lingvoevoluo en Azio.

Post akra kritiko de la malalta intelekta stato de la angla literaturo kontrastata kun la franca, kaj la malfaciloj de britaj pensemoj ĉe la eldonistoj, kaj la frosta sinteno de la aristokrataro kaj registaro rilate al la intelekta mondo, Wells apelacias al la povhavuloj helpi al renaskigo de la pensa vivo en Britujo. Sed li ne karesas iluzion: "Se la okupaĉo de eldonado estus spirite levita, tiel ke ĝi povus enporti la tutan beletristi-

kon, tutan sciencón, tutan nuntempan penson de la mondo en atingeblecon de ĉiu angleparolanto bezonanta kaj deziranta tion, mi profetus, ke la angla povus esti la ĉiutaga lingvo de Skandinavio, kaj Danujo, Holando, tut-Afriko, tuta Nordameriko, la Pacifikaj marbordoj de Azio kaj de Hindujo, la universa I.L. havanta bonan eblon fariĝi la tutmonda lingvo de la homaro. Sed tiu eldon-entrepreno postulas unu decidemon kaj inteligenton, pri kies ekzisto ĉe ni la tempo ankoraŭ ne donas signon; ĝi signifas veran renaskiĝon de intelekta vivo ĉe la angleparolantaj popoloj. . . . Klare estas, ke plua disvastiĝo de la angla dependas de la eblo de tia renaskiĝo." (ĉap. La lukto de la lingvoj, el "Anticipations (1914), antaŭen-pensoj). Trad. Robo.

KRONIKO.

AUCKLAND, Nov-Zelando:—Post kelksemajna interrompo nia societo je 13an de majo refunkciis. Pro malagrabra vetero la ĉeesto estis nombreta, sed entuziasmo tute ne mankis.

Ni bedaŭras foriron (la 14an de junio) de fervora Johano Majstrovich, ano N.Z.E.A. k. U.E.A., al sia patrujo, Jugoslavujo. Survoje li utiligos E-ton.

CHRISTCHURCH:—Grupanoj kunvenantaj ĉiuduan mardon vespere nun havas krom la kutimaj lecionoj pli da parolado ol antaŭe. La 14an de majo kelke da grupanoj ĝuis E-to-vesperon ĉe la hejmo de f-ino Saunders, kie Esperante ni elgorĝis kantojn k. multe parolis. En la lasta grupvespero, la 21an de majo, tri novaj sam-oj ĉeestis, per tio kreskiĝantaj la nunan ano-nombron ĝis 28. S-ro Tooley, nia socia organizanto, jam aranĝas E-to-vesperon por ĉiu monato. Tiaj vesperoj multe helpas ĉiujn, ĉar babilante oni kutimiĝas al la lingvo parolata, kaj ĉe la mardaj grupvesperoj oni komprene studas la lingvon skribitan. La societo nun ricevas "Int. Language." k. ni esperas povi ricevi ankaŭ "Heroldo de E-to." Unu grupano, s-ro Frampton, riĉkore donacis kotizon por la laste nomita ĝis jarfino. Verdire E-to disfluas en Christchurch. Post nelonge la societo devos trovi pli grandan ĉambron, sed ĝi nuntempe estas sufiĉe tenipova, ĉar ĉiu ano ne povas alesti ĉiukunvene—se jes, la ĉambro estus troe prempakita! Grupano s-ro G. Wheel-

er, spertulo, ekzamenos anojn pri elparolo. Proksimnumere ni skribos pri nia 34a aniĝinto, ĉar certe estas ke ni jam ricevos ankoraŭ seson.

MASTERTON:—Prosperas loka grupo. Progreso de kursanoj daŭras sub sperta gvidado, k. regulaj kunvenoj ĉiulundon okazas kun ĉeest-cifero kontentdona. Notinda fakto estas, ke ĉiu ano kotizas N.Z.E.A., honoro laŭ nia scio havata de neniu alia grupo aŭ klubo. E-tajn aferojn oni priskribas de tempo al tempo en lokaj gazetoj, kiuj vole akceptas de sek-iino L. Payne. S-ro A. Dewar gvidas serion de ok lecionojn fakorgano "The Oceania Collector" eldonata en Dannevirke.

FEILDING:—U.E.A. nun havas delegiton en tiu distrikto. Marta n-ro de "Esperanto" sciigas pri enoficiĝo de s-ro S. Andrew (Denbigh-sq), malnova pioniro de E-to en N.Z., k. en 1904 unu el la vicprez-oj de la tiama nacia asocio. Multe vojaĝinta ali-lande, s-ro Andrew eminente taŭgas plenumi tiun gravan rolon. Gratulon!

DUNEDIN:—En majo tiu urbo ricevis viziton de s-ro C. Adcock, prez. de N.Z.E.A. Dum dusemajna resto ĉe ni li fruktige propagandis per parolado ĉe la Rotaria klubo k. aperigo de longa informodona artikolo tagjurnale. Antaŭ ol foriri li vidis starigon de kurso ĉe la Y.M.C.A. (sek-io, s-ro G. Coley), k. donis al la kursanoj enkondukan lecionon.

WELLINGTON:—Krome la ĉiusemajne tenatajn klubkunvenojn oni aranĝis ja la 4a de junio specialan vesperon tute en E-to, por festi okupon de nova klubejo ĉe la konstruaĵo Y.M.C.A. Granda anaro ĉeestis ĝi ravan programon. Dum du horoj la alvenintaro aŭskultis karlingvajn gramofondiskojn.

F-ino C. Smythson oni elektis vicprez-o de la klubo. S-ro Adcock, prez. N.Z.E.A., viglige trapasis la urbon. Ankaŭ s-ino Drury el Christchurch, sek-io de tiu asocio, vizitanta, provizis al si adresojn de sam-oj tie, kien iros ŝi, kiu intencas pikveki nun dormantajn stelulojn.

Akra manko de lernolibroj sentiĝas tie ĉi nune, pro la ŝvelanta intereso en la lingvo. S-ro Amos donacis 9 al anaro de N.Z. skoltoj, irontaj por partopreni la tutmondan skoltkunvenon en Birkenhead, Britujō. Kun ili estas skolto ricevinta kelkajn lecionojn, pro tio li povos helpi la k-dojn. S-ro Amos, direktoro de Banks Kolegio k. ĉefo de Wellesley Kolegio, antaŭ ilia surŝipiĝo forte konsilis al ili

"multaj" kaj "multe da." Notaro 4/10.
 — 5. Vidu Gen. 9/20, 2 Reĝoj 25/12.
 — 6. Notaro 10/10, Gen. 46/32. — 7. Estas grave, ke post "kiel" oni uzu la ĝustan kazon. "Mi elektis lin kiel administranto" signifas "Mi, estante administranto, elektis lin," sed "mi elektis lin kiel administranton" signifas "Mi elektis lin (esti) administranto." L.R. pĝ 42. 8. "the future," la estonteco. "Estonto" signifas future person. L.R. pĝ 59, F.K. 268/12.
 — 9. Figura uzo de "loto" kiel en Jesaja 17/14, 57/6. Oni povas uzi "sorto" aŭ "parto" kiel en Jer. 13/25, Agoj 8/21, Ps. 105/11. — 10. Pri kunmetitaj (malsimplaj) verbtempoj. Notaro 1/21.

MEN!

"EZY-KREECE" TROUSER STRETCHER keeps a permanent crease in your trousers. Sent to you for 2/6. Full address: CURTIS MAIL ORDER Co., Richmond, E1.

GRAVA ĈINA ELDONAJO.

Ni ricevis el Nankin imponan alvokon al la tutmondo forme de akra protesto de la Naciista Partio, kiu diras, ke ĝi prefere apelacias la homaron ol batali kontraŭ siaj invadintoj. La sendaĵo konsistas el kelkaj fotoj montrantaj sur agoj ĉindire fari-taj kontraŭleĝe de Japana soldataro. La teksto makuliĝas pro trea nombro da preseraroj, tamen donas flaman bildon de la aferstato laŭ ĉina vidpunkto. Ĉu ni atendu ion nuligdiran el la Japana registaro? (Robo)

QUEENSLAND ELECTIONS AND ESPERANTO.

During the recent elections in Queensland, the Brisbane Esp. Society asked the candidates to answer the following:

(1) In view of Australia's ever-growing relations with foreign countries, in which the language difficulty is so often felt, are you in favor of the official encouragement of the use of Esperanto by Government departments having business abroad?

(2) Are you in favor of the teaching of this language in the schools of the state, as is already done in many places in England, Bulgaria, Brazil, Czecho-Slovakia, Finland, France, Italy, Japan and other countries?

Twenty-one replies were received: Affirmative—Question (1) 13; Ques-

tion (2) 12. Negative—(1): 1; (2): 3. Non-committal—(1): 3; (2): 2.

In favor of an international language, but not competent to judge whether Esperanto suitable: 4.

Five replies are accounted for by the secretary of the Communist party, who wrote affirmatively for all its candidates.

Six candidates in favor of one or both questions were elected: Messrs. H. Russell, J. Kerr, R. Warren, G. Farnes, Owen Daniel, all of the Country-Progressive-National (Government) party, and G. Barber, of the Labor party.

Two members of the Labor party, who expressed themselves in favor of an int. language but did not know enough about Esperanto to judge of its suitability, were also elected.

As a result of the issue of the circular, some staunch supporters have been discovered, viz: Mr. H. Russell (a foundation member of the Brisbane Esperanto Club), now the Government member for Toombul; Mr. W. Childs, of Nudgee, who has taken a great interest in the society since its beginning many years ago, and Mr. J. Kerr, Government member for Enoggera, who wished to consult the society after the elections. All three emphasise their willingness to help the movement. The Communist candidate for Townsville, Mr. C. Tripp, answered in Esperanto.

The daily papers in Brisbane reported briefly this activity of the society.

PARLAMENTANOJ KAJ ESPERANTO.

Jen resumo de la angla artikolo "Queensland Elections and Esperanto":

Dum elekto de parlamentanoj de la ŝtato Kvinŝlando, la Brisbane Esperanto-Societo dissendis cirkulerojn al la kandidatoj, petante ilian opinion pri (1) la uzado de Esperanto ĉe la regnaj oficejoj, kiuj havas rilatojn kun eksterlando, kaj (2) instruado de Esperanto en la regnaj lernejoj.

Al demando (1) respondis jese 13 kaj al demando (2) 12 kandidatoj. Nean respondon donis al demando (1) unu kaj al demando (2) tri kandidatoj. Du-tri kandidatoj donis nur "nekompromitajn" respondojn. La Komunista partio prezentis kvin kandidatojn, kiuj ĉiuj estis favoraj; sed ili ne sukcesis ĉe la balotado. Unu el ili skribis sian respondon en Esperanto.

El la favore respondintajkandidatoj, ses gajnis lokojn en la parlamento; kvin anoj de la reganta partio, kaj unu ano de la opozicia (laborista) partio.

LA VILA MANO.

Scenoj el Nederlanda Vivo. (Bulthuis).

S-ro Bulthuis denove donacis al nia literaturo ankoraŭ unu longan (300 paĝan) rakonton pri sia popolo. Ĉu vere li havas aĉetantan publikon, pretan igi lin fiere meti "elĉerpita" sur sia eldonlisto? Nenia antaŭreklamo, nenia voko por antaŭmendo, sed anstataŭe senbrua elpuŝo de bonpresitaj verkoj. Jen la metodo Bulthuis.

La lingvaĵo estas tiel facilglata, ke preskaŭ oni povus uzi ĝin por la ncmaturuloj, se la temo estus iom alinatura. Tamen restas nenotitaj en la erarlisto sufiĉe da preseraroj, kaj la Anglaj difinoj ofte estas ne ĝuste verkitaj. Evidente mankis al ties kompilo tiulanda kontrolokulo.

En la nunreganta modo literatura, kiam aŭtoroj precipe celas psikologian analizon, oni ne povas ne rimarki ĉe Bulthuis tro supraĵan karakterskizadon. Liaj hombildoj estas preskaŭ krude malkompleksanimaj; ĉu ni ne petu la aŭtoron doni al ni homfigurojn, kiuj elstaras vivece kaj elvokas de ni simpatian aŭ admiran?

La vila mano signifas la pikantan konsciencan, kaj la aŭtoro lerte vestas ĝin sub ombro de arbedo, nigra nubo, kaj gratanta kato.

Diskutindaj formoj estas "plena," "dupo," "enkorpiganto," "etaĵo," "ĵus parolinto," "flugiloj (de konstruaĵo); "akcenti" estas trans. "spite" estas uzita anst. "malgraŭ" foje, "surpriz," anst. "mir," "komplekso" estas por kelkaj neklara, oferi (doni, proponi, provizi), protekti ne signifas ŝirmi kontraŭ danĝero; ĉagren' estas trans., same kiel terur', ĵus (ĝuste), eviti (malebligi), komand' (ordon'). Ofte la verbtempoj

estas nekorektaj, kaj ankaŭ la modoj. Sajnas, ke la libro, cetere bona, tro rapidis tra la presejo. Estas esperinde, ke la verko atingos duan eldonon, kiuokaze oni ĝin saĝe rekonsiderus la supron.

Robo.

GAZET-RECENZO.

La Orienta Revuo kaj La Nagasaki Junularo, samkiel verŝajne ĉiu Ekstremorienta Esp-gazeto, konsistas plejparte el nacilingvaj paĝoj. Tio estas por ni bedaŭra, ĉar verdire la temoj sufiĉbone devenitaj per la okaza preso de Esp-vortoj scivolige allogas. Funda esploro prilingva, pika raporto pri intervjuo k.s. sendube trafas duoblan celon. Tio produktadas veran necesajn, nome firmkonajn Esp-istojn, pretajn instrui kore-cerbe la lingvon de Zam., kaj ankaŭ ĝi penetras la publikan penson ankoraŭ varbotan.

N-ro 1 de "La Juna Batalanto," romkatolika gazeto, tute ne estas amuzilo por infanoj, nek edifa legaĵo por piaj larmemuloj; ĝi alvokas la junajn en koro-spirito homojn, eĉ se blankharajn, por antaŭenigi la romkatolikismon kaj pacan spiriton transenden. Multenhava, ĝi prezentas i.a. atakan artikolon pri la moralo de la Rusa junularo, kaj alian pri misia agado en Ĥinujo. Ĝi sentime konfesas malneŭtralecon, sed pretendas kun iom da rajto provizi legindaĵon eĉ por alireligianoj. Mendu ĉe Dagobert-Str. 28, Koln, Germanujo. (Robo).

La prefikso MIS-.

Laŭ propono de s-roj Butler, Ellersiek, Grenkamp, Kreuz, kaj de Lajarte, oni akceptis la prefikson "mis-" per 72 voĉoj "jes" kontraŭ 39 "ne": 2 ne montris opinion. Ĝi do estas nun oficiala. Ĝia signifo estas severe limigata al la senco: erar-, malĝust-, malbon-.

Of 156 roots now used in English with the prefix mis-, in the case of 154 the prefix has the meaning malĝuste, erare, maltrafe. With 9 words

SANO — SANA — SANIGA.

DO YOU ENJOY GOOD HEALTH?

Thanks to Esperanto, Australia is now able to benefit from Switzerland's foremost medical discovery, NOVOCHIMOSIN (Novo-Kim) which is a remedy for every type of gastro-intestinal disorder and its sequels. "Incurable" cases yield to this remedy, which contains no drugs or chemicals, being a biological product.

All chemists CAN supply "Novo-Kim" or it will be forwarded upon receipt of a P.N. for 5/- by the agents: The Saniga Company of Australia, P.O. Box 1106. Melbourne.

diligentan studon de E-to. Ĉe Wellesley Kolegio instruisto s-ro Lohore gvidas kurson de 12 knaboj ĉiumarde. Tiu kurso estas kroma al tiu, konsistanta el edukistoj, samloke gvidata de s-ro W. Edmanson.

MELBURNO:—Ce kunveno je la 30a de Aprilo s-ro C. Ballard alparolis pri memorpovo. La temo forte kaptis atenton de ĉiuj. Fine de la kunveno kursanoj adiaŭis s-ron P. Hudson, kiu tuj komencos vojaĝon al Hindujo. Vive anoj kantis "Car li estas bonegulo." Antaŭ kelksemajno s-ro Hudson regalas anojn per rakonto pri antaŭa vojaĝo kaj vizito al Konstantinopolo.

La 21an de Majo la Melburna Soc. feste vesperis en la klubejo. Dancinte k. amuziĝinte ĝis la 11a horo, la ĉeestantoj enronde kantis "Auld Lang Syne." S-reto Milligan, mariste vestita, dancis lerte la Maristan Dancan, kaj f-inoj L. Irwin, V. Cox k. s-ro Bishop ludis unuaktan komedion "En Minaca Danĝero." S-ro J. Skurrie mallonge parolis propagande.

PERTH:—The Nigra Cigno Grupo is henceforth known as the "Westralian Esperanto Society," with Mr. H. Byatt as president. There are 22 members, of whom five have offered to teach. Classes of different grades have therefore been arranged. The club meets on Fridays at 7.30 at 197 Murray-st., Perth, in the centre of the city. The first part of the evening is devoted to business, the second to instruction and the last to social and conversational purposes.

SIDNEJO:—S-ro G. Fleming pri-traktis la metran sistemon, sub la titolo, "Iuj Popularaj Ideoj." Atentiginte ke ni jam havas unuecan i.l., Esperanto, kaj ankaŭ internaciajn komprenigilojn en aliaj sferoj, ekzemple, la muzika notaro, kaj la Morsekodo en radio, li diris ke en britoparolantaj landoj oni ankoraŭ uzas antikvan kaj malfacilan sistemon de mezuroj. Li kredas, ke tiu anakronismo malaperos, kaj ke iu simpla, logika sistemo de mezuroj, kiel la metra, jam grandparte internacia, estos uzata ĉie. La bone-konata S-ro Serišev ankoraŭ unu fojon paroladis pri Rusujo. La Psikologio de la Rusa Popolo estas temo tre malfacile traktata por unuhora lekcieto, sed nia parolflua samideano sukcesis klarigi multajn ecojn de la diversaj popoloj, kiuj formas la rusan nacion.

AL LA TUTMONDA INSTRUITARO ESPERANTISTA!

Preskaŭ ĉiutage oni urĝe petas, aŭ eĉ energie postulas de mi materialon statistikan pri la temoj "Esperanto en lernejoj" kaj "Esperanto inter la instruistaro." Ĉar ne ĉiuj gekolegoj abonis kaj legas nian "Internacian Pedagogian Revuon," mi nun per niaj aliaj esperantistaj gazetoj petas:

1e Anoncu vin kiel instruistojn esperantistajn sendante vian precizan adreson!

2e Bonvolu raporti, ĉu en via urbo aŭ vilaĝo oni (ne nur vi persone) iam ajn instruis aŭ hodiaŭ instruas Esperanton en iu ajn lernejo. Skribu la nomon de la koncerna lernejo!

3e Bonvolu turni vin, se vi bezonas korespondantojn el la tutmonda kolegaro por vi mem aŭ por viaj klasoj (pro internacia korespondado de lernantoj) al ni!

Ni ordigos la korespondan aferon sisteme kaj laŭplane. Cetero ni jam kolektis la adresojn de pli ol 4,000 esperantistaj geinstruistoj el pli ol 50 landoj.

Ricevinte viajn sciigojn, ni kapablos aranĝi kaj doni konfidindan statistikon pri la supre aluditaj temoj, kiu estas nepre necesa.

Sendu la materialon al f-ino Martha Moelke, Sommerfeld, Nicderlausitz (Germanujo), kun kiu mi en "Kunlaborado" kun I.A.L.A., New York, kaj la Instituto J. J. Rousseau, Geneve, zorgos pri la statistiko.

D-ro. Dietterle.

P.M. KOLEKTISTOJ.

Volas interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiulandanoj. Rev. Walter Noske, The Parsonage, Henty, N.S.W. Aŭstralio.

AT LAST!

S.A.T. announces publication before the end of the year of its All-Esperanto Dictionary, 450-500 pages. The sample leaves are rich in detail and citation. The work will prove a strong factor in consolidating internationality of usage. It is claimed that S.A.T. ideology has not influenced the compilers, headed by Prof. Grosjean-Maupin, of the Esp. Akademio. The rebate price for those ordering before publication is 7 G.M. (7/-).

Address: R. Lerchner, Colmstrasse 1, Leipzig-027, Germany.

CHINESE CONSUL ON ESPERANTO.

Although not conversant with the state of Esperanto in China, I have

seen evidences of its activity there. I know personally of the difficulties confronting the Chinese owing to the diversity of language, not only in their own country but also in their relations with Europe and America, and I wish to express my belief in the ability of Esperanto to abolish, at least in great measure, this latter hindrance to better relations. It would be indeed a wonderful thing for the Chinaman whose interests are centred in the Western world to find it necessary to learn only one simple language instead of, as at present, the chief tongues of Europe. The horizon revealed by Esperanto is vast, there are in the language the most attractive possibilities. May the nations be drawn closer together through its agency.

Signed: FARTSAN T. SUNG,
Consul for China in Melb.

NIAJ SUBTENANTOJ.

Danke ni kvitancas ricevon de abonoj jene:—J. F. Hills, Nov., '29; A. R. Cohen, anonco k. abono 20/-, Julio '30; Rev. Galloway 4/6, Marto '29; s-ino Lloyd 4/6, Junio '30; E. C. Jack 5/-, Junio '30; W. H. kaj J. McGuigan ĉiu 5/-, Aŭg. kaj Majo '30; Auckland grupo 5/-, Majo '30; f-ino P. McCabe 4/6, Junio '30; f-ino L. W. Saw 4/6, Julio '30; C. Dornbusch 4/6, Junio '30.

TRADUKO 14.

La ŝarĝo de la nigrulo.
(de Charles Barrett en The Sun,
Melbourne).

(Kondukata de s-ro G. Gordon, F.B. E.A.). Sek-io, Miss Blyth, 10 Victoria-av., Surrey Hills, Melb., E10.

La problemo de la indiĝeno fariĝos ĉiam pli kaj pli (2) premanta kun la jaroj (3). Nur malmultaj (4) homoj konscias, ke sur la Aŭstralia kontinento ekzistas pli ol sesdek miloj da indiĝenoj kaj pli ol dek sep miloj da rasmiksuloj. Ju pli la blankulo puŝas sian koloniadon en la internlandon, des pli malfeliĉa fariĝas

la loto (9) de la indiĝeno. Diversaj rimedoj estas proponitaj por malhelpi ĉi tiu artiko mi diskutas iujn el tiuj proponoj.

Ofte oni sugestias novajn metodojn por pagi malnovajn ŝuldojn, tamen neniu metodo estas farebla sen la apogo de tintanta mono. Ni konfesas nian ŝuldon al la indiĝeno, sed ĉe tro multaj (4) el la ŝenoj por pagi ĝin mankis la necesaj kondiĉoj de sukceso, nome sincera, vasta konsento kaj firma decido agi juste al la nigrulo.

Ŝarĝon ni metis sur la ŝultrojn de la nigrulo. Li havas en la lokoj de sia loĝado, amikojn inter la kultivistoj (5) kaj brutedukistoj (6) en la malproksima internlando, tamen li havas ankaŭ agemajn mal-amikojn, kiuj rigardas la indiĝenan kiel peston (7) kaj senrajtulon. "Forviŝu ilin per maŝinpafilo." Tion mi aŭdis dirata de brutedukeja laborulo en Meza Aŭstralio.

Ĉe la baldaŭa konferenco en Melbourne por konsideri pri la estonteco (8) de la indiĝenoj, misiistoj kaj aliaj amikoj de la indiĝenaj gentoj eble elpensos plenumeblan projekton por helpi la nigrulon kaj iom malpezigi al li lian loton (9). Ĉe la lasta ĉiujara kunveno de Aborigines' Friends' Association (asocio de amikoj de la indiĝenoj) la komitato konsilis, ke, traktante la indiĝenan problemon, oni (10) rigardu kiel unu teritorion (7) la tri grandajn regionojn rezervitajn por la indiĝenoj en Suda, Meza kaj Okcidenta Aŭstralio, plue, ke tiu teritorio estiĝu sub la administrado de la Commonwealth (Federacia) registaro, kaj ke ĝi ricevu (10) la nomon Aboriginal Territory, Central Aŭstralia (Indiĝena Teritorio, Meza Aŭstralio). (daŭrigota).

NOTARO 14.

2. Kp. F.K. 160/24, Mart. 20/19. —
3. "kun la (pasado de la) jaroj." Kp: "kun la tempo ĝi fariĝos." Fab. de And. pt. ii, 36/35, 94/12. — 4. Pri

HAROLD PUDNEY

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per poŝto. Memoru la adreson

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

Specialisto pri Fontanplumoj

it has the additional meaning malbon-. With one only (mistrust) it has the meaning mal-.

It is advisable to restrict the use of mis- in Esperanto to the meaning erare, malguste, maltrafe. For the meaning malbon- we already have the choice between the general pejoratives aĉ and fuŝ and the moral pejorative fi-. In no case must mis be used with the meaning mal.

Compare malordo (disorder) with misordo (malgusta ordo); and fikanti (to sing something morally shameful), kantaĉi, fuŝkanti (to sing "rottenly"), with miskanti (to sing amiss, however perfectly—perhaps the wrong note or at the wrong moment). M.C.B.

LA INFLUO DE BONAJ VIRINOJ.

Malofte oni aŭdas pri virinoj, fame konataj pri ilia elpensemeĉo aŭ intelekta forto. Ĉiam la viroj tenas la honoron de tio, kaj tra la jarcentoj la dirado-skribado estas pri bonaj, korpuraj virinoj, kiuj modele donadas formon al la karakteron de gehomidoj, kaj gvide metas la piedetojn sur firmajn vivvojojn. Per tiu sindona servado ili efektive faras pli laŭdindan laboron, ol pentradon de okul— aŭ eĉ kor-frapantaj bildoj, laŭ verkadon de epohfarantaj libroj, aŭ la komponon de brilantaj operoj. "Certe estas fakto," diris Joseph de Maistre, "ke la virinoj ĝis nun donas al la mondo nenian ĉefverkon. Ili ankoraŭ malhavas honoron enmondigi iun "Iliad," iun "Hamlet," iun "Phaedre," iun "Paradise Lost," iun "Tartuffe": ili ankoraŭ designas neniun Preĝejo de Sankta Petro, komponicias neniun "Messiah," skulptas neniun Apollo Belvedere, pentras neniun "Last Judgment": la algebro, la teleskopo, kaj la lokomotivo naskiĝis en la cerbo de viroj, kaj tute ne virinoj; tamen ĉi lastaj faris kaj faradas ion multe pli valoran kaj eĉ plilonge daŭran, ol tio, ĉar ĉe iliaj genuoj justaj kaj virtaj viroj unue ricevis stimulon al la bono, la enkoran senton pri la devo—kio estas ja el ĉiuj la plej ricevinda donaco en la universo. Bona virino estas la ĉefverko de la Naturo mem."

Westralian Esperanto Society, Ni-gra Cigno Grupo, kunvenas ĉiun vendredon de 7.30—10 p.t. ĉe 197 Murray-st., Perth, kontraŭ Boan's Ltd. Prezidanto, s-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretario, s-ino E. Sainsbury, "Noeline," Carrington-st., Maylands, W.A.

Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo. Prezidanto, S-ro A. Dewar; Sekretariino, S-ino L. Payne, 8 Bruce Strato. Kunvenas en ĉiu lundo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

AUCKLAND (N.Z.) ESPERANTO SOCIETO kunvenas la duan lundon de ĉiu monato je 7.45a horo vespere ĉe Nov-Preĝejo Halo (New Church Hall) Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell. Sekretariino: S-ino E. M. Watkin. Komunikaĵojn al la prezidanto ĉe Kent's Buildings, Newmarket, Auckland.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro J. Skurrie; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je ol oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 8-10 p.m. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; d-ro F. J. Williams; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 174 Burwood Road. Burwood.

Brisbana Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Klement Kidd. Vicprezidantoj: Fraŭlino Rose Macpherson; M. Hyde. Sekretario: Fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane (Kvinslando-Quensland).

WELLINGTON ESPERANTO CLUB.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A., Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Mr. V. L. M. Daniel; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A., 34, Argentine Ave., Miramar; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio : Abono (por dek du numeroj) :
Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Melbourne (Aŭstralio). Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Specimena numero-unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kuponon.

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 110 (Ninth Year)

Melburno (Melbourne), Australio.

10 August 1929

A MUNIFICENT BEQUEST.

£500 to Esperanto.

What is probably one of the most generous, if not the most generous, of monetary gifts ever made to Esperanto was recently announced at Christchurch, New Zealand, when the will of the late Mrs. Ensom of that town had been perused.

The honorary secretary of the N.Z. E.A. has been informed that Mrs. Ensom set aside the magnificent sum of £500 for the establishment of classes and for the instruction of Esperanto in Christchurch. Readers will appreciate something of the love which prompted our benefactress to make such a bequest by this extract from the testament:

"I give and bequeath the sum of Five Hundred Pounds (£500) to The Workers' Educational Association of Christchurch aforesaid for the establishment of classes in the International Language, Esperanto. I expressly request but without intending to create any legal obligation that a tutor shall be employed for the full course of classes and shall receive adequate remuneration and that Mr. Norman M. Bell, M.A., who has special qualifications for this work, and who has done much already to further public interest in the subject, shall be appointed tutor. The said classes shall be held at such times of the year as will ensure the best possible attendance of persons interested, irres-

pective of the terms of the academic year."

THE DIFFICULTY OF LANGUAGE LEARNING.

"Even so perfect a master of French literature as John Morley greatly disliked being called upon to speak in the French language. The fact that Viscount Bryce could address the German bankers in their own tongue, and the Historical Congress at Rome in Italian is considered by his biographer to be something worthy of comment." (W. Davies, "A World Outlook.")

"... Frederick the Great, after reading, speaking and writing French, and nothing but French, during more than half a century, after unlearning his mother tongue in order to learn French, after living familiarly during many years with French associates, could not, to the last, compose in French without imminent risk of committing some mistake which would have moved a smile in the literary circles of Paris." (Macaulay.)

Let the above be read in conjunction with the invariable testimony of widely travelled Esperantists anent the incomprehensibility of English as spoken by the vast majority of foreigners who try to express themselves in that medium. Whereas many an Esperantist can say that in the language of Zamenhof he has found the vesture wherewith to clothe an eloquence lacking to him in his mother tongue.

KENGOTTS'S POCKET DICTIONARY.

It is not likely that this little two-way word book will displace the present widely used "Edinburgh." The compiler has not listed many words of very frequent occurrence, on the ground that they are international and so presumably known to most readers of Esp-o text. This seems a faulty plan. Those who will use the dictionary will be for the most part learners who have no special faculty for discerning the "internationality" of this or that word's form, not to speak of its internationality of definition. Trivial', tron', trot', uzurp', konjekt', rikan' are omitted, for example; fazeol', frugileg', kariofil', kreton', kren', skorzoner', tropeol' are included. Why? The first are both literary and everyday words, the second are, speaking generally, limited to specialists. It would have been more satisfactory had the compiler used a system of abbreviations or signs enabling him to expand the derivative forms, set in smaller type.

Besides this fundamental defect of word omission, the booklet shows evidence of hasty preparation or careless proof-reading. What else can be responsible for the appearance in a dictionary of "ulcer: a soar"; entrepeno; granada, medecine, carier, naturtium, agil(e)? To define konkludi simply by "to conclude" is to facilitate the flow of an already fertile source of error with English Esperantists.

One would have expected in the grammatical outline complete treatment of the accusative case. The reader is not informed that omission of a proposition entails use of the N-case. (1) Mi iros lundon. (2) La muro estis alta tri metrojn. "Re" signifies also backward movement. "Uj" has been used for trees (pomujo), although this form is, owing to its lack of precision, now obsolescent. What is arbedo? The word "quantity" should appear after "da." Diveni means "to guess correctly"; we look in vain for konjekti! Domaĝi means also "to begrudge"; klopodi means rather "to bother about." With only this book's definition of krom, what is the reader to make of "mi manĝis ĉiujn fruktojn, krom la pomoj"? Why "Munhen" and not "Varsovio"? "Spanish" and not "Russian"? Nord(!) pole; ŝmaci means to smack with the lips when kissing, G. schmat-

zen; funny—ridiga; In view of the presence of "Jesuo" throughout the Esp-o N. Test. and its preponderant use over "Jezuo," would it not have been better to list that form, even at the cost of personal preference? The name was discussed at length in "La Eklezia Revuo," Nos. 4/5.

Price 25c. through the A.E.A. or Amerika Esperanto Instituto, 604 Seventh st., Rockford, Ill.—(Robo).

OSSENDOWSKI ON ESPERANTO

Prof. F. A. Ossendowski, scientist, chemist and world-famed author, whose works, among them the sensational *Beasts, Men and Gods*, *Man and the Mystery of Asia*, *Behind the Chinese Wall*, have been translated into more than 20 languages, was asked his opinion on Esperanto. He said:—

"An I.L. is much needed, because the rapidity of presentday intercommunication, while permitting the nations to draw closer to one another, is yet to a large extent nullified owing to the extreme difficulty of intercomprehension. When Esperanto is accepted generally in foreign relations such hindrance will be done away, and the resultant exchange of thought among the nations will be productive of unexpectedly rich harvests.

"Esperanto can play an important part in diffusing among the peoples the fruits of a common artistic and literary life. Translation could be made for example from Polish into Esperanto and so spread throughout the world without the necessity for putting it into the many national tongues, which latter process is hurtful to the character and psyche of the works so treated."

It would seem that Ossendowski acknowledges the unique position held by Esperanto in the field of translation. By reason of its flexibility and freedom from cramping syntax, it enables the translator not only to mirror the word-order and compounds of the original, but also reproduce more faithfully than national tongues the mind of the author, for the vocabulary of Esperanto is comparatively free from those thought-associations peculiar to the words of national languages.

AELITA.

La Marso Fermortanta.

Ankoraŭ aventura romano pri Marso, laŭdire vaste legata de la rusa junularo.

Fariĝoj sufiĉe frapaj sekvas unu la alian jam de kiam la raketomehanismo foriras de la Tero, kaj ili vigle daŭras veni ĝis la mirakla realteriĝo de la metalmonstro. Laŭ la modo ĉe tiaj skriboj neklera soldato, uzata de la aŭtoro kiel kontraŭpersono je brila sciencisto, provizas fluson da humoro, kaj la Marsa belulino, kies nomon ni uzas kiel titolon, donas amintereson.

Interese estas legi, ke "ĉie naskiĝas la vivo, kaj la vivon ĉie regas homsimilulo; neeble estas krei estaĵon pli perfektan ol la homo—bildo kaj similulo de la Mastro de la Universo." La uzo de "Peterburgo" supozigas, ke ĝi estis verkita antaŭ la revolucio.

Malfacilo ĉe romanoj pri supozata vivo aliplaneda kuŝas en tio, ke nur homo estas senti preskaŭan malpovecon imagi inteligentajn estaĵojn, kiuj havas ekzistecon tre malsimilan ol nia. Oni povas el la imago doni al ili flugilojn aŭ interpiedfingran membranon; oni povas pentri ilian regnan sistemon aŭ despota aŭ komunista, sed certe estas, ke oni sentos la malpovon de la homa imago doni al alimonduloj korpoformojn kaj pensmanieron malsimilajn al tiuj de teranoj.

La stilo estas flumova, sed ni ne ŝatas "plaĉinda" (75), morta (mortinta); la verbo terur' estas transsonor' estas nctrans. Sparko diferencas de ordinara fajrero en tio ke ĝi estas elektra, do uzita kiel maŝinfaka vorto.

200-paĝa, prezo 3/6 broŝurita, 4/6 tola per A.E.A.

Robo.

N.Z.E.A. DEPUTATION.

The deputation organised by the N.Z.E.A. for the purpose of placing the claims of Esperanto before the Minister of Education (Mr. H. Atmore) at Wellington, took place on the 12th July. Details will be made available for next month's issue. The Minister, has informed the deputation that, impressed with the information placed before him, he would investigate the question thoroughly and give the result of his consideration in two weeks.

KURSO PER TRADUKADO.
(kondukata de s-ro George Gordon,
F.B.E.A.)

Interesatoj turnu sin al f-ino Blyth, 10 Victoria-av., Surrey Hills, E10., Melb.

TRADUKO 15.

LA ŜARĜO DE LA NIGRULO
(daŭrigata)

Antaŭ multe da (1) jaroj iuj proponis (2) alian planon por krei indiĝenan ŝtaton. Oni tre diskutis (2) ĝin, sed ĝenerale oni konsideris ĝin neplenumebla (3). Tamen la indiĝena teritorio en iaj rilatoj estus indiĝena ŝtato sen aŭtonomio.

Li nigruloj bezonas vastajn terojn por ĉasado, akvejojn (4), ne liberaj al blankuloj, por siaj brutaroj, kaj liberecon por vivi laŭ siaj simplaj, naturaj moroj. Ili multmaniere suferas de la preno de sia tero por la brutedukado de la blankuloj.

Malgraŭ ĉiaj kontraŭdiroj kaj malakordaj atestoj, iliaj amikoj klare vidas, ke la indiĝenoj suferas pro la aplikado de la leĝo de la pliforto. Kvankam malfrue oni almenaŭ serĉas rimedon por pagi nian ŝuldon al ili.

La nombro de la nigruloj montrata en la raporto pri la lasta popolnombro povas esti nur proksimuma kaj montras, ke en Aŭstralio estas ĉirkaŭ sesdek mil pursangaj indiĝenoj kaj pli ol dek sep mil miksrasuloj. Kompreneble tiuj nombroj ne enhavas Tasmaniajn nigrulojn, ĉar la indiĝena raso de tiu ŝtato formortis antaŭ multe da (1) jaroj.

Viktorio enhavas malpli ol sesdek pursangulojn, kaj pli ol sescent miksrasulojn laŭ la oficiala popolnombro. En Nova Sud-Kimrujo troviĝas multe pli ol tiom kaj Norda Teritorio enhavas dudek mil pursangulojn, nombron pli grandan ol ĉiu alia ŝtato.

Ankoraŭ en partoj de Aŭstralio oni povas kamploĝi inter kanibaloj! Tamen la kanabalismo ne estas tute tia, kian oni kunigas kun la kruelegaj indiĝenoj de iuj Pacifikaj insuloj.

Misiistoj faris multon por la bono de la indiĝenoj, kvankam ili ja iufoje erare faris, kaj etnologoj (5) aprobas ne ĉiujn iliajn metodojn. Oni devas permesi al la nigruloj libere vagadi senveste, praktiki la plimulton el iliaj kutimoj kaj ceremonioj. Tio estas la opinio de sciencistoj. Neniu indiĝena raso estas pli interesa ol la Aŭstral-

ia. Oni helpu al tiu ŝtonepoka popolo daŭri tiel, kiel volas Naturo, en aparta teritorio, rezervata sole por ili. (La Fino)

NOTARO 15.

Preseraro: Notaro 14, noto 2, "30/19" (20/19). 1. Pri "multe da" kaj "kelke da." Notaro 4/10. 2. Rimarku la uzon de aktiva formo anstataŭ pasiva por eviti kunmetitan verbatimon. 3. Predikata adjektivo. Notaro 1/7, 10. 4. "akvejo." Lev. 11/36. — 5. "etnologoj." Kiam nomo de scienco finiĝas per -io, oni povas forlasi la i por nomi profesoron de tiu scienco. kp. "teologio," "teologo," "astronomio," "astronomo."

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Danke ni kvitancas ricevon de abonoj jene:—F-ino Ryan, 4/6 ĝis junio '30; J. Modar, 5/- aŭgust '30; N. Gaye, 5/-, aŭg. '30; F-ino Irwin, 4/6, junio '30; J. Pollock, 5/-, julio '30; N. M. Thomas, 4/6, junio, '29; S-ino Sainsbury, 5/6, anonco N. Cigno, julio, '30; R. J. Dodd 10/-, majo '30; M. Martinek, 4/6, junio, '30; F-ino Mitchell, 4/6, julio, '30; J. Thom, 5/3, aprilo, '29; F-ino V. Newnham, 4/6, aprilo, '30; M. S. Barnett, 4/6, marto '30 kaj 5/6 donaco; S-ino Wilson, 4/6, majo, '30; F-ino Conwell, 4/6, majo '30; Brisbane Grupanonco 5/6, majo, '30; L. Glynn 10/-, aŭg., '30; D. Guilbert, 4/6, junio '30; J. Girdwood, 4/6, junio '30; f-ino L. O'Connor, 4/6, junio '29.

GRAVA ALVOKO.

La Kristana Esperantista Ligo Internacia (K.E.L.I.) fondita en la jaro 1911a, bazita sole sur la sankta Biblio, sendependa de eklezio dogmo, dissendas al la Kristanaj Asocioj de Junaj Viroj (angle: Young Men's Christian Association), al la Kristana Penado (angle: The Christian Endeavour) kaj al aliaj, alvokon, lerni Esperanton. La tuta Esperantistaro, kiu simpatias kun tiu laboro estas petata, iamaniere helpi, ke la grava entreprenado bone sukcesu. Helpo povas okazi per traduko kaj transdono de la alvoko al kristana societo, per sendo de informo pri interesuloj al K.E.L.I., adreso; Paul Hubner, Polkenstrasse 4, Quedlinburg (Germanlando), krom tio per monsubteno. Ju pli da helpo, des pli rapide okazos la disvastigo de la alvoko.

INTERNACIA FRAZARO: CIUTAGA VIVO.

Jen du libretoj por tiuj, kiuj antaŭ ĉio volas utiligi Esp-on per interparolo-korespondado. Vivoplene originale verkitaĵoj enhavos por strat-kaj socivivo vortprovizon internacistile prezentitan. Ĉe "C.V." listoj de demandoj pri la antaŭe metitaj legaĵoj instigas lernantojn dekomence langlertiĝi kaj akiri facilan parolpretecon. Notitaj estas kelkaj vortoj pri kiuj ni volus altiri reatenton de la aŭtoro, s-ro Kengott. "oromitaj" (oritaj); inklusive (z); laternfostoj (lantern-); neakurataj tradukoj (nefidindaj, nebonaj)?. Ankaŭ iuj preseraroj okulprike sidas sur la cetero belaspektaj paĝoj de ambaŭ libroj.

"I.F." Kial "Avenida" de la Stacidomo? Atendigi (atentigi), frostosveloj (ŝ). Diskuteblaj formoj: sekvi laktan dieton (nutriĝi per lakta dieto); la perdo, kiun mi faris (. . . kiun mi suferis; kiu okazis al mi); neriparebla ĝi (mortperdo) estas! (nekompansebla); ni ne mankos veni (ni nepre venos). Pargeto cirita (vak-sita); situata (situanta); jupono (subjupo); oferi (ĝuste uzita en C.V., sed ĉe "oferi cigaredon" estas malbone; proponi; Zamenhof uzas "oferi" ĉiam en la senco de la Angla "sacrifice"); restaŭracio (o); ne necesa estas "starti," (ekiri, ekfunkcii); kabino (kajuto); ankrigita (ankrita); balancado (iĝ); dramatika (dram(ist-ec)a); orkestro homogena (bone konsistigita?); trieto, filmbendo (?).

Aĉetindaj lerniloj kaj formtrezoroj por la praktikulo.

Prezo 25 cendoj, Amerika Esperanto-instituto, 604 Rockford-st. Ill. U.S.A.

(Robo)

IMPORTANT TO TEACHERS!

The Pan-German Union of Teachers, with more than 150,000 members, at its congress in Dresden in May 1929 accepted the following resolution:—

"We urge that every effort in pedagogic circles to forward the diffusion of a world auxiliary language be supported by the Union."

It is asked that all teaching publications reprint the above, as success can be attained only by a similar advance in other countries. Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko, Leipzig, W31. - Seumestr. 10. Germ.

KRONIKO.

MELBURNO. — La 27an de junio verduloj kaj geamikoj dediĉis al Terpsihore ĉe La Rivoli, Collins-str., kie ili ĝuis la plezuron de la danco k. interparolo. Gaja muziko altigis la spiriton, k. per frandaĵoj la duopekirlantoj refreŝigis. Proks. 90 ĉeestis la ĉiel-sukcesan aferon. Tial, la Melburna societo aranĝos dancadojn kiel eble plej ofte.

La 3an semajnon en julio decidigis en la societejo Esp-a konkurso. La anoj vigle partoprenis, k. la premion gajnis f-ino M. Bostock. Krom amuzi, tiaj amuziloj multe alinstigas al pli forta intereso en la studo de Esperanto.

WELLINGTON:—La dissemo daŭras. Pasintmonate s-ro C. Priestley rakontis sian sperton ĉe internacia kongreso de E-to. S-ro Potts gvidas priesperantan kolonon en la gazeto literatura "New Zealand Life." Altgrade verkita, lia laborajo sendube allogos al Esp-ismo.

La sek-io de N.Z.E.A., kies ĉefsidejo estas en nia urbo, nun esploras proponon okazigi N.Z. Esp-o kongreson. F-ino Belcher, el Melb., bonvene vizitas al Wellington.

OKOROIRE:—S-ro instruisto J. Hodges, F.B.E.A., malnova laboranto por E-to, instruas klaseton ĉe sia lernejo ĉe Tapapa.

MASTERTON:—Je la 17a de junio la grupo adiaŭis s-ron Aurthur, kiu translokiĝas al Hawera. Kiel signon de atestimo la membroj donacis al li Sanktan Biblion. La grupo regule kunvenas, kaj s-ro Dewar koresponde instruas kelkajn loĝantajn en kamparo. Sino Payne vigle aperigis en la loka gazeto ampleksajn artikolojn pri akcepto de E-to de la internacia Rotario ktp.

AUCKLAND:—Speciala societkunveno okazis en la 14a de junio, kiam ni bonvenis du vizitantojn—s-inon Druary el Christch, k. s-ron Clark, el la Sidneja klubo: ĉi-kui nun loĝas en nia urbo. Entuziasmulo, s-ro Clark efike helpas disvastigi la lingvon ĉe

ni. Loka firmo, Whitcombe k. Tombs. posedas jam provizon de la "Esperanto Teacher," de Helen Fryer.

CHRISTCHURCH:—La societo, jam 31-ana, pligrandiĝas. Je la 3a de junio, de 7.30 ĝis 7.45 vesp., s-ro N. Bell, M.A., prez. de la societo, parolis de 3YA (Christch.) pri E-to. Li temigis la vivon de d-ro Zamenhof, lian nasklokon, k. lian majstroverkon por la mondo.

S-ro Bell similigis E-ton al spirita pinto de unu lando al alia. E-tistoj ne volas forigi sian gepatran lingvon, aŭ tiun de kiu ajn lando, sed volas uzi E-ton kiel ŝlosilon por malfermi al si la spiritojn de siaj fremdaj fratoj. Li finiĝis verdlingve per ŝercrakonto, kiun li tujposte tradukis anglan.

SIDNEJO:—La ĉiujara kunveno de la Sidneja Esp. Soc. okazis la 28an de junio. Oficistoj elektitaj por la venonta jaro:—Prezidanto, s-ro Pryke; vicprez-oj, s-roj H. Torr kaj Winter, s-ino Fleming; sekretario, s-ro L. Pfahl; kasisto, s-ro H. Davies; helpa sek-io, f-ino F. Fleming; bibliotekisto, f-ino Smith, librokontrolisto, s-ro Rutland. De la sek-io kaj kasisto estis akceptitaj raportoj, montrantaj progreson de E-to en Sidnejo. Estis diskutate, ĉu kotizo al la klubo estu pliigita ĝis 15/- anst. 10/- jare. Oni maljese decidis. Tre malnova Esp-isto, s-ro R. Swainson, O.B.E., D.B. E.A., paroladis en junio pri "Fruaj Esp-istoj." Interese estis renkonti homon parolintan kun la Majstro k. la famaj pioniroj de nia lingvo.

QUERY CORNER.

Readers are invited to send in questions of general interest bearing on Esperanto grammar, history and suchlike.

W.E. in T. The principles of sufficiency and necessity in Esperanto word forms were formulated by Rene de Saussure in 1916. One may use "konstruo," "manĝo," "alto," "trinko" instead of the forms with "aĵ" when the meaning is clear. See Gen. 24/33, Mart. 6/1 and 7, Hamleto 68/

SANO — SANA — SANIGA.
DO YOU ENJOY GOOD HEALTH?

Thanks to Esperanto, Australia is now able to benefit from Switzerland's foremost medical discovery, NOVOCHIMOSIN (Novo-Kim) which is a remedy for every type of gastro-intestinal disorder and its sequels. "Incurable" cases yield to this remedy, which contains no drugs or chemicals, being a biological product.

All chemists CAN supply "Novo-Kim" or it will be forwarded upon receipt of a P.N. for 5/- by the agents: The Saniga Company of Australia, P.O. Box 1106, Melbourne.

31, Levidoj 14/29. "Orumi" and "butonumi" are not necessary, for there is no difference between them and "ori" and "butoni."

Beno. Zam. uses "hordo" in the sense of "bando" on p.6 Rabeno de Baharah. "Intuicio" on p.147 of "Marta."

Y.O. in W.—According to the Fundamento "spite" is an adverb, not a preposition. Consequently it should be followed by the accusative or the preposition "de" or "al," but Privat and other experts often use it with the nominative. Zamenhof writes "spite al la diablo" Rabistoj 40/26, F.K. 286/23, "spite ĉiuj argumentoj," and at Ps. 27/11, "spite miajn insidantojn." The prepositional use is the more frequent. This is a point the Lingva Akademio should definitively settle.

A.T. in St. The first Esp-o gazette was "La Esperantisto" published in Nuremburg from 1889 till 1895. This was superseded by "Lingvo Internacia" (1896-1915), at first printed in Upsala (Sweden), then in Budapest, and finally at Paris. The first group of Esp-ists was that at Nuremburg, in 1888, consisting of ex-Volapukists.

NOTU!

Pro presista fuŝo la paĝoj de lasta n-ro misaranĝiĝis. Faru ke 93 estu 95, 94—96, 95—93, 96—94.

ILUSTRITA BIBLIOTEKO.

La Maro. (N-roj 6-10.) Tole binita en unu volumo, 172pp., 3/9. Ankaŭ en apartaj volumoj: (1) **La ŝipĉarpentisto**, rakonto de F. Gerstacker el la marista vivo, tradukita de Egruho el la germana, 59pp., 1/-. (2) **El "Navigado estas necesa,"** de Gorch Fock; **Kaprico**, Originala rakonto de D. P. Boatman, **Agonio de la "Semilante,"** de Alphonse Daudet; 32pp., 6d. (3) **Gudrun.** Rakonto laŭ la konata mezepoka germana eposo, verkita de Téo Jung; 40pp., 6d. (4) **La Hantataj ŝipoj**, novelo de Allan Cunningham; **Ŝuldpedelo sur la Maro**, novelo de W. Clarke Russell; elangligitaj de L. N. Newell kaj K. R. C. Sturmer; 40pp., 6d.

La entreprenema "Heroldo de Esp-o" daŭro naskas legaĵojn tre diversajn. En la rakontoj primaraj abundas teknikaj vortoj, el kiuj kelkaj ŝajnas nenecesaj. Enverŝado de neologismoj tute ne montras sur la interpotecon de nia lingvo. Kion ekz. signifas por Aziano "tempesto,"

trano, taklaĵo, kvoto, imensa, bruske, barto, eskapi, tomohaŭko, dura, kaj, blazo"? "La ŝipĉarpentisto" enhavas aventuron de forkurinta maristo, kiu, trafinta insulon, adoptas la vivmorojn de la tiea popolo. Alveninta ŝipestro sukcesas allogkapli lin kiel denovan maranon. Pri lia prospero fine reveni tra danĝero al la amata indiĝena edzino ktp. la legontoj sciigos. Ne ŝatinda estas "lando" anst. "tero," jamo (ignamo), "foje" misuzita, kurso (vojiro), depremi (melankoliigi), eldoni (forpeli), distrikto (regiono), skrupule (zorgege).

En n-ro 8 la plejbona estas "La agonio de la Semilante." "Navigado estas necesa" iom pezas pro tehniklingvaĵo. Ekz., ". . . terure knarantaj gafoj kaj tondrantaj ŝkotoj tangadis la evero." "Je la baborda flanko ili ŝeklis drivo-ankron."

N-ro 9 klare verkita de s-ro Jung. Ĝi rerakontas la fidelecon de bela Gudrun. Ĉi malnovepoka historiaĵo precipe allogos por tiuj sukcesantaj eviti la urĝvokon de la aktualeco. "Tagoj estas jam nombritaj" ŝajnas Anglaĵe. "Strando" (A. beach; kp. plaĝo, sablejo).

N-ro 10. Traduko el la Angla, ridiga estas "Ŝuldpedelo" verkita originale de tre konata mar-genristo. Ĝi lerte transdonas iuloke la guston de la Anglaĵo. "Firmterula" pedelo spertas tion, kio signifas la kuna kolero de maro kaj ŝipanaro. Kontraŭ kiuj li estas procesa instrumento. Superstiĉo, prikobolda timo de la apudmaraj Skotoj respeguliĝas en "Hantataj ŝipoj" verkita de amiko de Walter Scott kaj T. Carlyle. Kial "likva" (fluida), rigilaro (A. rigging), graŭlis, novlanda (?) hundo, ĉi tiam! "la sorto iom pli ol favoris la pedelon (?)"

Legante, oni ankaŭ studos ĉi marlibretojn.

(Robo)

BONAJ LIBROJ.

"Ju deinfanaĝa emo al legado kaj intelektaĵoj" diris Thomas Hood "tre ŝajne savis min el la moralpereiĝo, kiu tro ofte trafas tiujn, kiuj fruaĝe suferas perdon de gepatra gvidado. Miaj libroj malemige fortenis min de la kunuleco de boksistoj, drinkemaj amikoj, kaj hundbatalejistoj. La perlibre intima amiko de Pope kaj Addison, aŭ la homo, kies menso jam kutimiĝis al la nobla kvankam silenta interparolado kun

Shakespeare kaj Milton preskaŭ neniam alserĉas aŭ senreziste toleras la kunulecon de fianimaĉoj kaj sklavoĵ sub malmoraleco.”

(trad. Robo)

REVIEW.

Communism looms so large these days in discussion of political questions that an authoritative statement of its theory and principles is welcomed.

This book is the official programme of the Communist International, adopted at its world congress last September.

It includes a comprehensive analysis of the capitalist system (with special reference to the present era of imperialism), an eloquent exposition of “The ultimate aim of the Communist International — World Communism,” an explanation of “the dictatorship of the proletariat” and of Communist revolutionary policy, and, finally, an outline of the strategy and tactics of the Communist movement.

It is a compact expression of Communist thought and a necessary document for all students of political theory, whether opponents or sympathisers of revolutionary doctrine.

“Communism: the Programme of the Communist International.” A Baker, 395 Sussex Street, Sydney. 100 pages. Posted 1/1.

S-ro Masaharu Kaŭakiŝi
Enami-Maĉi, Tojama-Ken,
Japanujo,

deziras koresp. kĉl pri la literaturo, kino, interŝanĝi ipk.

LANGUAGE QUESTION PROVES PROBLEM AT SCIENCE CONGRESS

Delegates Could Not Understand Speeches.

English was the official language of the delegates at the recent Pan-Pacific Congress in Java. Dr. Marshall, of Wellington, who represented the New Zealand Institute at the

congress, said that the universal use of English in such a congress might sound all right in theory, but it worked out very differently in practice. The language question was a very great difficulty. The Dutch and French could not understand the English of the Japanese, the Japanese could not understand the French or Dutch, nor the English spoken by most of the Americans. The Japanese, however, could understand the Englishmen’s English.

“It makes one wonder,” he added, “if Esperanto will be able to do what is claimed for it. English is spoken in all parts of the world, yet these different people could not understand one another.”

Dr. Marshall mentioned that the Japanese and Chinese were able to talk to one another and that their English was understandable to the Englishmen. The Japanese talked very slowly. The language difficulty had caused a certain amount of confusion.

“The Japanese were very disinclined to talk,” he said, “for they felt that they would not be fully understood and that if they did speak they might make themselves ridiculous.”

Dr. Marshall visited a similar congress at Tokio two years ago, but he said the language difficulty was more noticeable on this occasion. “There was a greater mixture of nationalities,” he remarked.

DUM EKSPERIMENTO.

— Kial en ĉeesto de malsanulo ni parolas latine?

— Estas necese kutimigi lin al la morta lingvo.

ELLERNU ESPERANTON!

Tio signifas lernu tiel, ke vi ŝciu ĝin perfekte. Via ambicio estu estri ĝin tiel, kiel vi estras vian lingvon gepatran. Tiam vi konstatos kia mirinda beleco kaj kapableco ekzistas en Esperanto.

HAROLD PUDNEY

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkarę rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon **POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO?** Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per poŝto. Memoru la adreson

Specialisto pri Fontanplumoj

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

VALORA OPINIO.

Eldiroj de D-ro C. Th. Dumba, eksambasadoro aŭstria en Usono, prezidanto de Aŭstria Societo por "Ligo de Nacioj," okaze de lia parolado pri "Ligo de Nacioj kaj la germanoj" en I. Esperanto-Unuiĝo en Wien, la 11.1. 1929.

Mi estas konvinkita, ke la ekzisto kaj la ĝenerala alpreno de tia interkomprenigilo, kia estas Esperanto, efike akcelus kaj plirapidigus la mensan interproksimiĝon de la nacioj. Tion konsiderante ni salutas la esperantistojn kiel bonvenajn samliganojn, al kiuj ni povas apenaŭ sufiĉe danki pro ilia pionira laboro. Mi mem havis dum iom longa tempo la impreson, ke la angla lingvo estas la mondlingvo kaj povus anstataŭi Esperanton. Sed nun mi kredas, ke la spirito de tiu lingvo estas tiom fremda al tiu de la latinidaj lingvoj, ke la latinidlingvaj nacioj nur tre malfacile povus ellerni la lingvon anglan, kaj ni tute ne parolu pri la malfacilaĵoj prononcaj.

Tial mi opinias, ke Esperanto speciale por Eŭropo estas eksterordinare valora interkomprenigilo, al kiel disvastiĝo kaj fina venko mi deziras plejan sukceson.

SUR STRATO.

- Pro kio ci ploras?
- Patrino donis al mi mian naskiĝcertigilon, por ke mi alportu ĝin al la lernejo, kaj mi perdis ĝin.
- Nu, kaj kio?
- Nun mi devos denove naskiĝi . . .

LA NUNTEPAJ VIRINOJ.

Sur la strandbanejo pliaĝa sinjoro alparolas sian najbaron:

- Vidu, kiel ideale belan korpon havas tiu knabo, ĉu ne?
- Ne estas knabo, sed knabino.
- Ne diru, estas ja knabo!
- Tute ne knabo! Ŝi estas ja mia filino!
- Tiel! Do vi, sinjoro, estas ŝia patro!
- Ne! Mi estas ŝia patrino.

FORTA VOLO.

- Mia edzo tute dekutimiĝis de la fumado.
- Oni devas havi fortan volon por tio.
- Ho, tian mi havas.

Westralian Esperanto Society, Nigra Cigno Grupo, kunvenas ĉiun vendredon de 7.30—10 p.t. ĉe 197 Murray-st., Perth, kontraŭ Boan's Ltd. Prezidanto, s-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretario, s-ino E. Sainsbury, "Noeline," Carring-st., Maylands, W.A.

Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo. Prezidanto, S-ro A. Dewar; Sekretariino, S-ino L. Payne, 8 Bruce Strato. Kunvenas en ĉiu lundo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

AUCKLAND (N.Z.) ESPERANTO SOCIETO kunvenas la duan lundon de ĉiu monato je 7.45a horo vespere ĉe Nov-Preĝeja Halo (New Church Hall) Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell. Sekretariino: S-ino E. M. Watkin. Komunikaĵojn al la prezidanto ĉe Kent's Buildings, Newmarket, Auckland.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro J. Skurrie; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je ol oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 8-10 p.m. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro E. A. Pryke; Sekretario: s-ro Leslie E. Ahl, 174 Burwood Road, Burwood.

Brisbana Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Klement Kidd. Vicprezidantoj: Fraŭlino Rose Macpherson; M. Hyde. Sekretario: Fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane (Kvinslando-Quensland).

WELLINGTON ESPERANTO CLUB.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A., Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralie Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A., 34, Argentine Ave., Miramar; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.



La Suda Kruco

*Organo de la Internacia Lingvo Esperanto en
Australazio. Fondita en Julio 1920.*

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham.

Specimena numero—unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kuponon.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 111 (Ninth Year) Melbourne (Melbourne), Australio. 10 Septembro 1929

ESPERANTO.

A concise History of the International Language.

(By Wm. King, D.B.E.A., Secretary NZEA., Wellington, N.Z.)

Approximately 40 years ago—in 1887—there was one Esperantist in the world—the creator of the language, Dr. Zamenhof. Two years later the first Esperanto gazette was published, and five years after the birth of the language the founding at St. Petersburg of the first Esperanto Society followed. The French Esperanto Society was the second established—in 1898; and, in 1903, Spain came third and Britain fourth with national societies. The language spread with surprising rapidity, largely due to the holding of the world congresses of Esperanto yearly from 1905, when the first such congress took place at Boulogne, France, and to the efforts of the Universal Esperanto Association, founded at Geneva in 1908.

The position in 1911, was, briefly, as follows:— There were 765 delegates in 872 localities in 44 lands, and the membership comprised some 7,500 members; and 26 national associations of Esperantists disseminated the language. In addition, 14 Esperanto newspapers were being published.

In 1914 there were 1574 associations registered in 24 different countries. In 1922, Esperanto was taught in 320 towns in 17 different countries, and in evening classes in

1200 towns in 39 different countries. Besides being investigated by the League of Nations in 1922, Esperanto was considered in the same year by educationists from 28 countries (including 16 Governments) at Geneva. The Conference issued a manifesto to the teaching profession of the world, recommending the instruction of the language in the schools.

During the following year—1923, there was held in Venice a commercial conference in which were represented over 200 commercial and touring organisations from 23 different countries in Europe, Africa, America, Asia and Australasia. Included in the organisations represented were the International Labor Office of the League of Nations, Ministries of Industries and commerce of Austria, Czechoslovakia, Germany, Italy, Rumania, Persia; 23 Trade Fairs comprising the most important in the world; 72 Chambers of Commerce, of various countries of the five continents; 30 touring organisations; and a miscellany of organisations consisting of Rotary Clubs, commercial schools, banking, manufacturing groups, and others. The business of the conference was conducted throughout entirely in Esperanto without difficulty; and the conference brought home the fact that Esperanto stands as one of the necessary instruments for international commerce. Several recommendations were made, the main one being for the instruction of Esperanto in the commercial schools of all countries.

Although the League of Nations had thoroughly investigated Esperanto in 1922, and recommended its introduction into the schools of the world, the League again in 1924 supported Esperanto, on this occasion recommending that all State Members grant Esperanto the treatment and charges in force for a clear language in telegraphic and radio - telegraphic communications. This recommendation gave Esperanto its status as a modern language. In the meantime, Esperanto had been accepted and recommended by the British, French, and Italian Associations for the Advancement of Science, by the Preliminary Conference for the International Agreement on Wireless Telephony at Geneva, and by the American Radio Relay League. This advance took place in 1924. It is interesting to note that in this same year the Department of Psychology at Wellesley College (U.S.A.), decided to try a language experiment to determine whether Esperanto is as easy to learn as ordinary modern languages. After a careful and scientific comparison, without bias or prejudice, a report proving the facility of an artificial language was issued. Another attraction during this year was the broadcasting of an Esperanto translation of the King's speech on the occasion of the opening of the British Empire Exhibition at Wembley, the speech being received and understood in 18 countries.

In 1925, the International Telegraph Union, comprising the various countries of the world, New Zealand included, put into effect the recommendations of the 5th Assembly of the League of Nations relative to Esperanto in telegraphic and radio-telegraphic use. In July of the same year, the first session of the Esperanto Summer University was held at Geneva, which introduced a new departure in international life and thought. Four departments were provided, namely—(1) Psychology and Pedagogy; (2) Linguistic Science; (3) Physical Sciences and Technics (including Radio); and (4) International Organisation Law. Professors and students alike from all countries were present, instructing each other in one language only—Esperanto. During the same year (1925), 29 European radio-stations

were broadcasting regularly Esperanto lessons and speeches; and the first postage stamp with Esperanto text was issued.

Many international and national congresses were held in 1926, many of them using or recommending Esperanto. During the year the complete Bible was published in Esperanto by the British and Foreign Bible Society.

(To be continued).

Fairs.

The international fairs continue to use Esperanto. The Budapest Fair has once more issued a prospectus in that language; the Fairs of Frankfurt-on-Main, Rome and Paris have done the same.

University Courses in Esperanto.

University Courses will once more be held in the present year in conjunction with the Twenty-first Universal Esperanto Congress at Budapest, from 2nd to 9th August. A number of eminent men of various nationalities will give scientific or technical lectures in Esperanto. The programme is as follows:—

Philology: Mr. H. Skold, Lecturer at the University of Lund (Sweden): "The Linguistic Situation in the Far East." Dr. Dreher, Cracow: Anglo-Franco-German Comparative Linguistics." **Philosophy:** Dr. Joh Kiss, Papal Prelate, Professor at the University and Director of the Collegium Medium, Budapest: "The Nature, Origin and Value of human knowledge." **Physics:** Dr. Lazlo de Rhorer, Professor at the University of Pecs: "Television"; **Geology:** Dr. Gyula Rakusz, of the University of Budapest: "Formation and Destruction of Mountains." **Literature:** Mr. Bela Vikar, Former Chief of the Stenographic Office of the Houses of Parliament, Budapest: "Hungarian Literature." **Medicine:** Dr. Giorgio Canuto, Professor at the University of Turin: "Evolution and Present Application of Forensic Medicine." **Law:** Mr. Andres Pino, Advocate of Valencia (Spain): "Preste Victoria and the Spanish Literature of Public International Law." Mr. C. C. Tarelli

of International Labor Office; General Solicitor of the Supreme Court in England: "The International Labor Organisation and Forced Labor among Natives."

RECENZO.

NOBELA PEKO, EL LA RUMANA de M. Sadoveanu, trad. de Tiberio Morariu, brile ornamas per sia majstra lingvaĵo nian templon de l'verkajoj. La ĉefa enhavero rakontas pri nobela ankrimo kaj pri revenĝo de simplula patro al la filo de la ofendinto. Mihail Sadoveanu estas la plej forta k. valorpiena nuntempa prozisto rumana, kaj verkas en la plej bela k. originala lingvo; sendube tiuj ecoj klare respeguliĝas en la Esperantaĵo de s-ro Morariu, kiu, ĉiam riĉesprimanta, foje rememorigas pri la lingva facilfandado de Baghy aŭ Forge. Vere ni vidas ĉe nia lingvo (voĉkaskadoj, voĉkaoso, voĉsiraĵoj) senfundan minejon de novaj pensesprimiloj, taŭgaj por kapti ĉe la plej delikatajn konceptojn.

La uzo de "ene" ne estas ĉiujfoje klara: "pasinto" (pasinteco), "nekonato" (nekonateco); "krusto" 27 (arboŝelo?); ĉu estas naciismo duobligi formojn jene: tujtuje, nur-nure, solsula, foje-foje, apenaŭ-apenaŭ, ververe? "ŝi rigardis min per okuloj mallumaj, kaj sen scii, kion ŝi diru" lau konstruo estas kritikebla. Ĉu ne plibone, "mallumaj, ne sciante"? 34, decidite (—inte); "furoro (kolerego, furiozo); 39, "la aeron de mia junaĝo" ne glate legiĝas. Kial "bon'tagon"? Ventregeto!

Krom la titolverko la volumo donas "En Arbaro Petriŝora," pri kiu Petro Stojan, L.K., diras, "La belstila 'P. Arbaro' estas unu el la plej belaj juveloj de la E-ta literaturo; en ĝi estas atingita la plej alta punkto de la stila perfekteco." Ankaŭ "La Sciigantoj," beleta skizo de kristnaska kutimo k. infana vivo.

Modele presita, belriĉa enhavo, kiu estas, pro la kreipova bonstilo de la tradukinto, feliĉe libera de la malbeninda enfluo de neologismoj. Prezo 15 sil. ĉe AEA, aŭ Hirt und Sohn, Leipzig, Germ.

—Robo.

SCOUTS AND THE LANGUAGE DIFFICULTY.

If, according to the cable news of 12th August, the use of English was general at the International Jamboree at Arrowe Park, England, why were found necessary "attempts by

the boys (!) to evolve a world tongue" of their own? The information further given, that one per cent. of the scouts present spoke Esperanto should encourage us, knowing as we do that the I.L. has been propagated only 42 years. The 500 progressive scouts who formed the 1 per cent. were doubtless splendid advertisement for Esperanto in a responsive medium.

It is safe to say that the lads using the tongue of Zamenhof got on far better than those dependent on "sign language," which we are told was widely used.

The possession of language marks man from the beast, and the use of this mis-named "sign language" is surely a reversion to the gibbering of the tree dweller, unworthy of adoption by Homo sapiens. Such an artifice may serve for expression of the simplest needs, and indeed has served to some end among primitive peoples, but should the services of a gesture expert be enlisted to aid proceedings at an International Conference composed of beings higher in the mental scale than troglodytes, he would find his style badly cramped.

ROBO.

ESPERANTO IN N.Z. SCHOOLS. Deputation to Minister of Education.

A deputation representative of Esperantists and educationists was introduced on the 12th of July last by the Rev. Clyde Carr, M.P., and member N.Z.E.A., to the Minister of Education (Mr. H. Atmore) at Wellington, for the purpose of placing information before the Minister with a view to the inclusion of Esperanto in the curricula of N.Z. schools and colleges. In the deputation were Mr. W. King, Hon. secretary, N.Z.E.A.; Messrs. W. L. Edmanson, E. Jack, and Bertram Potts, of the Wellington Esp. Club; Mr. E. Lomas, Principal, Wellington Training College; Mr. H. Anros, Managing Director, Banks College, Wellington; Mr. F. Combs, Headmaster, Mt. Cook School; Mr. R. Lochore, Wellesley College; and Mr. H. Armstrong, M.P.

Mr. King urged that Esperanto be included in the curricula of the primary, secondary and technical schools and universities of the Dominion. The New Zealand Esperanto Association desired:—

The introduction of Esperanto as a subject of study for the higher standards in the primary schools. As an optional language subject in secondary schools.

As a subject in the training colleges.

As an optional language for University examinations.

As a subject in the commercial course in technical schools.

Mr. King said the time devoted to Esperanto would aid in the study of English and create interest in history and geography.

Numerous countries had introduced Esperanto into certain schools with splendid results.

Esperanto could be read and written after one year's study, and spoken fluently after two years, while the speedy acquisition of root words lessened the time required for French and Latin. Prof. J. Findlay, one of the highest educational authorities of the world, and examiner in education for the N.Z. University, advocated the introduction of Esperanto into the schools.

It had stood up to every test over a period of over forty years and had sufficient support to warrant New Zealand taking the important step which the deputation advocated and again leading the world in a great reform.

Mr. W. Edmanson related his experiences with nationals of other countries who spoke Esperanto.

Mr. E. Lomas said the pupil teachers had shown facility in acquiring the language. A quarter of an hour a day on two days of the week had been devoted at the Wellington Training College to a voluntary study of the language. The principals of the Auckland Training College approved of the language.

Mr. H. Amos said he had visited no fewer than four international conferences at which the language difficulty had been so marked that discussion had been almost impossible. He strongly urged the Minister to accord his support to the representations of the deputation.

Minister's interim reply.

The Minister stated that he was much impressed with the necessity for an international language, but that the distance from the Continental countries minimised to some extent the urgency of the need for such a language in New Zealand. He, however, would

give the matter careful consideration and discuss it with his colleagues and would inform the deputation of the decision at a later date.

Mr. Carr, on behalf of the deputation, thanked the Minister for his sympathetic reception of the deputation.

ALVOKO.

Emilo Chudoba, 21-jara fraŭlo, Stonava, Silezio-Ĉeĥoslovakio, deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj per leteroj kaj p.kartoj ilus. bildflanke afrankitaj. Interŝanĝas p.markojn k esperantaĵojn. Skribu multnombre. Neniu restos sen respondo.

ERAROJ.

Pĝ 102, Kol. 1, linio 8. legu: Kirliĝantoj. Pĝ. 105, Kol. 1, linio 30. legu: Kies (ne, Kiel).

GRATULON.

S-ro Alastair More, sek-io de la Christchurch Esp. Societo, sukcesis ĉe D.B.E.A. Ekzameno. Al li gratulon!

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Danke ni Kvitanco ricevon de abonoj jene:— s-ino James 10/-, febo, '32; W. Hill, 4/6, junio, '30; R. Worrall, 4/6, julio, '30; s-ino Purnell, 4/6, junio, '30; f-ino Hopton, 4/6, junio, '30; s-ro Hayes-Williams, 9/-, aprilo, '31; f-ino H. Batchelor, 5/-, junio, '30; s-ro Dewar, 5/-, aŭg., '30; s-ino A. Carter, 4/6, junio, '30; M. Ravelick, 5/-, majo, '30; f-ino C. Hannaford, 4/6, junio, '30; A. Saar, 5/-, junio, '30; f-ino Holdensen, 4/6, junio, '30; H. Tilbury, 4/6, junio, '30; S. Bishop, 4/6, junio, '30; f-ino D. Bell, 4/6, julio, '30; J. Hodges, 5/-, junio, '30; G. Gordon, 5/-, junio, '30. A. More, 5/-, aŭg., '30; s-ino Callinan, 6/-, dec., '29.

KURSO PER TRADUKADO.

(kondukata de s-ro G. Gordon, F.B.E.A.)
Sek-ino: Miss B. Blyth, 10 Victoria-
av., Surrey Hills, Melbourne, E.10.

TRADUKO 1

GIPPSLANDA MISTERO.

El "The Age" (Melb.) de la 5a de
Nov/o 1928.

Antaŭ ĉirkaŭ okdek jaroj la malgranda blankula loĝantaro de Gippsland (3) en Viktorio tre emociiĝis (4) pro strangaj raportoĵoj, ke blanka samrasa virino falis en la manojn de la indigenaj gentoj. La faktoj pri la malapero de la virino estas malmultaj, sed tre eble ankoraŭ vivas (4) homoj,



kies gepatroj memoris la kaŭzitan maltrankvilon kaj la sendon de armita ekspedicio por traserĉi la arbarojn kaj montetojn. En la nebuletoj de longe pasintaj jaroj la epizodo jam ŝajnas kvazaŭ stranga peco de Aŭstralia mitologio komparebla kun tio de la antikvaj Grekoj. Sendube estas, ke iuj blankulaj kolonietanoj kredis, ke la virino estas (11) kun la nigruloj, kaj ĝis nun ne kontentige (5) klarigis (4) iuj aŭtentikaj pecetoj de atesto, sugestiantaj (6) la aleston de blanka virino inter la indiĝenoj. En unu serĉa ekspedicio estis indiĝena knabino, kiu diris, ke ŝi mem ne nur vidis la virinon sed ankaŭ ludis kun ties infanoj.

Homoj maltrankviligitaj de tiuj raportoj menciis la aferon de William Buckley (ŭilŭim bokle) la soldato-malliberulo, kiu surbordigite (5) ĉe Sorrento (3) en la jaro mil-okcent-tria (7), forkuris en la sovaĝan teron (8). Li kaj liaj du kunforkurintoj (9) disigis, kaj Buckley vagadis sola en la daŭro de unu jaro kaj kelkan tempon loĝis en kaverno. Unu tagon li vidis indiĝenojn timomire observantajn (6) lin de sur monteto. Evidente estas (10), ke ili supozis, ke li estas (11) spirito reveninta (6) sur la teron, kaj lia giganta alto de ses futoj kaj kvin inĉoj (195 centimetroj) helpis savi lin de ilia malamikeco. Almenaŭ li kuniĝis kun la nigruloj kaj vivis laŭ ilia maniero en la daŭro de tridek du (7) jaroj. Kiam la kunularo de Batman trovis lin en la jaro mil-okcent-tridek-kvina (7), Buckley jam ne povis paroli sian nacian lingvon, kaj laŭ sia eksteraĵo li similis la nigrulojn. Lia korpo, estis kolorigita per ruĝa okro kaj aliaj farboj.

Ĉar tia sorto trafis Buckley, kial do, demandis la kolonietanoj, ĝi ne povus trafi ankaŭ virinon? La putriĝantaj lignaĵoj de kelkaj grandaj ŝipoj kuŝis sur la sabloj kaj malprofundaĵoj de Wilson's Promontory (3) ĝis Gabo (gebo). Estis (10) supozeble, ke saviĝintoj (9) el tiuj ŝiprompoj sin trenis surborden, vagadis en la regiono

kaj renkontiĝis kun malamikaj gentoj. Senarmilaj, senfortiĝintaj (6) homoj estas facile trafeblaj per la sagoj kaj lancoj de sovaĝuloj, kiuj verŝajne ne mortigis la virinon. En la frua parto de la nuna jarcento maljuna nigrulo, loĝanta (6) en misiejo, diris, ke la virino estis la edzino de ministro kaj akompanis sian edzon al Stockyard Creek (stokjard krik) en la tempo de la enkurado de multenombraj orministoj en la regionon. Tamen tiu historio certe ne estas vera, ĉar Gippsland dum kelke da jaroj post la serĉado por la virino ne altiris la atenton de orministoj.

(daurigota)

Notaro.

1. Estas neeble, ke mi "korektu" la tradukojn de kursanoj, kaj kvankam mi iufoje krajone montros eraron, oni ne pro tio komprenu, ke ne ekzistas pluaj. Per miaj traduko kaj notaro oni penu plibonigu sian tradukon kaj reskribu ĝin.—2. Kiam gramatika punkto estas sufiĉe klarigita en "Esperanto Grammar and Commentary" de Cox aŭ en "Lingvaj Respondoj" (L.R.) de Zamenhof, mi ordinare ne plu klarigos ĝin sed faros referencon al la rilata paragrafo en tiu aŭ la paĝo en tiu ĉi altvalora verko. — 3. Ne esperantigu nomojn de lokoj ne universale konataj.—4. "emociigi," "falisi," "vivas," "klarigis." Tiuj simplaj verbtempoj estas por eviti uzon de kunmetitaj verbtempoj (estis emociitaj, estis falinta, estas vivantaj, estas klarigitaj). Cox 222, 169, 226a kaj piednoto sur paĝo 266 (aŭ paĝo 255 en pli fruaj eldonoj).—5. Adverba participo. Cox 207-212.—6. "sugestiantaj," "reveninta," "observantaj." Adjektiva participo estas tre ofte uzata anstataŭ "kiu" kun verbtempo (kiu sugestiiis, kiu revenis, kiuj observas). Cox 207-213.—7. Kvankam ordinare oni cifere skribas datojn kaj nombrojn, oni en la nuna kurso preferinde skribu ilin per vortoj por kutimigi sin al ĝusta skribado kaj legado de ili.—8. "bush" en Australio ne ĉiam signifas "forest." Iom bona sinonimo estas

DO YOU ENJOY GOOD HEALTH?

SANA—SANA—SANIGA.

Thanks to Esperanto, Australia is now able to benefit from Switzerland's foremost medical discovery, NOVOCHIMOSIN (Novo-Kim) which is a remedy for every type of gastro-intestinal disorder and its sequels. "Incurable" cases yield to this remedy, which contains no drugs or chemicals, being a biological product.

All chemists CAN supply "Novo-Kim" or it will be forwarded upon receipt of a P.N. for 5/- by the agents: The Saniga Company of Australia, P.O. Box 1106, Melbourne.

"wilderness," kiu povas esti aŭ "forest" aŭ sovaĝa senarba regiono.—9. Substantiva participo, Cox 209-210.—10. Pri senpersonaj verboj, Cox 164.—11. "estas" ne "estis," Cox 220, 221. Rimarku, ke ĉe Cox 221 "of speaking" devas esti "spoken of."

LA LASTAJ SUFEROJ DE LA MAJSTRO.

Antaŭ dekdu jaroj, la 14 de aprilo 1917, mortis en Varsovio Zamenhof. Nia pola samideano, St. Essigman, rakontis kelkajn lastajn okazaĵojn en la vivo de la Majstro. El tiu rakonto ni ĉerpis jenon:—

En la centro de la ĉefurbo Varsovio troviĝas ducentjara ĝardeno nomita "Saksa" pro rememoraĵo de iama saksa dinastio, kiu tiutempe regis en Polujo. La ĝardeno kun multaj malnovaj arboj, kun belaj floroj kaj plantaĵoj, ombroplenaj aleoj, estas agrabla loko de ripozo. Sur unu el la benkoj en aleo proksima de strato Krolewska ofte sidadis la Majstro. Kun la kapo klinita, profunde enpensiĝinta, li ŝajnis ripozi trankvile, indiferece rigardante la ĉirkaŭon. Tiun trankvilecon de tempo al tempo interrompdis preterpasantoj, kiuj, ekkoninte la sidanton, respektoplene deprenadis ĉapojn, salutante lin. La Majstro ĝentile resalutadis.

Tiuj salutoj ŝajnis ripetadi tro ofte kaj supozeble maltrankviligis jam troe la Majstron, ĉar li, por eviti tion, ŝanĝis la lokon, eksidante poste ĉe pli trankvila flankala aleo, tra kiu ne pasis homamaso.

Ofte dum someraj tagoj de 1915-1916 li ripozadis tie, trankvila, preskaŭ senmova, enprofundiĝinte en iajn gravajn, eble malgajajn, pensojn. Dum du horoj aŭ pli, li sidis tiel, antaŭtagmeze, de tempo al tempo ekmoviĝante por fari iajn notetojn sur papereto aŭ notlibreto. Estas inde substreki, ke inter la labormaniero de la Majstro kaj tiu de la Prezidanto de Pola Esperantista Societo, Grabowski, estis certa simileco. Ili ambaŭ tute spontane, senimite notis kutime ĵus alvenintajn pensojn, ideojn, konceptojn, kvazaŭ timante, ke moviĝema torento de pensoj, trafluanta senĉese iliajn cerbojn, forportos senrevene iun bonan penson, kiel brilantan guton.

Post la ripozo la Majstro ekstaris kaj per paŝo malrapida direktiĝis al la domo ĉe la strato Krolewska, 41, kie li translokiĝis de strato Dzika en la jaro 1915.

Ŝajnis, ke la translokiĝo en novan, tre oportunan loĝejon, en bona kvar-talo, proksime de vasta ĝardeno, bone influis la sanostaton de la Majstro. Tiu ĉi espero estis tamen vana. La ĉagrenoplena afero kun "Pola Esperantisto," la malsukcesa vojaĝo al Pariza Kongreso, kiun li estis devigita interrompi en Germanujo kaj revojaĝi en tre malbonaj cirkonstancoj Varsovion, la milito kun ĝiaj konsekvencoj, akraj atakoj de plej gravaj polaj gazetoj kontraŭ lia persono kaj esperantismo, kaj fine sciigo pri morto de lia frato Aleksandro, kiu estis deviga milita kuracisto en rusa armeo, — ĉio ĉi deprimis lin tre forte kaj havis tre malbonan influon sur lin, jam de longe malbonstatan. La kor-atakoj, kiuj antaŭe okazis malofte, ripetadis nun pli kaj pli ofte, suferigante la Majstron treege, kaj malfortigante lian koron, kiu la 14 de aprilo 1917 ĉesis bati por ĉiam.

SCIENCA PROGRESO?

En Sovjetunio Profesoro S. Bruhonenko „sukcesis“ detranĉi kapojn de vivantaj hundoj, ligi la organojn de la detranĉita kapo al maŝino, kiu pumpis aeron kaj sangon, kaj atingi, ke la kapo sola vivis ankoraŭ dum du ĝis tri horoj, montrante per grincado de dentoj, per okulreagado, per lekado ktp. siajn funkciojn. Detalojn pri la eksperimentoj oni trovas en „Heroldo de Esperanto“ n-ro 506.

Germana Medicina Revuo diris, ke ekzistas tiel la ebleco, revivigi ankaŭ homajn kapojn, kaj ke oni povus uzi por tia eksperimento la kapojn de ekzekutitoj. Berlina sinjorino skribis indignite pri tio ĉi al la verkisto

George Bernard Shaw,

kaj kiel respondon ŝi ricevis jenan ironian leteron de la 12.3 1929:

Estimata sinjorino:

Laŭ mia opinio la Bruhonenko-eksperimento estas interese: sed ŝajnas al mi, ke la ideo, ripeti ĝin je mortkondamnitaj krimuloj, estas tute absurda. Ne estas dezirinde, plilongigi la vivon de tiaj personoj. La eksperimento devus esti provata per eminentulo de la scienco, kies vivo estas minacata de iu nekuracebla malsano (ekzemple stomakkancero), kiu povus rabi de la homaro la trezorojn de lia cerbo. Kio estos pli facila, ol savitiam geniulon de la morto per tio, ke oni fortranĉas lian kapon? Tiam oni liberigas lian cerbon de kancero kaj daŭrigas la necesan sangocirkuladon por la detranĉitaj vejnoj, por ke la

eminentulo povu daŭre fari al ni prelegojn, instrui nin, doni konsilojn al ni, ne estante ĝenata de la difektoj de sia korpo.

Mi eĉ mem sentas la tenton, fortranĝigi de mi la kapon, por ke mi povu plue dikti teatraĵojn kaj librojn sen la ĝeno de malsanoj kaj sen la neceso, vesti min, senvestigi min, manĝi, mallonge, sen la bezono fari ion ajn krom produkti majstroverkojn de arto kaj literaturo.

Kompreneble, mi atendus, ke unue unu aŭ du vivisekciistoj mem submetigu al la eksperimento, por konvinki min, ke ĝi estas praktikebla kaj sendanĝera; sed mi supozas, ke tio al ili ne kaŭzus malfacilaĵon.

Mi multe dankas vin pro tio, ke vi turnis mian atenton al tiu ĉi tre ĝojiga ebleco. Universitato, kies fakultatoj senescepte estus direktataj de la plej delikataj cerboj de la lando kun nenio alia ol pumpilo kiel korpa organo, do universitato, kies tuta instrua agado estus pure cerba agado, signifus grandan progreson kompare kun la nuna stato.

Estus agrable al mi, se vi publikigus laŭeble plej vaste la entuziasmon, per kiu mi salutas tiun lastan triumfon de fiziologia esploro.

Sindone, via G. BERNARD SHAW.

KRONIKO.

SYDNEY. — Ni preparas grupeton por la internacia balo, organizita ĉiujare de la Unio de la Ligo de Nacioj en Sydney. Tiu aranĝo brile sukcesis lastan jaron, altirinte al si atenton ĉe la fremdlanda konsularo. En julio s-ro H. Torr alparolis la grupon pri la Historio de E-to, tuŝante krome sur I.L. problemon en antikvaj tempoj. S-ro L.E. Pfahl ankaŭ lekciis, havanta temon La Mikrobĉasistoj.

Flirtigante devizojn Esp-varbilajn la Esp-Societo kune kun aliaj paciferemaj asocioj je la 4 Aŭgusto partoprenis stratmarŝon al demonstracio kontraŭmilita sur la Domain (Placo).

MELBOURNE, Viktorio.— El ĉiu monato oni dediĉas al tradukado la duan mardon, kaj la partoprenantoj

faras bonan progreson. Pro la foresto de s-ro P. Hudson, s-ro C. Ballard nun gvidas la kurson kaj atingis grandan sukceson.

Post tre vigla konkurado inter la anoj, s-ro C. Ballard estis la gajnanto en malgranda Esp. konkurso kiu estis ero sur la Aŭgusta programo.

Ankoraŭ unu fojoh, je la unua de Aŭgusto, la esperantistoj alestis ĉe la "Rivoli" por ĝui la plezurojn de la dancado kaj interparolado.

AUCKLAND, N.Z.—Pro kreskego de la anonombro, necesas ke la klubo translokiĝu al pli tenipova ejo, k kunvenu semajne anst. monate. Tial kunvenoj okazos lunde en Room 6, Unity Bldgs., Upper Queen's str. La 22an de julio ni bonvenigis s-ron Gregory, el Dargaville, k elektis oficistojn. Rea prez., s-ro J. Russell; vicprez., s-roj E. Clark k Woodward k p-tro Wooloxall; sek-io k kasisto, s-ro E. Watkin; helpsek-io, s-ino Drury; instruistoj, s-ino Watkin, s-ro Clark k p-tro Wooloxall.

De post nia deputacio ĉe Wellington la 12an de julio al la Eduka ministro, polemiko flamis tra tagjurnalo Star. Trafaj faktoj pri E. enpikiĝis, k ŝajne tio alportis al ni profiton, ĉar iuj novaj lernvoluloj aliĝis al ni.

HAMILTON. — Pasintmonate la societo perdsente adiaŭis al f-ino C. Murray, forirantan al la Solomon'aj Insuloj. Antaŭ iom da tempo f-ino Rucroft, societano, iris Anglujon. Tial ke nia instruisto, s-ro Adcock, baldaŭ translokiĝos al Drury, ni decidis kunveni denun nur monate.

MASTERTON.—La grupo la 5an de aŭg. okazigis vesperon specialan. S-ro A. Dewar prezidis antaŭ ĉ. 30 p. Guriĉa programo jenis: Kantoj, f-ino Jamieson, s-ino Rosewarne, s-ro Garvich; deklamoj, s-inoj Spiers k L. Payne; komedio, f-inoj Rosewarne k Robertson; muziko, s-roj Bullock k Green; dancado k ludoj, tiam finfine manĝeto provizita de la membrinoj. Forta diskonigo de E. per tagjurnaloj daŭras. En julio-aŭgusto s-ino

HAROLD PUDNEY

Specialisto pri Fontanplumoj

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon poŝtu ĝin al li kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per poŝto. Memoru la adresen.

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

L. Payne verkis koncizartikole pri la aprobakiro de E., ĝiaj ĉiam pli oftigantaj sukcesoj. Efika agado.

WELLINGTON. — Laŭtende la Esp-deputacio al la Eduka ministro (v. alikolone) la 12an de julio metis E-ton en la publikan penson. Gazetoj raportis; la celon, bezonon k utilon de I.L. ili frape surmontris. Avantaĝoj rezulte el tiu deputacio evidentigas ĉie, k ŝajnas ke eĉ pli heliĝos la estonteco por E. en N.Z.

Nuntempe la klubo konsistas el ĉ. 50 financaj anoj. La klubo funkcias marde. Progreson oni faras. Ĉiu klubvespero estas edukplena k dediĉita tute al E.; 8a ĝis 9a instruado (4 klasoj, ĉiu kun instruisto) k 9a ĝis 10a, Esp-aj programeroj. Precipe valora estas humorornamita teatraĵo, La Komercisto Reklamas, verkita de f-ino Smythson, nia vicprez.

S-ro G. Wheeler, el Christch., trapasis Wellington. Sorbigita de Espo, li, vera torĉo de entuziasmo, parolas karlingve tiel flue, kiel "enlandano," k inĉtrias koresponde centon da freŝaj batala(o)ntoj por nia ideo. Ammirinda laboro.

CHRISTCHURCH. — La societo ankoraŭ progresas. La ancifero estas jam nun 34. Por ke la soc. posedu standardon, ano taŭge desegnis, k laŭ tio anino fabrikis bravan flirtigilon el atlaso, jam preskaŭ finfaritan. La 9an de julio grupanoj alestis Esp-vesperon ĉe la hejmo de f-ino Saunders. Post sido ĉe lernolibro anoj plezurtempis kante-rakonte. La 15an, 7.30 ĝis 7.45 vesp., s-ro Bell, nia prez., parolis pri Esp. gramatiko el radiejo 3YA. Per penoj de nia sek-io ni aperigos raporteton monate en gazeto de la Junula Kristan-Asocio. Tio multe helpos dissemon en nia urbo. La 6an de aŭg. okazis monata E. vespero, ĉifoje ĉe la hejmo de s-ro Bell. Semajne la soc. ricevas el ambaŭ Insuloj de N.Z. leterojn, kies skribintoj deziras informon pri E. Ĉiutiurilate, kion faras Nordinsulaj grupoj? Anoncu k reklamu! Sciigu la popolon pri la lingvo! Ne lasu onin eltrovi gruplokojn senhelpe, sed elserĉu tiujn, kiuj deziras direkton.

Ni bedaŭras perdon al unu el niaj plej ŝpertaj kunuloj, s-ro Wheeler, kiun trafis la malĝojigo, en tio ke lia edzino pasis ekster tiu ĉi mond vivo. Li, kun sia bela filineto, forlasis nin

por veturi al Auckland, k eventuale de tie al Hawaii. Ni ĉiuj esprimas al li kondolencon pri lia doloriga kortranĉo.

Westralian Esperanto Society, Nigra Cigno Grupo, kunvenas ĉiun vendredon de 7.30—10 p.t. ĉe 197 Murray-st., Perth, kontraŭ Boan's Ltd. Prezidanto, s-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretario, s-ino E. Sainsbury, "Noeline," Carrington-st., Maylands, W.A.

Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo. Prezidanto, S-ro A. Dewar; Sekretariino, S-ino L. Payne, 8 Bruce Strato. Kunvenas en ĉiu lundo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas la duan lundon de ĉiu monato je 7.45a horo vespere ĉe Nov-Preĝeja Halo (New Church Hall) Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell. Sekretariino: S-ino E. M. Watkin. Komunikaĵojn al la prezidanto ĉe Kent's Buildings, Newmarket, Auckland.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro J. Skurrie; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je la oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: s-ro A. E. Pryke; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 174 Burwood Road, Burwood.

Brisbana Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str., proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Klement Kidd. Vicprezidantoj: Fraŭlino Rose Macpherson; M. Hyde. Sekretario: Fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane, Kvinslando (Queensland).

Wellington Esperanto Club.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralic Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.



La Suda Kruco

*Organo de la Internacia Lingvo Esperanto en Australio,
Nov-Zelando, Kaj. Fondita en Julio 1920.*

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham.

Specimena numero—unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kuponon.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 112 (Ninth Year) Melburno (Melbourne), Australio. 10 Oktobro 1929

ESPERANTO.

A concise History of the International Language.

(By Wm. King, D.B.E.A., Secretary N.Z.E.A., Wellington, N.Z.)

(Continued.)

1927 saw Esperanto officially authorised as a subject for instruction in all teachers' institutes for training of elementary and secondary school teachers of Greece and in all Aeronautical schools of Poland. During the year the 40th Jubilee of Esperanto was celebrated at the 19th World's Congress of Esperanto at Danzig. The Union of International Broadcasting Organisations met at Lausanne in May, and, having investigated the question of an international radio speech, recommended in favor of Esperanto. At this time 140 radio stations had broadcast Esperanto lessons and speeches, this fact providing the base for the Broadcasting Union's decision. The "Peace through the Schools" Congress, in which 19 countries were represented, was held in Prague, Esperanto being the sole language used.

Last year (1928) an enquiry was conducted by the Königsberg broadcasting station which operates over several European countries. In response to its appeal, listeners-in showed their preference for Esperanto over other languages by a large majority. 24 new courses were commenced in the elementary schools at Vienna, and teachers at the Normal School in Helsingfors who take the training course study Esperanto as a compulsory subject.

The University of Toulouse commenced publishing scientific articles in Esperanto. Professor J. Findlay conducted a vocational course of Esperanto at Manchester University, the course being attended by teachers from all parts of Britain. During the year Esperanto was taught in 48 towns in Saxony, 400 teachers being fully qualified to instruct. The courses were subsidised and fostered by the Government. Remarkable progress was made throughout the year in Sweden, where three years previously the Swedish Esperanto Federation announced a free Esperanto course, 1000 students enrolling the first year, 2000 the second, and 3000 the third. Up to August, 1928, 1000 new students were being enrolled each month. The Swedish Parliament this year authorised subsidy of 3000 Krone (£168/15/-) for the organising of Esperanto courses. The Farman Aviation Company announced during the year that its pilots must undergo an Esperanto course. Japan published various reports in Esperanto regarding meteorological and other scientific subjects. The advantages of the talking films—as with radio—introduced a new aspect of the language difficulty; producers find that national languages limit their activities. However, investigations of the international language are being carried out, and the opinions of Mr. Fred. Niblo, the producer of "Ben Hur" and Mr. Clarence Brown who produced "The Trail of '98," are worthy of consideration. The latter says:—

"Esperanto will at last become an

established fact. Talking pictures will make it absolutely necessary for the world to have a common language. The success of the talking films in this country will spread to Europe and South America, and unless Esperanto is understood generally the international exchange of talking pictures will be impossible. The idea of bringing the adoption of Esperanto to a head is not as far-fetched as it seems at first glance. The world has been on the point of accepting a universal tongue for some time and it needs but little more to bring on general acceptance. It is said that Esperanto is learned easily, and in an exceptionally short time. A person does not have to be a born linguist to grasp it immediately.

"The future great pictures of America, France, Germany, Russia, Sweden, Italy, will be confined to the country in which they are made unless the same dialogue is spoken in each. The producers realise this and steps will be taken immediately to promote Esperanto so that when the time comes in the not distant future when every theatre of the world shows talking movies, the whole world will be able to understand the same picture. It is reiterated, making a talking picture at least ten times, in ten different languages, synchronising the words and action in each instance, is financially impossible. There is but one solution—Esperanto."

It is significant that many film stars have already expressed their willingness to learn Esperanto.

(To be continued.)

WAYS TO A WORLD LANGUAGE.

There are four ways to a world language, whether used as auxiliary to the mother tongue or as the sole speech of mankind. First, the fusion of all tongues as the result of the intermingling of the peoples. Secondly, the gradual cultural and economic dominance of one powerful language over all others, to the eventual absorption of them. These two would be lengthy processes indeed. Thirdly, acceptance by the powers of some national tongue, to be used in all foreign relations. Fourthly, adoption by the Powers or the peoples of a composite neutral auxiliary language.

1. It is maintained by some that the merging of the world's peoples by reason of the ever-increasing facilities of transport and inter-communication will result in the gradual emergence of a tongue common to all men. Philology does not unreservedly voice the same belief. Prof. T. Cart, of the Sorbonne, ventures to call such reasoning fallacious and says that in the 19th century it was widely but erroneously held by students of the subject that there was a tendency to centralisation in language, to the eventual dominance of a few chief tongues. But to-day there are more languages than in 1914. Not centralisation, but federation is the characteristic of present-day Welt-politik. The nations draw together in politico-economic groups, but an intense national spirit prompts them to guard jealously the tongues of their fathers. In Russia some 80 languages are following distinct lines of evolution; zealously fostered, each according to its peculiar genius, Czech, Catalan, Magyar, the diverse tongues of the Baltic States and a string of Slav idioms in the South-East of Europe, most of them born of the break-up of Austria-Hungary and the partition of Western Russia, all join to weaken faith in a natural unification of European language.

2. History shows that the vast increases in language territories gained by this or that dominant nation are not permanent. Greek and Latin, interlanguages in a limited sense, have ceased to be such. The day of French for such a role has passed. The progress of Arabic is equalled or passed only by English, which in turn shows signs of having reached its high-water mark of expansion. Wells says the possibilities that still in a dwindling degree exist for resolute statesmen to make English the common language of communication for all Asia south of the Himalayas will probably pass away. "One is surprised to discover how slow the extension of English has been in the face of apparently far less convenient tongues. It still fails to replace the French in French Canada, and its ascendancy is doubtful to-day in South Africa after nearly a century of British domination."

3. Prof. Guion points out that while languages borrow words and idioms from one another there is no

instance of one tongue adopting the syntax of another. He adds that one could learn ten vocabularies in the time that it takes to master the subtleties of syntax in one tongue. Herein lies one of the difficulties confronting those advocating the adoption of a national language. Experience of instructors of French in the schools in this country and others is not encouraging; it might be called disheartening when one considers the vast expense of time and patience devoted to the study of an idiom, which, contrary to general belief, is one of the subtlest languages of Europe. For that matter, Italian or Spanish, simpler from the phonetic and syntactical points of view, would seem to be better fitted to the purpose for which French is taught in our Schools. But it is questionable whether the gain, namely the production of a few prize winners of linguistic bent, repays the cost and care involved in such instruction, especially in a monolingual country.

4. The solution then would appear to lie in the adoption of some form of artificial synthetic language easy of acquirement, characterised by neutrality, but based on the chief idioms of Europe. Such would not only give no country undue cultural or economic advantage over the others, but would also attract the peoples to a profitable study of the nature and structure of their own language.

—ROBO

STENOGRAFIO KAJ ESPERANTO.

Neniu flugrapidskribisto povas juste plendon elpuŝi pro malatento de stenografi-fakuloj. Jen ni ricevis por rencozo (vana peto!) tri sistemojn adaptitajn aŭ originalajn je Esp-o. 1. Internacional stenografio en ĉiuj kulturlingvoj, Duisburg Friedenstr. 79, Germanlando. 2. Sistemo Brabbee, Wien 1, Akademie-str 12. 3. Duploye-Flageul, "La Poezio de Zamenhof" en stenografio. La aŭtoro donacos al ĉiu aĉentinto de tiu libreto sian lernolibron de la sistemo. S-ro Flageul, 9 Boulevard Voltaire, Issy, Seine, Francujo. Prezo 1.50F.

BUDAPEST KAJ LA JURNALARO.

Ankoraŭ en la Aŭstralazia taggazetaro ĉi-jare ni vidas tute nenian rimarkon pri la Esp-a kongreso. Kial tio, post la plendo de ni farita al nia centro ĉe Genevo lastan jaron?

Sufiĉe longaj raportoj troviĝadas trajare, informantaj pri sciencaj, privirinaj, junulaj, reklamaj k alifakaj kongresoj, eĉ la malgrandaj. Ni ŝatus klarigon de Genevo aŭ la respondeca funkcidevuloj en tiu ĉi rilato. Kion faras la angloj ĉe I.C.K.?

SYDNEY ESPERANTO SOCIETY.

Oct. 17.—Why not the U.E.A.? L. E. Pfahl.

Oct. 24.—The Aftermath of War. Mr. W. J. Morrison.

Oct. 31.—Musical Evening.

Nov. 7.—The Human Mind. Mr. A. Feldmayr.

Nov. 14.—Why is Esperanto? Mr. E. A. Pryke.

Nov. 21.—Opposing Forces. Mr. E. Hart.

Nov. 28.—Members.

PROpono DE ESPERANTO- INSTRUISTO.

Dediĉinte mian vivon al esp. movado, mi serĉas esp. laboron. Mi proponas min kiel instruiston kaj lekciiston en E. en ia urbo de Australio, N.Z. aŭ Pacifiko, kie ekzistas E. Societo, kapabla inviti min por tiu celo. Mi povas gvidi komenc- aŭ altajn kursojn, lekci publiko por samoj kaj neesperantistoj pri diversaj temoj, aranĝinte la kvazaŭ peresperantan Fakultaton. Per tiuj pagataj de publiko lekciroj la invitinta E.S. to povas eĉ mone profiti. Mi havas oficialan diplomon por E. instruisto, donitan de U.E.A. Mi estis instruisto de E. en PEKINA Esperanta Kolegio, en TOKIO, en SIBERIO.

Proponojn kaj invitojn sendu al Sro I. Serišev, G.P.O., Box 2988-NN, SYDNEY.

QUERY CORNER AND CORRESPONDENCE.

Under this head are invited questions on Esperanto history and language. Contributions in the form of short articles, verselets, sketches, etc., are appreciated.

M.C.T. in E. Thanks for appreciation.

Mimo en B. "Strikt," Fabeloj de And. Vol. 1, 151/7, 2 Sam. 20/8 is

derived from the Latin strictus, p.p. of stringere, to draw or bind tight, to compress, urge. In the Esperanto text it means "tight-fitting."

Koto in L. "Tehniko de Glufabrikio" is too sticky for us to handle.

Umulo in F. Will appear in the fullness of time.

Infanulo. The pronunciation of "kolorriĉa" although not easy for the English, who do not trill the "R," is not difficult for the Irish, Scotch, and several Continental nations.

Talentulo. "Alesperoj"; read "disappointments."

Precizamiko in A1. "Lunde," Fabeloj de And. Vol. 1, 130/39. We think Cox is right and that the precise signification is "Mondayly, on Mondays," but through the loose usage of many writers the adverb has taken to itself also the meaning of "on Monday," and Zamenhof may have ceded to this fairly general custom. Use it, however, only with the sense first given.

Lardule. The terminus for "La Vojaĝanta Pikemulo" was the W.P. basket.

SOMERA MALGRASIĜO DE GAZETOJ?

Ĉu fakte ke iuj gazetoj ne bone eltenas la brulveteron; ke ili kvazaŭ formetas la karnopezon k eliras el presejo iom maldikaŝpektantaj pro malvigliga veterpremo? Tute ne. Alikiale estas! La geoficistaro ferias, aŭ kongresas, k al la Esp-istaro mankas emo legi! Do la maldikiĝo estas memvola k intenca por tio ke la abonantaro ne tre ĝenu sin per troa somera legdevigo. Vidu Heroldon de E-to, n-ro 27.

La redakcio ŝate ricevus opiniojn de la legantoj pri aplikebleco de tiu brila ideo al La Suda Krucio. Jam alvenas somera varmego. Ĉu vere velkas pro la ŝvitiga sunbrulado legemo de sudkrucanoj, k ĉu malvigliĝas ilia atendo al aperado de nia gazeteto? Ni espere pensas ke tute ne. Prefere ni imagokule vidas legantojn oportune kuŝsidantajn en ombro de intermontetaj filikarboj, aŭ ĉe plaŭde muzikantaj sablej-ondetoj, kie ili avide suĉas encerben la Sudan Krucon preparitan por sia regalo.

Ĉu vi ne bonvolos konstati la fakton pri via ĝusta financrilato al nia organo, karaj legantoj, montrante per daŭre ĝisdata abonanteco vian ŝaton al ĉi tiu gazeto? Antaŭe mi dankas elkore al ĉiuj subtenantoj nunaj k estontaj.

REDAKTISTO.

THE ENSOM BEQUEST.

At a meeting of the council of Workers' Education Association in Christchurch it was decided to accept the bequest for a class in Esperanto, and that for the purpose of securing the Government subsidy, the amount be transferred to the Board of Governors of Canterbury (University) College, Christchurch, the Board, in accordance with the recommendations of the W.E.A. and the tutorial class committee, to appoint the tutor for the class, Mr. Bell, M.A., being recommended as tutor. It is not yet known whether Canterbury College will accept.

ESPERANTO-REDEN (Paroladoj)

de doktoro Zamenhof, tradukita en la germanan de d-ro E. Pfeffer.

Por la unua fojo aperas en nacilingva vesto la kongresaj oratoradoj de la Majstro. La progresemaĵoj germanoj per sia idiomo jam konigas al la ne-Esperantleganta publiko la esencon k celadon de la grade mondonvekanta invento de Zamenhof. Imitinda ekzemplo al tradukantoj en aliajn lingvojn. Do signifoplena verko estas ĉi tiu de d-ro Pfeffer, konata laboranto en la kampo de nia serioza literaturo. Tre eble estas ke la teksto nacilingva tentos al germanaj varbotoj k varbigantoj lasi la belriĉan originalon nelegita. Tamen oni ne povas dubi pri la altiro de multaj homoj al la sincera idealeco k nepre aminda personeco kiuj certe brilas ankaŭ en la tradukaĵo. Ĝojige estos vidi nacilingvajn verkojn en plena detalo pri la vivo de Zamenhof, ankoraŭ preskaŭ nekonata de la publiko.

Ke Esp-o superas nacilingvojn laŭ kompakteco k frazneteco facile vidiĝas per komparo de kiuj ajn paĝoj de la originalo k traduko. Kvankam pli diklitere presita la Esp-aĵo devas enlasi al si blankajn spacojn por ke ĝi ĝuste sampaĝu kun la germana. La plena Esp-a originalo sidas flanke de la tradukaĵo, tial al negermanlingvanoj ni ankaŭ konsilas aĉeton de ĉi tiu legenda libro, plena de kuraĝa espero k inspiro, el kies fonto ni ĉiuj, eĉ la plej fortikakoraj, sentas iam k iam soifon trinki.

La fama Letero al Borovko pri la origino de Esp-o estas inkluziva, k enkadriginda fotografaĵo de la amata doktoro ridetas bonvenige al legantoj. 170 pĝ. Prezo 1.20rm. Libreja Fako de "Heroldo de Esp-o," aŭ per AEA.

ROBO.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Danke ni kvitanças ricevon de abonoj jene:— S-ino Sainsbury 4/6, aŭg., '30; f-ino G. Marshall 4/6, junio, '30; J. Widdowson 4/6, aŭg., '30; A. Kelley 10/-, okt., '30; C. Clarke 4/-, majo, '30; Box no. Swan Hill 2/6, feb., '30; D. Munro 4/6, sep., '30; Melb. Esp. Soc. 5/6, anonco, aŭg., '30; E. Hart 4/6, aŭg., '30; f-ino P. Hart 4/6, junio, '30.

KURSO PER TRADUKADO.

(kondukata de s-ro G. Gordon,
F.B.E.A.)

Sek-iino; Miss B. Blyth, 10 Victoria-
av., Surrey Hills, Melbourne, E.10.

TRADUKO 2**GIPPSLANDA MISTERO.**

(daŭrigata)

Estis (1) sciate (2), ke la nigruloj havas emon diri al demandanto (3) tion, kion ili supozas, ke tiu deziras aŭdi, tial pli maltrankviliga ol nigrulaj rakontoj estis tio, kion eltrovis aro de pioniroj en la jaro mil-okcent-kvardek-unua. Tiuj trafis (4) iujn bivakantajn (9) nigrulojn, kiuj pro timo tuj rapide forkuris, lasante (5) kvin arboŝelajn kanotojn. Inter la materialo uzita (6) por ŝtopi la ekstremaĵojn de la kanotoj por bari eniron de akvo estis korpviŝilo kaj objekto el virina vestaĵo. Kompreneble estis, ke tiuj fabrikaĵoj povis veni en la posedon de la nigruloj el rompita ŝipo aŭ estis ŝtelitaj el domo de kolonietano (7); tamen tiu eltrovo kune kun tiuj de kurioza desegnaĵo ĉe la loko de la forlasita bivakejo kaj de sago montranta (6) al la sovaĝejo forte subtenis tiujn, kiuj petis pri serĉa ekspedicio. Tuj oni sin turnis al la registaro en Sydney, kaj ĝi organizis kaj sendis du serĉantarojn (8). Unu serĉantaro, konsistanta (6) el kvin blankuloj kaj naŭ nigruloj ĉefata (6) de sinjoro de Villiers ekveturis de Melbourne la dudekan de Oktobro mil-okcent-kvardek ses sur la vaporŝipo Shamrock (elp. ŝamrok). La intenco estis surbordiĝi apud aŭ Port Albert aŭ Ram Head (elp. hed) aŭ insulo

Rabbit, kiel ajn permesos veteraj kondiĉoj, kaj poste disiĝi en du balenajn boatojn. Ĉiu serĉantaro estis bone armita kaj portis provianton (10) por kvar monatoj kaj provizon de fiŝhokoj kaj ŝnuroj, lankovriloj kaj aliaj objektoj ŝatataj (6) de la nigruloj. Aparte (11) interesa estis granda nombro da poŝtukoj, sur unu flanko de kiuj estis presitaj Angle kaj Gaelle la jenaj vortoj:

“Blankula virino.—Dek kvar armilhavaj viroj, iuj blankuloj iuj nigruloj, serĉas vin. Estu ruza kaj kuregu al ili, kiam vi vidos ilin en via proksimeco. Precipe vigliĝu en mateniĝo ĉiutage, ĉar estas tiam, ke la serĉantoj (3) esperas vin savi. La blankula kolonieto (7) estas en la direkto al la sunsubiro.” La serĉantoj alfiksis la poŝtukojn sur la trunkojn de arboj, por ke ili altiru atenton de indiĝenoj kaj donu al la virino informon pri la serĉantaro (8). Sur la alia flanko de la tukoj estis presitaj bildoj por mirege interesi la indiĝenojn. Oni en la presaĵo uzis la Gaelan lingvon pro tio, ke antaŭ kelka tempo barko rompiĝis sur Ninety Mile Beach (elp. najnti majl biĉ. t.e. Naŭdekmejla marsablaĵo), kaj inter la netrovitaj pasaĝeroj estis virino el la montara regiono de Skotlando kaj ŝia edzo. La serĉantoj ankaŭ sur la arbojn alfiksis spegulojn, kies dorso surhavis tiel saman komunikon. (daŭrigata)

NOTARO 2

1. Senpersona uzo de “estis” sekvata de adverba participo. Cox 164.
2. “estis sciate” aŭ “oni sciis.”—3. Substantiva participo. Notaro 1/9.—
4. “upon disturbing” en la originalo estas Angla gramatika formo ne permesebla en Esperanto. Cox 211b.—
5. Adverba participo. Cox 211c.—6. Adjektiva participo. Notaro 1/6.—7. Bone estas distingi inter “colony” (kolonio) kaj “settlement” (kolonieto)—8. “partio” ne havas la ĉi tiean sencon. “Aro” estas la ĝusta vorto. Vidu Mill.—9. Indiĝenoj ne posedas tendojn.—10. “provianto” Vorto uzata

DO YOU ENJOY GOOD HEALTH?**SANA—SANA—SANIGA.**

Thanks to Esperanto, Australia is now able to benefit from Switzerland's foremost medical discovery, NOVOCHIMOSIN (Novo-Kim) which is a remedy for every type of gastro-intestinal disorder and its sequels. “Incurable” cases yield to this remedy, which contains no drugs or chemicals, being a biological product.

All chemists CAN supply “Novo-Kim” or it will be forwarded upon receipt of a P.N. for 5/- by the agents: The Saniga Company of Australia, P.O. Box 1106, Melbourne.

de Zam. kun la signifo de "provisions for maintenance."—11. "aparte," ne "speciale," kiu enhavas la ideon de "purpose," kiel en Ekz. 19/7. (N.B. En tiuj ĉi notaroj "Ekz" signifas "Ekzercaro de d-ro Zamenhof," "Mill." signifas "The Esperanto-English Dictionary de Millidge.")

Rondaneco de tiu supra tradukantaro kostus al vi nur kvar pencetojn monate! Turnu vin al la sek-iino!

ESPERANTO AND THE POST OFFICE.

Esperanto is more and more finding support from the official authorities of posts, telegraphs and telephones. The General Directorate of the Bulgarian Posts, Telegraphs and Telephones recommend the study of Esperanto to postal servants. The General Directorates of the Posts, Telegraphs and Telephones of Rumania, authorised the organisation of a course in Esperanto by the P.T.T. School in Bucharest and the use of the language in accordance with the requirements of the Postal Service.

International Conferences.

The International Touring and Advertising Conference held at Frankfort during Easter of the present year, used Esperanto with great success as the sole language for translation.

The Congress of the World Federation of Educational Associations in Geneva, 25th July-4th August, used Esperanto as a language for translation and discussion in certain sections.

An Esperanto Discussion Group will be formed during the International Pedagogic Congress at Helsingor, Denmark, from 8-12 August.

Official Subsidies for Esperanto.

On the occasion of the 21st Universal Esperanto Congress in Budapest, the Normal School of the Hungarian Capital organised a special Esperanto Course for teachers in co-operation with the J.J. Rousseau Institute of Geneva. The Town of Budapest granted a subsidy to provide gratuitous board and lodging for 30 foreign participants. The Swedish Parliament voted a subsidy of 3,000 crowns (£168/15/-) for the organisation of similar courses. The Minister of Public Instruction of Estonia also granted financial assistance to the Esperanto organisation of that country.

Exhibitions.

The International Colonial, Maritime and Flemish Art Exhibition to be held in Antwerp in 1930, is carrying out publicity work by means of Esperanto. It has distributed a considerable number of prospectuses and advertising stamps in that language. The directorate of the Horticultural Exhibition at Courtrai has also issued an advertising stamp in Esperanto.

Science.

The Observatory of Taten (near Tokyo), has now for the third year published its lengthy aerological report in Esperanto.

KRONIKO.

MELBOURNE.—Okazos en Novembro la ekzamenoj por la Unua Provo kaj la Diplomo.

Je la 12a de Septembro okazis la tria dancado en la "Rivoli." La afero tre sukcesis pro la senĉesa laborado de la komitato. Krom la kutima "Monte Carlo," le dancantoj portis ĉapojn el papero. En ĉiu ĉapo troviĝis numero, kaj oni donis premion al tiu kiu havis la bonŝancan numeron. Duonon de la profito de la dancado oni donacos al U.E.A. S-ro Skurrie faris kelkvortan propagandan paroladon.

La Societanoj aranĝas por pikniko, kiu okazos je la 10a de Novembro. F-ino V. Cox afable metos je dispono de ekskursanoj sian dometon ĉe Belgrave, kaj ĉiuj Esperantistoj estos bonvenaj. La renkontejo estos: "Philomena" Station Strato, Belgrave, kaj de la domo flirtos la Esperanto flago.

CHRISTCHURCH, N.Z.—Jam la soc. atingis ĝis 34 membroj, k ties ĉeestoj ĉe kunvenoj sufiĉe kontentigas. En soci-vespero f-ino Saunders, la gastiganto, donis al ĉiu ekzempleron de poemo "La Sago kaj la Kanto," anoncanta ke tiu, kiu povos post monato plej bone deklami ĝin premion ricevos. Vigla vendado de lernolibroj daŭras. Ŝajne, malgraŭ ke la aĉetejo de tiaj libroj sidas ĉe Wellington, la tuta provizo estas ĉe ni! Je la 16a de sep. s-ro N. Bell, M.A., nia prez-o, parolis de radiejo 3YA pri Esp-a gramatiko. La sek-io, s-ro A. More, 48 Hackthorne-rd, Cashmere Hills, la 17an de sep. instruis klason de 32 geknaboj, starigitan responde al deziro de tiuj esprimita al La Onklino, kiu gvidas la porinfanan rondon en tagĵurnalo Star. La infanoj avidas lerni k facile kapablas akiri la elparolon k komencan vortprovizon. Kiam ili jam povos bele paroli E-te, la gepatroj nepre sentos emon lerni!

AUCKLAND, Nov-zelando. — Lernantoj aliĝas ĉiusemajne la societan klason, kiu kreskas koraltige. Kelkaj progresintoj jam celas B.E.A. diplomon. Aprobite de la soc. tre povos disflugi ĉien varbil-folio presita en nombro 4000. Per radiejo IYA p-tro Wolloxall parolis ĉiuvendrede je 7.40a v. dum tri semajnoj, lastfoje je la 9a de sep., k s-ro G. Wheeler lekciis la 13an. Ĉi tiu nun aranĝas kun la "Star" aperigon de lecionoj, kiujn li klarigos radie. La 2an de sep. s-ro Andrews rakontis spertojn ĉe la Edinburgh Esp. Kongreso. La soc. aranĝis je la 9a plaĉan programon.

MASTERTON, N.Z. — La grupo jam rekomencis funkcii la 9an de sep. k preparas anojn por ekzameno.

WELLINGTON, N.Z. — La dua ĉiujara kunveno de la klubo okazis la 27an de aŭgusto, kiam s-ro E. Jack prezidis multajn membrojn. S-ro B. Potts prezentis jarraporton, kiu montris detale sur veran frukton el 12-monata laboro. Havante 34 plenkotizulojn je komenco de jaro, la klubo posedis jarfine 46. S-ro L. Dust respondis pri la bilanco, kies ciferoj parolis pri forta financa pozicio de la klubo. Ambaŭ dokumentoj ĉiesvoĉe akceptiĝis. Rilate elekton de nova oficistaro la ĉeestantaro entuziasme reendevigis entute la malnovan, jene: Prez., s-ro E. Jack; vic-prez., f-ino C. Smythson; sek-io, s-ro B. Potts; kasis-to, s-ro L. Dust; oni delegis s-ron Leck trakontroli librotenadon.

S-ro W. King polemikas ĵurnale. Defendante Esp-on ofte aperantaj leteroj vaste konigas la avantaĝojn de nia kara. La UEA jaribro (1929) jam alvenis. La eldonintoj de tiu bonega ja meritas plejeban subtenon.

BRISBANO (Kvinslando). — Aperas jam kvara numero de la societa manuskripta gazeto "La Brisbana Bleko," kun diversa enhavo, originala kaj ŝtelita: artikoloj gravaj, anekdotoj, versoj, respondoj al korespondantoj, anoncoj k. t. p. Oni legis ĝin ĉe la societo, kaj poste dispruntis al anoj.

Kampa festo okazis unu dimanĉon apud bela rivereto en Ashgrove. Kel-

kaj noblanimaj samideanoj per siaj aŭto-j portis la anojn de la tramvojo ĝis la kunvenejo, kie oni manĝis kaj babilis.

La malgranda kurso finiĝis, kaj al la plej bonaj lernantoj oni donacis premiojn: f-inoj N. Littleton kaj D. Graham.

SIDNEJO. — Jen ĉefa afero! La ĉiujara internacia balo, organizita de la Sidneja filio de la Unio de la Ligo de Nacioj. Ĉeestate de la alilandaj konsuloj, tiu gaja kunveno ŝajnas semotaŭga kampo por propagando. Tial, la S.E.S. ĝojis akcepti inviton de la komitato sendi reprezentecan grupon. Kontrastate kun la pli grandaj naci-grupoj, kiel ekz. la ĉina, kiu gajnis la ĉef-premion, la E. grupo, cetere bela k atentiga, eble aspektis malgranda. F-ino Bridge k aliaj f-inoj socientanaj en la lasta jaro faris kostumojn el verda k blanka teksaĵoj. La afero sendube tiris atenton al la problemo de internacia komunikado.

S-ro I. Serišev alparolis pri "La naturaj riĉaĵoj de rusujo" ĉe la klubo. S-ro Davies legis el "Aŭstralio, lando k Popolo," k s-ro Rutland, la bonekonata, klarigis pri tio, kiel le "Monatoj de la Jaro" nomiĝis.

REFORMAJ KLOPODOJ EN ESPERANTO.

(Julio Baghy.)

Kiam oni parolas pri reformoj en la lingvo, preskaŭ ĉiam mi konvinkiĝas, ke la reformemulo tute ne vivas en la spirito de la lingvo kaj li estas gvidata per personaj gustoj, ofte per ekesteraj proponoj. Certe la sama persono ne kuraĝus riski similajn reformojn en sia nacia lingvo, kies spiriton li alproprigis dum la lernejaj jaroj. Respekti la parolatan lingvon ne signifas esti "konservatulo," sed esti aktiva batalanto de la lingva unueco.

Oni ne bezonas longe serĉi la kaŭzojn de kelkaj neĝustaj esprimoj enŝoviĝintaj en la lingvon, ĉar ĉiu literaturamanta aŭ kelkajn gravajn verkojn leginta Esperantisto tuj povas konstati, ke tiujn malkorektaĵojn nas-

HAROLD PUDNEY

Kial fuŝe skribaĉi per kripla fontanplumo? Vi povas denove senti tiun plézuron, kiun donas facile funkcia fontanplumo, se vi alportas ĝin al H. Pudney, multjara spertiĝinto, kiu lerte riparos ĝin je malalta kosto ĝis re-

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

Specialisto pri Fontanplumoj

noveco.

Ĉu nova fontanplumo kiel donaco, aŭ por vi mem? El ĉiu speco ili kuŝas ĉe li je facilaj prezoj. Aparta atento donata, al poŝt-mendoj.

Notu adreson:—

kis la nesufiĉa lingvoscio aŭ la facilanima ambicio egoista, kiu soifas eĉ je bagatelaj gloroj.

Cetere la periodo de reformoj jam pasis antaŭ 30 jaroj, kaj dank'al la tiamaj pioniroj ĝi ne difektis la sanan evoluon de la lingvo. Hodiaŭ E-to jam ne estas projekto, sed vivanta realaĵo, kies valoro estas taksebla ne sole per ĝia estanteco, sed precipe per tiu vasta perspektivo, kiun ĝi havas por sia estonteco. Kiel elokventa averto staru antaŭ la reformemuloj la historio de Ido, kiu dum sia ekzisto estis nur eksperimenta substanco de personaj gustoj, reformaj tendencoj kaj en la momento, kiam ĝi celis al stabiliĝo, tiam mortis pro du ĉefaj kaŭzoj: la reformemuloj forlasis ĝin kaj la sindonaj adeptoj perdis la fidon al ĝi post la foriro de la aŭtoritatoj.

Ni estu konvinkitaj, ke la kvardek-jara prospero de E-to jam plene pruvis la relativan perfektecon pri la gramatika strukturo. Ĝi ne bezonas do komplikajn aldonojn. Pri absoluta perfekteco oni ne povas paroli en la homa vivo. Estas necese scii, ke ne la gramatiko vivigas la lingvojn kaj ne ĝi donas ilian ĉarmon, sed la sento, kiu spiras vivon en la rigidajn vortojn kaj per la diversaj esprimoj donas koloron al ĉiu frazo. La gramatiko de ĉiu lingvo estas rigida meĥanismo, muelanta la vortrezoron de ĉiu epoko. Ĝi estas la gardanto de la struktura unueco, sed, neniel ĝi malhelpas la evoluon, riĉigon de la lingvo mem, kies vivo dependas de ĝiaj literaturistoj kaj parolantoj. Precipe tio ĉi koncernas E-ton, kies literatura lingvo edukas la amason, la parolanton tute klare: la popolon de nova vivo kaj nova kulturo. En tiu ĉi lingvo estus do duoble danĝero reformadi eĉ laŭ la gusto de plej kompetentaj lingvistoj. La reformoj de la naciaj lingvoj ne entenis tiom da danĝeroj, ĉar tie el la parolata popola lingvo evoluis la literatura.

Severe ni gardu la lingvan unuecon kaj ne akceptu facilanime iun novaĵon, kiu eble trafas nian guston; en la parolado kaj verkado ni klopodu al la plej granda klareco, sed ne al precizeco superflua, ĉar ĝi estas kontraŭnatura en ĉiu lingvo. Ni rekonu la elastecon de la vortoj kaj fidu al la natura intuicia povo de la auskultanto. Sekvante tiujn ĉi principojn nia parolo havos vivan karakteron kaj nia stilo

ne estos rigida fandaĵo de vortoj, de difinaĵoj.

EL "ANTAŬEN."

Westralian Esperanto Society, Ni-gra Cigno Grupo, kunvenas ĉiun vendredon de 7.30—10 p.t. ĉe 197 Murray-st., Perth, kontraŭ Boan's Ltd. Prezidanto, s-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretario, s-ino E. Sainsbury, "Noeline," Carrington-st., Maylands, W.A.

Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo. Prezidanto, S-ro A. Dewar; Sekretariino, S-ino L. Payne, 8 Bruce Strato. Kunvenas en ĉiu lundo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas la duan lundon de ĉiu monato je 7.45a horo vespere ĉe Nov-Preĝeja Halo (New Church Hall) Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell. Sekretariino: S-ino E. M. Watkin. Komunikaĵojn al la prezidanto ĉe Kent's Buildings, Newmarket, Auckland.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro J. Skurrie; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je la oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro A. E. Pryke; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 174 Burwood Road, Burwood.

Brisbana Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str., proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Klement Kidd. Viceprezidantoj: Fraŭlino Rose Macpherson; M. Hyde. Sekretario: Fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane, Kvinlando (Queensland).

Wellington Esperanto Club.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralic Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34. Argentine Avenue, Miramar; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.



La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham.

Specimena numero—unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 113 (Ninth Year) Melbourne (Melbourne), Australio. 10 Novembro 1929.

ESPERANTO.

A concise History of the International Language.

(By Wm. King, D.B.E.A., Secretary NZEA., Wellington, N.Z.)

(Continued.)

The outline of the progress of 1928 is concluded with two facts; Japan placed Esperanto into an additional number of universities and schools; and several wedding ceremonies were conducted in Esperanto.

Today there are no fewer than 2,000 groups of Esperantists with a membership of about 130,000, but outside these groups, are many thousands of men and women who through various channels have learned the language; and nearly two hundred broadcasting stations in 33 countries have broadcast lessons in Esperanto. It would be impossible, therefore, to say how many have learned the language, but it is believed that not fewer than one million have acquired a knowledge of Esperanto.

According to incomplete statistics compiled by the League of Nations (vide League's Report, 1922) about four million Esperanto textbooks had up to that year been sold, and nearly one hundred thousand had followed Esperanto courses. As regards Esperanto literature, the library of the Esperantists' Central Office contains four thousand volumes, and since 1920 a new book in Esperanto on scientific or other subjects is published every day of the year; and at the present time there are poets and writers, Eastern and Western,

who are adding to the stores. The Esperanto Press includes about one hundred reviews and periodicals, one of them appearing in Braille for the use of the blind, which has a circulation of 750 copies. A glance at the Esperantists' book-list discloses many gems of literature of various nations, the Bible, works of Dickens, Shakespeare, Sir Rider Haggard, Moliere, Jerome K. Jerome, Goethe and Schiller. In addition to a host of Esperanto text-books—30 textbooks and 8 dictionaries in English—and literature relative to the language and its history, an abundance under the headings of fiction, drama, verse, religion and philosophy, sociology and politics, and commerce, science, and technics, is to be found. Pitmanic and Gregg systems of shorthand, as well as others, have been adapted to Esperanto; and a Esperantist Stenographers' Association has been formed. Esperanto gramophone records, entertaining and educational, have been manufactured, many Esperantists using them as means ensuring uniformity in pronunciation.

Numerous countries and towns have issued guide books in Esperanto, these receiving a world-wide distribution per medium of the Universal Esperanto Association; and post-offices in many towns display Esperanto notices. Other countries provide bonuses for postal, tramway, and railway officers and policemen who have learned Esperanto. The International Labor Office of the League of Nations publishes 10,000 copies of its bulletin in Esperanto. Well-known international fairs, such

as the Paris, Basle, Padua, Lisbon, Bratislau, Bordeaux, Breslau, Barcelona, Malmo, Prague, Vienna, Helsingfors, Lyons, Frankfurt and the Leipzig Fairs issue prospectuses in the language.

(continued.)

ESPERANTO AND CLASSICAL CULTURE.

From the camp of the classicists too often are heard voices opposing Esp-o—evidence of a view that calls for adjustment. Logically, the Latinist, the Hellenist, and the Sanscrit scholar, such as the late Profs. Max Muller and Meyer, and Prof. G. M. Murray, with us today, should be among the staunchest supporters of Esp-o.

While the needs of modern life make incumbent the mastery of foreign languages, there is found in practice a tendency to study several of them superficially, rather than one of them profoundly. Meanwhile, in the higher schools neglect of the classics is steadily increasing. There are many who note this with satisfaction, glad that their children are to be spared the agony of wrestling with Latin declensions or Greek conjugations. With an eye on realities they prefer that a child should know how to repeat parrot-like identical phrases in four or five different languages.

On the other hand, many regret this attitude to the ancient tongues, holding that this superficial language learning is hurtful not only to the national culture but also to the international sympathies. The study of the same ancient idioms is, they aver, one of the common bases of the civilisation of many nations. They esteem of high value the experience of those mighty people who taught us the principles of art, of law, and of philosophy. They fear that mankind stands to lose heavily if it severs itself from the venerable founts of inspiration. In education circles, in the newspapers, even in Parliament, one hears the din of battle between the classic and the modern languages.

The classicists consider the Esp-ists to be the most rabid of the moderns, and from their side the Esp-ists regard the pleaders for the dead languages as blind to the facts of life, foolish beings, some of whom even yet indulge fancies that Latin may become an instrument of international communication.

Both sides are wrong. The true Latinist knows well that history will not repeat itself here. The day of

Latin as an I.L., although useful in its day, has long since passed, and if the nations assembled authoritatively suggested that such a difficult language were to be chosen as an I.L., that is, to be used by the peoples as well as by the intellectuals, it is certain that the masses would choose a modern tongue, as being at least fitter to the time. Even today, Esp-o is more widely used, and more usable, than Latin (which, in practice, is limited to purely ecclesiastical affairs), and it was not without consideration that the International Telegraphic Union modified its regulations so as to place Esperanto within the scope of Art. vii.

If this easy I.L. were taught in all the schools of the world, the practical side of the problem would be solved, and the claims of modern life would no longer play the decisive role in the battle between the dead and the living tongues. The question would then resolve itself into a matter of choice. Everyone would be free to base his culture on a study of modern languages or on classical ones, or on a more profound study of one modern and one classical tongue, according to his intellectual preference, and not under the pressure of material necessity. Perhaps the time will come when, in greater numbers, Western students will be able to explore the treasuries of Sanscrit and Arabic, and so feel a deepened consciousness of their relationship to the East.

Sure it is that in the atmosphere produced by the universal acceptance of Esp-o, the study of Latin and Greek in Europe, and Sanscrit in Asia, would receive strong impulse to flourish again. Without Esp-o, modern languages will certainly gain the day, through sheer human necessity; with Esp-o, the dead tongues have a chance.

Instead of wrangling, or shrugging the shoulders, it would be wiser for us, Esp-istoj, to politely explain the above to the classicists; and if these listen objectively they will sooner or later realise that they have grave cause to be friendly with us, in order that their cherished ideals may be preserved. It seems an audacious paradox, but it is a profound truth nevertheless, if only one gives it a little thought.

According to the Esperanto of Dr. E. Privat, in May "Esperanto."—Robo.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Danke ni kvitanças ricevon de fidelulaj abonoj jene:—Amiko 20/-; per s-ro Cox 1/3; A. Slade 9/-, julio, '31; H. Love 4/6, julio, '30; Syd. Esp. Club

(anonco) 5/6, aŭg., '30; D. Guilbert 1/-; s-ino M. Dunne, 4/6, majo, '30; M. Maronovich, 5/-, aŭg., '30; s-ino Trewin, 4/6, sep., '30; f-ino Fairfield, 4/6, okt., '29; d-ro W. Lamb, 4/6, aŭg., '30; s-ino Payne, 5/-, okt., '30; k 2/- pro anonco; E. Cox, 4/6, julio, '30; s-ino F. Tondut, 4/6, junio, '30.

VOJAĜBILETOJ.

Altkreska, maldika viro li estis, kun delikattrajta vizaĝo kaj trankvila sinteno. Ĉe li mi tuj senĝeniĝis. Mi sentis tian malsarĝon, ke mi decidis ĉion konfesi, kaj fidi je lia kompato. Unue mi moderigis mian voĉon kaj hontmiene konfesis mian kompletan nescion pri fremdlanda vojaĝado. Li tute ne montris tiun malestimon kiun mi ne dubis, persono en lia pozicio devus senti. Eĉ pli moderigante la voĉon, mi demandis pri pasportoj, temo kiu neeviteble eligis la sciigon, ke ĉi tio estos mielmonata vojaĝo. Li montris sufiĉe ĝentilan intereson kaj kompletan mankon de scivolemo. Mi sentis profundan dankon, tiom pli, ke tiumomente mi ekvidis la amuzitan alrigardon de lia juna helpisto kaj ekkomprenis, ke prefere ol fari al li tiajn konfesojn, mi tuj aĉetus biletojn al Devonshire.

La plej malbona momento do forpasis, kaj mi ekdiskutis miajn planojn kun s-ro Johnson. Mi nomis la lokojn en Italujo, kiujn mi deziris viziti, kaj tuj mi konsciigis pri ŝanĝo en lia sinteno. Lia antaŭa ĝentila intereso jam fariĝis entuziasmo. Sendube li havis vastan scion pri la lando. Li ŝajnis preta kaj dezirema tre longe preparoli ĉiun detalon de mia projektita rondvojaĝo. Por li hortabeloj enhavis neniam terurojn; en lia kapo li ŝajne portadis nevideblan fervojan gvidlibron italan; nur unufoje li petis la blondharan junulon serĉi por li horkombinon. Antaŭ ol mi eliris la oficejon, ŝajnis, ke jam en lia menso staris kompletigita bildo de la tuta rondvojaĝo.

Post tio mi havis kun li multnombrajn interparolojn, kaj ĉiam li impresis min sammaniere. Unue, kiam ni diskutis pasportojn, Ĉanel-transirvojojn, kaj Parizajn hotelojn, li montris ĝentilan intereson; sed de post la momento kiam ni, transirinte la landlimon, eniris Italujon, lia intereso fariĝis entuziasma kaj vigla. Lia entuziasmo estis infekta; ĝue mi aŭskultadis lin, ĉar dum li parolis, ŝajnis, ke la lokoj priskribitaj de li starigis antaŭ niaj okuloj.

Jen li diris, "Mi rezervigis ĉambron por vi ĉe hotelo apud la rivero Lungarno en Florenco. Estas tie pli trankvile ol en la urbo. Vi superri-

gardos la riveron kaj vi povos vidi la Ponte Vecchio de via litĉambro." Jen, "Mi opiniis, ke plaĉos al vi esti apud la Granda Kanalo en Venecio. Loĝado en la hoteloj tie estas pli multekosta, sed valoras povi rigardi la trafikon kaj vivon sur la Kanalo, kaj vi estos tute proksima al Sta. Marko kaj la Placo." Plue li diris, "Mi konsilus al vi resti en Bellagio. Estas videblaj de tie ambaŭ brakoj de la lago, kaj vi povos transiri al Menaggio kaj Cadenabbia en malmulte da minutoj." Lia voĉo ame emfazigis la multsilabajn nomojn.

Fine venis la tago de mia lasta vizito ĉe la oficejo. La lerta juna helpisto salutis min per gaja rideto, kaj sciigis al mi, ke s-ro Johnson estis forvokita por kelke da minutoj kaj petis, ke ĉi mi bonvolu plenigi kelkajn blankojn, kiujn li submetis al mi. Lia kontrolo de miaj penoj estis tiel kuraĝiga, ke mi sentis deziron ekkonversacii kun li. "Mi supozas, ke s-ro Johnson laboras ĉi tie de post longa tempo?" mi komencis diri. "Pli ol tridek jaroj," li respondis indifere.

"Li havas mirindan scion pri Italujo," mi daŭrigis. "Nu, kompreneble, tio estas lia speciala fako," li klarigis. "Sed fakte, li amegas la landon. Li legas ĉiun libron pri Italujo, kiun li povas havigi al si. La subuloj ĉi tie nomas lin 'Maljuna Italujo.' Li eĉ prenadis lecionojn de itala lingvo por ke li ĝustamaniere elparoli la nomojn."

"Li do ne estis ĉe unu el viaj italaj oficejoj," mi diris. "Ne," li respondis. "Mi pensas, ke li esperis, ke tio okazu, kiam li unue venis ĉi tie, sed oni neniam translokigis lin."

"Mi pensis, ke li iam loĝis en la lando," mi diris. "Sed mi supozas, ke li havis multajn okazojn por ĝin viziti."

La junulo rigardis min momente kaj diris tutkvieste: "S-ro Johnson neniam estis ekster Anglujo, sinjoro."

Dum momento mi preskaŭ ne povis kredi lin. "Sed kiel li povus scii pri tiom da detaletoj...?" Li interrompis min dirante: "Ho, tio estas sufiĉe facila. Kiam li aranĝas rondvojaĝon por iu, li petas tiun, ke li vizitu lin poste kaj priskribu al li ĉion."

La afero ankoraŭ ŝajnis al mi nekredibla. "Sed kial li ne iris? Ĉu li ne volis iri?"

"Ho, li ja volis iri. Estis pro tio, ke li aliĝis al la firmo. Sed li edziĝis frue, kaj mi supozas, ke pro tio li devas monŝpari. Li estis ironta al la italaj lagoj por sia mielmonato, sed lia edzino malsaniĝis en Londono la unuan tagon."

"Sed ĉu post tio ne estis eble—?"

mi demandis. Li levis la ŝultrojn. "Malfortika edzino kaj kvar infanoj! Nenia ŝanco por vojaĝi post tiam."

Antaŭ ol mi povis respondi s-ro Johnson mem alvenis. Niaj aferoj baldaŭ finiĝis. Li kontrolis kun mi la vojaĝbiletojn, kaj transdonante ilin al mi, li deziris al mi bonan vojaĝon per sia kvietaj, gaja voĉo. Mi dankis lin pro lia afableco. "Estas nenio," li diris, sed aldonis kvazaŭ senpripense, kiam mi turniĝis por foriri, "Kiam vi jam revenos, vi eble vizitu min, por sciigi, ĉu ĉio iris bone."

El "The Manchester Guardian," trad. por "La S.K." de Wilfred Ingle, Varese, Italujo.

RECENZO.

La Dormanto Vekiĝas.

Eldonaĵo de The Esp. Publishing Co. Prezo, tolbindita 5 ŝil.; brosurita 3/6p., per AEA.

Jen frua elmetaĵo de la genio de H. G. Wells. La Esp-a traduko multloke konservas la anglan parolturnecon, sed necesas kromdiri, ke la "perpleksiĝo" de la originalo ankaŭ troviĝas reflekte antaŭ la leganto Esp-a. Tie k tie konstatata estas troa sinligo de la traduko al la anglaĵo, ĝenanta iagrade al neanglalingvanoj, kiuj tre povos cerbumi super aludoj aŭ esprimpropraĵoj de la aŭtoro. Tradukontoj tenu regulon havigi al si kontrolhelpon de spertuloj kun gepatra lingvo sufiĉe malparenca. Tio, kvankam ne en ĉiu kazo nepre necesa, donus ĝenerale pli da certeco, ke la stilo fluu sen la pezo de propralingva trafilaĵo.

Kelkaj radikoj estas uzataj en aliaj sencoj ol la donitaj de OKL. Inter ili: spion', agac', period', kontrol', diven', kontur', prov', observ'; neologismoj tro ofte aperas. Jen "tranco" (alissignifa en F.I.H.P.), darfi, konekti (kunigi, kunligi), bobelo ((sap) veziko), bran-kardo (portlito, homportilo), kontesti (uzata laŭ F. contestar?), obskur', inĝenia (genia) estas nenecesaj.

Neklaraj linioj: 61. Vicoj da fantomaj blankaj konturoj, kvazaŭ la fantomoj de kovritaj fenestroj . . . ; "ŝveliganta perpleksiĝo" 17/30; neĝotuŝita lumo" 60/20; "ombrotremigita" 53/15; "histeriajn ombrojn" 94/7; "senkoloran intencon" 94/24; nova vorto, kia "merĝado" 160/10 nepre ricevu por si klarigan piednoton; sensenca faro enmeti "paŭperejo" 145/14, Kaj "banderlog" sen ia klarignoto; precize kion signifas "subtil" 17/36 laŭ la tradukinto?

Kelkaj pres- kaj gramatikaj eraroj makulas la cetere bele aperigitan libron.

"Kirl'i" estas trans., do ĉe 56, 57, 59 "kirl'" devas esti "kirlig'"; "flave vestitoj" (—aj); 5/4 sia (lia); "subite" taŭge povus anstataŭi la monotone uzatan "abrupte" en multaj lokoj; uziĝas tri formoj kun "spite" (—al, —kun akuz., —kun nom.) La aŭtoro ĉe tio pli ĝuste uzus "malgraŭ," kiu cetere forestas rimarkinde la tekston. Se "veras," kial ne "belas," "bonas" ktp.? "Subenflugo," "suprena"; ĉu iu internacia stilmajstro adjektivigas adverbojn direktajn? "Teosofio" (z); "Goodwin" 168 (Godwin); 30/10 "krom pro" estas nebona. Kp. "se ne estus," Bat. de l'Vivo 74/12. "maloftaj neĝeroj" 59/20 (maldensaj); "iadirekte" 79/34 (senceldirekte); "ĉie ajn" 172/30 (ĉie aliloke); "dumtempa" 36/35 (pasanta, malmultedaŭra). Kelkloke devas esti adjektiva participo anstataŭ la neĝusta adverba. "Nigra festono, pendante" (a); "koridoro kondukante (a).

La tradukinto akceptu konsilon submeti sian verkon al fremdlingvaj redaktoroj por sincera kritiko, kaj li reviziu ĝin por estonta eldono laŭ sia konstatita sintezo de la ricevataj plibonig-sugestioj. Aŭ, plibone, li kontroligu ĝin rekte ĉe la E.L.A.

—Robo.

KRONIKO.

AUCKLAND, Nov-Zelando:—Je la 23a de okt. la societo enoficigis s-ron k f-inon Wheeler kiel honorajn sekretarion k kasistinon. Kordankas ni al la ekŝiginto de la duobla ofico, s-ino Watkin, kiu longtempon elportis sindone siajn taskojn rilate E-ton en Auckland.

Paroladoj semajne de radiejo 1YA. Ĝis fino de sep/o pastro Wolloxall "pri-espertantis" kvarfoje, s-ro Wheeler dufoje, k nia prez-o, s-ro Russell unu fojon. S-ro Wheeler ankaŭ kantis E-te. La radiejstro favoras la lingvon; jam montriĝis li amiko. Ĉiuĵaŭde la "Star" enhavas serion da lecionoj.

CHRISTCHURCH, N.Z.—Nune tri fakoj ĉe niaj kunvenoj, nigratabula, gramatika, k koresponda. Anoj unuafakaj studas bildojn k skizojn, parole k skribe, en la dua ili pritraktas gramatikon, k triafake ili korespondas internacie. La lan de okt. anoj vesperon pasigis ĉedome de s-ro Bell, kie ili praktikis karlingve. Gratulon al s-ro Bell, jam la kvina delegito de UEA en N.Z. Li oficas por Christchurch.

WELLINGTON, N.Z.—La ĉefurba klubo aranĝis kable reprezentadon ĉe la Esperanto-Kongreso en Perth. Same faris la NZEA. Ambaŭ ekspedis al la kongreso sukcesesprimojn. Lastatempe-vizitantoj estis s-ro S. Ujdur

TO ALL OUR WELL-WISHERS !

We feel it timely to ask those who receive the "Suda Kruco" from month to month to kindly consider their position as subscribers, and, if unfinancial in this respect, to observe the moral obligation of renewing their subscription. The task of ensuring the regular appearing of our gazette is rendered unnecessarily difficult by the inattention to this important duty, the fulfillment of which—an annual visit to the nearest Post Office for a 4/6 (or 5/- N.Z. money order) postal note—should surely represent but small sacrifice to him who really believes in the need for Esperanto and its fitness to meet that need.

If in doubt, send this small sum to "Suda Kruco," Box 731F, P.O., Elizabeth-st., Melb. It will be thankfully and correctly acknowledged in current issue.

REDAKCIO.

(Auckland), s-ro V. Sowry (Mangamaire), kiu lernis E-ton per radio, k d-ro J. Vilmits, el Sidnejo. La doctoro estas latvia ĵurnalisto, mondvojaĝanta.

En Junio la jarkunveno de la Melburna Esperanto-Societo okazis kaj, dum lia foresto, oni unuanime elektis kiel prezidanton s-ron P. Hudson. Je lia reveno s-ro Hudson akceptis la oficon kaj la oficistaro nun estas: prez-o, s-ro P. Hudson; vic-prez-oj, f-ino L. Irwin kaj s-ro P. Holmes; sek-iino, f-ino V. Cox; kasisto, s-ro E. Cox; bibliotekisto, s-ro Bishop.

Je la naŭa de Okt., s-ro Pyke bone parolis de 3LO.

Je dimanĉo, la 13a de la monato, la E-tistoj faris ekskurson ĝis "Luffman's Hill" ĉe Ringwood, kie oni kolektis sovaĝflorojn kaj admiris la belan panoramon videblan de la monteto.

La Melb. Esperanto-Klubo aranĝis vesperon je 16a de Okt., por festi la revenon de ges-roj Rawson post liber-tempo en la kamparo. Oni vidis multe da bone konataj vizaĝoj inter la ĉeestantoj.

Je la 16a de Okt., s-ro Skurrie donis lecion pri Esperanto, antaŭ proks. 100 anoj de l' Societo de Katolikaj Junuloj, ĉe Hawthorn. Ili montris entuziasmon, kaj la starigo de Esp. grupo efektiviĝos preskaŭ tuj.

En la lasta monata s-ro Skurrie veturis ĝis Bendigo, kie oni aranĝis ke li donu paroladon pri Esperanto. Starigo de grupo sub gvido de s-ro Wookey, sekvis. Ĉian sukceson al la nova grupo!

NEKROLOGO.

With regret we announce the death of Miss Jean Chisholm, who was a member of the Melbourne Esperanto Society for some years prior to her last long illness, and the sincere sympathy of members is extended to her aunt, Miss E. Chisholm.

IMPORTANT !

The January number of "Suda Kruco" will be published on 28th December (Sat.) owing to the holidays.

Kindly send current "Kroniko" as early as possible.

KLASIKA LEGOLIBRO.

Broŝuro eldonita de Em. Robert, 6 Rue Ravignan, Parizo 18; prezo afrankite F. fr. 1.50. Kolekto de plej diversaj legaĵoj. Pro la lingva korekteco tiu libreto estas rekomendinda por ĉiuj Esperantokursoj.

POINTS IN THE ADVANCE.

We have learned since last issue—

That the French Chamber of Commerce now publishes an Esperanto section in its Bulletin Mensuel.

That the Daily Herald (London) now has elementary and advanced courses of Esp. for its readers.

That the International Esperanto Museum has been opened by the Austrian President in the National Library as a State Institution with grant from the Government.

DO YOU ENJOY GOOD HEALTH?**SANA—SANA—SANIGA.**

Thanks to Esperanto, Australia is now able to benefit from Switzerland's foremost medical discovery, NOVOCHIMOSIN (Novo-Kjm) which is a remedy for every type of gastro-intestinal disorder and its sequels. "Incurable" cases yield to this remedy, which contains no drugs or chemicals, being a biological product.

All chemists CAN supply "Novo-Kim" or it will be forwarded upon receipt of a P.N. for 5/- by the agents: The Saniga Company of Australia, P.O. Box 1106, Melbourne.

That Esp. is now taught compulsorily to 200 boys at Ellesmere Port, Cheshire, Eng.

That H.M.V. has recorded "En la Drinkejo," sung by a leading singer of the Budapest Opera House at the Congress of Esp.

That a history of the international language movement written by the Esperantist, E. Drezen, has been published with Government support in Russia.

That Esp. is taught in many schools in Poland, eighteen in the district of Bialystok alone.

That the first Esperanto talkie has been made, by Paramount-Famous Players-Lasky. A three-minute "shoot" of the president of the North American Esp. Congress, Henry Hetzel, and Mrs. Charles Chomette, in a dialogue.

That in the Swedish Workers' Educ. Assoc. there are 235 circles for Esperanto study, and only 148 for English. Two years ago the reverse was the case.

ESPERANTO.

Congress in Perth.

Delegates to the Esperanto Congress were tendered a civic reception in the City Council Chambers on 8th October. The representatives included Mrs. Sainsbury (Q.), Misses N. Gibson (S.A.) and M. Jeffrey (Wellington), Messrs. C. Caine (Universal Esperanto Assoc.), T. Burt (British Assoc.), Walker (Sydney), H. Byatt (Melb.), Cadden (Auckland), Steitz (Germany), L. C. Mansfield (Austria), Repley (Czechoslovakia), Davis (Yugo-Slavia) and Saar (Estonia).

The Lord Mayor (Mr. J. T. Franklin) welcomed the guests, and his remarks were supplemented by Cr. Berryman, who said that his travels in many parts of the world had convinced him of the need for a common language. Many misunderstandings could be overcome in that way. For instance, the slang Australian word "grafter" was applied to a hard worker. In America the same term was used for a dishonest person. The use of an interlanguage would leave no room for mistaken meanings.

Mr. T. Burt said they have sought to induce representatives to attend from all parts of the world that they might have first-hand information of the State's progress, but the distance had made a good representation impossible. There were several Esperanto

societies in Western Australia, which were able to extend a welcome to foreigners, who would otherwise, through language difficulties, feel stranded.

Mr. Mansfield said that the International Esperanto Congress just held in Budapest was attended by 1,200 delegates from over 30 countries. The Austrian Government had given a big grant for the establishment in Vienna of an international Esperanto museum. Professor Murdoch had recently told him that the language would be placed on the syllabus for the 1931 examinations. In other countries the same interest was shown in the movement. The aim was to teach children both their native tongue and Esperanto.

The Lord Mayor had consented to become a member of the honorary committee of the International Esperanto Museum.

Mr. Caine also responded to the welcome.

(According to the "West Australian" report).

KURSO PER TRADUKADO.

(kondukata de s-ro G. Gordon, F.B.E.A.; sek-iino, f-ino B. Blyth, 10 Victoria-av., Surrey Hills, E.10.)

TRADUKO 3.

GIPPSLANDA MISTERO.

(daŭrigata.)

Laŭdire de "The Port Phillip Patriot" de la dudeka de Oktobro mil okcent kvardek ses la registaro intencis sendi ankaŭ ĉevalrajdan ekspedicion. Ĉiukaze la plej zorga penado de la serĉaj ekspedicioj estis vana. Ili ne trovis (1) blankulan virinon, kaj la poezia anonco en du lingvoj ne sukcesis venigi la supozatan (3) kaptitinon (2) al la homoj celantaj (3) ŝin savi. Se ja ekzistis kaptita (3) virino, ŝia sorto devas ĉiam resti nesolvebla mistero. Eble pri la afero estis miksaĵo de fikтивaj indiĝenaj historietoj, ĉar en tiu tempo la blankulaj kolonietanoj ankoraŭ ne kutimiĝis al tiu karakteraĵo de la landidoj. Poste oni sciigis, ke blanka figuraĵo de virino, prenita (3) el rompiĝinta (3) ŝipo, estis vidita en la posedo de indiĝenoj, por kiuj ĝi eble havis embleman signifon. En tiu tempo ŝipoj ofte portis sub la busprito (4) skulptitan (3) figuraĵon de Britania. kaj por la nigruloj tio estus mirindega objekto. Pli poste nigrulo donis similan raporton al esplorantaro serĉanta (3) oleofonton en Norda Teritorio, kaj tio kaŭzis serĉon en Arnheim Land

por blankula virino supozeble surbordiginta (3) el la vaporŝipo Douglas Mawson (elp: doglas moson) (5). Oni traserĉis la regionon. faris specialan policejon. kaj sensacifaraj gazetoj publikigis tre ekscitajn kaj imagplenajn rakontojn pri la sorto de la supozata (3) virino, sed la raporto pruviĝis tiel nekredinda kiel mito kaj sen forta bazo, kaj neniam troviĝis (1) signo de tia blankula virino.—(La fino).

INSULA ĜARDENO EDENA.

Sur la orienta marbordo de Nova Gvineo ĉe la kvin-kaj-duona grado de suda latitudo kaj la cent-kvardek-sesa grado de okcidenta longitudo sidas la malgranda kolonieto Madang en ideala loko rilate al klimato kaj ĉe la piedo de rokplena montarĉeno, kiu abrupte sin levas malantaŭ ĝi kaj havas kovraĵon el netrairebla arbeto. Dum la vaporŝipo veturas preter la insulo Kar Kar kaj proksimiĝas al la ĉefa insulo, agrable trafas la okulojn de vojaĝanto prospektivo el malhela tropika verdaĵo, en kiu tie ĉi okazas pecoj de brilkolora indiĝena floraro. Ĉiuflanke sur la deklivo ĝis la marbordo estas aroj de la ĉieaj facile balanciĝantaj (3) palmoj. La ŝipo eniras la havenon tra tordecan pasejon inter duone submaraj rifoj, sur kiuj malforta ondmoviĝado intermite rompiĝas en blankan akvon. Baldaŭ vidiĝas la ruĝe tegmentitaj (3) domoj de la kolonieto, starantaj (3) sub kokosujoj laŭ la tuta longo de la marfronto. Forte tenas la okulojn la sceno el multenombraj malgrandaj sed trege pentrindaj atoloj kaj ilia fono la alta montaro, de kiu fluas sennombraj riveretoj por fordoni sian akvon en la havenon, la bluan klaregan maron. Ĉio tio sub tropika suno, kies radioj prezentas en ĉiam ŝanĝiĝantaj koloroj la mirindajn belaĵojn, faras neperdeblan impreson sur la menson.—(daŭrigota).

NOTARO 3.

Preseraroj.—Notaro 1, noto 1 "plibonigu" (plibonigi); noto 4 "emociigi" (emociigis): (1) "was encountered." Notaro 1/4.—2. Substantiva participo, Notaro 1/9.—3. Adjektiva participo. Notaro 1/6.—4. "busprito" (Scienca Vortaro de Verax).—5. Ne transliteru nomojn de modernaj personoj.—6. Iuj

kursanoj tro penas imiti la frazkonstruon de la Angla originalo, kaj, tion farante, faras al si tute eviteblajn malfacilaĵojn. Oni relegu "Konsiletoj al Tradukantoj."

N.Z. ESPERANTO DEPUTATION. Minister's Reply.

The N.Z. Minister of Education, Mr. H. Atmore, forwarded on September 27th to the hon. secretary of the N.Z.E.A. his reply to the deputation which waited on him on July 12th last to urge the introduction of Esperanto into the curricula of the Primary, Secondary and Technical Schools and the University Colleges of the Dominion.

The Minister stated that while fully appreciating the very laudable objective the Association has in view, he much regretted that he was unable to grant the Association's request "in view of the fact that the subjects of instruction are at present so numerous and varied and the syllabus so full of important work."

Despite this negative reply, the N.Z.E.A. regards its effort with satisfaction, for the deputation performed the important service not only of directing official attention towards Esperanto, but also, by means of Dominion-wide Press reports, of notifying the public that the movement with all its ramifications is now firmly established and in full operation.

ELLERNADO.

(Pri la malemo de multaj Esperantistoj al aĉeto de Esperanta literaturo).

Efektive la Esperanta popolo ne estas tiel multenombra, kiel montras kelkaj statistikoj. Ni legas pri miloj kaj miloj da aĉetintoj de gramatikoj, da aliĝintoj al rondoj, en kiuj oni sin diletante okupas kelkafoje pri Esperanto! Sed tiu amorfa maso ne estas homogena popolo, kiu efektive praktikas la lingvon. Por tiu maso Esperanto restas akcesoraĵo. Ĝi ne kapablas sukcesigi eldonfirmon Esperantlingvan, ĉar ĝi ne havigas sufiĉan nombron de abonantoj. En Esperantujo estas tro da esploristoj, kaj ne sufiĉe da civitanoj. Multaj tute ne interesiĝas pri litera-

HAROLD PUDNEY

Kial fuŝe skribaĉi per kripla fontanplumo? Vi povas denove senti tiun plezuron, kiun donas facile funkcia fontanplumo, se vi alportas ĝin al H. Pudney, multjara spertiĝinto, kiu lerte riparos ĝin je malalta kosto ĝis re-

Specialisto pri Fontanplumoj

noveco.

Ĉu nova fontanplumo kiel donaco, aŭ por vi mem? El ĉiu speco ili kuŝas ĉe li je facilaj prezoj. Aparta atento donata al poŝt-mendoj.

Notu adreson:—

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

turaĵo aŭ gazeto, pro tio, ke ili ne ellernis la lingvon. La plimulto el niaj nuntempaj "Esperantistoj" nur duonkomprenas Esperantan tekston. Ili estas kaj restas en la sama lingva stato, kiel knaboj, kiuj scipovas silabi nur facilan frazon: La patro estas bona. Ĉu infano, kiu nur povas silabi lernejaĵajn frazojn, aĉetas literaturaĵon aŭ gazeton? Tute ne!

Ni estru Esperanton tiel, kiel ni estras la nacian lingvon. Nur tiam nia Esperanta literaturo povos plene flori. —(Mallongigite: el "Espero Katolika").

PRI VIRINA PSIAO.

La kredaĵo el mezepoko, nome, ke la pliparto de la virinoj estas diabloj, estas nur infanmensa. Moderna Sta. Antono ricevas mokridon kune kun konsilo, preni al si edzinon, por ke li konduku, kiel prudenta homo. La virinoj estas nek pli bonaj nek pli malbonaj ol la viroj. Troviĝas en ambaŭ seksoj ja fort- kaj malfortkarakteraj, nepasiĝaj kaj emaj al pasiondoj, bonmoraj kaj malĉastaj ktp. La diferencoj inter la du seksoj nur estas tiuj, kiuj helpas al la daŭra ekzistado de la homa speco. Kontrastate kun la viroj, la virinoj estas pli emociemaj, kaj iliaj emocioj moviĝas pli supraĵe de ilia naturo; iliaj korsentoj estas pli facile tuŝitaj je vido al la sufero. Ili estas pli amemaj kaj restas pli konstante en siaj amoj. Ĉiuj tiuj nomitaj kvalitoj bone efikas sur la vivi-eltenadon de iliaj infanoj. La virinoj estas tute tiel honestaj kaj veremaj, kiel la viroj, krom tiam, kiam ili devigiĝas ruzi pro sia malsupera korpoforto. Ĉe ĉiuj seksrilatecoj ilia intuicio estas pli vigla ol la vira. La amo kaj pasio estas en ili almenaŭ tiel fortaj, kiel en la viroj, sed tiuj sentoj ne tiel facile flamiĝas, kaj jam florantaj ili daŭras ne tre longe kaj nur kun intertempoj de senardo. Moderaj fiereco je korpaspekto kaj emo sinornami estas tute laŭnaturaj ĉe la virino, ĉar tio faras ilin pli allogaj, kaj tial havigas al ili pli vastan elektokampon rilate al estonta edzo. Ke virino serĉadu laŭplane sian tutvivan kunvivanton estas same dece kaj rajte, kiel estas, ke la viro amindumu, volante edzinon.

Tiuj patrinoj, helpantaj siajn filinojn en tiu rilato, faras la plej altan patrinan devon. Malestimeginda patrino estas tiu, kiu, malfidela al sia sankta devo, nur pro la bonhavo de iu riĉulo vendas la filinon en efektivan prostituecon, vualitan de la nomo de edzineco, al

viro, pri kiu neeble estas, ke la filino lin amu.—J. I. PARSONS, "Evoluado klarigita." Trad. Robo.

WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere, ĉe 197 Murray St., Perth, kontraŭ Boans Ltd, Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, S-ino Sainsbury, "Noeline," Carrington St., Maylands, W.A.

Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo. Prezidanto, S-ro A. Dewar; Sekretariino, S-ino L. Payne, 8 Bruce Strato. Kunvenas en ĉiu lundo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas la duan lundon de ĉiu monato je 7.45a horo vespere ĉe Nov-Preĝeja Halo (New Church Hall) Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell. Sekretariino: S-ino E. M. Watkin. Komunikaĵojn al la prezidanto ĉe Kent's Buildings, Newmarket, Auckland.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro P. Hudson; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je la oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro A. E. Pryke; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 174 Burwood Road, Burwood.

Brisbana Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str., proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Klement Kidd. Vicprezidantoj: Fraŭlino Rose Macpherson; M. Hyde. Sekretario: Fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane, Kvinlando (Queensland).

Wellington Esperanto Club.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralic Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.



La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham.

Specimena numero—unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kuponon.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 114 (Ninth Year) Melburno (Melbourne), Aŭstralio. 10 Decembro 1929

ESPERANTO.

A concise History of the International Language.

(By Wm. King, D.B.E.A., Secretary NZEA., Wellington, N.Z.)

Concluded.

The organisers of the last named Fair circularised by this means 180,000 manufacturers in 71 countries in connection with the fair of this year. Newspapers and periodicals in every country are now devoting space to Esperanto, and radio journals in almost every country are advocating it.

In addition to the various national congresses, there have been held 20 world's congresses of Esperanto, held in different towns. The first took place at Boulogne, in which 688 Esperantists from 20 lands attended, and the last at Antwerp, when over 1500 delegates were present from 35 lands. King Albert of Belgium, who has been interested in Esperanto since 1911, was the patron of the Congress. Such congresses extend over a period of 10 days, and Esperanto is the sole language used. The church, the theatre, and the various sectional and professional gatherings are conducted entirely in Esperanto, and no difficulty is experienced. The Esperanto world has now arranged for the 21st Congress, to be held in Budapest in July and August of this year. In addition to this important congress, the World's Federation of Educational Associations will meet in congress at Geneva in July when, as in the case of the Con-

ference of the World's Touring and Advertising Assoc., held at Frankfurt during Easter, of this year, Esperanto is to be used in the various sessions of the congress and will be the sole translation language.

International organisations and offices are very specially interested in the spreading of an auxiliary language, and Esperanto has been adopted by many of them. Besides those mentioned throughout this statement, the following are among others supporting Esperanto:— The World Union of International Associations, the International Red Cross, the International Pharmaceutical Federation, the Young Men's Christian Assoc. (Y.M.C.A.), the International Women's Suffrage Alliance, the International Bibliographical Institute, the International Federation of Hatters, the International Order of Good Templars Neutral, the International Catholic League, the Catholic International League of Youth, the International Bureau of Freemasons, the International Peace Bureau, the World Union of Women, the International Bureau for the Protection of Aborigines, the International Bureau of Spiritism, the Postal International, the Women's International League of Peace and Freedom, and the International Labor Office.

The Esperanto movement itself has generated the following special organisations:—

The Universal Assoc. of Blind Esperantists, 380 members in 28 lands.

The International Assoc. of Es-

perantist Railwaymen, 630 members with national representatives in 16 countries.

The World's Youth Esperanto Assoc., with national secretaries in 23 lands.

The International Society of Esperantist Lawyers, founded in 1906.

Three Catholic Unions each with its own gazette and members in 30 lands.

International Esperantists' Christian Union, founded in 1913.

World Non-national Assoc., 6000 members in 35 lands.

World's Assoc. of Esperantist Doctors, founded in 1909 and publishing its own gazette.

Esperantists' Literary Association, founded in 1911.

World Assoc. of Esperantist Teachers, 630 members.

World Police League with 58 groups and 3,200 members and own official organ.

International League of Esperantist Post, Telegraph and Telephone Officers, with delegates in 35 lands. Publishes a gazette.

International Radio Assoc., with national secretaries in 26 lands.

International Science Assoc. of Esperantists, founded in 1906.

Scouts' Esperantists' League, founded in 1918 and publishing its official organ "The Scouts' Herald." 500 members.

Esperantists' Sports League.

International Assoc. of Esperantist Stenographers. Publishes the gazette "The International Stenographer."

Theosophical Esperanto League, founded in 1911 and publishing an official organ.

Esperantist League of Vegetarians, founded in 1908.

Although geographically isolated and as far as the life of her people are concerned, coming into direct contact with no country of a different speech, New Zealand has not neglected the international language. For the above-mentioned reasons, the language has not met with the same progress here as it has overseas, but what has been done has been solid. As early as 1904 the pioneers of Esperanto formed a New Zealand Esperanto Association, which held one congress—during the New Zealand Exhibition at Christchurch. This Association became inactive through the War. At Wellington, Feilding, Hamilton, and Whangarei

are delegates of the Universal Esperanto Association, who attend to a large volume of correspondence relating to various matters affecting New Zealand, particularly commercial, touring and national topics. Each delegate is virtually an advertising agent for the Dominion. Four radio-stations have broadcast Esperanto items, the Wellington station (2.Y.A.) in 1927 broadcast a course of 20 lessons in the language. In accordance with the recommendation of the League of Nations, and the authorisation of the Telegraph Union, the Post and Telegraph Department has amended its regulations to permit the acceptance of Esperanto telegrams as a clear language at ordinary rates. Esperanto clubs and societies have functioned at Wellington, Auckland, Christchurch, Hamilton and Masterton for some time, and recently a club was formed at Dunedin. In January last, in a national conference of Esperantists held at Wellington, the members revived the previous Association and although operating only for a few months, the membership has already reached 150 persons of all ranks. The Prime Minister, Sir Joseph Ward, Sir Robert Stout, and Sir George Fowlds, President of the Auckland University, are patrons of the Association, having supported the language for many years. The movement is at the present time showing steady growth; the newspapers, with a few exceptions, by publishing articles and news regarding the language, contribute in no small way to the stimulation of the public interest in the matter.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Danke ni kvitancas pri jenaj fidelulaj abonoj:—

N. R. Mills 4/6, julio, '30; W. McPherson 6/- jano., '31; A. Serpell 4/6, sepo., '30; s-ino R. Bigelow 5/-, sepo., '30; H. Byatt 10/- julio, '30; J. Dobrich k f-ino Ivanus 10/- aŭg., '30 k marto, '30; K. Takahaŝi 10/- junio, '30.

ANGLA LINGVO NETAŬGAS.

Centra Kleriga Fakoj de la Vienaj tramistoj decidis forigi de ŝia instruplano la anglan lingvon pro la malbonaj spertoj akiritaj per tiu ĉi lingvo (la C.Kl.F. elspezis dum la pasintaj jaroj centojn da ŝilingoj por anglaj kursoj—la sukceso estis nula) kaj enkonduki en la instruplanon nur Es-

peranton. Jam dum pasintaj jaroj estis aranĝataj en diversaj remizoj vesperaj E-kursoj, kiuj pro la neregula deĵorado de la tramistoj ne povis havi la deziratan sukceson; sed nun estos la kursoj aranĝataj centre, la C.K.I.F. prizorgos mem la propagandon inter la tramistoj kaj aranĝos teknike la kursojn tiel, ke estu eble al ĉiu kursano viziti la kurson sen interrompo. La C.K.I.F. certe ne faras la aferon pro speciala amo aŭ emo al Esperanto, ĝi ja antaŭe provis la anglan lingvon, sed la fera, malvarma realo montris al ĝi la ĝustan vojon.

SERVICE IN ESPERANTO.

For the first time in W.A. a Divine service in Esperanto took place, in Oct., in the Temperance Hall, Museum street, when Mr. Burt, the president of the Esperanto Congress, addressed a gathering of Esperantists on "La Amo de Dio," and the utility of Esperanto was shown in the treatment of the subject. The speaker pointed out that English did not differentiate between the subjective and the objective genitive—between the love of God for man, and the love which man had for God. He chose many texts to prove that Esperanto gave clearly the meaning which the original intended to convey. Six hymns were sung.

ESPERANTO GUIDE BOOK THROUGH VIENNA

All interested in the Austrian capital are invited to send to „Austria Fremdultrafika Oficejo“, Wien 1., Friedrichstr 7, for its artistic and informative guide book. Of 60 pages, pocket size, illustrated richly with photos., the publication is a striking evidence of the valued support of the Austrian Government. In faultless Esp-o every place worth visiting is described crisply, yet with no omission of an interesting detail. May this venture in the use of Esp-o be justified by a wide response.

SYDNEY ESPERANTO SOCIETY.

Dec. 12—Fabloj . . . Miss F. Smith
 „ 19—Zamenhof Celebration.
 „ 26—Vacation.
 Jan. 2—Vacation.
 „ 9—La Kvara dimensio de spaco . . . Mr. I. Serishev
 „ 16—Australian Bushrangers—
 Mr. A. Jamieson
 „ 23—Eltrovo de Australia—
 Mr. H. Torr
 „ 30—Conversazione.

GRATULON.

S-ro Wm. McGuigan, Wellington, sukcesis ĉe la unuagrada ekzameno de la B.E.A. Korgratulon!

AN ACCEPTABLE GIFT.

You believe in Esperanto and what it stands for? Pass this copy of "La Suda Kruco" on to your friend; or better still, send to us your friend's name and address, together with 4/6, and we will post to him each copy for the ensuing twelve months.

Both your friend and your Esperanto journal will benefit by your thoughtfulness.

KURSO PER TRADUKADO.

(konduktra de s-ro G. Gordon, F.B.E.A., sek-iino, f-ino B. Blyth, 10 Victoria-av., Surrey Hills, Melb., E.10.)

TRADUKO 4

.. INSULA ĜARDENO EDENA ..
 (daurigata.)

La haveno de Madang estas grandioza verko de la Granda Majstro, kaj la verkanto de la nuna artikolo opinias, ke laŭ beleco kaj sendanĝereco por ŝipoj ĝi konkuras la mondfaman havenon de Sydney, kvankam povas esti, ke ĝi estas malpli granda. En ĝiaj vastaj spacoj de trankvila akvo, sin etendantaj (1) trans kapoj de la ĉeflando, troviĝas oportunaj kaj sendanĝeraj ankregoj por ŝipoj de dek dumil tonoj (2). Estas certe, ke en tempo de militado en Pacifiko la haveno de Madang havos grandan valoron pro sia sendanĝereco por ŝipoj en ĉiaj veteroj. La kolonietasidas en la vulkana zono, kaj en ĝi iufoje okazas tertremoj, tamen malofte. Konstruita preskaŭ tute el la profito de la eksportado de plumoj de paradizeoj (3) la Madanga kolonieto estas malgranda, malgrava, havanta (1) ĉirkaŭ tridek blankajn loĝantojn (4), kies plimulto sin okupas pri administrado sub la Aŭstralia registaro. En la ĉirkaŭaĵo estas kelkaj negrandaj plantejoj de kokosujoj, kaj tial, ke (5) vaporŝipo alvenas ĉiun trian semajnon, Madang estas komuna centra tenejo por la produktoj de la regiono. Ĝi posedas du tre bonajn ludejojn de laŭteniso, kiuj havigas al la loĝantoj la solan rimedon por amuziĝado. Grandparto de la manĝaĵoj estas el konservaj ladvazoj; glacio, freŝaj viando kaj legomoj estas kelkaj el multaj komfortaĵoj, kiujn tiuj homoj devas malhavi en la plenumado de sia devo en tiu malproksima posteno de la Brita imperio. La tieaj indiĝenoj similas al la tipo ĉie renkontata (1) en la teritorio laŭ tio, ke ili estas mallaboremaj kaj sen interesoj ekster si (6).

Aŭstralio regas la landon sub mandato de Ligo de Nacioj kaj nomas administranton, sub kiu loĝas en Madang oficisto por kontroli la distrikton. Policianoj varbitaj (1) el la indiĝenaj viroj patrolas la distrikton kaj pli vere pro la admirego (7) de la popolo al la uniformo ol pro ĝia timo aŭ respekto, ili konservas ŝajnon de obeado al la leĝaro kaj bonordon. Inter indiĝenaj fruktoj sin trovas sur la montetoj papaj (3), "soursops" (8), pandanoj kaj bananoj.

La bestaro (9) de la lando konsistas el tre malmultaj specoj; krokodiloj troviĝas en multaj el la kriktoj (10) kaj manglaj (3) marĉoj. Paradizeoj (3) abundas en malfacile alireblaj partoj de la montetoj kaj rapide plimultiĝas de kiam ili ricevis protekton de rigora leĝo. La distrikto estas iom malbonfama pro malario kaj "blackwater" (nigrakva) febro, sed pro tio, ke (5) la lokaj oficialaj sanistoj bone prizorgas ĝin, malsano estas tre malofta. Pro ĝia sidloko Madang posedas varman, tropikan klimaton, mildigatan (1) de la tradoj (3) kaj estas tolerebla pro sia proksimo de la maro. La pluvado estas tre multa, precipe tia en la malseka sezono, daŭranta (1) de Oktobro ĝis Februaro, kaj malofte pasas tago sen pluvego. (daŭrigota).

NOTARO 4

1. Adjektiva participo. Notaro 1/6—2. "tono." La vorto estas en "Marista Terminaro" de Rollet de l'Isle kaj en la scienca leksikono de Verax, tamen iuj aliaj vortaristoj donas "tuno."—3. Verax,—4. Akuzativo ĉar "ĉirkaŭ" ĉi tie ne estas prepozicio sed signifas "proksimume".—5. "tia, ke" (aŭ "pro tio, ke" aŭ "ĉar").—6. "lotus-eating". Figura esprimo. Vidu Anglan leksikonon.—7. "awe". En la Angla lingvo la vorto havas diversajn nuancojn, kaj en la Esperanta literaturo oni trovas "respektego" (Psa. v. 7), "estimego" (Psa. xxii, 23), "timomiro," "adoradmiro" "solena timo," "pia ekstazo".—8. Kiam en Esperanta leksikono ne troviĝas la nomo de iu natura objekto, kaj oni ne trovas la sciencan nomon en Angla leksikono, estas bone nur uzi la Anglan vorton inter citsignoj. Ordinare oni trovas sciencan nomon en la Angla difino en bonaj Anglaj leksikonoj kaj enciklopedioj.—9. Ĉiu vivanta estaĵo, posedanta la kapablon senti kaj sin. movi, estas besto. (Kabe).—10. "creek". La vorto ĉi tie ne havas la Aŭstralian signifon "brook," "small stream," sed la Anglan signifon "inlet of sea."

POINTS IN THE ADVANCE.

Since our last issue we have learned-- That the next Universal Congress of Esp-o. will be held at Oxford in Aug., 1930.

That the famous French literary weekly "Monde" now publishes a half-page in Esp-o. Specimen copy from 50 rue Etienne Marcel, Paris.

That the New Testament can now be had in pocket size from 6d. to 6/-. Order through A.E.A.

That the membership of the Japanese Esp. Institute is now 2181.

That at Budapest, under Government ægis, 12 days' instruction enabled 70 teachers from various countries to converse with representatives of 34 nations at the Congress.

LETERO EL JAPANUJO.

Jen elĉerpo el ŝatesprime verkita skribo de jap. samprincipano K. Takahaŝi, Ŝizuoka.

24/9/29.

. E-to k malriĉeco ŝajnas esti neapartigeblaj unu de la alia, ne nur ĉe organizaĵoj (NZZA ŝajnas fariĝi escepto dank'al la malavareco de la mortinta s-ino Ensom) sed ankaŭ ĉe individuoj. Mi ankoraŭ ne konas iun redaktejon nek sam-on sufiĉe riĉan.

Hodiaŭ mi eltiris de via gazeto (aŭg.n-ro) kelke da linioj en la malsupro de ĝia unua paĝo, t.e., „many an E-tist“, k la tutaĵon de la rimarko de d-ro Marshall, k disdonis al kelkaj amikoj-neesp-istoj, kiuj koncernas la venontan int. teknikan kong.

Hazarde leginte La Nuntempaj Virinoj mi ekridegis. Mi rakontis ĝin al edzino sidanta apud mi. Ŝi diris ke ŝi trovis la saman humorajon en iu el niaj gazetoj—eble trad. laŭ la sama originalo.

EL LA HINDA LINGVO.

SIVAĜI estas alloga 68-paĝa drameto el la hinduja historio de la deksepa jarcento. La verkinto estas juna hindu, kiu, vizitante Svedujon por studoj, okaze interesiĝis pri Esperanto kaj fervore komencis ĝin studi. Post apenaŭ unujara lernado li nun traveturas Svedujon, farante prelegojn en Esperanto pri sia hejmlando kaj ĝia popolo, tiamaniere propagandante. Kun flamanta entuziasmo li akceptis la mondlingvan ideon kaj ĝian efektivigon per Esperanto.

La stilo estas simpla. La aŭtoro studu la radikojn "mistik'", "protek'". La unua estas religia fakvorto, kaj la

dua ne signifas "sirm'" (de danĝero), "defend'" "gard'", sed "ŝirmi iun per sia rekomendo kaj influo" Kio estas la senco vere de "florumado"? ĉu "plenfloranteco", "floradeco"?

Sivaĝi estas la unua verko de Laksmishwar Sinha, kaj pro neesto de kroma nomo, supozende lia originalaĵo. Ĝin eldonis Eldona Societo Esperanto, Stockholm. Prezo 1.50 Kr.

THE CANBERRA ESPERANTO SOCIETY.

The above Society held its first meeting in the rooms of Messrs Bersten Bros., Civic Centre, Canberra, at 8 o'clock on Tuesday evening, 19th November, at which a number of influential citizens was present.

A set of Rules was discussed and agreed upon, and the election of officers resulted in Major C. L. Clarke being elected President, Messrs. Bersten and R. A. Broinowski, Vice-Presidents; Mr. J. Henry, Hon. Secretary and Treasurer, and Messrs. C. G. Garriock and G. Halle and Miss B. Bevan as Committee.

It was decided to hold the Annual Meeting in June of each year and the Ordinary Meetings on every Tuesday at 8 p.m. each week, and that the annual subscription should be 5/-.

It is evident from the enthusiasm displayed by those present on Tuesday last, that Esperanto will arouse the same public interest in Canberra as it has done in the other Capital Cities of Australia.

KRONIKO.

Auckland, Nov-Zelando. — Daŭra sukceso ĉi-loke farata danke energian laboron de flamaj samprincipanoj. Ĉiusemajnaj disaŭdigoj pri E.-movado k gramatiko, de konversacioj en E-to inter du flulanguloj, k de kantadoj allogas multujn al la lingvo k ĉi-ties bazideo. Krome, la "Star" aperigas jaŭdade E-an kolonon. Tiomefike estas la propagando, ke ĉi-tiea firmo vendis 2—300 lernolibroj; je unufoja neokazo de la E-a disaŭdigo el radiejo 1YA, pli ol 300 esplordemandoj riceviĝis ĉe la koncerto, s-ro G. Wheeler!

Klubanoj progresas stude; sepo jam atendas ekzamenan demandaron el Anglujo. La sek-io, s-ro Wheeler, perpoŝte nun instruas ĉ. 80 studulojn en diverspartoj de N.Z.

La NZEA sek-io, s-ro W. King, el Wellington, nin vizitis je 11a de nov. k faris informoplenan paroladon pri E. movado en N.Z. k pri la naci-asocia funkciado.

Christchurch, N.Z.—La 7an de okt. s-ro M. Bell, M.A., priparolis de 3YA "Amikecon inter la nacioj per Esp-o." S-ro Bell ankaŭ traktis pri E-an gramatikon. Plejbone deklaminte E-an poemon, f-ino L. Samms pro tio gajnis havindan premion, donacon de f-ino Saunders. La infanklaso (Stela Rondo) kun ĉ. 30 lern. koraltige donas rezultaton al sperta gvido de s-ro A. More.

Melbourne.—Alveninte ĉe Belgrave per vagonaro aŭ aŭtomobiloj, multaj E-tistoj el ambaŭ Melburnaj kluboj, pasigis feliĉan tagon je la 10a de Nov-o. Matene la ekskursanoj amuziĝis per ludoj; tagmeze ili sin regalis per diversaj manĝindaĵoj, kaj poste promenigis Selby por vidi la belan pejzaĝon. Reveninte la domon ili denove festenis babile, kaj poste ekiris hejmen.

La lasta dancado de l'Melburna Societo de la jaro okazis je 4a de Nov. en la halo de la Fervoja Instituto. La afero estis granda sukceso.

Post lia reveno, s-ro P. Hudson donis al membroj du paroladojn pri sia vojaĝo en Hindujo. Li priskribis detale palacojn, templojn kaj aliajn vidindaĵojn, kiujn li vidis, kaj montris al anoj kuriozajn vazojn kaj tranĉilojn.

PERTH—Ŝipestro Claxton, alveninte ĉe Fremantle de Anglujo en sia ŝipo Bonthorpe, vizitis la kunvenejon en sep-o. La Westralia Esperanto Society kore donis al li la manon. S-ro C. faris Esp. paroladon pri la vojaĝo de sia ŝipo k la arto marfiŝojn kapti. Li montris sur kelkajn fotografiaĵojn, por ilustrati la rakonton. Espereble ni ĝue aŭskultos baldaŭ pluan de nia marista sam-o.

DO YOU ENJOY GOOD HEALTH?

SANA—SANA—SANIGA.

Thanks to Esperanto, Australia is now able to benefit from Switzerland's foremost medical discovery, NOVOCHIMOSIN (Novo-Kim) which is a remedy for every type of gastro-intestinal disorder and its sequels. "Incurable" cases yield to this remedy, which contains no drugs or chemicals, being a biological product.

All chemists CAN supply "Novo-Kim" or it will be forwarded upon receipt of a P.N. for 5/- by the agents: The Saniga Company of Australia, P.O. Box 1106, Melbourne.

S-ro Burt k Mansfield, organizantoj de nia kongreso en Perth, ĉeestis la 26an de sep. S-ro B. sciigis klubanojn pri kongresaferoj.

Anoj ĥorvoĉe bonvenigis nian prezon, s-ron H. Byatt, felice jam resaniĝintan post longa k severa malsano.

Detempe de la klubfondo meznombro alestas la kunvenojn 16 membroj.

N.Z.E.A.

Since its formation in January last, 202 members in 75 localities have been enrolled in the New Zealand Esperanto Association. Below are the names of the towns, etc., in which N.Z.E.A. members are resident. Should any reader desire it, the relative addresses will be supplied by the hon. secretary of the N.Z.E.A. (Mr. Wm. H. King), 119a Kelburn Parade, Wellington:—

Auckland, Balclutha, Christchurch, Cust, Dannevirke, Dargaville, Devonport, Dunedin, East Oxford, Ellerslie, Feilding, Frankton Junction, Glenside, Greymouth, Half-way Bush, Hamilton, Hamilton North, Hastings, Hawarden, Helena Bay, Henderson, Heriot, Hokitika, Huapai, Invercargill, Johnsonville, Kaikoura, Kaipara Flats, Khandallah, Kilbirnie, Kingsland, Lower Hutt, Mangamaire, Maraetai, Masterton, Matamata, Mititai, Morningside, Morrinsville, Mt. Albert, Nelson, Newmarket, New Plymouth, Ngahauranga, Okaihau, Okorioro, Onehunga, Oratia, Oxford, Palmerston North, Parua Bay, Patetonga, Reefton, Riccarton, Ruakaka, Seatoun, Stratford, Taipuhi, Tarras, Taumarere, Tawa Flat, Te Araroa, Te Puke, Teuku Timaru, Tinui, Waihi, Waimate, Waimauku, Wairoa, Waiuku, Wanganui, Wellington, Whangarei, and Willowbridge.

Wellington has the greatest number of members, 32, Auckland being second with 23, Masterton third with 15, Hamilton fourth with 14, and Christchurch fifth with 11. It augurs well that included in the membership, are four M's.P. and 14 schoolteachers.

B.E.S.-a ADRESARO.

For a Swiss franc one may obtain the excellent address book of the Bohema Esperanto-Servo, Potštejn, Ĉeĥoslovakio, which contains over 1000 names and addresses of corresponding E-tists, many of whom are in non-European countries, especially in Egypt. Over 100 portraits grace this booklet of 90 pg. An essential to the "Korespondemulo."

CENZURITAJ!

La ĉi-subaj strofoj ricevis de la hungara registaro forstrekon el la programo Esp.-Kongresa. Pro tio ili sendube havas por legantoj aldonitan intereson. En ili la malsubmetiĝa, libera spirito de la lupo estas favore kontrastata kun la kaŭranta, sklavema de la bonmanĝa hundo.

Kanto De La Hundoj.

A. Peton.

Fajfegas la ventego
Sub peza, nigra nub'
De l' vintro du ĝemeloj:
Frapadas neg' kaj pluv'.
Sed kiom nin koncernas!
La bona grand-sinjor'
En kuirej'-angulo
Nin lasas kun favor'.
Pri manĝo ni ne zorgas;
Post lia satmanĝad'
La niaj estas ĉiuj
Restaĵoj sur la plad'.
Ja vere, ke kelkfoje
Eksonas vipa plaud',
Doloras plaŭdo, sed ja
Saniĝas hunda haŭt'.
Kaj se kolero pasis
Nin vokas la Sinjor'
Piedojn. liajn lekas
Ni kun feliĉa kor'.

Kanto De La Lupoj.

Fajfegas la ventego
Sub peza, nigra nub'
De l' vintro du ĝemeloj
Frapadas neg' kaj pluv'.
Ni loĝas en la nuda
Dezerto sen defend'
Ne ŝirmas tie nin eĉ
Arbeta branĉotend'.
Ekstere la malvarmo,
Interne la malsat':
Du niaj turmentantoj,
Nin pelas sen kompat'.
Kaj tie, jen la tria:
Pafil' kun kugloŝut'.
Ruĝiĝas blanka neĝo
Per nia sangogut'.
Ni frostas kaj malsatas,
Hurlante pro l' mizer',
Kun kuglo en la flank'...sed
Ni vivas en liber'!

Trad. el la hungara K. de Kalocsay.

MISS ESPERANTO.

Etiology is an interesting science. We now know that Miss Veronika Eksta owes indirectly to the Swedish Prince Charles her title of Miss Esperanto, the most beautiful woman at the Budapest Esperanto Congress.

The prince, as spokesman for the Swedish Esperantists, invited Pastor Andrew Che to Sweden to arrange an Esperanto course for teachers. Che

came, and taught several hundreds in Sweden, then left for Estonia, where the Education Minister, impressed by the Hungarian pastor's astonishing success, invited him to demonstrate his "direct method" in Tallinn. Miss Eksta attended this course, thoroughly-learned Esperanto, saved for her first voyage abroad—to the World Congress of Esperanto at Budapest.

She was induced to enter the beauty contest there, in which some 100 girls from 37 countries paraded for the coveted title. She was acclaimed the queen of beauty. Baron Karl Kazy, representing the Ministry, wished to congratulate the girl, but although he spoke German, English, and French, besides his native Hungarian, and although Miss Esperanto could charm in Russian, her mother tongue Estonian, and Esperanto, an interpreter was needed! The baron expressed the conviction that he must learn Esperanto, notwithstanding his ability to discourse in three "world tongues."

BELA JOE.

Jen 310-paĝa eldonaĵo de la BEA, verkita en formo de memrakontita historio de hundo, ironie nomita Bela Joe pro ĝia stumpigita postpendaĵo k fortranĉitaj oreloj. Marshall Saunders, la aŭtoro, konata usona porjunula verkisto, elplumigis la nune recenzatan por konkurso elektonta tiun hundhistorion plejindan alpreni rajton sidi ĉe la jam tiam mondfama ĉevalhistorio Black Beauty (Nigra Belulo). Pli ol miliono da ekz. da Bela Joe, vestitaj per kelkaj lingvoj, jam vendiĝis tra la mondo. La traduko Esp-a estis kunlabore farita de s-ro James Blaikie k rusa samideano N. Hohlov. saĝe imitinda procedo, kiu tamen ĉi-kaze ne faris la cetere facilfluan tradukon aŭ gramatike plenperfekta aŭ senidiotisma.

La libro alte taŭgas por junuloj, instigas kultivon de bontraktaj rilatoj al bestoj, k entute provizas sufiĉe neĝenan k korektan medion por komenca legpenado. Mi skribis "entute," ĉar pro verŝajna denova eldono ni al-tiras atenton de la tradukintoj al jeno:—

kredi (pensi); aludo (mencio); penseme (enpense); daŭre (permanently, por ĉiam); provi (peni); surmeti (al si); graŭli (ne internacia, kolere plendi); foje (unu fojon); abundo de (da); mi estus pli komforta (estus al mi pli komforte); bedaŭre "surpriz'" k "mir'" fariĝas sinonimaj; protekti (defendi); oftfoje la estinta verbtempo neĝuste estas uzata anstataŭ la estanta, ekzemple; "mi ne haltis por pensi, ke mi estis (-as) nur hundo"; ĉasi (persekuti); "rab'" estigas ideon pri perforto (ŝtel'); observi (vidi); lumigita (pirlumita); ekzameni (esplori); kontrolbrido ("curb"; neĝusta uzo de kontrol'); recit' (deklam'); lunde (iun lundon, la lastan lundon?); 176 di vi (?); 198/9, grava eraro estas traduki la anglan "past imperfect" (would do, used to do) per la Esp-a kondiĉa modo -us anstataŭ -adis. Kp. Eliro 18/26. 33/9, "Moses used to..."; havos respondi (devos r.); post ke (p. kiam); daŭrado, stamina, endurance (eltenado); estis estinta (jam antaŭe estis); ĉagrenigi (ĉagreni); "so that," tiel ke (tial); agaci ("irritate." sen-malpacien-cigi, koleretigi, kolerinciti). Iom diskutinde ankaŭ estas certaj uzoj de la korelativoj.

Prezo 3½ ŝil. per AEA aŭ BEA.

—Robo.

PRI H. G. WELLS.

Jam de preskaŭ 35 jaroj fekundpense verkas H. G. Wells, malamiko al ĉia socihipokrito, simpatia interpretisto de la meza sociklaso de Anglujo, unuaranga brita publicisto, kaj profeto de la metalmonstra epoko. Ĉu ni povus tro multe danki al li pro lia "Mr. Britling sees it through" (s-ro B. eltenas ĝis fino), unu el la plej famaj, se ne la unikfama, angla romano de la militega tempo? Kiam ni vidos sur la bretoj de nia librejo Esp-ajn tradukojn de liaj "Nevidebla Homo," "La Tempomaŝino" "La Milito de la Mondo," "La Manĉaĵo de la Dioj," kaj tiun kun-sentatan psiĥo-studaĵon pri la ŝanĝadanta en viron junulo, "Kipps"?

Lia mirinda verkaro antaŭen-pensa ŝprucas el funda scienca kaj sociologia klerhavo; liaj aŭdacaj skriboj pri la

HAROLD PUDNEY

Kial fuŝe skribaĉi per kripla fontanplumo? Vi povas denove senti tiun plezuron, kiun donas facile funkcia fontanplumo, se vi alportas ĝin al H. Pudney, multjara spertiĝinto, kiu lerte riparos ĝin je malalta kosto ĝis re-

7 **EQUITABLE PLACE,**

Specialisto pri Fontanplumoj

noveco.

Ĉu nova fontanplumo kiel donaco, aŭ por vi mem? El ĉiu speco ili kuŝas ĉe li je facilaj prezoj. Aparta atento donata al poŝt-mendoj.

Notu adreson:—

MELBOURNE.

teologio, el vera spiriteco kaj males-timo al ĉia tre rigida religiformo. Tamen povas kuŝi ioma vero en la kritiko de iu ankaŭ atentiga verkanto pri la aktuala, dekano Inge, per kio tiu nomas lin frakasisto de historiaĵoj. Ĉu ne vere en sia "Skizo de la Mond-historio" li lasas sin foje aserti tro supraĵe dogmeme?

Li nun havas 63 jarojn. Lia lasta libro, la trivoluma "William Clissold," estis preskaŭ-fiasko ĉe la eldonisto, malgraŭ ke antaŭ dek jaroj liaj verkoj estis inter la plej volonte aĉetataj. Kial li nun devas konstati pri malmultigo de legantoj? Eble pro tio ke lia emo al la politiko k la filozofio jam forpelis el la cerbo-koro la romanistan kapablon, kiu brilas el liaj fruaj verkoj. Liaj lastaj ellaboraĵoj iom tedas, tamen ni esperas, ke antaŭ ol venos la 70a naskiĝdato lia, jam donos li al la mondo pri la nuna tempo k generacio respegulon tian, kia inde levos lin inter la Nemortulojn de la Verkarto.

—Robo.

ORIGINO DE HOMA PAROLO.

Sir Richard Paget, lekciante antaŭ la Reĝa Instituto de Granda Britujo, klarigis kiamaniere la insektoj kaj bestoj komunikas siajn emociojn unu al alia, kaj kiel la homa parolo ekestiĝis. Li diris, ke la emocia stato estas tre ofte esprimata per sono, kiel ekz., en la amkantoj de la griloj kaj birdoj, kaj en tiuj hurloj, zumoj, gruntoj, kaj murmuregoj, la ĝojaj bojoj kaj feliĉpepoj kiujn ni tiel bone konas en la besta mondo.

Pritraktanta la originon de la homa parolo, la lekcianto diris, ke "la primitiva homo esprimis siajn rudimentajn ideojn kaj intencojn per simpla gestado, pleje per la manoj, sed ankaŭ la korpon li geste uzadis. Sed dum tuta tiu tempo la homo estis evoluiganta siajn artojn kaj manlaboraĵojn. La manoj fariĝis al li ĉiam pli okupataj, kaj li sentis sin pli kaj pli en malfacilo, kiam li, devis peni "paroli kun la manoj plenplenaj."

Tute nekonsciante pri tio, li komencis uzi la langon kaj lipojn anstataŭ la manoj. En Eŭropo la pli sude lokitaj gentoj, ĝuantaj pro la klimato sufiĉe facilajn vivojn kaj do pli da manlibereco, ĝis nun ankoraŭ uzas ĉe si multon da siaj mangestoj. La nordaj gentoj, vivantaj laŭ pli rigoraj kondiĉoj, perdis la gestmanieron pro tio ke iliaj manoj ĉiam estis ĉe iu necesa laboro.

La norduloj tial estis devigitaj limigi siajn gestojn preskaŭ tute per la lango kaj lipoj.

El la Angla trad. Robo, Melbourne.

WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere, ĉe 197 Murray St., Perth, kontraŭ Boans Ltd, Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, S-ino Sainsbury, "Noeline," Carrington St., Maylands, W.A.

Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo.

Prezidanto, S-ro A. Dewar; Sekretariino, S-ino L. Payne, 8 Bruce Strato. Kunvenas en ĉiu lundo je la oka horo vespere en la kunveno ĉe la Y.M.C.A.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas la duan lundon de ĉiu monato je 7.45a horo vespere ĉe Nov-Preĝeja Halo (New Church Hall) Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell. Sekretariino: S-ino E. M. Watkin. Komunikaĵojn al la prezidanto ĉe Kent's Buildings, Newmarket, Auckland.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro P. Hudson; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunveno: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je la oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro A. E. Pryke; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 174 Burwood Road, Burwood.

Brisbana Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str., proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Klement Kidd. Viceprezidantoj: Fraŭlino Rose Macpherson; M. Hyde. Sekretario: Fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane, Kvinslando (Queensland).

Wellington Esperanto Club.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralic Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34. Argentine Avenue, Miramar; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.